EBBE VILBORG

# ETIMOLOGIA VORTARO DE ESPERANTO

## VOLUMO 3: K – M

ELDONA

EBBE VILBORG

# ETIMOLOGIA VORTARO DE ESPERANTO

## VOLUMO 3: K – M

ELDONA SOCIETO ESPERANTO
MALMÖ 1993

Ebbe Vilborg:
**ETIMOLOGIA VORTARO DE ESPERANTO**
Volumo 3: K – M

*Eldono:* Eldona Societo Esperanto
Malmö 1993
*Kompostado:* Omnibus, Tyresö
*Kovrilo kaj grafika aranĝo:* Franko Luin
*Preso:* Kristianstads Boktryckeri AB, 1993

ISBN 91 85288 21 7

# ETIMOLOGIA VORTARO DE ESPERANTO

# Klarigo de signoj

| | |
|---|---|
| * | ĉe pralingva radiko aŭ vortformo indikas neatestitan, nur supozatan formon |
| * | ĉe Interlingua-formo indikas vorton ne troveblan en Interlingua-English Dictionary |
| † | arĥaikiĝinta aŭ malofte uzata vorto [formo] |
| > | evoluis al |
| < | evoluis el |
| = | post la sigloj Io (Ido), Ie (Interlingue), Ia (Interlingua) indikas, ke la responda vorto en la resp. lingvo havas formon identan kun la Esperanta |
| [ ] | Interkrampe estas metataj proksimumaj prononcindikoj, bazitaj sur la Esperanta alfabeto; rimarku la jenajn signojn: |
| ó | (ktp) indikas lokon de la akcento |
| ô | (ktp) indikas nazalan vokalon |
| o: | (ktp) indikas longan vokalon |
| ä | indikas vastan antaŭan nerondan vokalon (A *a* en *fat*) |
| e' | indikas mezvastan centran nerondan vokalon (A *a* en *about*) |
| ö | indikas mezvastan antaŭan rondan vokalon (F *eu* en *neuf*) |
| c | indikas la palatal-alveolaran frikativon signitan per *ch* en G *ich* |
| dh | indikas voĉan dentalan frikativon (A *th* en *thing*) |
| th | indikas nevoĉan dentalan frikativon (A *th* en *the*) |
| k' | (ktp) indikas aspiracion de la koncerna plozivo |
| l' | indikas moligitan l-sonon kiel en I *figlio* |
| n' | indikas moligitan n-sonon kiel en F *baigner* |
| 1-8 | indikas la numeron de tiu Oficiala Aldono (OA), en kiu la koncerna radiko estas oficialigita. |

# Sigloj de vortaroj kaj aliaj fontoj

| | |
|---|---|
| *Ald* | Aldono al la Dua Libro (1888) |
| *Bat* | Batalo de l' vivo (tradukis Zamenhof) |
| *Be* | de Beaufront, Dictionnaire Espéranto-Francais (1902) |
| *BEsp* | British Esperantist (periodaĵo) |
| *Cgl* | Cosmoglotta (periodaĵo) |
| *Du* | Dua Libro de l' Lingvo Internacia (1888) |
| *EBV* | Esperanta Bildvortaro (1988) |
| *EdE* | Enciklopedio de Esperanto (1933) |
| *EG* | Meza Vortaro Internacia-Germana (1889) |
| *E-isto* | (La) Esperantisto (periodaĵo 1889-1895) |
| *Ekz* | Ekzercaro |
| *El* | Eliro (Biblio) |
| *ER* | Plena Vortaro Esperanta-Rusa (1909) |
| *Fab* | Fabeloj de Andersen |
| *FK* | Fundamenta Krestomatio (1903) |
| *Fund* | Fundamento de Esperanto (9-a eldono 1963) |
| *GD* | Waringhien, Grand Dictionnaire Espéranto-Francais (1957) |
| *Haml* | Hamleto (tradukis Zamenhof, 8-a eldono 1964) |
| *HdE* | Heroldo de Esperanto (periodaĵo) |
| *Jeĥ* | Jeĥezkel (Biblio) |
| *Jer* | Jeremia (Biblio) |
| *Jes* | Jesaja (Biblio) |
| *Jü* | Jürgensen, Wörterbuch Esperanto-Deutsch, 3-a eld. (1909) |
| *Ka* | Kabe, Vortaro de Esperanto (1910) |
| *Konj* | Konjunktivito (de Zamenhof) |
| *Ktp* | ktp (periodaĵo) |
| *LR* | Lingvaj Respondoj (3-a eld. 1936) |
| *LR II* | Lingvaj Respondoj, nova serio (1913) |

*LV* Waringhien, Lingvo kaj Vivo (1959)
*LZ* Leteroj de Zamenhof, eldonis G.Waringhien (1948)
*Mart* Marta (tradukis Zamenhof)
*MK* Monda Kulturo (periodaĵo)
*OA* Oficiala Aldono (1 –8)
*Par* Kongresaj Paroladoj de Zamenhof (I –VIII)
*PIV* Plena Ilustrita Vortaro (1970)
*PIVS* Plena Ilustrita Vortaro, Suplemento (1987)
*PL* Planlingvistiko (periodaĵo 1981-1986)
*PR* Poŝa Lernolibro por Rusoj (1890)
*Prov* Zamenhof, Proverbaro Esperanta (1961)
*PV* Plena Vortaro (1964)
*PVS* Plena Vortaro, Suplemento (1954)
*Rabe* Rabeno de Baĥaraĥ (tradukis Zamenhof)
*RE* Plena Vortaro Rusa-Internacia (1889)
*Sa 1* Samuel, 1-a libro (Biblio)
*ScR* Scienca Revuo
*Un* Unua Libro (1887); Un R = rusa eldono, Un Po = pola eldono
*UV* Universala Vortaro (1894)
*Ve* Verax, Enciklopedia Vortareto Esperanta (1910)
*Wü* Wüster, Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana (I-IV, 1923-1929)
*ZR* Zamenhof-Radikaro (1927).
*N-ro 14 1888*: Grabowski, La neĝa blovado. Varsovio.
*N-ro 15 1888*: Einstein, La lingvo internacia als beste Lösung des internationalen Weltspracheproblems. Nürnberg.
*N-ro 20 1889*: Einstein, Weltsprachliche Zeit- und Streitfragen. Nürnberg.
*N-ro 29 1889*: Libeks, Starptantinska waloda. Riga.
*N-ro 30 1889*: de Wahl, Princino Mary. Varsovio.
*N-ro 77 1895*: Zamenhof, Polnyj uĉebnik... Varsovio.

# Mallongigoj de lingvoj

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| *A* | angla | *H* | hispana | *Li* | litova |
| *Ak* | akada | *HE* | hindeŭropa pralingvo | *Nd* | nederlanda |
| *Ar* | araba | | | *Nl* | Novial |
| *AS* | anglo-saksa | *(H)E* | hindeŭropa praradiko | *No* | norvega |
| *As* | asiria | | | *Oc* | okcitana |
| *Bg* | bulgara | | atestita nur sur eŭropa teritorio | *P* | portugala |
| *Ĉe* | ĉeĥa | | | *Pe* | persa |
| *Da* | dana | *He* | hebrea | *pEo* | pra-Esperanto |
| *Eg* | egipta | *Hi* | hindia | *pĜ* | praĝermana |
| *Eo* | Esperanto | *Hu* | hungara | *Po* | pola |
| *eo* | Esperanto (neoficiala vorto) | *I* | itala | *pSl* | praslava |
| | | *Ia* | Interlingua | *R* | rusa |
| | | *Ie* | Interlingue (Occidental) | *Sa* | sanskrita |
| *F* | franca | | | *SK* | serbokroata |
| *Fi* | finna | *Io* | Ido | *Sk* | skandinava |
| *Fk* | franka | *Ir* | irlanda | *Sv* | sveda |
| *G* | germana | *Is* | islanda | *Tu* | turka |
| *Gr* | greka (= helena) | *Ji* | jida | *Us* | usona angla |
| | | *Ki* | kimra | *Vp* | Volapük |
| *Gt* | gota | *L* | latina | | |

La koncerna nomo de lingvo estas ofte kompletigata per aldono signanta epokon aŭ nivelon, ekz. por la latina: L mez., L vulg. ktp. Tiuj aldonoj estas klarigataj en la listo de ceteraj mallongigoj.

# Transskriboj

**Transskribo de la helena alfabeto:**
a, b, g, d, e, z, ê, th, i, k, l, m, n, x, o, p, r, s, t, y, ph, kh, ps, ô.

**Transskribo de la rusa alfabeto:**
a, b, v, g, d, e, ë, ĵ, z, i, k, l, m, n, o, p, r, s, t, u, f, ĥ, c, ĉ, ŝ, ŝĉ, -, y, ', e, ju, ja.

**En polaj vortoj, la diakritaj literoj estas redonataj tiel:**
c', l', n', ó, s', z'. Nazalaj a kaj e ne estas speciale markataj.

**En ĉeĥaj vortoj, la literoj kun renversita cirkumflekso estas redonataj tiel:**
é, r', ŝ. Rimarku ankaŭ y' = y kun akuta supersigno.

# Ceteraj mallongigoj

| | |
|---|---|
| *abstr.* | abstrakta |
| *adj.* | adjektivo |
| *am.* | amerika |
| *anat.* | anatomia termino |
| *ank.* | ankaŭ |
| *anst.* | anstataŭ |
| *ant.* | antikv(epok)a |
| *aor.* | aoristo |
| *ark.* | arkitektura termino |
| *art.* | artikolo |
| *bot.* | botanika termino |
| *cer.* | ceremonio |
| *cet.* | cetera(j) |
| *dat.* | dativo |
| *dem.* | demonstrativa |
| *der.* | deriv/aĵo, -ita |
| *dial.* | dialekta formo |
| *dif.* | difinita |
| *dim.* | diminutivo |
| *dmd.* | demanda |
| *dor.* | dorika |
| *dukat.* | dukategoria |
| *Ea* | Esperanta |
| *ekl.* | eklezia |
| *eld.* | eldono |
| *espismo* | esperantismo (=imito de Esperanta formo) |
| *ev.* | eventual/a, -e |
| *f* | Fundamenta radiko |
| *f'* | radiko trovebla en la Fundamento ekster Universala Vortaro |
| *fem.* | femina (=ingenra) |
| *ferv.* | fervoja termino |
| *fig.* | figura senco |
| *fot.* | fotografia termino |
| *fram.* | framasona termino |
| *geogr.* | geografia termino |
| *gram.* | gramatika termino |
| *ĝen.* | ĝenerale |
| *ĝerm.* | ĝermana |
| *her.* | heraldika termino |
| *int.* | internaci/a, -e |
| *intj.* | interjekcio |
| *jc* | jarcento |
| *k* | kaj |
| *k.a.* | kaj aliaj |
| *kem.* | kemia termino |
| *klas.* | klasika |
| *kom.* | komerca termino |
| *konj.* | konjunkcio |
| *konkr.* | konkreta |
| *kp* | komparu |
| *k.s.* | kaj similaj |

| | |
|---|---|
| *ktp* | kaj tiel plu |
| *kul.* | kulinara termino |
| *kunm.* | kunmet/o, -(it)a |
| *l.c.* | loko citita |
| *lit.* | literatura vorto (termino) |
| *L.I.* | lingvo internacia |
| *lok.* | lokativo |
| *mar.* | marista termino |
| *mask.* | maskula (=virgenra) |
| *med.* | medicina (termino); medialo |
| *mez.* | mezepoka |
| *mll* | mallongigo |
| *mod.* | modern(epok)a |
| *muz.* | muzika termino |
| *naŭt.* | naŭtika termino |
| *neof.* | neoficiala |
| *orig.* | origin/a, -e |
| *p.* | paĝo |
| *par.* | parenca |
| *pas.* | pasiv/o, -e |
| *perf.* | perfekta |
| *pers.* | person/o, -a |
| *plur.* | pluralo |
| *pos.* | posesiv/a, -o |
| *postkl.* | postklasika |
| *pp* | parolante pri |
| *pref.* | prefikso |
| *prep.* | prepozicio |
| *prez.* | prezenc/a, -o |
| *pron.* | pronomo |
| *propr.* | propradire |
| *ps-pf* | pseŭdoprefikso |
| *ps-sf* | pseŭdosufikso |
| *ptc* | participo |
| *rad.* | radiko |
| *red.* | redakt/oro, -is |
| *refl.* | refleksiva |
| *reg.* | regiona vorto |
| *resp.* | respektiv/a, -e |
| *ril.* | rilativa |
| *rim.* | rimarku |
| *s.* | kaj sekva(j) |
| *sc.* | scienca (termino) |
| *sekv.* | la sekva |
| *sem.* | semantika |
| *sim.* | similaĵo |
| *sin.* | sinonimo |
| *sing.* | singularo |
| *s.j.* | sen jaro |
| *sk.* | subkomprenu |
| *spec.* | speciale |
| *s.s.* | sama senco |
| *s.t.v.* | sub tiu vorto |
| *subj.* | subjekto |
| *sup.* | supin/o, -a |
| *superl.* | superlativo |
| *supl.* | suplemento |
| *s.v.* | sub la vorto |
| *t.e.* | tio estas |
| *tekn.* | teknika termino |
| *tip.* | tipografia termino |
| *V* | vokalo |
| *var.* | varianto |
| *vb* | verbo |
| *vd.* | vidu |
| *ven.* | venecia |
| *vulg.* | vulgara |
| *Z* | Zamenhof |
| *Za* | Zamenhofa |
| *zool.* | zoologia termino |

# Bibliografiaj indikoj


*Albaut 1992* Vojaĝo tra la landoj. Saarbrücken.

*Backman 1919* Esperanto-svensk ordbok. Stockholm.

*Bastien* Naŭlingva etimologia leksikono. 2-a eld. London 1950.

*Berger 1947* Li lingue international justificat. Chapelle.

*Bianchini* Cursus completus Esperanti. San Vito al Tagliamento 1934.

*Blanke 1985* Internationale Plansprachen. Berlin.

*Boirac 1909* Plena vortaro Franca-Esperanta kaj Esperanta-Franca. Dijon. (Stojan, n-ro 2166.)

*Bokarev 1974* Esperanto-Russkij slovar'. Moskva.

*Briquet* Esperanta teknika medicina vortaro. Bruxelles 1932.

*Biblia Vortaro* Paruzel k.a., Biblia Vortaro. Romo 1984.

*Butler 1967* Esperanto-English Dictionary. London.

*Cart 1903* (kun Merckens & Berthelot) Vocabulaire Francais-Espéranto et Vocabulaire abrégé Espéranto-Francais. 82-a eld. Paris. (Stojan, n-ro 2154.)

*Cherpillod 1989* Akada Leksikono. 2-a eld. Ĉe la aŭtoro.

*Cherpillod 1990* La Zamenhofa radikfarado. Ĉe la aŭtoro.

*Christaller 1923* Deutsch-Esperanto Wörterbuch. (Stojan, n-ro 2434.)

*Collinson 1959* Germanic Elements in the Vocabulary of Esperanto. Esperantologio II:1, p. 1-12.

*Fund* Zamenhof, Fundamento de Esperanto. 9-a eld. Marmande 1963.

*Gold 1980* Towards a Study of possible Yiddish and Hebrew influence on Esperanto. En Szerdahelyi 1980, p. 300-367.

*Gregor 1958* La fontoj de Esperanto. Scienca Revuo 34-35 (vol. (IX, n-roj 2-3), p. 92-110.
*Gregor 1982* sama verko, 2-a eld. Glasgow.
*Lewin 1961* Meteologia Vortaro. En Jarlibro de UEA 1961, dua parto.
*Li kaj Ni* Li kaj Ni. Festlibro por ... G. Waringhien. Antverpeno-La Laguna 1985.
*Lo Jacomo 1981* Liberté ou autorité dans l'évolution de l'Espéranto. Paris.
*LV* vd. Waringhien.
*Mattos (1987)* La deveno de Esperanto. Chapecó s.j.
*Middelkoop 1971* Nederlands-Esperanto-Nederlands. Utrecht-Antwerpen.
*Millidge 1924* The Esperanto-English Dictionary. 5-a eld. Rickmansworth.
*Modrijan* Elementoj latinaj en Esperanto. Ljubljana s.j.
*Nom.anat.* Li Kexi & Albault, Nomina anatomica. Pekino 1989.
*Nordenstorm 1982* Materialo por slanga vortaro de Esperanto, I. Ktp 36/1982
*O'Connor 1904* O'Connor & Hayes, English-Esperanto Dictionary. (Stojan, n-ro 1906.)
*OV* vd. Zamenhof.
*Poŝatlaso* Poŝatlaso de la mondo. Prago 1971.
*Presa Societo 1908* Vortaro franca-esperanta de la Presa Societo.
*PVZ* vd. Zamenhof.
*Ruhrig* Schild & Ruhrig, Wörterbuch Deutsch-Interlingua. Freiburg (Breisgau) s.j.
*Schubert 1989* (red.) Interlinguistics. Berlin-New York.
*Sentis 1906* "Urso" (novelo). Parizo.
*Spiritu de Occ.* Spiritu de Occidental. Li ovre de E. de Wahl. Chapelle 1938.
*Stojan* Bibliografio de internacia lingvo. Genève 1929.
*Szerdahelyi 1987* Principoj de Esperanta etimologio. En Duc Goninaz, Studoj pri la internacia lingvo (Gent 1987), p. 8109-137.
*Waringhien LV* Lingvo kaj Vivo. La Laguna 1959.
*Waringhien 1946* A.B.C. d'Espéranto à l'usage de ceux qui aiment les lettres. Paris.
*Waringhien 1967* sama verko, 2-a eld. Paris.

*Webster* Webster's Third New International Dictionary. Vol. I-II. Springfield, Mass. 1968.

*Wells 1969* Esperanto and English Dictionary. London.

*Wiener 1950* Ĝemelaj radikoj. Esperantologio I:2, p. 98-106.

*Wüster Esp. princ.* Esperantologiaj principoj. Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana, vol. II-III (1925 resp. 1926). Leipzig.

*Zamenhof LR* Lingvaj Respondoj. 3-a eld. Paris 1936.

*Zamenhof OV* Originala Verkaro. Leipzig 1929.

*Zamenhof PVZ* Iam kompletigota Plena Verkaro de L.L. Zamenhof. Kajeroj 1–. Kioto 1973–.

# K

**KABAL/O** (1; RE): A *cab(b)ala*, F *cabal/e*, I(H) *-a*, G *Kabbala*, R *kabal(istik)a*, Po *kabal'a*. ¶ Io =, Ie *cabal/e*, Ia *-a*.

El He *qabbâla* "tradicio; mistiko" de *qabal* "ricevi". Historio de la vorto ĉe Carlevaro, PL 6/1983, p. 4.

**KABAN/O** (2; Jü): A *cabin*, F *caban/e*, (H *-a*), I *capanna*. Bazita sur F. ¶ Io =, Ie *caban/e*, Ia *-a*.

El L *capanna* s.s. (sen certa etimologio). Kp ev. *kabineto*, *kajuto*.

**KABINET/O** (5; RE): AF *cabinet*, G *Kabinett*, I *gabinetto*, Po *gabinet*, (H *-e*), R *kabinet*. Plimulto de la fontlingvoj sugestas *k-*. Ps-sf *-et*. ¶ Io =, Ie *cabinett/e*, Ia *-o*.

Orig. F vorto kun signifo "ĉambreto" (> "laborĉambro, spec. de ministroj" > "ministraro"), klarigita kiel dim. de F *cabine* "kajuto" (var. de *cabane* "kabano", kp tiun) aŭ kiel der. de I *gabbia* "kaĝo" (kp tiun).

**KABL/O** (1; Jü; antaŭe *ŝnur/eg/o*): A(H) *cable*, F *câble*, G *Kabel* [ká-], Po *kabel* [ká-], R *kabel'* [ká-]. Kp ank. I *cavo*. ¶ Io =, Ie *cabl/e*, Ia *-o*.

El L mez. *capulum* "ŝnurego", eble (kun influo de L *capere* "preni", vd. *kapti*) el Ar *ħabl* "ŝnuro". – I *cavo* estas neparenca.

**KABRIOLET/O** (2; RE): AF *cabriol/et* (H *-ê*), G *Kabriolett*, RPo *kabriolet*. Ps-sf *-et*. ¶ Io =, Ia *cabriolet*, Ie *-e*.

F vorto (18a jc), aludanta la 'saltadon' de tiu malpeza tipo de kaleŝo, der. de *cabriole* "kaprosalto", finfine el I *capriolo* "kaprolo" (vd. tiun kaj *kapro*).

**KAĈ/O** (f; RE): Po *kasza* [-ŝ-], R *kaŝa*. Kp Ĉe *kaŝe*. Ĉar *kaŝ-* jam havis alian signifon, Z anstataŭigis ĝin per fonetike proksima sono (*ĉ = tŝ*). ¶ 1894 *grie-*, kp. *grio*. ¶ Io *paplo*, Ia *pappa* (< A *pap*, H *papilla*, I *pappa*); Ie *puré* (< F *purée*).

El pSl **kasja*, par. al Li *kósti* "filtri".

**KADAVR/O** (1; Jü): F *cadav/re*, I *-ere*, G *Kadaver* (nur pp bestoj), (H *cadáver*); L *cadaver*. Kp A *cadaverous* "-eca". ¶ Io =, Ie *cadav/re*, Ia *-ere*. ¶ 1881 *kabr-* (modifo de la sama etimo). ¶ Io =, Ie *cadav/re*, Ia *-ere*.

Propr. "falintaĵo", der. de L *cadere* "fali" (vd. sekv.).

**KADENC/O** (1; Jü): AF *cad/ence*, (H *-encia*), I *-enza*, G *Kadenz*, Po *kadencja*, R *kadencija*. Ps-sf *-enc*.

Propr. "falado" (> "fina tonfalo"), der. de IL *cadere* "fali" (kp. pEo 1878 *kadó* "falu") kun supino *casum*, par. al Sa *cacâda* "estas falinta" (HE rad. **kad-*). Etimologie identa estas *ŝanco*. Ceteraj samfamiliaj vortoj en Eo: *akcidento*, *kadavro*, *kaduka*, *kazo*, *okazo*, *okcidento*.

**KADET/O** (1; RE): AF *cadet*, (H *-e*), I *-to*, G *Kadett*, PoR *kadet*. Ps-sf *-et*. ¶ Io =, Ie *cadett*, Ia *-o*.

F vorto, el Gaskona dial. *capdet* "ĉefo" (orig. signifanta gaskonajn oficirojn ĉe la pariza kortego), dim. de vorto devenanta de L *caput* "kapo" (vd. tiun k *ĉefo*).

**KADR/O** (f; RE): F *cadre*, (H *cuadro*). Kp P *quadro*. Videble bazita sur F. ¶ Io =, Ie *cadre*, Ia *quadro*.

Orig. "kvadrato", el L *quadrus* "kvadrata, kvarangula" (vd. sub *kvar*; kp *kvadrato*).

**KADUK/A** (f; RE): F *caduc*, I(H) *-o*; L *caducus*. (Kp A *caducity*† "-eco".) ¶ Io =, Ie *caduc*, Ia *caduc**.

L vorto, ank. "fal/inta, -onta", der. (sufikso kiel en *laktuko*) de *cadere* "fali" (vd. *kadenco*).

**KAF/O** (f; Un Po): A *coffee*, F(H) *café*, G *Kaffee* [káfe], I *caffè*, R *kofe*, Po *kawa*. Kp L bot. *Coffea arabica* "kafarbo". Bazita ĉefe sur G kun apogo de FI. ¶ Io =, Ie *café*, Ia *caffe*.

Pere de Tu *kahve* el Ar *qahwa* s.s., kredeble orig. "(trinkaĵo, kreskaĵo) el Kafa" (regiono en sudokcidenta Etiopio).

**KAĜ/O** (f; RE): AF *cage* [A -ĝ, F -ĵ], G *Käfig*, I *gabbia*; L *cavea*. Radiko laŭ AF kun normala reprezento de mola *g*, vd. *aĝo*. ¶ 1894 *kag-*. ¶ Io *kajo* [-ĵ-], Ie *cage* [-ĝ-], Ia *cavia*.

Kredeble de HE rad. **kagh-* "ĉirkaŭ/bari, -fermi": Sa *kakṣâ* "zono"; A *hedge* "heĝo" (kp tiun). Kp ank. *kajo*.

**KAHEL/O** (f; RE): G *Kachel* [-ĥ-], R *kafel'*, Po *kafel*. Kp Ji *kakhl* [-ĥ-], Sv *kakel*. Nenie do [-h-], kaj oni devas sin demandi, kial Z ne allasis *-ĥ-* laŭ G; intervokala *-h-* (unika kiel reprezentanto de G *ch*, vd. Cherpillod 1990, 21) certe estas malfacile aŭdebla pro sia malforteco. Tamen la formo restas en 1894. – Szerdahelyi (1987, 24) rimarkigas, ke *ĥ* tute mankas inter la G-etimaj vortoj. ¶ Io *karelo*, Ie *carrel* (< F *carreler* "-i"); Ia *bricca glacé*, propr. "glazurita briko".

El L vulg. **caccalus* "bolpoto" (la unuaj kaheloj estis pelvoformaj), var. de *caccabus* "kaldrono" el Gr *kákkabos* s.s., eble de semida origino (kp Ak *kukubu*).

**KAJ** (f; Un): Gr *kai*. Evidenta etimologio (se ne rimarkigi, ke Gr *ai* kutime reprezentiĝas en Eo per *e*: vd. Cherpillod 1990, 13), kiun Z mem donis en LR (6a eld., p. 30 s.): "ĝi estas vorto greka = la latina '*et*'". Li ankaŭ prezentas la motivon por preferi tiun ĉi vorton al la latin(id)a ekvivalento (LF *et*, I *e*, *ed*): "la vortoj '*e*' kaj '*et*' estis necesaj por la finiĝo de l'adverbo kaj por la sufikso de malgrandeco". Alian motivon donas Privat, VZ 44:"Same plibelsona *kaj* el greka lingvo anstataŭis *e* latinan, ne sufiĉe klaran al oreloj por dividi frazojn sen konfuzo". Kp de Kock, Norda Prismo 1/1962, 27: "[Z] volis havi vorteton finiĝantan vokale kaj prefere kun konsonanto ĉe la komenco, por eviti vokalkolizion kun la finaĵo de antaŭe uzita vorto". – Tamen Grabowski provis *ed* en "La Liro de la Esperantistoj", 1893. ¶ 1881 *e*; 1894 *e*. ¶ Io *e(d)*, Ie *e* (vd. Berger 1947, 6), Ia *e*.

Gr *kai* "kaj; ankaŭ"; kp ank. *kai...kai* "kaj...kaj". Partikulo kun necerta etimologio.

**KAJ/O** (1; Jü) 1) mar. 2) ferv. (Ve): A *quay* [kej] (1,2), F *quai* [ke] (1,2), G *Kai* (1). Kp Sv *kaj* (1). Por Eo *aj* el fina F *-ai*, kp *frajo*, *gaja*. ¶ Io *kayo* (1,2), Ie *caye* (1), *platforme* (2), Ia *quai* (1), *platteforma* (2).

F vorto de gaŭla origino, kp Ki *cae* "ĉirkaŭbaraĵo" (HE rad. **kagh-*, vd. *kaĝo*).

**KAJER/O** (f; Un): F *cahier* [kajé], I(H) *quaderno*, Po *kajet*. Bazita sur F prononco; la neprononcata fina *r* estis adoptita por eviti hiaton kun la substantivkarakteriza vokalo. (Iom alie Szerdahelyi 1987, 125, kiu rigardas la formon kiel kompromisan inter F kaj Po.) ¶ Io *kayero*; Ie *caderne*, Ia *quaderno*.

El L vulg. *quaternus*, orig. "kvaropo de folioj", kp L *quaterni* "kvarope", der. de *quattuor* "kvar" (vd. tiun). Etimologie identa estas *kazerno*.

**KAJUT/O** (f; RE): G *Kajüte*, RPo (ank.Sv) *kajuta*. Eo *-u-* laŭ PoR aŭ kiel anstataŭigo de G *-ü-*, vd. *flustri*. ¶ Io *kabino*, Ie *cabin/e*, Ia *-a* (vd. sub *kabineto*).

G eble el F *cahute* "kabano", kiu povas esti kombino de *cabane* kun *hutte* (ambaŭ "ka-

bano"); tiu ĉi el G *Hütte* s.s., de la sama radiko kiel G *Haut* "haŭto", vd. tiun.

**KAKA/O** (1; RE): A *cocoa*, FI(H) *cacao*, G *Kakao*, PoR *kakao*. Kp L bot. *Theobroma cacao* "-arbo". La finaĵo de la subst. estas efektive parto de la etima radiko, same kiel en *kont/o*, *pian/o*. ¶ Io =, Ie *cacáo*, Ia *cacao*.

Pere de H el Azteka *kakaŭatl*; vd. sub *ĉokolado*.

**KAKT/O** (8; Jü): AF *cactus*, G *Kaktus*, I(H) *cacto*, PoR *kaktus*; L bot. *Cactus*. Kvankam la plimulto de fontlingvoj konservis finan latinecan *-us*, tiu silabo estas tie ĉi ellasita (kiel normale en Eo, vd. Szerdahelyi 1987, 117; Modrijan 17). ¶ Io *kaktuso*, Ie *cacté*, Ia *cacto*.

El Gr *káktos*, nomo de dorna kreskaĵo.

**KAL/O** (f; N-ro 15 1888, RE): A *callosity* "-aĵo", F *cal*, I(H) *callo*; L *call/us*, *-um*. ¶ Io =, Ie *call/e*, Ia *-o*.

Ev. par. al Ki *caled* "malmola", Sa *kína* "ŝvelaĵo".

**KALDRON/O** (f; Un): A *ca(u)ldron*, F *chaudron*, I *caldaia* (kp *calderone* "-ego"), (H *caldero*). Ŝajnas bazita sur la malpli longa (kaj malpli ofta) el la A formoj kun apogo de la I aŭgmentativo (senakcenta *-e-*!).. Ps-sf *-on*. ¶ 1906a *kaldro*. ¶ Io =, Ie *caldron*, Ia *caldier/a*, *-on*.

F *chaudron* der. de *chaudière* s.s. el L postkl. *caldaria* s.s., propr. "ujo por varma (akvo)", de *cal(i)dus* "varma" (> F *chaud*, H *calido*, I *caldo*) de *calere* "esti varma", par. al G *lau* "varmeta".

**KALEJDOSKOP/O** (2; Ald, Be): A *kaleidoscope*, F *caléidoscope*, G *Kaleidoskop*, I *caleidoscop/io* (H *-o*), PoR *kalejdoskop*. Formo paŭsanta la prononcon (proksimume [ej] krom en A); ĉar la vorto estas modernepoka, la origina Gr *ei* (vd. sube) escepte reprezentiĝas per diftongo (normale *i* aŭ *e*, vd. ekz. *ironio*, *muzeo*); Ve tamen donas *kalido-* kiel ĉefan formon, *kalejdo-* kiel varianton.

Farita en A (1816, de Brewster) el Gr *kalós* "bela" (necerta etimologio; kp *kalomelo*), *eídos* "formo, figuro" (vd. *idolo*), *skopeín* "spekti" (vd. *mikroskopo* k plue *spektaklo*), 'ĉar ĝi ebligas vidi belajn figurojn'.

**KALENDAR/O** (1; RE): A *calend/ar*, F *-rier*, I(H) *-ario*, G *Kalender*, Po *kalend/arz*, R *-ar'*. Kp la L originformon sube. Ps-sf *-ar(i)*.

El L *calendarium* "konto-, rento/libro", der. de *calendae (kal-)* "unua tago de monato", kredeble el *calare* "proklami" (ĉar tiuj tagoj estis proklamataj de heroldo), vd. *klara*. Kp spec. sekv.

**KALENDUL/O** (2; Jü): L bot. *Calendula*; I *calendola*, (H *caléndula*). Botanika termino prenita el L. ¶ Io =, Ie *calendul*, Ia *-a*.

Nomo farita de Lineo, evidente der. de L *calendae* "unua tago de monato" (vd. *kalendaro*) kaj do signifanta "monata (floro)", eble pro ĝia longdaŭra florado.

**KALEŜ/O** (f; Un; *kaleĉ-* N-ro 15 1888): A *calash* [-ŝ], F *calèche* [kalêš], G *Kalesche* [-ŝ-], I *cal/esse* (H *-esa*), Po *kolasa*, R *koljaska*. Ea formo laŭ la prononco de FG. ¶ 1894 *kalec-*. ¶ Io *kalesho*, Ie *caleche*, Ia *calessa**.

El Ĉe *kolesa* "(aperta) veturilo", der. de *kolo* "rado", de HE rad. **kŭel-* "turni", vd. *ciklo* k plue *poluso*.

**KALFATR/I** (f; RE): F *calfater*, G *kalfatern*, I *calafat/are*, (H *-ear*), Po *kalfatrowac'*. Bazita sur G(Po); kp G *flüstern* > *flustri*. ¶ Io *kalfatar*, IeIa *calfatar*.

El Gr mez. *kalaphateín* s.s. el Ar *qalfat'a* s.s.

**KALI/O** (4; Jü): G *Kalium*, R *kalij*; L mod. *kalium*. Nomo probable elektita pro la kemia simbolo *K* (kp Po *potas*, AF *-sium*, H *-io*, I *-sio*). Ps-sf *-i* 2. ¶ Io =, IeIa *kalium*.

Scienca termino farita (19a jc) el la pli malnova termino A *alkali*, Po *-um*, FH *alcali*, G *Alkali* ktp (> eo *alkal/o* EG) el Ar vulg. *al-qalî* (*al* dif. art.), responda al Ar klas. *qilî* "sodo" (rad. *qalâ* "rosti, bruligi").

**KALIBR/O** (2; RE): AF(H) *calibr/e*, I *-o*, G *Kaliber*, Po *kalib/er*, R *-r*.

Pere de I (orig. "instrumento por mezuri

kalibron") kredeble el Ar *qâlib* "muldilo, modelo".

**KALIF/O** (2; Jü): A *cali/ph, -f*, F *calif/e*, (H *-a*), I *-fo*, G *Kalif*, PoR *kalif*. ¶ Io =, Ie *calif*, Ia *-a*.

El Ar *khalîfa* "anstataŭanto, postvenanto" (sk. de Mahometo), der. de *khalafa* "postveni".

**KALIK/O** (f; RE) 1) vazo, 2) bot. (ER): A *chalice* (1,2), FI *calice* (1,2), G *Kelch* (1,2), Po *kielich* (1,2), (H *cáliz* 1,2); L *cal/ix -icis* [kálik-] (1,2). Kp Sv *kalk* (1,2). Bazita sur L (kiel montras la radikfina *k*), kredeble kiel katolika termino. Kp sekv. ¶ Io *kalico* (1,2), Ie *cálice* (1?,2), Ia *calice* (1,2).

Par. al Gr *kylix* "pokalo", *kályx* "florkaliko" k Sa *kaláca-* "poto, pelvo".

**KALIKOT/O** (f; RE): A *calic/o*, F *-ot*, I *-ò*, (H *-ó*), G *Kaliko*, Po *kaliko*, R *kolenkor*. Radikfine bazita sur F ortografio (kiel *kamlot/o*), tie ĉi evidente por eviti kolizion kun *kalik-*; oni povas kompari *trikot/o* : *trik/i*. ¶ Io *kaliko*, Ie *calic/ó*, Ia *-o*.

El la nomo de la sudhindia urbo *Kolikodu* (A *Calicut*, eo *Kalikat/o* Pošatlaso), konata kiel fabrikejo de kotonaj ŝtofoj.

**KALK/O** (f; RE): F *chaux* (kp *calcaire* "-a"), G *Kalk*, I *calce*, (H *cal*); L *cal/x -cis* [kalks, kálkis]. Bazita sur la akordo de G kaj L prononco. ¶ 1906b *kalĉ/o*. ¶ Io =, IeIa *calce*.

L *calx* "kalk/o, -ŝtono, ludŝtono" (kun dim. *calculus*, vd. *kalkuli*) el Gr *khál/ix -ikos* "ŝtoneto, siliko". Ev. parenca estas *ŝoseo*.

**KALKAN/O** (f; RE): L *calcane/us, -um*; I *calcagno* [-n'-], (H *calcañar*† [-n'-]). Prenita el L kiel anatomia termino; ĉar la normala L vorto (*calx*) kolizius kun alia radiko (*kalk-*), Z adoptis derivaĵon apogatan de certaj latinidaj formoj. En L med. *calcaneus* signifas "kalkanosto" (> eo *kalkane/o* Ve). Ps-sf. *-an*. ¶ 1906a *kalĉ/o*. ¶ IeIa *talon*, Io *-o* (F *tal/on*, H *-ón*); Ia ank. *calce*.

De L *cal/x -cis* "kalkano", probable par. al Li *kulnìs* "kalkano", R *koleno* "genuo" (HE **kolk-* "fleksebla artiko"). Der. de L *calx* estas *calceus* "boto" (vd. *kalsono*).

**KALKUL/I** (f; Un): A *calcul/ate*, F *-er*, (H *-ar*), I *calcolare*. Kp G *kalkulieren* "(prez)kalkuli". ¶ 1882 *komp-* (< L *computare*, vd. sub *konto*). – 1906a *komt/i*. ¶ Io *kalkular*, IeIa *calcular*.

El L postkl. *calculare* s.s., der. de L *calculus* "kalkulo", propr. "ŝtoneto" (ĉar oni sur abakoj kalkulis per ŝtonetoj), dim. de *calx* "(kalk)ŝtono" (vd. *kalko*).

**KALOMEL/O** (2; Jü): AF *calomel*, I *-ano*, (H *-anos*), G *Kalomel*, Po *kalo/mel*, R *-mel'*.

El L mod. *calomel(as)* s.s., ŝajne signifanta "bela produkto el nigra substanco": termino farita el Gr *kalós* "bela" (vd. *kalejdoskopo*) k *mélas* "nigra" (vd. *melankolio*).

**KALSON/O** (f; RE): F *calecon* [kalsô], Po *kalesony* (plur.), R *kal'sony* (plur.), (H *calzoncillos*, plur.). Kp Sv *kalsonger* (plur.). La radikmeza *-ls-* estas laŭ la F prononco (apogata de R). Singulara formo laŭ F; kp tiurilate *pantalono*. Ps-sf *-on*. ¶ Io =, Ie *calson*, Ia *calceones* (plur.).

El I *calzoni* (plur.) "pantalono", aŭgmentativo de I *calza* "ŝtrumpo" el L vulg. **calcea*, kp L *calceus* "boto", der. de *calx* "kalkano" (vd. tiun).

**KALUMNI/I** (f; RE; *kalomni-* N-ro 15 1888): A *calumni/ate*, (H *-ar*), F *calomnier*, I *calunniare*. La L originvorto (vd. sube) certe kontribuis ĉe la fiksado de la radikformo. ¶ Io *kalumniar*, IeIa *calumniar*.

El L *calumniari* "ĉikani, tordi la veron, false akuzi", der. de subst. *calumnia* "falsakuzo, trompo, kalumnio", samradika kun *calvi* "ĉikani, trompi".

**KALV/A** (4; Mart, Wü; antaŭe *sen/har/a*): F *chauve* (kp *calvitie* "-eco"), I(H) *calvo*; L *calvus*; eble Z ankaŭ trovis certan apogon en G *kahl* [ka:l] s.s. ¶ Io =, Ie *calv*, Ia *-e*.

L *calvus* estas par. al G *kahl*, plue al R *golyj* "nuda", Sa *kulva-* "kalva" (HE **galŭos*).

**KAMARAD/O** (1; Jü): A *comrade*, F *ca-*

*marad/e*, (H *-a*), G *Kamerad*, I *camerata*. Z sekvis la vokalismon de F. Ps-sf *-ad*. ¶ Io =, Ie *camarade*, Ia *camerada*.

Orig. "samĉambranoj" (kolektive; kp tiurilate *kanajlo*), der. de H *cámara* "ĉambr(et)o" el L *camera* (vd. *kamero*; kp *ĉambro*).

**KAMBI/O** (f; RE): I *cambiale, lettera di cambio*; kp F *lettre de change*, (H *letra de cambio*). Komerca termino prenita el I (kun ellaso de sufikseca *-ale*). ¶ Io *kambio-letro*, Ie *lettre de cambio*, Ia *littera de cambio*.

Propr. "/letero de/ (inter)ŝanĝo". Vd. la etimologie identan *ŝanĝi*.

**KAME/O** (2; Jü): A *cam/eo*, F *-ée*, I *-meo*, (H *-afeo*), G *Kamee*, Po *kam/ea*, R *-ej*. ¶ Io =, Ie *cam/é*, Ia *-eo*.

I vorto kun nekonata etimologio.

**KAMEL/O** (f; RE): A *camel*, (H *-lo*), F *chameau* (kp *chamel/le* "-ino", *-ier* "-isto"), G *Kamel*, I *cammello*; L *camelus*. ¶ Io =, Ie *camel*, Ia *-o*.

El Gr *kámêlos* s.s., de semida origino (kp Ar *ĝamal*, He *gâmâl* s.s.). – (Kp *kamloto*.).

**KAMELI/O** (1; Be): A *camel/lia*, I(H) *-ia*, F *camélia*, G *Kamelie*, Po *kamel/ia*, R *-ija*; L bot. *Camellia*. Ps-sf *-i* 4. ¶ Io =, Ie *camel/ia*, Ia *-lia*.

Farita de Lineo laŭ la nomo de G. J. Kamel (latine *Camellus*), kiu portis la planton el Japanujo en Eŭropon (1738).

**KAMEN/O** (f; Un): F *cheminée*, G *Kamin*, I *camino*, Po *kominek*, R *kamin*, (H *chimenea*). Kp A *chimney* "kamentubo". Radiko laŭ GIR kun vokalŝanĝo *i* > *e* por eviti similecon al virinsufiksa vorto (vd. *abomeni*). ¶ 1894 *kamin-*. ¶ Io = (espismo), Ie *camin/e*, Ia *-o*.

Pere de L *caminus* "fajrujo, forno" el Gr *káminos* "forno".

**KAMER/O** (f; EG) 1) "ĉambreto", ank. tekn. 2) fot. (Wü; ne ĉe Z; kp *kamera/o* PIV): A *chamber* (tekn.), *camera* (2), F *chambre* (tekn.), *caméra* (2), G *Kammer* (1), *Kamera* (2), I *camera* (tekn.), Po *kam/ora*, *-órka* (1), *kamera* (2), R *kamera* (1), *kinokamera* (2); (H *cámara* 1,2). Inter la modernaj fontlingvoj, GR respondas al la Ea radikformo; certe tamen ankaŭ la L originvorto (vd. sube) ludis rolon, kp Eo *kamero senluma* (Z) = L mod. *camera obscura*. La formo *ĉambr-* (laŭ AF) estis ja okupita de alia signifo. ¶ Io = (tekn., 2; kp *chambreto* 1), IeIa *camera* (1,2).

El L *camera* "volbo, arkaĵa ĉambro" (en L mez. "ĉambreto") el Gr *kamára* s.s. – Etimologie identa estas *ĉambro*; kp. ank. *ĉambelano*, *kamarado* k ev. *omaro*.

**KAMFOR/O** (f; RE): A *camph/or*, F *-re*, G *Kampfer*, I *canfora*, PoR *kamfora*, (H *alcanfor*). Kp L bot. *Cinnamomum camphora* "-arbo". ¶Io =, Ie *cámfor*, Ia *camphora*.

Pere de H el Ar *kâfûr* s.s. el Sa *karpûra-* s.s., probable de aŭstralazia origino (ekz. Ĥmera *kâpôr*).

**KAMION/O** (8; Wü:"blok-, rul-, ŝarĝo-, transport/veturilo, ĉaro"; PVS: "ŝarĝaŭto"; ne ĉe Z): FI *cami/on*, (H *-ón*). Influo de Io ebla. ¶ Io =, IeIa *camion*.

F vorto de nekonata origino.

**KAMIZOL/O** (f; RE): F *camisole* [-z-], G *Kamisol*† [-z-], I *camiciola*. Kp P *camisola*. ¶ 1894 *kamisol-*. ¶ Io =, Ie *camisol*, Ia *-a*.

Orig. dim. de L tardepoka *camisia* "ĉemizo" (vd. tiun, etimologie identan).

**KAMLOT/O** (f; RE): A *camlet*, F *camelot* [kamló], G *Kamelott*, I *cammellotto*, Po *kamlot*, (H *camelote*). Eo *-ml-* laŭ F prononco (kp *kalsono*), *-t* laŭ F skribo (kp *kalikoto*). ¶ Io = (espismo), Ie *camelot*; mankas en Ia.

F vorto, ligita per popola etimologio al F *chameau*, L *camelus* "kamelo" (la ŝtofo estis laŭdire farata el kamela haŭto), pli ĝuste tamen el Ar *khamla* "vilo (fibroj) de ŝtofo".

**KAMOMIL/O** (f; RE): A *camomil/e*, F *-le*, I *-la*, (H *-a*), G *Kamille*; L *chamomilla*. ¶ Io =, Ie *camomill/e*, Ia *-a*.

El Gr *khamaímêlon* s.s., propr. "grunda (t.e. malalta) pomo" (pro pomeca odoro de la

floroj): *khamaí* "surgrunde" (vd. *humo*), *mêlon* "pomo" (vd. *melono*).

**KAMP/O** (f; Un): L *campus*; F *champ* (kp. *campagne* "-aro"), I(H) *campo*. En AG la radiko estas konata kiel turisma termino, ekz. A *camp* "-adi", AG *camping* "-ado". ¶ Io *agro* (vd. sub *agronomo*; kp *kampar* "kampadi"), Ie *camp/e*, Ia *-o*.

Orig. probable "kurbiĝo, valo, malalta tereno", kp Gr *kampê* "kurbiĝo" (el kiu L *gamba* "genuartiko" > F *jambe*, I *gamba* "kruro, gambo" > eo *gamb/o* Wü), Li *kampas* "angulo; regiono" (HE **kamp-*). Samfamilia vorto en Eo: *ĉampano*.

**KAN/O** (f; RE): A *cane*, F *cann/e*, I *-a*, (H *caña*); L *canna*. ¶ 1894 *kanu-*. ¶ Io =, Ie *cann/e*, Ia *-a*.

L *canna* (ank. "tubo") el Gr *kánna* "kano" el Ak *qanû* s.s., kredeble el Sumera *gin* s.s. Samfamilia vorto en Eo: *kanono*.

**KANAB/O** (f; RE): L *cannabis*; F *chanvre*, I *canapa*, (H *cáñamo*); Po *konop/ie*, R *-lja*. Botanika termino prenita el L; la apokopo de *-is* estas normala (vd. Wüster Esp. princ. 56). ¶ Io =, Ie *cánabe*, Ia *cannabe*.

El Gr *kánnabis* s.s., vorto de orienta origino, kp Ar *qunnab*, Sumera *kunibu* s.s. Saman fonton havas la ĝermanaj formoj, ekz. A *hemp*, G *Hanf*. – Samfamiliaj vortoj en Eo: *kanabeno*, *kanvaso*.

**KANABEN/O** (2; Jü): L zool. *Carduelis cannabina*. Kp Po *konop/ka*, R *-ljanka*. Zoologia termino prenita el L; vokalŝanĝo *i* > *e* por eviti similecon al la virina sufikso (kaj eventuale por ebligi la formaĵon *kanaben/in/o*); vd. *abomeni*. ¶ Io *kanabino*, Ia *cannabino**; Ie *linotte* (< F).

La L specinomo, donita de Lineo, signifas "kanaba" (der. de L *cannabis*, vd. *kanabo*), aludante la fakton, ke la koncerna birdo volonte manĝas kanabajn semojn. Komparu ank. la PoR nomojn kun tiuj de la kanabo; simile A *linnet*, F *linotte* "kanabeno" de *lin* "lino".

**KANAD/O** (8; Jü; *Kanad/uj/o* E-isto 8/1894): AF *Canad/a*, I *-à*, (H *-á*), GPoR *Kanada*. ¶ Io *Kanada*, IeIa *Canada*.

Kredeble el Irokeza *kannata* "aro da kabanoj"; la unuaj koloniistoj erare prenis la vorton por nomo de la lando.

**KANAJL/O** (f; RE): F *can/aille* [-áj], I *-aglia* [-l'-], (H *-alla* [-l'-]), Po *kan/alia*, R *-al'ja*. La latinida [-l'-] reprezentiĝas per *-jl-* (vd. *ajlo*). ¶ 1894 *kanali-*. ¶ Io *kanali(ul)o*, Ie *can/allia*, Ia *-alia*.

I vorto, orig. "hundaro", der. de *cane* "hundo" (vd. tiun). Por la ŝanĝo de kolektiva al individua senco, kp. *kamarado*.

**KANAL/O** (1; Be): AF(H) *can/al*, I *-ale*, G *Kanal*, PoR *kanal*; L *canalis*. Ps-sf *-al*.

Propr. "deflutubo", der. de L *canna* "tubo; kano" (vd. *kano*).

**KANAP/O** (f; Un): F(H) *canap/é*, I *-è*, G *Kanapee*, Po *kanap/a*, R *-e*. Bazita sur F(GI); apokopo de akcentata *e* kiel en *kliŝo*, *negliĝo*. ¶ Io *kanapeo*, IeIa* *canapé*.

F vorto, el L *conopeum* "(lito garnita per) kulvualo" el Gr *kônôpion* "kulvualo", der. de *kônôps* "kulo".

**KANARI/O** (f; RE): A *canary* [-i], F *canar/i*, I *-ino*, (H *-io*), G *Kanarienvogel* (*Vogel* "birdo"), Po *kanar/ek*, R *-ejka*; L zool. *Serinus canarius*. Bazita sur F(L); formo **kanaro* estis neebla pro *kan/ar/o*. Ps-sf *-ari*. ¶ Io =, Ie *canar/í*, Ia *-io*.

H vorto signifanta "(birdo) el Kanariaj Insuloj" (de kie la birdospecio estis importata en Eŭropon en la 16a jc): H *Islas Canarias*, L *Insulae Canariae*, propr. "hundaj insuloj" (pro la tie observitaj grandaj hundoj), der. de L *canis* "hundo" (vd. tiun).

**KANCELARI/O** (f; RE): A *chancell/ery*, F *-erie*, G *Kanzlei*, I *cancelleria*, Po *kancel/aria*, R *-jarija*, (H *cancillería*). Ŝajne bazita sur PoR, tamen kun konsidero al la L originvorto (vd. sube). Ps-sf *-ari* (la vokalo *a* estis eble elektita por maksimuma kontrastigo kun la sekva). ¶ Io *kanceler-eyo*, Ie *cancell/ería*, Ia *-eria*. – Nomo de oficisto: **KANCELIER/O** (f; RE): A *chanc/ellor*, F *-elier*, G *Kanzler*, I *canc/elliere*, (H *-iller*), R *kancler*, Po *-z*. Ra-

Radikkomenco (konforma al la paralela *kancelari-*) laŭ (G)PoR; fino laŭ FI (vd. ps-sf *-ier*). ¶ Io *kancelero*, IeIa *cancellero*.

El L mez. *cancellaria* "kancelario" resp. L postkl. *cancellarius* "skribisto, notario", orig. proks. "kiu ĉe bariero laŭtlegas proklamojn", der. de L *cancelli* (plur.) "bariero (apartiganta la juĝistan tribunon de la publiko)", dim. de *cancri* (plur.) "krado, bariero", malasimilita el *carcer* (vd. *karcero*).

**KAND/O** (f; RE): A *candy*, F *sucre candi*, G *Kandis(zucker)*, I *(zucchero) candito*, Po *kandyz*, R *kandis*, (H *[azucar] cande*). En FGHI, oni ĝenerale esprimas la nocion per "kand(it)a sukero"; memstara vorto en Eo laŭ APoR. Apokopo de *-i* (vd. *dando*). ¶ Io *kandio*, Ie *sucre candit*, Ia *sucro candité**.

El Ar *qandî*, adj. de *qand* "kando" el Sa *khan'd'aka-* s.s., vorto de dravida origino.

**KANDEL/O** (f; Un): L *candela*; A *candle*, F *chandelle*, I(H) *candela*. Krome konata per la internacia derivaĵo *kandelabr/o*, kiu eble kunhelpis doni latinan formon ankaŭ al tiu ĉi radiko. ¶ 1881 *ŝand/o* (< F). ¶ Io =, Ie *candel*, Ia *-a*.

Der. de L *candere* "(hele) brili" de HE rad. **kand-* "brili", kp Sa *ĉandrá-* "brila, blanka".Rimarku la L der. *candidus* "brile blanka" (vd. *kandidato*), *incendere* "bruligi" (vd. *incenso*). Kp spec. sekv.

**KANDELABR/O** (3; Be): A *candelabr/um*, I(H) *-o*, F *candélabre*, G *Kandelaber*, PoR *kandelabr*; L *candelabrum*.

Der. de L *candela* "kandelo" (vd. tiun).

**KANDIDAT/O** (1; RE): F *candidat*, A *-e*, I(H) *-o*, G *Kandidat*, Po *kand/ydat*, R *-idat*; L *candidatus*. Ps-sf *-at*.

L vorto, propr. "(persono) vestita per blanka (togo)" (ĉar en antikva Romo la aspirantoj je oficoj dum la kandidata tempo surhavis blankan togon), der. de *candidus* "(brile) blanka", adj. de *candere* "brili" (vd. *kandelo*).

**KANIBAL/O** (1; Jü): A *cannibal*, FI *-e*, G *Kannibale*, Po *kanibal*, R *kann-*, (H *canibal*).

H vorto, kredeble modifo de *caribal*, der. de *caribe* "karibo; kruelulo", orig. indiĝena vorto de Antiloj signifanta "maltima".

**KANKR/O** (f; RE): L *canc/er -ri*; (H *cangrejo*). Kp AF *Cancer* (H *Cáncer*) "Kankro" (astr.). Zoologia/astronomia termino prenita el L; forme de la sama tipo kiel *apro* < L *ap/er -ri* (vd. tiun). La medicina termino eo *kancer/o* (Wü) reprezentas specialigon de la sama vorto, apogata de pluraj fontlingvaj formoj (LAF *cancer*, H *cáncer*, I *cancro*). ¶ Io *kankro* (zool.,astr.), *kancero* (med.); Ie *creve* (zool.) (< F *écrevisse*, kp A *crayfish*), *cáncere* (med.); Ia *cambaro* (zool.) (< I *gambero*), *cancere* (med., astr.).

L *cancer* estas probable malasimilita el **carcer*, par. al Gr *karkínos* "kankro; kancero", Sa *karkat'a-* "kankro; krabo", kredeble de HE rad. **kar-* "malmola" (vd. *hardi*). (La medicina senco, laŭ Galeno, pro tio ke la ŝvelintaj venoj ĉirkaŭ la atakita korpoparto similas al kankraj membroj.) – Etimologie identa estas *ŝankro*.

**KANON/O** (1; RE) 1) mil.(Jü; antaŭe *paf/il/eg/o* RE) 2) ekl. 3) muz.: A *cannon* (1), *canon* (2,3), F *canon* (1,2,3), G *Kanone* (1), *Kanon* (2,3), I *cannone* (1), *canone* (2,3), PoR *kanon* (2,3) (kp PoR *kanonada* "-ado"), (H *cañón* 1, *canon* 2,3). Ps-sf *-on*. ¶ Io = (1,2,3), Ie *cannon* (1), *canon* (2,3), Ia *cannon* (1), *canone* (2,3).

1) I vorto, propr. "tubego", aŭgmentativo de *canna* "tubo, kano" (vd. tiun). – 2) 3) pere de L *canon* "regulo, normo" el Gr *kanôn* "regulo, modelo", orig. "mezurstango, bastono", kredeble der. de *kánna* "kano" (vd. tiun). Kp spec. *kanoniko*.

**KANONIK/O** (1; N-ro 15 1888, Be): A *canon*, I *-ico*, F *chanoine* (kp *canonicat* "-eco"), G *Kanonik/er*, *-us*, PoR *kanonik*, (H *canónigo*); L ekl. *canonicus*. Bazita sur L, kies formo estas konservita en pluraj el la modernaj fontlingvoj. Ps-sf *-ik*. ¶ Io *kanonik(ul)o*, IeIa *canonico*.

Orig. "enskribita en la oficialan liston de ekleziuloj", adj. der. de L *canon* "normiga eklezia katalogo", orig. "normo" (vd. *kanono*).

**KANT/I** (f; Un): L *cantare*, F *chanter*, I *cant/are*, (H *-ar*). Kp A *chant* "psalmokanti". La radiko krome havas derivaĵojn internacie konatajn, vd. ekz. *kantato, kantoro.* ¶ 1882 *kant-*. ¶ Io *kantar*, IeIa *cantar.*

L *cantare* orig. intensa verbo de *canere* s.s., de HE rad. **kan-* "kanti", kp Ir *canim* "mi kantas"; G *Hahn* "koko", A *hen* "kokino". Samfamiliaj vortoj en Eo: *akcento, ĉarmo, kantato, kantoro, kanzono.*

**KANTARID/O** (f; RE): F *cantharide*, I *can/taride*, (H *-tárida*); L *canthar/is -idis.* Kp *aspid/o*: Wüster Esp. princ. 58. ¶ Io =, Ie *can/taride*, Ia *-tharide*.*

El Gr *kanthar/ís -ídos* s.s., der. de *kántharos* (nomo de sterko- skarabo).

**KANTAT/O** (1; Jü): AI(H) *cantat/a*, F *-e*, G *Kantate*, PoR *kantata.* Ps-sf *-at.*

I muzika termino, propr. "kant/ado, -aĵo", der. de *cantare* "kanti" (vd. tiun).

**KANTON/O** (2; Jü): AF *cant/on*, I *-one*, (H *-ón*), G *Kanton*, PoR *kanton.* Ps-sf *-on.*

Identa kun I *cantone* "angulo", aŭgmentativo de *canto* "angulo, flanko" el L *cantus* "radrando", de kelta origino (kp Ki *cant* s.s.). – Kp semantike la uzadon de Eo *angulo* pri (malvasta) loko.

**KANTOR/O** (f; RE): A *cant/or*, I *-ore*, F(H) *chantre*, G *Kantor*, PoR *kantor*; L mez. *cantor.* Ps-sf *-or* 1. ¶ 1906a *kantro.*

*El L *cantor* "kant/isto, -anto", agantnomo de *canere* "kanti" (vd. tiun).

**KANVAS/O** (f; RE) 1) tolo 2) skizo (PV): A *canvas* (1), F *canevas* [kanvá] (1,2), G *Kanevas* (1), I *canovaccio* (1,2), Po *kanwa* (1), R *kanva* (1), (H *cañamazo* 1). ¶ Io = (1), IeIa *canevas* (1).

El L vulg. *cannabaceus* "kanaba", der. de L *cannabis* "kanabo" (vd. tiun).

**KANZON/O** (8; Wü; ne ĉe Z): F *chanson*, I *canzone*, (H *canción*); la F formo estas konata kiel fremdvorto en AG. Kvankam la F formo estas pli internacie konata, Eo preferas italecan (ankaŭ kun *-nz-*), probable ĉar komenca *k-* rememorigas la radikon *kant-*. Influo de Io estas ebla. ¶ Io *kansono*, Ie *canzon*; Ia *lied* (< G).

Propr. "kanto", el L *cant/io -ionis*, agonomo de *canere* "kanti" (vd. tiun).

**KAP/O** (f; Un): L *cap/ut -itis*; I *capo*, (H *cabeza*). Kp F *de pied en cap* "de piedo ĝis kapo", A *decapitate* "senkapigi" k.a. La I formo donis oportunan okazon mallongigi la L radikon (*capit-*, kp *kapit/alo, -ano*); kp *temp/o* laŭ I por L *temp/us -oris.* ¶ 1881 *kap/o.* ¶ Io =, Ie *cap*, Ia *capite.*

El HE **kap-ut*, kp A *head* "kapo", G *Haupt* "kapo; ĉefo"; kun alia sufikso: Sa *kapâlam* "kranio". Etimologie identa estas *ĉefo.* Ceteraj samfamiliaj vortoj en Eo: *ĉapo, ĉapelo, ĉapitro, kadeto, kapitalo, kapitano, kapitelo, kapitulaco, kaporalo, kapoto, kaprico, kapuceno, kapuĉo.*

**KAPABL/A** (f; RE): AF *capable*, G *kapabel*†. Kp I *cap/ace*, (H *-az*) s.s. Ps-sf *-abl.* ¶ Io =, Ie *capabil*, Ia *-e.*

El L postkl., mez. *capabilis* "tenebla; povanta enteni [ion]" (en la lastnomita senco kredeble influita de L *cap/ax -acis* /kp HI supre/ "povanta enteni [ion], taŭga por [io]"), ambaŭ der. de L *capere* "preni", ank. "(en)teni" (vd. *kapti*).

**KAPEL/O** (f; RE) 1) ekl. 2) muz.: A *chapel* (1), F *chapelle* (1,2), G *Kapelle* (1,2), I *cappella* (1,2), Po *kaplica* (1), *kapela* (2), R *kapella* (2), (H *capilla* 1). Formo **ĉapel-* laŭ AF estis kompreneble neebla pro alia signifo. ¶ Io = (1), Ie *capell/a* (1), *-e* (2), Ia *cappella* (1,2).

El L mez. *cap(p)ella* s.s., propr. "mallonga mantelo" (unue uzata pri la kapelo de la kortego de la frankaj reĝoj, en kiu estis konservata la mantelo de S-a Marteno el Tours, grava relikvo), dim. de *cappa* "mantelo kun kapuĉo" (vd. *kapuĉo*). – La muzika senco estiĝis pro tio, ke la ĥorkantistoj ofte ekzerciĝadis en kapeloj.

**KAPITAL/O** (1; Ald,RE): AF(H) *capi-*

*tal*, I *-e*, G *Kapital*, Po *kapit/al'*, R *-al*. Ps-sf *-al*.

Propr. "ĉefa (parto de la mono)" (kontraste kun la interezoj), el L *capitalis* "ĉefa, kapa", de *cap/ut -itis* "kapo; kapitalo" (vd. *kapo*).

**KAPITAN/O** (f; RE): A *captain*, F *capit/aine*, I *-ano*, (H *-án*), G *Kapitän* (mar.), PoR *kapitan*. Ps-sf *-an*.

El L mez. *capitaneus* "ĉefo, eminentulo, soldatestro", der. de *cap/ut -itis* "kapo" (vd. tiun). Kp semantike *ĉefo* k G *Hauptmann* "kapitano (mil.)", propr. "kapo-viro".

**KAPITEL/O** (f; RE): A *capit/al*, I *-ello*, (H *-el*), F *chapiteau*, G *Kapitell*, Po *kapit/el*, R *-el'*; L *capitellum*. ¶ Io =, Ie *capitell/e*, Ia *-o*.

Propr. "kapeto", dim. de L *cap/ut -itis* "kapo" (vd. tiun). – Pri alia dim. formo de la sama L vorto, vd. *ĉapitro* k la sekvan.

**KAPITULAC/o** (f; RE): AF *capitul/ation*, (H *-ación*), G *Kapitulation* [-ts-], I *capitolazione* [-ts-], Po *kapitul/acja*, R *-jacija*. El tiu ĉi radikformo oni devas konkludi, ke Z ial ne rigardis la pli mallongan formon de la responda verbo (A *capitul/ate*, F *-er*, G *kapitul/ieren*, Po *-owac'*, R *-irovat'*, I *capitolare*; kp *kapitul/i* Ve) sufiĉe malambigua (eble pro la multaj aliaj similaj radikformoj: *kapital-*, *kapitel-*, ank. *kapitol-* EG); sekve li deiris de la subst., tamen iom simpligante la finon (*-ac/o* anst. *-aci/o* kiel en *donac-*, *kurac-*), probable kun konsidero al la ĉefe verba uzado de la radiko. ¶ 1894 *kapitul-*. ¶ Io = (espismo), IeIa *capitulation*.

El L mez. *capitulatio* s.s., subst. de *capitulare* "kapitulaci", propr. "akordiĝi pri la ĉefaj punktoj (de traktato)", de *capitulum* "ĉefa ero", dim. de L *cap/ut -itis* "kapo" (vd. tiun). La kerno de tiu ĉi vorto estas etimologie identa kun *ĉapitro*, kp tiun.

**KAPON/O** (f; RE): A *cap/on*, I *-pone*, (H *-ón*), F *chapon*, G *Kapaun*, Po *kap/l'on*, R *-lun*; L *cap/o -onis*. Formo laŭ L, apogata de AI. ¶ Io =, IeIa *capon*.

L vorto (kun pli malnova varianto *capus*), signifanta la kastritecon, se el HE rad. **kap-/kop-* "tranĉi, haki" (vd. *komo*).

**KAPOR/O** (f; RE) 1) arbedo 2) burĝonoj: A *caper* (2), *-bush* (1) (*bush* "arbedo"), F *câpr/e* (1), *-ier* (2), G *Kaper* (2), *-nstrauch* (1) (*Strauch* "arbedo"), I *capper/o* (1), *-i* (plur.) (2), Po *kapar* (1), *kaparki* (2), R *kaper/s*, *-c* (1), *kapersy*, *kaporcy* (plur.) (2), (H *alcaparr/o* 1, *-a* 2); L *capparis* (1,2). Laŭ ekzemploj de Z, la Ea vorto signifas jen la arbedon (EG), jen la burĝonojn (UV). La definitiva radikformo evidente estiĝis pro strebado eviti homonimojn: nek **kaper-* (laŭ AGI) nek **kapar-* (laŭ LPo) nek **kapr-* (laŭ F) taŭgis pro jamaj radikoj aŭ derivaĵoj; Z do apogis sin sur unu el la R variantoj. (La unika formo *kaper'er'o'j* en RE s.v. *kapersy* estas probable preseraro; s.v. *kapers* aperas *kapor'*.) ¶ Io *kaper-o* (2), *-iero* (1), Ie *cáppare* (2), Ia *cappero** (2).

El Gr *kápparis* (1,2), fremdvorto de nekonata origino.

**KAPORAL/O** (1; Jü): A *corporal*, F *caporal*, I *-e*, G *Korporal*, PoR *kapral*. Militista termino prenita el FI. Ps-sf *-al*. ¶ Io =, Ia *caporal*, Ie *-e*.

I vorto, propr. "ĉefulo", der. de *capo* "ĉefo, kapo" (vd. *kapo*). (La AG formoj el la pli malnova F varianto *corporal*, kiu montras influon de *corps* "korpuso".) .

**KAPOT/O** (f; RE) 1) vestaĵo 2) tekn. (Wü): AF(H) *capote* (1), G *Kapotte* (1), I *cappotto* (1), Po *kapota* (1), kp R *kapot* "tualetrobo"; F *capot* (2), (H *-a* 2), R *kapot* (2). ¶ Io = (1,2), Ie *capote* (1), Ia *cappotto* (1); Ie *covritura*, Ia *copertura (del motor)* (2; propr. "kovraĵo").

Der. de F *cape* resp. I *cappa* "(kapuĉ)-mantelo" el L tardepoka/mez. *cappa* "speco de kapvesto", orig. probable "mantelo kun kapuĉo" (kp *ĉapo*).

**KAPR/O** (f; RE): L *cap/er -ri* "virkapro", *capra* "kaprino"; F *chèvre*, I *capra*, (H *cabra*). Zoologia termino prenita el L, forme de la sama tipo kiel *apr/o* el L *ap/er -ri* (vd. tiun). ¶ Io =, Ie *capr/e*, Ia *-a*.

Identa al Gr *kápros* "apro" (el HE **kapros* "virbesto"?). Samfamiliaj vortoj en Eo: *kabrioleto, kapreolo, kaprico.*

**KAPREOL/O** (f; RE): L *capreolus*; F *chevreuil*, I *capriolo*. Kp P *capréolo*. Zoologia termino prenita el L. ¶ Io =, Ie *capreol*, Ia *-o**.

Der. de L *caper* "kapro" (vd. tiun). Kp spec. *kabrioleto.*

**KAPRIC/O** (f; RE; *kapris-* Du): AF *capr/ice*, I *-iccio*, (H *-icho*), G *Kaprice*, Po *kapr/ys*, R *-iz*. ¶ Io =, Ie *caprici/e*, Ia *-o.*

I vorto, orig. "timtremo" (la nuna signifo dependas de asociado kun I *capra* "kapro" – kapricaj kaprioloj de kaproj!), propr. "starigitaj kapharoj", kunm. de *capo* "kapo" k *riccio* "erinaco" (vd. tiujn).

**KAPSUL/O** (f; EG): AF *capsul/e*, I *-a*, G *Kapsel*, Po *kapsla* (tekn.), *kapsul'ka* (med.), R *kapsula*. ¶ Io =, Ie *cápsul*, Ia *capsula.*

El L *capsula* "ujeto", dim. de *capsa* "ujo, skatolo", verŝajne de HE rad. **kap-* "preni" (vd. *kapti*).

**KAPT/I** (f; Un): L *captare*; kp (PIV 2) A *capture*, F *capturer*, I *captar* (H *capturar*), plue F *captif* "kaptito". Bazita sur L; por la baza signifo (PIV 1), la modernaj fontlingvoj uzas aliajn verbojn. ¶ Io *sizar* (PIV 1; < A *seize*, F *saisir*), *kaptar* (PIV 2), Ie *capter* (PIV 1,2), Ia *sasir* (PIV 1), *capturar* (PIV 2).

Orig. verbo intensa de L *capere* "preni", de HE rad. **kap-* "preni": Sa *kapatî* "du manplenoj"; Gr *kôpê* "tenilo"; L *capsa* "ujo, skatolo" (vd. *kapsulo*); A *have*, G *haben* "havi" (vd. tiun); G *Haft* "aresto", *Hafen* "haveno" (vd. tiun). Etimologie identa estas *ĉasi.* – La familio de L *capere* (kun radikvarianto *-cip-* en kunmetoj), sup. *captum* (kun radikvarianto *-cept-* en kunmetoj) estas reprezentata de multaj aliaj vortoj en Eo: *akcepti* (identa kun *aĉeti*), *escepto, kapabla, kaso, koncepto, okupi, participo, princo, recepto, ricevi*; kp. ank. *kablo.*

**KAPUCEN/O** (f; RE): A *Capuchin*, F *capucin* [-ê], G *Kapuziner* [-ts-], I *cappuccino*, Po *kapuc/yn*, R *-in*, (H *capuchino*). Formo bazita sur PoR k F, kies prononco iom apogas la vokalŝanĝon *i* > *e* (kp *arlekeno*), evidente por eviti aspekton de insufiksa vorto (vd. sub *abomeni*) – procedo speciale motivita ĉe la nomo de vira ordeno! Per *-c-* (laŭ FPoR, G prononco) la radikformo kontrastas kun *kapuĉo*, kp tiun. ¶ Io *kapucin(ul)o*, Ie *capucino*, Ia *cappucino.*

I vorto, orig. "(monaĥo) kun kapuĉo", der. de *cappuccio* "kapuĉo" (vd. tiun).

**KAPUĈ/O** (f; RE) 1) kapvesto 2) tekn. (Ve): F *capuch/e* (1), *-on* (1,2), G *Kapuze* (1), I *cappuccio* [-úĉo] (1), R *kapjuŝon* (1), (H *capucha* 1). Eo kopias I. La *-ĉ-* (laŭ [ĉ] en I, [ŝ] en FR) klare diferencigas tiun ĉi radikon de *kapucen-*. ¶ 1894 *kapuc-*. ¶ Io *kapuco*, Ie *capuce*, Ia *cappucio.*

I vorto, der. de *cappa* el L mez. *cappa* "(mantelo kun) kapuĉo" (vd. *ĉapo*; kp plue *kapelo, kapoto, kapuceno*).

**KAR/A** (f; Un) 1) amata 2) multekosta: L *carus* (1); F *cher* (1,2), I(H) *caro* (1,2). Kp Sv *kär* (1). ¶ 1881 *kar/a.* ¶ Io *kara* (1), *chera* (2), IeIa *car* (1,2).

El HE **karo-* "kara, dezirata", kp Sa *cârua* agrabla, dolĉa"; G *Hure* "publikulino"; Ki *caru* "ami". Samfamilia vorto en Eo: *karesi.*

**KARABEN/O** (f; RE): A *carbin* (kp *carabineer* "-isto"), F *carabin/e*, I(H) *-a*, G *Karabiner*, PoR *karabin*. Vokalŝanĝo *i* > *e* por eviti aspekton de virinsufiksa vorto (vd. sub *abomeni*). ¶ Io *karabino*, Ie *carabin/e*, Ia *-a.*

Der. de F *carabin* "soldato de malpeza kavalerio", de obskura origino.

**KARAF/O** (f; RE): AF *caraf/e*, I *-fa*, G *Karaffe*, Po *karafka*, R *grafin*, (H *garrafa*). ¶ Io =, Ie *caraffe*, Ia *carrafa.*

El Ar vulg. *g'arrâfa* "dikventra botelo", der. de *g'arafa* "ĉerpi".

**KARAKTER/O** (f; *ĥ-* Du, *k-* N-ro 14 1888,RE): A *character* [k-], F *caractère*, G *Charakter* [k-], I *carattere*, Po *charakter* [ĥ-], R *ĥarakter*, (H *carácter*). La kom-

encsono *ħ-*, bazita sur Gr (vd. sube) kaj PoR, tre frue ŝanĝiĝis al *k-*, kiu respegulas la prononcon de la plimulto de fontlingvoj kaj estas iom pli ofta reprezentanto de Gr *kh* (vd. Cherpillod 1990, 14). – Verbo signifanta "montri, difini, konsistigi la karakteron [de io, iu]": **KARAKTERIZ/I** (f; RE): A *characterize*, F *caractériser*, G *charakter/isieren*, *Po -yzowac'*, I *caratterizzare*, R *ħarakterizovat'*, (H *caracterizar*). Neniu formo kun *ħ-*; la prononco estas [k-] en AFGI (H). Ps-sf *-iz*. ¶ Io *karakter/o*, *-izar*, Ie *caracter/e*, *-isar*, Ia *character*, *-isar*.

El Gr *kharaktêr* (kun verbo *kharakterízein*) "karakter(izil)o", propr. "marko, stampo, io enpremita", der. de *kharássein* "ĉizi, grati, enpremi, marki", kp *khárax* "pinta paliso".

**KARAMBOL/I** (1; Be): F *carambol/er* (ank. fig.), I *-are*, (H *-ear*), Po *karambolowac'*; kp G *Karambolage*, R *karambol'* "-o".

Der. de F *carambole* "speco de biliardo", pli frue "ruĝa biliardglobo", orig. "frukto de la orienthinduja arbo *Averrhoa carambola*", el H *carambola* s.s., pere de P el malaja *karambil* s.s.

**KARAMEL/O** (2; Jü): AF *caramel*, G *Karamelle*, Po *karmel*, (H *caramelo*); kp I *caramella*, R *karamel'* "karamelbombono".

H vorto, ofte klarigata kiel modifo de L mez. *cannamella* "sukerkano" (vd. *kano* k *mielo*).

**KARAS/O** (f; RE): A *crucian (carp)*, F *carassin*, G *Karausche*, I *coracino*, PoR *karas'*; L zool. *Carassius carassius*. Eble bazita sur L (zoologia termino); la mallonga formo povas tamen indiki, ke la vera fonto estas PoR kaj F minus la sufikseca *-in*. ¶ Io *karasino*, Ie *carasse*; mankas en Ia.

FI pere de la L fiŝnomo *coracinus* el Gr *korakínos*, der. de *kórax* "korvo" (pro nigreca koloro), vd. tiun. Iel parencaj al tiu Gr vorto estas ankaŭ la slavaj formoj kune kun Li *karâŝis* (el kiu G). – La L zool. termino baziĝas sur modernlingvaj formoj.

**KARAT/O** (1; RE); AF *carat*, I *-o*, G *Karat*, PoR *karat*, (H *quilate*).

El Ar *qîrât'* "kvar grajnoj de karobo" (pezilo uzata por oro k diamantoj) el Gr *kerátion* "triono de obolo (malgranda pezo)", orig. "frukto de karobo", propr. "korneto" (pro la formo de la frukto), dim. de *kéras* "korno" (vd. s.t.v.).

**KARAVAN/O** (1; RE): A *caravan*, F *-e*, I(H) *-a*, G *Karawane*, Po *kara/wana*, R *-van*.

El Pe *kârwân* s.s., kredeble el Sa *karabhá-* "kamelo".

**KARB/O** (f; Un): L *carb/o -onis*; F *charbon*, I *carb/one*, (H *-ón*). Bazita sur L nominativo, kies lasta vokalo fariĝis Ea finaĵo (kp *burdo*). ¶ Io =, IeIa *carbon*. – Nomo de la kemia elemento: **KARBON/O** (4; Ka; ne ĉe Z; antaŭe *karb/o*): A *carbon*, F *-e*, I *-io*, (H *-o*). Krome nomoj de kemiaj derivaĵoj, bazitaj sur tiu radiko, estas konataj ankaŭ en ĝermanaj kaj slavaj lingvoj, ekz. G *Karbonat*, PoR *k-* (eo *karbonat/o* Ve). ¶ Io =, IeIa *carbon*.

La nomo de la kemia elemento estas kreita (en F, 1787, de de Morveau) surbaze de la oblikvaj kazoj de L *carb/o -onis*, probable par. al A *hearth*, G *Herd* "fajrujo" (HE rad. **ker-*).

**KARCER/O** (1; Jü): G *Karzer*† [-ts-], *Kerker*, PoR *karcer*. Kp A *incarc/erate*, F *-érer* "enkarcerigi"; L *carcer*, I *-e*, (H *cárcel*) "malliberejo". ¶ Io =, Ie *cárcere*; Ia *carcere* "malliberejo".

L *carcer* orig. "(ĉirkaŭ)baraĵo"; etimologio nekonata. Samfamiliaj vortoj en Eo: *kancel/ario*, *-iero*.

**KARD/O** (f; RE): L *carduus*; F *chardon*, I(H) *cardo*. Botanika termino; tial probable bazita sur L, kun radikfina vokalapokopo eble inspirita de I(F) (malsama traktado de L *-uus* en *individuo*, *vidvo*). Rimarku, ke antaŭvokala *u* forfalis ankaŭ en la sekva radiko. – Kun aŭ sen scio pri la etimologia identeco, oni ekuzis la radikon ankaŭ verbe (*kard/i* Ve)

laŭ A *card*, F *-er*, I *-are*, (H *-ar*), G *kard/-en*, R *-ovat'*, kp Po *kard* "-ilo". ¶ Io *kardono*, Ia *card/o*, Ie *-on*; kp Io *kardar*, IeIa *cardar* "-i".

L vorto ligita kun L *carrere* "kardi" (la vegetaĵo do ricevis nomon laŭ sia uzo; kp, inverse, la supre cititajn modernlingvajn verbojn, kiuj estas derivitaj de la resp. vorto por "kardilo") de HE rad. **kars-* "skrapi", kp Sa *kaŝati* "gratas", Li *karšti* "kombi, kardi". Samfamilia vorto en Eo: *kardelo.*

**KARDEL/O** (f; RE): L *carduelis*; I *cardellino.* Zoologia termino prenita el L kun monoftongigo *ue* > *e* por eviti hiaton (la I formo povis montri la vojon; cetere jam en L postkl. aperas variantformo *cardelis*); kp. analogajn sinkopojn ĉe *agrabla, franda* (kp Szerdahelyi 1987, 135). ¶ Io = (espismo), Ie *cardul*, Ia *carduel**.

La birdo ricevis sian nomon el L *carduus* "kardo" ĉar ĝi ŝatas la grajnojn de tiu kreskaĵo; kp F *chardonneret* "kardelo" der. de *chardon* "kardo" (vd. tiun).

**KARDINAL/O** (2; RE): AF(H) *cardinal*, I *-e*, G *Kardinal*, Po *kard/ynal*, R *-inal.* Ps-sf *-al.*

El L mez. *cardinalis* s.s., orig. subst.-igo de L adj. *cardinalis* "ĉefa, centra", der. de *card/o -inis* "pivoto (de pordo); turnpunkto" (vd. *ĉarniro*).

**KARES/I** (f; Un): A *caress*, F *-er*, I *(ac)carezzare*, (H *acariciar*). Eo *-s-* senvoĉa pro AF *-ss-*. ¶ Io *karezar*, IeIa *caressar.*

De I *carezza* "-o", propr. "kar/um/o", der. de *caro* "kara" (vd. tiun).

**KARIER/O** (3; Jü): A *career* [-íe'], F *carr/ière*, I *-iera*, (H *-era*), G *Karriere*, Po *kar/iera*, R *-'era.*

Propr. "vojo (de la vivo)", el L mez. *carraria* "veturvojo", der. de L *carrus* "ĉaro" (vd. tiun).

**KARIKATUR/O** (2; RE): AF *caricat/ure*, I(H) *-ura*, G *Karikatur*, Po *karykatura*, R *karikatura.* Ps-sf *-ur.*

I arttermino, propr. "troigo", der. de *caricare* "(tro)ŝargi" (vd. *ŝargi*; kp ank. *ĉaro*).

**KARIOFIL/O** (f; RE): L *caryophyllon* (L bot. *Caryophyllus aromaticus*, sin. *Eugenia caryophyllata*) "-arbo"; F *girofle*, I *garofano.* Forme bazita sur L sed kun semantiko laŭ F. ¶ Io =, Ie *cariofil*, Ia *caryophyllo.*

El Gr *karyóphyllon* "-arbo", propr. "nuksfolio" (pro la gusto simila al tiu de nuksarba folio): *káryon* "nukso" (kun necerta etimologio), *phyllon* "folio" (vd. tiun).

**KARIOL/O** (3; Jü): A *cariole*, F *carriol/e*, I(H) *-a*, G *Karriole*, Po *kariolka.* ¶ Mankas en la aliaj L.I. (Ie *carriol* "ĉarumo").

Propr. "ĉareto", dim. de I *carro* "ĉaro" (vd. tiun).

**KARMIN/O** (f; RE): F(H) *carmin*, A *-e*, I *-io*, G *Karmin*, PoR *karmin.* ¶ Io =, Ie *carmin/e*, Ia *-o.*

El L mez. *carminium*, kiu estas kruciĝo de L *minium* "minio" (vd. sub *miniaturo*) kaj Ar *qirmiz* "sekigitaj koĉeniloj" (el kiuj la kolorilo estas ekstraktata), kredeble el Sa *krmija-* "koĉenila kolorilo", kies unua elemento estas *krmi-* "vermo, larvo" (kp Li *kirmìs*, R *červ'* "vermo"). – De la responda Ar adj. *qirmizî* devenas A *crimson*, F *cramoisi*, G *Karmesin*, I *carmes/ino*, (H *-í*) > eo *karmezin/o* Jü.

**KARN/O** (1; Cart 1903 [vd. LZ I,44], Jü; antaŭe *viand/o*): L *car/o -nis*; F *chair* (kp *carnivore* "karnomanĝa"), I(H) *carne.* Kp A *carnal* "-a", *carnivorous* "karnomanĝa" kaj AF *incarnation*, G *Ink-* "enkarniĝo". Utiligo de la L nominativo (**kar/o*) estis neebla pro adj. *kar/a*; kp ank. *karo/o.* ¶ Io =, IeIa *carne.*

Orig. kredeble "tranĉaĵo", de HE rad. **(s)ker-* "tranĉi" (vd. plue *korko*). Kp. sekv.

**KARNAVAL/O** (f; RE): A *carn/ival*, F *-aval*, I *-evale*, (H *-aval*), G *Karneval*, Po *karna/wal'*, R *-val.* Ea vokalismo laŭ F kaj PoR. ¶ Io =, Ia *carneval*, Ie *-e.*

I vorto kun pridisputata etimologio. Ĝenerale oni vidas en la unua elemento I *carne* "viando" (la vorto signifis orig. la antaŭfastajn tagojn), dum la dua elemento estas obskura: oni plej ofte asocias la tuton kun L mez. *carnelevamen* k.s. "forpreno de la

viando" de L *levare* "for/levi, -preni" (proksimume tiel Carlevaro, PL 6/1983); la interpreto *carne vale* "ho viando, adiaŭ!" estas popola etimologio. Kp *karno* k ev. *levi*.

**KARO/O** (f; RE): F *carreau* [karó], G *Karo*, I *quadri*, Po *karo*. Prenita el F same kiel la aliaj nomoj de ludkartaj emblemoj. Formo **kar/o* estus bone apogita (F prononco, GPo ortografio) sed kolizius kun la adj. *kar/a* (kp ank. *karn/o*). Pri *-o/o*, vd. *heroo*. ¶ Io *karelo* (kp sube), Ie *carró*, Ia *quadro*.

Propr. "kvadrateto", el L vulg. **quadrellus*, der. de L *quadrus* "kvadrata, kvarangula" (vd. *kadro*, *kvadrato* k plue *kvar*).

**KAROB/O** (f; EG): A *carob*, F *caroube*, I *carruba*, (H *algarroba*). ¶ Io *karubo*, Ie *carube*, Ia *carruba**.

El Ar *kharrûb* s.s., kp Ak *ħarûbu* s.s.

**KAROT/O** (f; RE): A *carrot*, F *car/otte*, I *-ota*; L postkl. *carota* (L bot. *Daucus carota*). Kp G *Karotte* "-eto". ¶ Io =, Ie *car/-otte*, Ia *-ota*.

El Gr *kárôton* s.s., eble der. de *kára* "kapo" (pro la kompaktaj umbeloj); vd. tiuokaze *kranio*.

**KARP/O** (f; RE): A *carp*, F *-e*, I *-ione*, (H *-a*), G *Karpfen*, PoR *karp*; L zool. *Cyprinus carpio*. Tiu ĉi zoologia termino escepte baziĝas ne sur L sed sur la modernaj fontlingvoj, evidente pro ilia preskaŭ kompleta akordo. ¶ Io =, Ie *carp/e*, Ia *-a*.

Ĝenerala eŭropa fiŝnomo (unue en L formo *carpa*, 6a jc) kun nekonata etimologio.

**KARPEN/O** (f; RE): L *carpinus*; F *charme*, I *carpin/e, -o*, (H *carpe*). Botanika termino el L; vokalŝanĝo *i* > *e* por malebligi konfuzon kun *karp/in/o* (vd. sub *abomeni*). ¶ Io *karpino*, Ie *carpino*; Ia *fago blanc* 'blanka fago'.

Kredeble nomita laŭ siaj dentitaj folioj; tiuokaze – same kiel Li *skirpstùs* "ruĝa fago" – de plivastigita HE rad. **ker-* "tranĉi" (vd. *korko*; kp spec. *ĉarpio*).

**KART/O** (f; Du,RE) 1) ĝen. 2) por ludo 3) geogr. (kp *map/o*): A *card* (1,2), F *carte* (1,2,3), G *Karte* (1,2,3), I *carta* (1,2,3; 1 ank. *cartolina*), Po *karta* (1,2), R *kartoĉka* (1), *karta* (2,3). Kp Wiener 1950, 101 (pritraktas ankaŭ la ĝemelan vorton eo *ĉarto* Wü). ¶ Io = (1,2), Ie *cart/e* (1,2,3), Ia *-a* (1,2,3).

El L *charta* "papero (el papiruso)", el Gr *khártês* "papirusa folio", kredeble de egipta origino. Samfamiliaj vortoj en Eo: *kartono*, *kartoĉo*, *kartograf(i)o*, *kartuŝo*.

**KARTAV/I** (f; EG): R *kartavit'*. Kp Ji *kartaven*. ¶ Io *kartavar* (espismo); mankas en IeIa.

Sonesprima radiko kun varia signifo en la diversaj slavaj lingvoj (ekz. Po *karcić* "admoni, puneti"); obskura etimologio.

**KARTILAG/O** (f; RE): AF *cartilag/e*, I *-ine*, (H *cartílago*); L *cartilag/o -inis*. Eble prenita rekte el L kiel anatomia termino. ¶ Io =, Ie *cartil/ágine*, Ia *-agine*.

Par. al L *cratis* "plektaĵo" (vd. *krado*).

**KARTOĈ/O** (f; RE): A *cartridge* (*cartouch*†), F *cartouche* [-úŝ], I *cartuccia* [-úĉa], (H *cartucho* [-ĉ-]). La radiko kredeble devas esti prijuĝata konekse kun *kartuŝ/o* (kiu tamen aperas iom pli malfrue); se tiel, *-o-* kaj *-ĉ-* povas esti elektitaj por kontrasti kun *-u-* resp. *-ŝ-*. Mi rigardas *-o-* (ne en la fontlingvoj) kiel simpligon de la F ortografio. ¶ Io *kartocho* (espismo), Ie *cartuch/e*, Ia *-a*.

I vorto, der. de *carta* "papero; karto" (vd. tiun; la kartoĉoj estis komence cilindretoj el kartono). – De paralela I der. *cartaccia* devenas G *Kartätsche*, Po *kartacz*, R *karteč'* "mitrajlo", kiuj estas donitaj en UV kiel GPoR tradukoj de *kartoĉ/o*. Kp. *kartuŝo* (kvazaŭĝemelo).

**KARTOGRAF/O** (7; Wü; antaŭe *kartografi/ist/o*, *kart/ist/o*): A *cartograph/er*, F *-e*, G *Kartograph*, I *cart/ografo*, (H *-ógrafo*), PoR *kartograf*. – Sciencnomo: **KARTOGRAFI/O** (2; Jü): A *cartograph/y*, F *-ie*, G *Kartographie*, I *cartograf/ia*, (H *-ía*), Po *kartograf/ia*, R *-ija*. Ps-sf *-i* 1.

Konstruitaj (en F, 19a jc) el F *carte* "karto"

*hos* "(pri)skribanto, desegnanto" resp. *-graphía* "(pri)skribado, desegnado" (vd. *geografo*; kp *biografo*).

**KARTON/O** (f; RE): F *cart/on*, I *-one*, (H *-ón*), G *Karton*, PoR *karton*. Kp A *carton* "-a skatolo". Ps-sf *-on*. ¶ Io =, IeIa *carton*.

Aŭgmentativo de I *carta* "papero" (vd. *karto*).

**KARTUŜ/O** (2; Jü): AF *cartouche* [-uŝ], G *Kartusche* [-úŝ-], I *cartoccio* [-oĉ-], Po *kart/usz* [-uŝ], R *-uŝa*. La Ea formo havas tre fortan fonetikan bazon: AFGPoR. ¶ Io *kartusho*; Ie *cartuch/e*, Ia *-a** (ank. "kartoĉo").

Orig. "paper/konuso, -rulaĵo" (kartuŝo havas la formon de duone malvolvita paperrulaĵo), der. de I *carta* "papero" (vd. *karto* kaj la kvazaŭĝemelon *kartoĉo*).

**KARUSEL/O** (f; RE): F *carr/ousel* [-u-], (H am. *-usel*), G *Karussell*, I *carosello*, Po *kar/uzela*, R *-usel'*. Eo *-s-* estas apogata de la prononco en FGR. ¶ Io =, Ie *carrusselle*, Ia *carosello*.

I (neapola) vorto, orig. signifanta specon de turniro (16a jc), kun pridisputata etimologio.

**KAS/O** (f; RE): F *caisse*, G *Kasse*, I *cassa*, PoR *kasa*, (H *caja*). Kp A *cashier* "kasisto". Eo *-s-* kiel normale el fontlingva *-ss-*. ¶ Io =, IeIa *cassa*.

El L *capsa* "ujo, kesto, skatolo", de HE rad. **kap-* "preni" (vd. *kapti*; kp spec. *kapsulo*).

**KASEROL/O** (f; RE): F *casser/ole*, I *-uola*, G *Kasserolle*, R *kastrjulja*, (H *cacerola*). Kp A *casserole* "stufpoto". Evidente bazita sur FG; senvoĉa intervokala *-s-* pro origina *-ss-*. ¶ Io *kasrolo*, Ie *casserol*, Ia *-a*G.H.

Dim. de F ant. *casse* "pelvo, pato", el L vulg. *cattia* "trulo, ĉerpilo", kredeble el Gr *kyáthion*, dim. de *kyathos* "ĉerpilo".

**KASK/O** (f; RE): F *casque* [kask], I(H) *casco*, Po *kask*, R *-a*. ¶ Io =, IeIa *casco*.

H vorto, orig. "rompaĵo de vazo" ( > "kranio" > "kasko"; por la semantiko, kp I *testa* "kapo" < L *testa* "ceramikaĵo"), der. de *cascar* "disrompi", el L vulg. **quassicare* "skui", paralela formo de L *quassare* "skui", verbo intensa de *quatere* "skui" (kp tiun k *diskuti*).

Kp spec. sekv.

**KASKED/O** (8; PV; ne ĉe Z): F *casquette* [kaskét], (H *casquete*). Konsonantŝanĝo *t* > *d* por eviti kolizion kun *kask/et/o*. Vd. sub *aldo*; kp spec. *bufedo, cigaredo, pikedo, planedo*. ¶ Io *kasqueto*, Ie *casquette*, Ia *caschetto*.

Dim. de F *casque* "kasko" (vd. tiun).

**KAST/O** (1; RE): AF *cast/e*, I(H) *-a*, G *Kaste*, PoR *kasta*.

El P *casta*, propr. "pura (raso)", el L *castus* "pura, ĉasta" (vd. tiun).

**KASTANJET/O** (4; Bat,Ve): A *cast/anet*, F *-agnette* [-n'-], I *-agnetta* [-n'-], (H *-añeta* [-n'-]), G *Kastagnette* [-nj-], Po *kast/anieta*, R *-an'eta*. Latinida [n'] redonita per *nj* kiel en *konjako, sinjoro*; vd. plue sub *akompani*; kp spec. *kaŝtano*. Ps-sf *-et*. ¶ Io *kastanyeto*, Ie *castaniett/e*, Ia *-a*.

H vorto, propr. "kaŝtaneto" (pro la formo, kiu similas al tiu de kaŝtano). Kp *kaŝtano*.

**KASTEL/O** (f; RE): A *castle*, F *château*, I *castello*, (H *castillo*). Kp G *Kastell* "citadelo", R *kasteljan* "kastelmastro". Influo de L (vd. sube) probabla. ¶ Io =, Ie *castell/e*, Ia *-o*.

El L *castellum* "fortikaĵo, citadelo", propr. dim. de *castrum* "reduto" (plur. *castra* "kampejo"); kredeble orig. "detranĉita [apartigita] grundo", samradika kun L *castrare* "detranĉi, kastri" (vd. tiun).

**KASTOR/O** (f; RE): F(H) *castor*, I *-o*; L *castor* (L zool. *Castor fiber*). Kp A *castor* "substanco sekreciita de la kastoro" (= F *-éum*, I *-eo*, H *castóreo* > eo *kastore/o* Ve). ¶ Io =, IeIa *castor*.

El Gr *kástôr* s.s., identa al la nomo de la heroo *Kástôr* (*Kastor/o* PIV), kiu estis konsiderata kiel helpanto de virinoj; pro la uzado de la kastoreo kontraŭ virinaj malsanoj lia nomo estis transdonata al la besto, kiu donis tiun sekreciaĵon.

**KASTR/I** (f; RE): A *castr/ate*, I *-are*, (H

**KASTR/I** (f; RE): A *castr/ate*, I *-are*, (H *-ar*), F *châtrer* (kp *castration* "-o"), G *kastr/ieren*, Po *-owac'*, R *-irovat'*; L *castrare.*

Orig. "pritranĉi", de HE rad. **kas-* "tranĉi", kp Sa *castrám* "tranĉilo" k L *castus* "ĉasta" (vd. tiun k *kasto*), *castrum* "reduto" (vd. *kastelo*).

**KAŜ/I** (f; Un): F *cacher.* [-ŝ-]; pri F *ch* > Eo *ŝ*, vd. *buŝo* kaj Cherpillod 1990, 16. ¶ 1881 *kas'-*. 1894 *okult-* (< L *occultare*). ¶ IoIeIa *celar* (< L *celare*).

El L vulg. **coacticare* "kunpremi", verbo intensa de L *coactare* "kunpeli; devigi" de pref. *co-* "kun-" (vd. ps-pf *kon-*) k *agere* "peli" (vd. *agi*).

**KAŜTAN/O** (f; RE): A *chestnut*, F *châtaigne* [-n'], G *Kastanie*, I *cast/agna* [-n'-], (H *-aña* [-n'-]), Po *kasztan* [kaŝ-], R *kaŝtan*; L *castanea.* Videble bazita sur la slavaj formoj; motivo por akcepti *ŝ* estis probable deziro malebligi konfuzeblon kun *kast/an/o.* (Iom komparebla estas *poŝt/o* laŭ PoR pro *post.*) La romana [n'] ne trovis esprimon en la Ea formo (kp, kontraste, *kastanjeto*); vd. sub *akompani.* ¶ 1894 *kastani-*. ¶ Io *kastano*, Ie *castani/e*, Ia *-a.*

El Gr *kástanon* s.s. (kun *kastanéa* "-arbo"), kredeble de malgrandazia origino (kp Armena *kask* s.s.).

**KAT/O** (f; Un): A *cat*, F *chat*, G *Katze* (*Kater* "virkato"), I *gatto*, PoR *kot*, (H *gato*). Kp L postkl. *cattus*; Sv *katt.* Oni povas dubi, ĉu Z konis la malfruan L formon; A kaj G sufiĉas por doni bazon al la Ea radiko.¶ 1882 *fel-* (< L *feles*). ¶ Io =, Ie *cat*, Ia *-to.*

Vorto komune eŭropa (kp ank. IR *cat*, Li *kâtas* k.a.) kun kelkaj ekstereŭropaj similaĵoj (ekz. Ar *qitt'*, Tu *kedi*). Unue atestita el L (4-a jc); origino obskura (hipotezoj ĉe Albaut FE 245/1967, 81, kie pliaj formoj estas cititaj).

**KATAFALK/O** (1; Be): AF *cata/falque* [-k], I(H) *-falco*, G *Katafalk*, RPo *katafalk.* Ps-pf *kata-*.

I vorto, orig. "stablo" (identa kun F *échafaud*, vd. *eŝafodo*), probable el L vulg. **catafalicum* el Gr *kata-* (vd. tiun ps-pf) k L *fala* "ligna stablo, turo".

**KATAKOMB/O** (2; Jü; *katakumb-* E-isto 8/1892): A *catacomb*, F *-e*, I(H) *-a*, Po *kata/kumba*, *-komby* (plur.); L *catacumba.*

Kredeble el L vulg. **cata tumbas* "ĉe la tomboj" (kun posta alsimiligo al L *cumbere* "kuŝi"); vd. ps-pf *kata-* resp. *tombo.*

**KATALEPSI/O** (1; RE): A *cataleps/y*, F *-ie*, (H *-ia*), G *Katalepsie*, I *catalessia*, Po *kataleps/ja*, R *-ija*; L med. *catalepsia.* Ps-pf *kata-*; ps-sf *-i* 1.

El Gr *katálêpsis* s.s., orig. "atako (de malsano)", de *katalambánein* "ekposedi, ekokupi": *kata-* intensiga pref. (vd. la ps-pf), *lambánein* "preni" (rad. *lab-*, vd. *silabo*; kp spec. *epilepsio*).

**KATALOG/O** (1; RE): AF *cata/logue* [-g], I *-logo*, G *Katalog*, PoR *katalog*, (H *catálogo*); L postkl. *catalogus.* Ps-pf *kata-*.

El Gr *katálogos* "katalogo, registro", propr. "nomado, citado" de *katalégein* "laŭvice nomi (diri)": *kata-* "el-, fin-" (perfektiva pref.; vd. la ps-pf), *légein* "diri; kalkuli" (vd. *logiko*).

**KATAPLASM/O** (f; RE): A *cataplasm*, F *-e*, I(H) *-a*, G *Kataplasma*, Po *kataplazm*; L *cataplasma.* Ps-pf *kata-*.

El Gr *katáplasma* s.s., de *kataplássein* "surŝmiri, apliki (plastron k.s.)": *katá* "sur" (vd. la ps-pf), *plássein* "muldi, formi" (vd. *plastiko*).

**KATAR/O** (f; RE): A *catarrh*, F *-e*, G *Katarrh*, I(H) *catarro*, PoR *katar*; L *catarrhus.* Ps-pf *kata-*. ¶ 1906a *katro* (evidente por preventi misan analizon *kat/ar/o*).

El Gr *katárrhous* s.s., propr. "malsuprenfluo" (oni opiniis, ke muko kaŭzis la malsanon, malsuprenfluante el la cerbo), de *katarreín* "malsuprenflui": *katá* "malsupren" (vd. la ps-pf), *rheín* "flui" (vd. *reŭmatismo*).

**KATARAKT/O** (f; RE) 1) med.; neof. ank. 2) geogr. (EG): A *cataract* (1, 2), F *-e* (1, 2), G *Katarakt* (2), I *cateratta* (1, 2),

Po *katarakta* (1, 2), R *katarakt* (2), *-a* (1), (H *catarata* 1, 2); L *cataract/a* (L klas. 2, L med. 1), *-es* (1). Ps-pf *kata-*. ¶ Io =, Ie *cataract/e*, Ia *-a* (ĉiuj 1,2).

El Gr *katar(r)háktês* (1), orig. "falpordo", propr. "malsuprenfalanta": unua elemento *katá* "malsupren" (vd. la ps-pf), dua probable *rháxai* "(teren)bati". La medicina uzo baziĝas sur la signifo "falpordo": oni kredis, ke membrano, kovrante la okulon kvazaŭ falpordo, kaŭzis la malsanon.

**KATASTROF/O** (1; N-ro 15 1888, Jü): AF *cata/strophe*, I *-strofe*, G *Katastrophe*, PoR *katastrofa*, (H *catástrofe*). Ps-pf *kata-*.

El Gr *katastrophê* "renverso, turnpunkto (de dramo)", de *katastréphein* "renversi, turni malsupren": *katá* "malsupren" (vd la ps-pf), *stréphein* "turni" (vd. *strofo*).

**KATEDR/O** (1; RE): F *chaire*, G *Katheder*, I *cattedra*, Po *katedra*, R *kafedra*, (H *cátedra*). Kp A *chair* "profesor/a katedro, -eco". Ps-pf *kata-*, var. *kat-*.

Pere de L *cathedra* "seĝo" el Gr *kathédra* s.s., de *kathézesthai* "sidiĝi": *katá* "malsupren", *hézesthai* "sid(iĝ)i" (kp semantike A *sit down*, propr. "sidi malsupren"). Vd. la ps-pf *kata-* k *sidi*. Kp spec. sekv.

**KATEDRAL/O** (2; Jü; antaŭe *preĝ/ej/o katedr/a* Be): A *cathedral*, F *cathédrale*, G *Kathedrale*, I *cattedrale*, Po *katedra*, R *kafedral'nyj sobor*, (H *catedral*); L mez. *cathedralis (ecclesia)*. Ps-pf *kata-*, var. *kat-*; ps-sf *-al*.

Propr. "katedra (preĝejo)" (t.e. kun episkopa katedro), der. de L *cathedra* (vd. *katedro*).

**KATEGORI/O** (1; RE): A *categor/y*, I *-ia*, (H *-ía*), F *catégorie*, G *Kategorie*, Po *kategor/ia*, R *-ija*. Ps-pf *kata-*, var. *kat-*; ps-sf *-i* 1.

El Gr *katêgoría* "klaso (de nocioj); kvalito, predikato; akuzo", propr. "eldiro, aserto", de *katêgoreín* "eldiri, montri; akuzi": *katá* "kontraŭ; intensiga pref." (vd. la ps-pf), *agoreúein* "paroli" (vd. *alegorio*).

**KATEĤIST/O, -K-** (3; Jü:ank. *kateĥiz/ist/o*: Z, LR n-ro 31): A *catechist* [-k-], I *-a* [-k-], F *catéchiste* [-k-], G *Katechet* [-c-], Po *katecheta* [-ĥ-], R *katiĥizator*, (H *catequista* [-k-]); L ekl. *catechista* [-k-]. La formo kun *-ĥ-* verŝajne respegulas Gr X [kh] (vd. sube kaj kp s.v. *ĥaoso*) sed ankaŭ havas apogon en PoR; kp la molan prononcon de G. Ps-pf *kata-*, var. *kat-*; ps-sf *-ist*. La vorto estas agantnomo de la koncerna verbo: **KATEĤIZ/I, -K-** (3; O'Connor 1904, vd. LR n-ro 31; PV): A *catech/ize* [-k-, -z-], I *-izzare* [-k-], F *catéchiser* [-k-,-z-], G *katechisieren* [-c-,-z-], Po *katechizowac'* [-ĥ-], (H *catequizar* [-k-]); L ekl. *catechizare* [-k-]. Formo evidente paralela al tiu de la antaŭa. Vorto ne iniciatita de Z sed aprobita de li, vd. LR n-ro 31:'Pri "kateĥizi"'. Ps-pf *kata-*, var. *kat-*; ps-sf *-iz*. ¶ Io *katekiz-ero* resp. *katekizar*, Ie *catech/ist* resp. *-isar*, Ia *catech/eta, -ista* resp. *-isar*.

El Gr *katêkhízein* (agantnomo: *katêkhistês*) "instrui (pri religio)", plivastigo de *katêkheín* s.s., orig. "instrui parole, per demandoj kaj respondoj", propr. "reeĥi": *katá* "kontraŭ" (vd. la ps-pf), *êkheín* "(re)soni" el *êkhô* "(re)sono" (vd. *eĥo*). – La agonomo de la citita Gr verbo estas *katêkhismós*, de kies modernlingvaj formoj devenas eo *kateĥismo* RE "elementa lernolibro pri religio".

**KATEN/O** (f; RE): L *catena* (ank. "ĉeno"); A *chain* (precipe "ĉeno"), F *chaîne* (ank. "ĉeno"), G *Kette* (precipe "ĉeno"), I *catena* (ank. "ĉeno"), (H *cadena*, ank. "ĉeno"). Z bazis tiun ĉi radikon sur LI, tiel diferencigante ĝin disde *ĉen/o*, kiu baziĝas sur AF (kp tiun). Vd. Wiener 1950, 99. ¶ Io =, Ie *caten*, Ia *-a* (ĉiuj ank. "ĉeno").

Necerta etimologio.

**KATOLIK/A** (1; RE): A *cathol/ic*, F *-ique*, G *katholisch*, I *cattolico*, Po *katolicki*, R *katoličeskij*, (H *católico*); L ekl. *catholicus*. Ps-pf *kata-*, var. *kat-*; ps-sf *-ik*.

El Gr *katholikós* "ĝenerala, universala", adj. de *kathólou* "ĝenerale", propr. "potute": *katá* "po" (vd. la ps-pf), *hólos* "tuta" (vd. sub

*savi*).

**KATUN/O** (f; EG): A *cotton cloth* (*cloth* "tolo"), F *cotonnade*, G *Kattun*, I *tela di cotone* (*tela* "tolo"), *cotonina*, Po *katun*, (H *cotonada*). Kp la difinon en PIV: 'tolo el kotonfibroj'. Bazita sur GPo kiel formo diferencigita de *koton/o*. ¶ Radiko mankas en IoIeIa (Io *koton-telo*, Ia *tela de coton*, ambaŭ 'tolo el kotono').

Vd. la etimologie identan *kotono*.

**KAŬCI/O** (2; Jü): A(Skot.,Us)F *caution*, G *Kaution*, I *cauzione*, Po *kaucja*, (H *caución*); L *caut/io -ionis*. Ps-sf *-cio*. ¶ Io *kauciono*, IeIa *caution*.

L *cautio* orig. "singardemo, sekuremo" (kp semantike A *security*, F *sureté* "sekureco; garantio") de *cavere* "sin gardi; kaŭcii" de HE rad. **keŭ-* "rimarki, atenti", kp Sa *kaví-* "saĝa, prudenta"; Gr *koeín* "rimarki"; A *hear*, G *hören* "aŭdi".

**KAŬĈUK/O** (1; Jü): (A)F *caoutchouc* [kaŭtŝúk], G *Kautschuk* [-ĉ-], I *caucciù* [kaŭĉú], Po *kauczuk* [-ĉ-], R *kaučuk*, (H *caucho* [káŭĉo]). Eo *-ĉ-* fakte respondas al la prononco de ĉiuj fontlingvoj (ĉar *ĉ* = [tŝ]). Kp eo *maĉ/o* PIV el A *match* (apud *matĉ/o*, same kiel *buĝet/o* estas alternativo de *budĝet/o*). ¶ Io *kauchuko*, Ie *cautchuc*, Ia *cauchu*.

Pere de H el indiana lingvo en Peruo (ekz. Gvarania *cahuchu* s.s.).

**KAŬR/I** (2; Jü): G *kauern*; kp A *cower* "kaŭri (pro timo)". Bazita sur G kun ellaso de *-e-* por konservi la akcenton (analoge en *bedaŭri*). ¶ Io *squatar* (< A *squat*), Ie *hoccar* (< G *hocken*), Ia *quattar*.

Orig. signifo "kurbiĝi, esti kurba", par. al Gr *gyros* "rondo" (vd. *ĝiro*): HE rad. **geŭ-*, vd. plue sub *kuglo*).

**KAŬTERIZ/I** (f; RE): A *cauter/ize*, I *-izzare*, (H *-izar*), F *cautériser*, Po *kauteryzować*; L postkl. *cauterizare*. Ps-sf *-iz*. ¶ 1894 *kauteris-*.

El Gr *kautêriázein* s.s. de *kautêrion* "brulstampilo", formita per instrumenta sufikso el *kaíein* (rad. *kau-*) "bruligi" (kp *inko*).

**KAŬZ/O** (f; Un): AF *cause* [-z], I(H) *causa*; L *caus(s)a*. Kp G *kausal*, R *kauzal'nyj* "kaŭza". ¶ 1894 *kaus-*. ¶ Io *kauzo*, Ie *caus/e*, Ia *-a*.

L *causa* ank. "afero" (> F *chose*, HI *cosa* "afero, aĵo"; kp semantike G *Sache* "afero", *Ursache* "kaŭzo"); de nekonata origino. Samfamiliaj vortoj en Eo: *akuz/i*, *-ativo*.

**KAV/O** (f; EG): L *cavum*; A *cav/ity*, F *-ité*, I *cav/o*, *-ità*, (H *cavidad*). La apartena adjektivo estas sambaza: L *cavus*; F *cave*, I *cavo*. ¶ Io =, Ie *cav/a*, Ia *-o*.

Par. al Gr *koílos* "kava", de HE rad. **keŭ-* "ŝveli, volbiĝi", kp Sa *cv-áyati* "ŝvelas, fortiĝas", Gr *kyma* "ondo". Samfamiliaj vortoj en Eo: *kaverno*, *konkava*.

**KAVALERI/O** (1; RE): A *caval/ry*, F *-erie*, I *-leria*, G *Kavallerie*, Po *kawaleria*, R *kavalerija*, (H *caballería*). Ps-sf *-eri*. ¶ Io *kavalrio*, Ie *cavaller/ie*, Ia *-ia*.

Der. de I *cavallo* "ĉevalo", vd. tiun. Kp spec. sekv.

**KAVALIR/O** (f; RE): A *cavalier*†, F *chevalier* (PIV 2,3), *cavalier* (PIV 4), G *Kavalier* [-ír] (PIV 4), I *cavaliere*, Po *kawaler*†, R *kavaler* (PIV 3), (H *caballero*). Semantike, la Ea radiko sekvas la romanajn vortojn; la formo havas pli vastan bazon (nur la fino estas iom speciala, vd. la ps-sf *-i(e)r*). ¶ 1881 *kabalir/o*. ¶ Io *kavaliero*, Ie *cavaliero*, Ia *cavall-ero*.

Propr. "ĉevalisto", der. de I *cavallo* "ĉevalo" (vd. tiun).

**KAVERN/O** (f; RE): A *cavern*, F *-e*, I(H) *-a*; L *caverna*. Kp Po *kawerna*, R *kaverna* (med.). ¶ Io =, Ie *cavern/e*, Ia *-a*.

Propr. "kavaĵo", der. de L *cavus* "kava" (vd. *kavo*).

**KAVIAR/O** (f; RE): A *caviar(e)*, F(H) *caviar* (H ank. *cavial*), G *Kaviar*, I *caviale*, Po *kawior*. ¶ Io =, Ia *caviar*, Ie *-e*.

El Tu *havyar* s.s.

**KAZ/O** (f; RE) 1) gram. 2) okazo (ekde Wü): A *case* (1,2), F *cas* (1,2), G *Kasus* (1), I(H) *caso* [I -z-] (1,2), R *kazus* (2). Eo *-z-* estas apenaŭ apogata de la fontlingvoj; grava estis la diferencigo disde *kas/o*. La senco "okazo" trudiĝis pro in-

ternacieco (AFHI); pri la semantika evoluo vd. Piron en Schubert 1989, 130: medicina kaj jura termino en la 20-aj jaroj, hodiaŭ preskaŭ ekvivalento de F *cas.* ¶ 1894 *kasu-*. ¶ Io =, Ie *cas/u*, Ia *-o* (ĉiuj 1,2).

Propr. "falo" (la antikvaj gramatikistoj imagis la nominativon kiel rektan formon, la aliajn kazojn kiel "defalojn" de tiu – kp semantike *deklinacio* k G *Fall* "kazo"; por la semantika evoluo "fali [al iu]" > "okazi [al iu]", vd. *okazo*), subst. de L *cadere* "fali" (vd. *kadenco*).

**KAZE/O** (f; RE): Neniu el la fontlingvaj ekvivalentoj similas al la Ea formo (la koincido kun H *cáseo* – en H pli ofte *cuajada* – estas hazarda). Kredeble Z deiris de la internacia kemia termino A *casein*, I *-a*, F *caséine*, G *Kasein*, (H *caseína*), R *kazein*, Po *-a* (> eo *kazein/o* Jü), forstrekis la sufikson kaj donis al la restanta bazo la sencon "fromaĝosubstanco". Alternativa fonto (kun analoga procedo) povus esti la adjektivo A *caseous*, F *caséeux* "fromaĝeca". En G la ekvivalento estas *Weisskäse* (propr. "blanka fromaĝo"), kies dua elemento etimologie respondas al *kaze/o* (vd. sube). ¶ 1894 *kasa-*. ¶ Io = (espismo); Ie *coagulat lacte* (kp F *lait caillé*); Ia *caseo molle* ('mola fromaĝo'; kp F *fromage mou*).

El L *caseus* "fromaĝo" (> A *cheese*, G *Käse*, H *queso* s.s.), der. de vorto signifanta "fermentilo", de HE **kŭat-* "fermenti", kp Sa *kváthati* "bolas", R *kvasit'* "fermentigi".

**KAZEMAT/O** (2; RE): AF *casemate* [-z-], G *Kasematte*, I *casa/matta* (H *-mata*), Po *kazamata*, R *kazemat*. Eo *-e-* laŭ AFGR; normala intervokala *-z-* kun apogo en kelkaj fontlingvoj. ¶ Io =, Ie *casemate*, Ia *casamata**.

I vorto, eble el Gr *khásmata* "fendegoj, abismoj", uzata kiel fortikaĵa termino (plur. de *khásma*, subst. de *kháskein* "malfermi la buŝon, faŭki"; kp tiuokaze la paralelan *khaínein* sub *ĥaoso*), sed almenaŭ forme influita de I *casa* "domo" (vd. *kazino*).

**KAZERN/O** (1; Jü): F *caserne* [-z-], G *Kaserne*, I *caserma* [-z-], Po *koszary* (plur.), R *kazarma*. Intervokala Ea *-z-* laŭ la plimulto de fontlingvoj. ¶ Io =, Ie *casern/e*, Ia *-a*.

El Oc *cazerna*, orig. "ejo por kvar soldatoj", el L vulg. **quaterna*, subst.-igita formo de L *quaterni* "kvarope", de *quattuor* "kvar" (vd. tiun k *kajero*, kiu estas etimologie identa).

**KAZIN/O** (2; Jü): AFI(H) *casino* [FI -z-], G *Kasino*, Po *kasyno*, R *kazino*. La kutima intervokala *-z-* havas apogon en kelkaj fontlingvoj. ¶ Io =, IeIa *casino*.

I dim. de *casa* "domo" el L *casa* "dometo, kabano", eble orig. "kabano el plektaĵo", kp L *cassis* "ĉasreto". Parenca vorto en Eo: *ĉe*; kp. ank. *kazemato*.

**KE** (f; Un): F *que* [ke'], I *che* [ke]. Kp HP *que* [ke]. (Pliaj, pli malproksimaj koneksoj ĉe Bianchini, 75.) ¶ 1881 *ŝu* (rilatigita al Po *z'e* en PVZ 5, 147). ¶ Io =, Ie *que* [kŭe], Ia *que* [ke, kŭe].

El L *quia* "ĉar; ke (L mez.)", orig. formo (neŭtra plurala) de la pronomo *qui(s)* "kiu", vd. tiun.

**KEGL/O** (f; RE): F *quille* [kij], G *Kegel*, Po *kregiel*, R *keglja*. Kp Ji *kegl*; ank. Da *kegle*. Bazita sur G; la formoj R kaj Ji sugestis ellason de la dua *e*, per kio la fontlingva akcento sur la unua *e* estis konservata. Paralela estas la traktado de *kuglo*. ¶ Io =, Ie *kegle* (espismoj), Ia *quillia*.

El pG> **kagila-*, dim. de vorto signifanta "fosto, paliso".

**KEJL/O** (8; Ve, PV; ne ĉe Z): G *Keil*. Kp Sv *kil*. Transskribo de G laŭ la grafismo; analoga traktado fare de Z en *hejmo*, *hejti*, *mejlo* (vd. Cherpillod 1990, 21). ¶ Io *kelo*; Ia *cavilia* (< F *cheville*, I *caviglia*); neniu specifa termino en Ie, kp s.v. *kojno*.

Orig. "fendilo, dissplitilo", formita per instrumenta sufikso el la pĜ rad. **ki-* "fendi", kp A *chine* "ravino". Parenca vorto en Eo: *keno*.

**KEL/O** (f; RE): A *cellar*, G *Keller*, ank. Sv *källare*. Kp F *cellier* "vinkelo; provizejo". Bazita sur G kun forstreko de la neakcentata sufikssimila finsilabo (eventuala **kelar-* estus samkaŭze maloportuna). Pri analogaj kazoj, vd. *glimo*. ¶ 1894 *kelar-*. ¶ Io *kelero*, Ie *céllare*, Ia *cellario*.

El L *cellarium* "provizejo, kelo", der. de *cella* "ĉambreto, ĉelo" (vd. *ĉelo*). Kp spec. *kelnero*.

**KELK/A** (f; Un): F *quelque* [kélke'], I *qualche* [-ke]; kp Po *kilka* "-aj". Sendube bazita sur F, eĉ se la frapa simileco de la Po formo eble favoris la adopton. ¶ Io =, Ie *quelc*, Ia *qualque* [kŭalke].

La FI vortoj, orig. signifantaj "kiu ajn" (> "iu ajn" > "iu, kelka"; kp ank. H *cualquier* "iu ajn"), estas kombinaĵoj de pronomo demanda (F *quel*, I *quale* "kiu? kia?") k pronomo rilativa (F *que*, I *che* "kiu"); la nuna signifo estas rezulto de mallongigita frazo. (F *quel* el L *qualis* "kia", vd. *kvalito*; F *que* el L *qui*, vd. sub *kiu*). – La Po formo same devenas de demanda pronomo, signifanta "kiom?" (pSl **kolikŭ*, kp R *skol'ko* "kiom?"). Ambaŭ de HE **kŭ-*, bazo de demandaj kaj nedifinaj pronomoj, vd. sub *kiu*.

**KELNER/O** (f; RE): G *Kellner*, Po *kelner*, R *kel'ner*. La (en la fontlingvoj senakcenta) finsilabo estas konservita (kiel en *cifero* ktp, kp tiun kaj vd. Cherpillod 1990, 21), fakte pro neceso: **keln/o* estus nesufiĉe distingiga, **kelnr/o* tro malfacile prononcebla. Povas esti, ke Z ne volis malhavi la personsignan sufikson en tiu ĉi vorto: ps-sf *-er*, var. de *-i(e)r* (sama varianto en *makler/i*). ¶ Ie *garson*, Io *-o* (< F *garcon*); Ia *servitor* (kun pli vasta signifo: "servisto").

Propr. "kelisto", der. de G *Keller* "(vin)kelo", vd. *kelo*.

**KEMI/O** (8; Ve), vd. **ĤEMI/O**.

**KEN/O** (f; RE): G *Kien* [ki:n]. Laŭ analogaj kazoj kun G *ie*, oni unualoke atendus **kino* (kp *Kiel* > *kilo*, *Riemen* > *rimeno*, *schmieren* > *ŝmiri*; rimarku ke *kin/o* kiel mallongigo de *kinematografa arto* estas pli nova [PV] kaj ne-Za), dualoke **kieno* (ekz. *Miene* > *mieno*); la traktado *ie* > *i* estas unika (vd. Cherpillod 1990, 22). Ĉu ŝablona ŝanĝo *in* > *en*? (sed kp *lin/o*, *min/o*, *sin/o* ktp.) ¶ 1894 *resine ligno*. ¶ Mankas vorto por tiu nocio en la aliaj L.I. (Io *rezinoza ligno*, Ia *ligno resinose*).

Orig. "kena torĉo", propr. "splitaĵo", par. al G *Keil* "kojno, kejlo", orig. "dissplitilo" (vd. *kejlo*).

**KEP/O** (f; RE): APoR *kepi*, F *képi*, G *Käppi*, I *chepì* [ke-], (H *quepis* [ke-], *kepis*). Apokopo de finvokalo *-i* same kiel en *kolibr/o*, *paĉul/o*. ¶ Io *kepio*, IeIa *kepi*.

Svisgermana vorto, dim. de G *Kappe* "ĉapo" (vd. tiun).

**KER/O** (f; RE): F *coeur* [kö:r], G *Coeur* [kö:r], I *cuori*, Po *kier*, R *ĉervi*, (H *corazón*). Prenita el F same kiel la aliaj nomoj de ludkartaj emblemoj (por F [ö] > Eo *e*, kp *meblo*, *parkere*.) ¶ La aliaj L.I. uzas por tiu nocio la vorton por "koro".

Propr. "koro" (pro la formo de la karakteriza simbolo), etimologie identa al tiu (la cititaj FHI formoj signifas ankaŭ "koro", kp ank. A *heart*, G *Herz* "koro; kero").

**KERN/O** (f; RE): A *kernel*, G *Kern*. Kp Da *kaerne*, Nd *kern*. Bazita sur G. ¶ Io = (espismo); Ie *núcleo*, Ia *nucleo* (< L *nucleus*), *grano* (ank. "grajno"), *pepita* (< H, kp A *pip*).

El pĜ **kernan-* (la A formo estas orig. diminutivo), paralela al G *Korn* "grajno", kiu estas etimologie identa kun L *granum* "grajno" (vd. tiun).

**KERUB/O** (f; RE): A *cherub* [ĉ-], F *chérubin* [ŝ-], G *Cherub* [c-], I *cherubino* [k-], Po *cherubin* [ĥ-], R *ĥeruvim*, (H *querubin* [k-]). Oni atendus molan komencsonon laŭ la plimulto de fontlingvoj; eble la hebrea originformo (vd. malsupre) estis decidiga. mallonga radikformo laŭ AG; *-in* ja maloportune sugestus insekson. ¶ Io =, Ia *cherub*, Ie *-e*.

El He *ke'rûb* (plur. *ke'rûbîm*) "kerubo, supernatura estaĵo simbolanta Dian poten-

con" (vd. Biblian Vortaron s.t.v.), vorto de akada origino (vd. Cherpillod 1989, 32).

**KEST/O** (f; Un): A *chest*, G *Kasten*, *Kiste*; L *cista*. Kp A *case*, F *caisse* [kes], I *cass(ett)a*, (H *cassa*) s.s. Ŝajne miksformo kun A vokalismo kaj G konsonantismo (vd. *draŝi*); eble la F prononco influis la radikkomencon. Fakte **kist-* laŭ GL estus same ebla (la medicina termino *kist/o* aperis nur en Ve). ¶ 1882 *iri/o* (sen etimologio, vd. PVZ 5, 137). ¶ Io = (espismo), Ie *cheste*; Ia *cassa*.

A *chest*, G *Kiste* pere de L *cista* el Gr *kístê* "korbo, kesto". Samfamilia vorto en Eo: *cisterno*. – Pri la etimologio de A *case*, F *caisse* ktp, vd. *kaso*. – La etimologio de G *Kasten* estas pridisputata.

**KIA** (f; Un): Vd. la sekcion pri korelativaj vortoj. ¶ 1882 *kva*, 1894 *kvale* (< L *qualis*, vd. *kvalito*). ¶ IeIa *qual*, Io *-a*.

**KIAL** (f; Un): Vd. la sekcion pri korelativaj vortoj. ¶ 1894 *por kvo* ('pro kio?'). ¶ IoIe *pro quo*, Ia *proque*, *perque*.

**KIAM** (f; *kian* Un, *kiam* Ald): Vd. la sekcion pri korelativaj vortoj. ¶ 1881 *kvan*, 1894 *kvandu* (< L *quando*). ¶ Io *kande*, Ie *quand/e*, Ia *-o*.

L *quando* (> F *quand*, I *-o*, H *cuando*) orig. probable "ĝis kio": *quam* oblikva formo de *qui(s)*, *quid* "kiu, kio" (vd. sub *kiu*), **do* prep. identa kun A *to* "al" (vd. *de*). Kp Sa *kadâ* "kiam".

**KIE** (f; Un): Vd. la sekcion pri korelativaj vortoj. ¶ 1894 *ubu* (< L *ubi*). ¶ Io *ube*, Ie *ú*, Ia *ubi*.

L *ubi* (> F *où* [u:]) orig. **cubi* (kp *ali-cubi* "i(ulok)e") de HE **kŭu-*, demanda pronomradiko paralela al **kŭi-* (vd. sub *kiu*). Kp Sa *kuha* "kie?".

**KIEL** (f; Un): Vd. la sekcion pri korelativaj vortoj. ¶ 1881 *kve*, mallongigita formo *ke* (PVZ 5, 138): evidente bazita sur la bazo de L *quam*. – 1894 *kom* (< F *comme*). ¶ Io *quale* (adv.; vd. sub *kia*), *kom* (konj.); Ie *qualmen* (adv.), *quam* (konj.); Ia *como*, *quam* (ambaŭ adv. k konj.).

**KIES** (f; Un): Vd. la sekcion pri korelativaj vortoj. ¶ 1894 *de kvu* ("de kiu"). ¶ Io *di qua*, Ie *de qui*, *de quel*, Ia *cuje* (< L *cuius*, H *cuyo*).

HE originformo **kŭeso*; kp ank. G *wes(sen)*.

**KIL/O** (f; RE): A *keel* [ki:l], F *quille* [ki-], G *Kiel* [kil], I *chiglia* [kí-], Po *kil*, R *kil'*, (H *quilla* [kí-]). ¶ Io *kilio*, Ie *kil*, Ia *carina* (< L), *quilla**.

El pĜ **keluz*. Oni supozas parencecon al G *Kehle* "gorĝo" (vd. sub *gluti*); tio validas, se oni akceptas la semantikan evoluon "gorĝo" > "kolo" > "io kurba" > "kilo".

**KILOGRAM/O** (f', 1; Un): A *kilo/gram(me)*, F *-gramme*, Po *-gram*, R *-gramm*, (H *-gramo*), G *Kilogramm*, I *chilogramma* [ki-]. **KILOMETR/O** (f', 1, 7; Du): A *kilo/metre*, F *-mètre*, PoR *-metr*, G *Kilometer*, I *chilometro* [ki-], (H *kilómetro*). ¶ Io =, Ie *kilo/gramme*, *-metre*, Ia *kilo/gramma*, *-metro*.

Konstruitaj (en F, 1795) el Gr *khílioi* "mil" (el HE **gheslio-* "mil", vd. ank. *mil*) k *grámma* resp. *métron* (vd. *gramo*, *metro*).

**KIN/O** (8; Wü; ne ĉe Z): R *kino* (ank. "-ejo"). Kp G *Kino* "-ejo", Po *kino* "-ejo". Tiu formo estas unu mallongigo de *kinematograf-* (Jü) aŭ *kinematografi-* (GD); aliaj estas AI *cinema*, F *ciné(ma)* (kp eo *kinem/o* Wü), H *cine* (ĉiuj "kin/o, -ejo"). Eo do alprenis la GPoR mallongigon, kiu tamen precipe signifas la ejon, ne la arton. ¶ Io *cinematograf-ala arto*, Ie *cinematic arte*, Ia *arte cinematographic*.

R *kino*, G *Kino* el *kinematograf* resp. *Kinematograph*, el F *cinématographe*, termino farita en 1895 de la fratoj Lumière el Gr *kinêm/a -atos* "movado" (de *kineín* "movi", vd. *citi*) kaj *-graphos* "skribanto" (vd. *telegrafo*).

**KININ/O** (4; Jü): AF *quin/ine* [A kŭi-, F ki-], (H *-ina* [ki-]), G *Chinin*, IPo *chinina* [I ki-], R *ħinin*; L sc. *chininum* [ki-]. Ps-sf *-in* 2. ¶ Io *quinin/o*, Ie *-e*, Ia *-a*.

Formita (en F, 1820) el H *quina* "kinkono" el Kečua *kina* "arbošelo".

**KIO** (f; Un): Vd. la sekcion pri korelativaj vortoj. ¶ 1881 *kvo*, mallongigita formo *ko* (PVZ 5, 138); 1894 *kvo* (< L *quod*,

vd. sub *kiu*). ¶ IoIe *quo*; Ie *que* (< FH *que*).

**KIOM** (f; Un): Vd. la sekcion pri korelativaj vortoj. ¶ 1894 *kvantu* (< L *quantum*, vd. *kvanto*). ¶ Ie *quant*, IoIa *-e*.

**KIRAS/O** (f; RE) 1) armaĵo 2) blendo (ekde Jü): A *cuirass* (1), F *-e* (1,2), G *Kürass* (1), I *corazza* (1,2) , Po *kirys* (1), R *kiras(a)* (1), (H *coraza* 1,2). Formo laŭ R(GPo), semantiko laŭ FI. Fontlingva *ss* (antaŭe ank. en R) donas Eo *s*. ¶ Io *kuraso* (1,2), Ie *curasse* (2), Ia *cuirasse* (1,2).

El L *coriaceus* "leda", de *corium* "ledo", orig. "felo", de HE rad. **(s)ker-* "(de)trancî" (vd. *korko*).

**KIRL/I** (3; Jü): G *quirlen* [kv-]. Eble forma influo de A *whirl*, *twirl* s.s. Radiko komence simpligita (kp *kiraso* supre!). ¶ IoIe *quirlar* (espismoj); Ia *batter (con le molinetto)* 'bati (per la kirlilo)'.

Der. de G *Quirl* "kirlilo", kun ŝanĝita komencsono el G ant. *twiril* s.s. (kp A *twirl* "kirlilo: kirl(iĝ)i") de HE rad. **tŭer-* "turni, kirli", kp Sa *tvárate* "rapidas", Gr *otryein* "eksciti, rapidigi", L *turba* "malordo; moviĝanta amaso", *turbo* "kirliĝo" (vd. *turbo*).

**KIRŜ/O** (2; Jü): G *Kirsch(wasser)* [-ŝ-]. Ekzistas kiel fremdvorto en aliaj fontlingvoj: A *kirsch(wasser)* [-ŝ-], F *kirsch* [-ŝ], ¶ Io *kirsho*, Ie *kirsch*, Ia *kirschwasser*.

Propr. "ĉeriz(akvo)": G *Kirsche* "ĉerizo", *Wasser* "akvo". Vd. la etimologie identan *ĉerizo*.

**KIRURG/O, Ĥ-** (8; *ĥ*-Jü, *k*-Wü): A *surgeon*, F *chirurgien* [ŝ-], G *Chirurg* [c-], Po *chirurg* [ĥ-], I *-o* [k-], R *ĥirurg*, (H *cirujano* [th-]); L *chirurgus* [k-]. La komencsono ne baziĝas rekte sur la fontlingvoj sed dependas de la tradicia transskribo de Gr X [kh]: origine *ĥ*, pli poste *k*. – Sciencnomo: **KIRURGI/O, Ĥ-** (8; *ĥ*-E-isto 6/1892, Jü, *k*-Ve): A *surgery*, F *chirurg/ie* [ŝ-], IPo *-ia* [I k-, Po ĥ-], G *Chirurgie* [c-], R *ĥirurgija*, (H *cirujía* [th-]); L *chirurgia*. ¶ Io *kirurgi/isto, -o*, Ie *chirurg, -ie*, Ia *chirurg/o, -ia*.

El Gr *kheirourg/ós* "kirurgo" resp. *-ía* "operacio", propr. "manlabor/anto, -ado": *kheir* "mano" (el HE **ghesr-*), *érgon* "laboro" (vd. *verko*, kp spec. *energio, liturgio*).

**KIS/I** (f; Un): A *kiss*, G *küssen*. Kp ank. Nd *kussen*, Sv *kyssa*. La radiko povas esti rigardata kiel transskribo de AG, kvankam la evoluo G *ü* > Eo *i* estas escepta (normale *u*, vd. *flustri*); en *kiras/o* la *-i-* troviĝas en PoR. Z cetere hezitis inter tiu vokalo kaj tiu de G subst. *Kuss* (vd. pEo); inverse okazis ĉe G *Flug* : *fliegen*, kie la substantiva *u*-vokalo estis akceptata. ¶ 1882 *kuss-*; 1894 *baci-* (< I *baciare*, kp F *baiser*, H *besar*). ¶ Vp *kidön*, Io *kisar* (espismo), Ie *besar*, Ia *basiar, oscular* (< L *osculari*).

Ĝermana vorto, kredeble de onomatopea origino, kp Gr *ékyssa* "(mi) kisis".

**KITEL/O** (f; RE): G *Kittel*, Po *kitel*, R *kitel'*. Kp Nd *kiel*. ¶ 1894 *sukenil-* (< F *souquenille*). ¶ Mankas en la aliaj L.I.

Eble el Ar *qut'un* "kotono" (vd. tiun).

**KIU** (f; Un): Vd. la sekcion pri korelativaj vortoj. ¶ 1881 *kvu*, mallonga formo *ku* (< L *quis* dmd., *qui* ril.); 1894 *kvu*. ¶ Io *qua* (dmd., ril.); Ie *qui* (dmd.,ril.; kp F *qui*, I *chi* [ki]), *quel* (dmd. adj., ril.; kp F *lequel*); Ia *qui* (dmd., ril.), *que* (dmd.,ril.; kp F *que* ril., I *che* [ke] ril.), *qual* (dmd., vd. sub *kia*), *le qual* (ril., kp F *lequel*).

La L kaj latinidaj formoj (kp ank. sub *kio*) devenas de HE bazo **kŭ-*, kiu servis por formado de demandaj kaj nedifinaj pronomoj k adverboj (la evoluo al rilativaj okazis poste en la diversaj lingvobranĉoj): **kŭo-*, kp Sa *kah* "kiu", Gr *pôs* "kiel", L *quod* "kio", Gt *hvas* "kiu", R *kto* "kiu"; **kŭ(e)i-*, kp Sa *kim* "kio", G *tís* "kiu", L *qui(s)* "kiu", *quid* "kio", G *wie* "kiel", R *čto* "kio", Po *czy* (vd. *ĉu*); **kŭu-* (nur adv.), kp Sa *kû* "kie", L *(c)ubi* "kie" (vd. sub *kie*), A *how* "kiel". Vd. ank. *kvalito, kvanto, kvociento*.

**KLAĈ/I** (4; Rabe,Ka; antaŭe *babil/aĉ/i, ĉikan/i*): G *klatschen* [-tŝ-]. Kp Nd *kletsen*. La enkonduko de *klaĉ/i* rezultigis ŝan-

ĝon en la semantiko de *ĉikan/i*, kp tiun kaj vd. Waringhien LV 87. ¶ Io *babilachar*, Ie *lingu-ard-ar*, Ia *commatrar* (de *commatre* "baptopatrino"), *garrular* (L *garrulus* "babilema").

Onomatopea vorto; G *klatschen* signifas ank. "klaki", kp A *clash* "kunfrapiĝi".

**KLAFT/O** (f; RE): G *Klafter*. Kp Ji *klafter*. Por analogaĵoj al la apokopo de (senakcenta) *-er*, vd. *glimo*. ¶ 1894 *tois-* (< F *toise*). ¶ Io *"toise"*; Ie *brassade* (de *brasse* "brako"); Ia *fathom* (< A).

Orig. "ĉirkaŭbrakaĵo (= tio, kion oni povas teni per la brakoj"), kp A *clip* "†ĉirkaŭ/braki, -pinĉi; pinĉilo", par. al Li *glóbti* "ĉirkaŭbraki", L *globus* "globo" (HE rad. **gel-* "buligi", vd. *globo*).

**KLAK/I** (3; Ka): A *clack*, F *claquer* [klaké]. Kp Nd *klakken*. Pluraj similaj formaĵoj ekzistas, ekz. A *click*, *clap*, G *klatschen*, *klappe(r)n* (vd. sekv.), Po *klaskać*. Kp ank. *kraki*. ¶ Io *klakar*, IeIa* *claccar*.

Onomatopea vorto, kp F intj. *clac*! .

**KLAP/O** (f; RE): F *clapet*, G *Klappe*, R *klapan*, Po *klapa*. Kp Da *klap*, Nd *klep*. La radikon konsistigas la elemento komuna al FGPoR. ¶ Io =, Ie *clappe*; Ia *valva* (< AF *valve*).

Orig. "klakbruo" (> "io, kio fermiĝas per tia bruo"), kp F *clapper* "(lango)klaki", G *klappen* "klaki", ambaŭ de onomatopea origino.

**KLAR/A** (f; Un): L *clarus*; A *clear*, F *clair* (kp A *clar/ity*, F *-té* "-eco"), G *klar*, I *chiaro*, (H *claro*). Kp Sk *klar*. ¶ Io =, IeIa *clar*.

Komuna ĝerm.-rom. adj. de L origino: L *clarus* signifas "klara" = "hela; laŭta, facile aŭdebla; komprenebla; fama"; la orig. signifo estas "laŭta" (por la semantika evoluo, kp *hela*), de la radiko en L *calare*, *clamare* "voki" (kp *a-*, *de-*, *pro/klami*) de HE rad. **kel-* "voki", ekz. en Sa *uśâ-kala-* "koko" (propr. "kiu alvokas la matenruĝon"); Gr *kaleín* "voki", *ekklêsía* "asembleo de civitanoj" (vd. *eklezio*); L *classis* propr. "kunvokitaro" (vd. *klaso*), *calendae* "la unua tago de monato" (vd. *kalendaro*); G *hallen* "sonori; resoni", *hell* "hela" (vd. tiun). Kp spec. *deklar/i*, *-acio*, *klarneto*.

**KLARNET/O** (f; RE): A *clarin/et*, F *-ette*, I *-etto*, (H *-ete*), G *Klarinette*, PoR *klarnet*. Pro la malfeliĉa koincido, ke adopto de la AFGI formo rezultigus duoblan sufiksecan finon (**klarinet-*), Z preferis imiti la slavajn formojn. Ps-sf *-et*. ¶ 1894 *klarinet-*. ¶ Io *klarineto*, Ie *clarinett/e*, Ia *-o*.

Dim. de I *clarino* "speco de trumpeto kun klara sono", der. de L *clarus* "klara" (vd. tiun).

**KLAS/O** (f; RE): A *class*, FI *-e*, G *Klasse*, Po *klasa*, R *klass*, (H *clase*); L *classis*. Fontlingva *ss* > Eo *s* (kiel kutime). ¶ Io =, IeIa *classe*.

L *classis* orig. "kunvokado" (> "kunvokitaro" > "grupo, klaso"), par. al *calare* "voki" (vd. *klara*). Samfamiliaj vortoj en Eo: *klasifiki*, *klasika*.

**KLASIFIK/I** (3; Jü; ank. *klas/i*, *-ig/i* Wü): A *classi/fy*, F *-fier*, I *-ficare*, G *klassifizieren*, Po *klasyfikować*, R *klassificirovat'*, (H *clasificar*). Por *-s-*, vd. *klaso*. La dua elemento aperas en Eo jen kiel *-fik-*, jen kiel *-f-*, vd. sub *edifi*. ¶ Io *klasifikar*, IeIa *classificar*.

Latineska vorto, propr. "klas-fari" (> "klasigi"): L *classis* "klaso" (vd. tiun) k *-ficare*, kunmeta var. de *facere* "fari" (vd. tiun).

**KLASIK/A** (1; RE): A *class/ic*, F *-ique*, I *-ico*, G *klass/isch*, R *-ičeskij* (kp *klassik* "-ulo"), Po *klasyczny*, (H *clásico*); L *classicus*. Por *-s-*, vd. *klaso*. Ps-sf *-ik*.

Propr. "de (unua) klaso, rango" (ekz. L *scriptor classicus* "unuaranga verkisto" > "klasika verkisto"), de L *classis* "klaso" (vd. tiun).

**KLAV/O** (f; RE): Po *klawisz*, R *klavîš(a)*. Kp F *clavier*, G *Klaviatur* "-aro". La Ea formo povas esti rekta transpreno de PoR, sed mi emas kredi, ke Z kreis la radikon egaligante F *clav/ier* al *klav/aro* (se tiel, *klav-* estas kvazaŭ retrograda radiko). ¶ Io =, IeIa *clave*.

Orig. orgena termino: el L mez. *clavis* "ŝlosilo de orgentuba valvo", orig. "ŝlosilo", samradika kun L *claudere* "ŝlosi" (vd. *konkludi*). Kp semantike A *key* "ŝlosilo; klavo".

**KLER/A** (f; RE): Du hipotezoj estas lanĉitaj por klarigi la devenon de tiu ĉi radiko: (1) ĝi estas kreita per aferezo el F *éclairé* [ekleré] s.s. (Waringhien LV 76), kp spec. *kluz/o* el F *écluse*, *terni* el F *éternuer*; (2) ĝi estas farita el L *clerus* "ekleziularo" (kiu do estus konsiderata kiel reprezentantaro de klereco): tiel esence Bastien, p. 132; lia aserto, ke la latina radiko "kler" signifas "klera", estas erara. La senco favoras la unuan, la formo la duan. Ĉar intenca semantika ŝanĝo "ekleziulo" > "klera" aperas tro aŭdaca, ŝajnas preferinde rigardi la unuan hipotezon kiel pli probablan. ¶ 1894 *kultur-* (Z do rezignis tiun ĉi radikon). ¶ Neniu ekvivalento en la aliaj L.I.; kp cetere la Eajn sinonimojn *instruita*, *kulturita*, *edukita*.

(F *éclairé* propr. "prilumita", ptc. perf. de verbo der. de *clair* "klara", vd. tiun; kp Szerdahelyi 1987, 128.) .

**KLIENT/O** (1; RE): AF *client*, I(H) *-e*, G *Klient*, PoR *klient*. (Ps-sf *-ent.*)

El L *cli/ens -entis* "kliento, protektato, 'plebano sinmetinta sub protektado de patricio' (PV)", propr. "kiu kliniĝas (al iu)" de la radiko de L *clinare* (vd. *klini*).

**KLIMAT/O** (f; RE): F *climat*, A *-e*, G *Klima*, I(H) *clima*, PoR *klimat*. La greka ps-sf *-m(at)-* normale aperas kiel *-m-* en Eo (kp ekz. *dramo*, *ekzemo*, *prismo*) kaj analoga formo estus ebla ankaŭ ĉi tie (kp la mallongajn GHI formojn), sed Z eble trovis eventualan **klim-* tro simila al *klin-*. ¶ Io =, IeIa *climate*.

El Gr *klí/ma -matos* "kliniĝo" (spec. la kliniĝo de la tera surfaco de la ekvatoro en direkto al la poluso) de *klínein* "klini" (vd. tiun).

**KLIN/I** (f; RE): L *clinare*; Gr *klínein*; cetere kun pref.: A *inclin/e*, F *-er*, I *-are*, (H *-ar*); kp R *klonit'*. Ĉar la latinida verbo estis bezonata por la senco "havi impulson al, emi al" (*inklini*), Z por la pli konkreta senco elektis la simplan verbon troviĝantan en LGr(R). ¶ Io *inklinar*, IeIa *inclinar* "kliniĝi". Kp ank. sub *inklina*.

De HE rad. **kli-* "klin(iĝ)i" ekz. en Sa *cráyati* "klinas, apogas"; Gr *klíma* "kliniĝo" (vd. *klimato*), *klínê* "lito" (vd. *kliniko*); L *clivus* "deklivo" (vd. tiun) k prefiksaj verboj *declinare* (vd. *deklinacio*), *inclinare* (vd. *inklina*); sen *k-*: A *lean* [li:n] "klin(iĝ)i", G *lehnen* "apogi". – R *klonit'* estas, malgraŭ la simileco, probable ne parenca.

**KLING/O** (2; Jü): G *Klinge*, Po *klinga*. Kp Nd *kling*, Sv *klinga*. ¶ Io *lam/o*, Ie *-e*, Ia *lamina* (< F *lame*, I *lama*, L *lamina*).

Nomita laŭ la sono de glavo trafanta kaskon aŭ kirason, der. de G *klingen* "son(or)i, tinti" kun paralelaj onomatopeoj en pluraj lingvoj: A *clink* "tinti", Sv *klinga* "son(or)i, tinti", L *clangere* "sonegi, kraki, tondri", Gr *klangê* "bruo, kriego" ktp.

**KLINIK/O** (2; Be): A *clin/ic*, F *-ique* [-ík], I *-ica*, G *Klinik*, PoR *klinika*, (H *clínica*). Ps-sf *-ik*.

El Gr *klinikê* "kuracarto (pri enlitaj pacientoj)", propr. "lita (arto)", adj. der. de *klínê* "lito", par. al *klínein* "klini" (vd. tiun).

**KLISTER/O** (f; RE): A *clyster*, F *clystère*, G *Klistier*, I *clistere*, R *klistir*, (H *clister*). ¶ Io =, Ie *clistere*, Ia *clyster*.

El Gr *klystêr* "-o, -ilo", propr. "lavanto", agantnomo de *klyzein* "forlavi, gargari" de HE rad. **klu-* "purigi, lavi", ekz. en L ant. *cluere* "purigi", L *cloaca* "kloako" (vd. tiun); sen *k-* en G *lauter* "pura".

**KLIŜ/o** (1; *-i* Jü): AFI *cliché* [-ŝ-], G *Klischee* [kliŝé], Po *klisza* [-ŝ-], R *kliše*, (H *clisé*). Apokopo de akcentata fina *-e* (kp *kanapo*, *negliĝo*); efektive ĝi estas nur ŝajna, ĉar la radiko estas prezentita kiel verba, kaj la verbo malhavas tiun finvokalon: F *clich/er*, G *klisch/ieren*, (H *clis/ar*). ¶ Io *klish-uro*, IeIa *cliché*.

La subst. devenas de la verbo, kiu estas onomatopea (pro la sono estiĝanta dum la

procedo, kiam la matrico falas sur la fandatan metalon).

**KLOAK/O** (1; Jü): F *cloaque* [-k], G *Kloake*, I(H) *cloaca*, PoR *kloaka*; L *cloaca*. Kp A *cloaca* (zool. = PIV 3).

Kredeble der. de L ant. *cluere* "purigi" de HE rad. **klu-* "purigi, lavi" (vd. *klistero*).

**KLOPOD/I** (f; RE): R *klopotat'*, Po *kl'opotac' sie* (refl.). Adopto de la slava verbradiko (*-at'*, *-ac'* estas infinitivaj finaĵoj). Konsonantŝanĝo *t* > *d* (vd. Waringhien LV 78) sen evidenta motivo: tiu ŝanĝo plej ofte trafas radikojn finiĝantajn per *et* (vd. liston sub *aldo*). La formo **klopot-* ne okazigus misanalizon; cetere, ĉar la verbo estas netransitiva oni neniam uzus la malbonsonan participon **klopotota*. ¶ 1894 *hava peno*. ¶ Io *demarshar*, Ie *demarchar* (< F *démarche* "klopodado"); IeIa *ef(f)ortiar se*, *penar se* ("fari fortostreĉon, peni").

Kp SK *klopotati* "klakadi". La vorto estas origine onomatopea (semantika evoluo: "brui, klaki" > "brue kuregi, rapidi" > "sin peli, klopodi").

**KLOR/O** (4; Jü): F *chlor/e* [k-], A *-ine* [k-], G *Chlor* [k-], I(H) *cloro*, Po *chlor*, R *ħlor*. ¶ Io =, Ie *clor*, Ia *chloro*.

Vorto farita (en A, ĉ. 1810) el Gr *khlôrós* "(pale, flave) verda" (pro la koloro de la gaso je ĉambra temperaturo), par. al Gr *kholê* "galo" (HE rad. **ghel-* "flava, brili", vd. *galo* k *glaso*).

**KLOŜ/O** (f; RE): F *cloche* [kloŝ], Po *klosz* [-ŝ]; kp G *Glocke* s.s. ¶ Io *klosho* (ank. "sonorilo"), Ie *cloche* (ank. "sonorilo"), Ia *globo*.

Orig. "preĝeja sonorilo" (> "io havanta la formon de tia sonorilo, kloŝo"), kp L mez. *clocca* "sonorilo", Sv *klocka* "sonorilo; horloĝo"; de kelta origino (Ir *cloc* "sonorilo"), dekomence onomatopea.

**KLUB/O** (f; RE): AFI(H) *club*, G *Klub*, PoR *klub*.

A vorto, orig. "klabo" (> "stafeto, vokbastono" > "kunven(antar)o" > "klubo") de skandinava origino, ekz. Sv *klubba* "klabo" (kp Is *klumba* s.s.), par. al G *Klumpen* "bulo" (vd. *globo*).

**KLUK/I** (4; Jü): A *cluck*, G *glucken*, R *kloħtat'*. Kp F *glousser*, I *chiocciare* [ki-], (H *cloquear*). Tiuj formoj ŝajnas montri al A kiel la rekta fonto; tamen la vera etimo povas esti la G interjekcio *kluck*, uzita de Z en Ea formo (vd. Wü s.t.v.): *kluk kluk* (tamen pri ŝprucanta akvo, ne pri kokinoj; kp Sv *klucka* "glugli"). ¶ Io *klukar*, Ie *cacarear* (< H), Ia *cluccar**.

Onomatopea vorto kun paralelaj formaĵoj en aliaj lingvoj, kp ekz. L *glocire*, Gr *klôzein* s.s.

**KLUZ/O** (f; RE): A *sluice*, F *écluse* [-z], G *Schleuse*, I *chiusa*, Po *s'luza*, R *šljuz*. Farita laŭ F kun aferezo de *e-* (kp spec. *terni* el F *éternuer*, ev. ank. *klera*; vd. krome *boji*). ¶ 1894 *klus-*. ¶ Io *sluzo*, Ie *scluse*, Ia *esclusa*.

El L mez. *exclusa* "baraĵo en rivero, kontraŭakva bariero", subst.-igita ptc. perf. de L *excludere* "ne enlasi" (vd. *ekskluziva*).

**KNAB/O** (f; Un): G *Knabe*. Rilate fontlingvon kaj traktadon, *bub/o* prezentas ekzaktan paralelon (Szerdahelyi 1987, 124). ¶ 1882 *pu-* (< L *puer*; laŭ Modrijan, 40: "puer ne povis esti uzita pro malbela sono eventuala: puo, kies ina sekso montrus pli bone la malbelsonecon: puino. Verŝajne Z nur tial estis elektinta novan vorton: knabo"). ¶ 1894 *pubr-* (evidente, sed surprize, el L *puber* "pubera": PVZ 5, 145). ¶ Io *puero*, Ie *púer*, Ia *puero*.

El G ant. *knabo* s.s. kun necerta etimologio. Identa kun A *knave* fripono" (kp semantike G *Bube* sub *bubo*).

**KNAR/I** (4; Jü): G *knarren*. Kp Nd *knarsen*, Sv *knarra*. ¶ Neniu ekzakta ekvivalento en la aliaj L.I. (Io *krak-et-ar*; vd. *kraki*).

Ĝermana onomatopea vorto.

**KNED/I** (f; RE): A *knead* [ni:d], G *kneten*. Kp Ji *knetn*, ank. Nd *kneden*. Kompromisa formo kun G vokalismo kaj A (ortografia) konsonantismo (samtipaj

estas ev. *bramo, faldi*). ¶ 1894 *inpast-* (< I *impastare*). ¶ Io *petrisar* (< F *pétrir*); Ie *plastar* (verŝajne el Gr *plássein* "formi", vd. *plastiko*); Ia *impastar.*

Ĝerm. vorto par. al Bg ant. *gnesti* "premi, knedi" (HE bazo **gne-*).

**KOAKS/O** (f; EG; *koks-* N-ro 15 1888): A *coke* (*coak*†), FI *coke*, G *Koks* (*Koaks*†), PoR *koks*, (H *coque* [-ke]). Bazita sur A(G) ortografio nun arkaiĝinta; nek **kok-* (laŭ FI), nek **koks-* (laŭ GPoR) estis eblaj pro aliaj signifoj (vd. Waringhien, LV 78). ¶ Io *koko*, IeIa *coke.*

A vorto (formoj kun *-s* laŭ la A pluralo; la ortografio *-oa-* kredeble influita de *coal* "karbo"), eble identa kun A mez. *co(l)ke* "kernujo".

**KOBALT/O** (f; RE): A *cobalt*, I(H) *-o*, G *Kobalt*, Po *kobalt*, R *kobal't.*

Identa kun G *Kobold* "koboldo" (ĉar oni kredis, ke montaj koboldoj, forŝtelinte arĝenton, anstataŭigis ĝin per tiu ĉi laŭŝajne senvalora metalo; pri simila kredo, vd. *nikelo*), vd. tiun.

**KOBOLD/O** (f; RE): G *Kobold*, Po *kobold.* ¶ Io =, Ie *cobolde*; mankas en Ia (kp *gnomo*).

G vorto, eble responda al G ant. **kobwalto* "dom(et)-reganto": kp G *Kober* "staleto", *walten* "regi". – Etimologie identa estas *kobalto.*

**KOĈENIL/O** (f; RE): A *cochineal* [-ĉ-,-ni:l], F *cochenille*, G *Koschenille*, I *cocciniglia* [-ĉi-], Po *koszenila*, R *koŝenil'*, (H *cochinilla* [-ĉ-]). Eo *-ĉ-* (anst. *-ŝ-*) alsimiligas la formon al la ortografio de la plimulto de fontlingvoj. Eo *-en-* preferita antaŭ *-in-* evitigas la duoble kvazaŭsufiksan finon *-in/il.* Eo *-l-* respondas al [l'] latinida kiel en *abelo* (vd. tiun kaj speciale *vanilo*). ¶ 1894 *kocenil-*. ¶ Io *kochenilo*, Ie *coch/enille*, Ia *-inilia.*

Identa kun H *cochinilla* "onisko", dim. de *cochino* "porko".

**KODICIL/O** (2; Jü): A *codicil*, F *-le*, I *-lo*, (H *-o*), G *Kodicill*, Po *kodycyl*; L *codicillus.*

L *codicillus* signifas ĝenerale "mallonga skribaĵo", orig. "skribtabulo, ligna tabulo", dim. de *cod/ex* (var. *caudex*) *-icis* "skribtabulo; libro", orig."ligno/ŝtipo, -trunko", samradika kun *cudere* "haki, bati" de HE rad. **kaŭ-* "haki, bati", kp G *hauen* "haki", Li *káuti* "bati; forĝi".

**KOEFICIENT/O** (1; Jü): AF *coefficient*, I *-e* G *Koeffizient* [-ts-], R *koefficient*, (H *coeficiente*). Ps-pf *kon-*, var. *ko-*; *eks-*, var. *e-*; ps-sf *-ent.*

Latineska termino, propr. "(io) kun-efikanta, -aganta", farita el *co-* "kun-" (vd. ps-pf *kon-*) k *effici/ens -entis*, ptc. prez. de *efficere* "efiki, plenumi, agi" (vd. *efiki*).

**KOFR/O** (1; Jü): F *coffre* [kofr], G *Koffer*, Po *kufer*, (H *cofre*). Kp A *coffer* "kesto". Bazita sur F kun apogo de G (*-er* senakcenta!). ¶ Io =, Ie *coffr/e*, Ia *-o.*

El Gr *kóphinos* "korbo" (> A *coffin* "ĉerko") kun nekonata etimologio.

**KOINCID/I** (4; Be): A *coincid/e*, I *-ere*, (H *-ir*), F *coincider*, Po *koincydowac'*. Ps-pf *kon-*, var. *ko-*; *in-.*

El L mez. *coincidere*, propr. "okazi kune": *co-* "kun-" (vd. la ps-pf *kon-*) k *incidere* "okazi", propr. "surfali" (kp semantike *akcidento* k *okazo*): *in-* "en; sur" (vd. *en*), *cadere* "fali" (vd. *kadenco*). Kp spec. *akcidento, okcidento.*

**KOJN/O** (f; RE): F *coin*, I *cuneo*, (H *cuña*); L *cuneus.* Kp A *quoin* [kojn] (tekn.); *cuneiform* "kojnoforma". Bazita sur F ortografio (por *oi* > Eo *oj*, kp *fojo, fojno* kaj ev. *hobojo*). ¶ Io *konio*, IeIa *cuneo.*

L *cuneus* eble par. al *culex* "kulo" (baza signifo "pikilo"), vd. tiun; kp ank. PoR *klin* "kojno".

**KOK/O** (f; Un): A *cock*, F *coq* (ambaŭ [kok]). ¶ Io *hano* (< G *Hahn*); Ie *gallino*, Ia *gallo* (< L *gallus* "koko", *gallina* "-ino").

Vorto imitanta la kokokrion, kp L *coco coco* "kokeriko", Sa *kukkutá-* "koko" (pliaj formoj ĉe Albaut en FE 245/1967, 81). Parencaj vortoj en Eo: *kokardo, koketa*; kp ank. *kokluŝo.*

**KOKARD/O** (1; Jü): A *cockade*, F *cocar-*

*de*, G *Kokarde*, I *coccarda*, PoR *kokarda*, (H *cucarda*). Ps-sf *-ard.* ¶ Io =, Ie *cocard/e*, Ia *-a.*

El la F esprimo *bonnet à la cocarde* "ĉapo (kufo) kun kokardo", orig. "koketmoda ĉapo", el F ant. *cocard* "koketa, vanta", propr. "kokeca", de *coq* "koko" (vd. tiun, kp *koketa*).

**KOKCINEL/O** (f; RE): F *coccinell/e*, I *-a*; L zool. *Coccinella.* Eo *-kc-* estas normala ekvivalento de F *-cc-*, vd. sub *akceli.* ¶ Io *kocinelo*, Ie *coccinell/e*, Ia *-a.*

Formita el L *coccinus* "skarlata" (pro la koloro de la elitroj) de *coccum* "skarlato; koĉenilo" el Gr *kókkos* "kerno, skarlat-(ber)o".

**KOKET/A** (f; N-ro 14 1888, Be): A *coquettish* [-ké-], F *coquet* [-ké], G *kokett*, Po *kokieteryjny* (kp *kokietka* "-ulino"), R *koketlivyj* (kp *koketka* "-ulino"), (H *coquetón* [-ke-], kp *coqueta* "-ulino").

F vorto, propr. "kokeca" (t.e. vanta kiel koko), de *coq* "koko" (vd. tiun).

**KOKLUŜ/O** (f; RE): F *coqueluche* [koklyŝ], Po *koklusz* [-ŝ], R *kokljuŝ*, (H *coqueluche*). La prononco de ĉiuj tri fontlingvoj donas la saman rezulton en Eo (por F *u* > Eo *u*, kp *amuzi, bruli, sur*: vd. Cherpillod 1990, 19). ¶ 1894 *kokluc-*. ¶ Io *koklusho*, Ie *cocluche*; Ia *pertusse* (< L *pertussis*).

F vorto, antaŭe "gripo", kun necerta etimologio. La unua elemento estas verŝajne per popola etimologio influita de *coq* "koko", ĉar populara nomo de la malsano estis *chant de coq* "kokokanto".

**KOKON/O** (2; Jü): A *cocoon*, F *cocon*, G *Kokon*, PoR *kokon.* ¶ Io =, IeIa *cocon.*

El Oc *coucoun* s.s., ank. "ovoŝelo", dim. de *coca* "konkoforma vazo".

**KOKOS/O** (f; RE): A *cocoa-nut* (*nut* "nukso"), F *noix de coco* (*noix* "nukso"), G *Kokosnuss* (*Nuss* "nukso"), I *cocco*, PoR *kokos*, (H *coco*). Kp L bot. *Cocos* "-ujo". Necese bazita sur GPoR(L?), ĉar *kok-* jam estis okupita de alia signifo. ¶ Io =, IeIa *coco.*

H vorto, orig. "grimac(ul)o" (aŭ ĉar oni el kokoso facile povas fari vizaĝmaskon, aŭ pro ĝia hirta aspekto).

**KOKS/O** (f; RE): L *coxa.* Kp (sc.) AFH *coxal* "-a"; F *coxalg/ie*, (H *-ia*), I *cossalgia* "koks/algio, -a malsano". Anatomia termino prenita el L. La ekzisto de tiu ĉi radiko influis *koaks-*, kp tiun. ¶ Io *hanch/o*, Ie *-e* (< F *hanche*), *coxe*, Ia *coxa.*

L vorto (> I *coscia*, F *cuisse* "femuro") de HE **koksa*, signifanta korpan artikon, kp Sa *kákŝâ* "akselo", G *Hachse* "tarsa artiko". Samfamilia vorto en Eo: *kuseno.*

**KOL/O** (f; Un): L *collum*; F *cou* (kp *col* "kolo de vazo; kolumo"), I *collo*, (H *cuello*). Kp P *colo.* Krome konata per plurlingvaj derivaĵoj, ekz. A *collar*, Po *kol'nierz* "kolumo" kaj F (ktp) *collier* "koliero". ¶ Io =, Ie *col*, Ia *-lo.*

Latin(id)a vorto, pli frue **colsom*, identa kun G *Hals* s.s. (HE **kŭolso-*, propr. "turnpunkto, pivoto (de la korpo)" de rad. **kŭel-/kŭol-* "turni" (vd. *poluso*). Samfamilia vorto en Eo: *dekolti.*

**KOLBAS/O** (f; RE): Po *kiel'basa*, R *kolbasa.* Kp Hu *kolbász.* Unu el kelkaj slavaj gastronomiaj terminoj enpenetrintaj en Eon, kp *barĉo, bulko, kaĉo, kreno.* ¶ 1894 *salsic-* (< I *salsiccia*, A *sausage*, F *saucisse*). ¶ Io *sosico*, Ie *salsice*, Ia *salsicia.*

Ĝenerale slava vorto (kp Če *klobása*, SK *kobasica*) kun pridisputata etimologio (par. al R *koloda* "bloko, ŝtipo"? el Tu *külbasti* "rostita viando"? el He *qol basar* "tuta viando"?) .

**KOLEG/O** (f; Un): A *colleague* [-i:g], F *collègue* [-ég], G *Kollege*, I *collega*, Po *kolega*, R *kollega*, (H *colega*); L *collega.* Ps-pf *kon-*, var. *ko-.* ¶ 1906a *kamarado* (!). ¶ Io =, Ie *colego*, Ia *collega.*

Propr. "kun-komisiito" el L *con-* "kun" (vd. ps-pf *kon-*) k *legare* "komisii" (vd. *delegi* k plue *leĝo*). Kp spec. sekv.

**KOLEGI/O** (1; RE): A *colleg/e*, I *-io*, F *collège*, G *Kollegium*, Po *kolegium*, R *kollegija*, (H *colegio*); L *collegium.* La *-i-* estas kompreneble necesa ĉi tie por diferen-

cigi la radikon disde *koleg/o*. Ps-pf *kon-*, var. *ko-*.

Propr. "koleg/aro", der. de L *collega* "kolego" (vd. tiun).

**KOLEKT/I** (f; Un): A *collect*, F *-ionner*, (H *colleccionar*); L *colligere* (sup. rad. *collect-*). Subst.: AF *collection*, G *Kollektion*, I *collezione*, Po *kolekcja*, R *kollekcija*, (H *colección*) "-(aĵ)o", kp G *Kollekte* "monkolekto". Estis nature bazi la Ean vorton sur la supina latina radiko pro ĝia internacieco (kp cetere *elekti*, *neglekti*). Semantike, la Ea verbo iom devias de la fontlingvoj, vd. Waringhien LV 87: "*kolekti*, krom la bazaj sencoj de L *colligere*, A *to collect*, akiris ankaŭ tiun kroman de la R *sobirat'*, t. e. 'depreni, delevi'". Ps-pf *kon-*, var. *ko-*. ¶ 1882 *kel-* (laŭ PVZ 5, 138 el F *cueillir*; laŭ Mattos 1987, 29 el la citita L verbo: eventuala **kol-* estis neebla pro *kol/o*). ¶ Io *kolektar*, Ie *collecter*, Ia *colliger*.

Propr. "kun-pluki", el L *con-* "kun" (vd. ps-pf *kon-*) k *legere* "pluki" (vd. *legi*). Kp spec. sekv.

**KOLEKTIV/A** (3; Jü): A *collect/ive*, F *-if*, G *kollektiv*, R *-nyj*, I *collettivo*, Po *kolektywny*, (H *colectivo*). Ps-sf *-iv*.

El L *collectivus*, propr. "kuniga, kolekt-(ant)a" de *colligere* "kolekti" (vd. tiun).

**KOLER/o** (f; Un): F *colère*, I *collera*, (H *cólera*). Radiko internacie konata per la psikologia termino A *choler/ic*, G *-isch*, F *colérique*, I *collerico* "-iĝema", Po *choleryk*, R *ħolerik* "-iĝemulo" ktp. Probable la radiko estas bazita sur F kun decidiga apogo de la citita adjektivo (en UV, ĝi estas prezentita kiel verba, sed iu responda fontlingva verbo ne ekzistas). AFGI prononcas [k-]; la rezulta formo *koler-* oportune diferencigas la radikon disde *ħoler-*. ¶ 1894 *irask-* (< L *irasci* "-iĝi"). ¶ Io *iraco*, Ie *colere*, Ia *cholera*, *ira* (< L).

Pere de L *cholera* "galo; (fig.) kolero" (la antikvaj kuracistoj konsideris la galon kiel la fonton de kolero) el Gr *kholéra* "galo" (vd. plue *ħolero*, etimologie identan).

**KOLIBR/O** f; RE): F *colibr/i*, I *-ì*, (H *-í*), G *Kolibri*, Po *koliber*, R *kolibri*. Apokopo de fina *-i* (kiu portas la akcenton en FHI) same kiel en *kep/o*, *paĉul/o*; ĉi tie, la Po formo povas esti citata kiel apogo por tiu procedo. ¶ Io *kolibrio*, Ie *colibr/í*, Ia *-i**.

Pere de F el kariba lingvo sur la insulo Martiniko.

**KOLIK/O** (1; Jü): A *col/ic*, F *-ique*, I *-ica*, G *Kolik*, R *kolika*, (H *cólico*); L med. *colica*. Ps-sf *-ik*.

El Gr *kôlikê (nósos)* "kojla (malsano)", adj. de *kôlon* "kojlo" kun nekonata etimologio.

**KOLIMB/O** (f; RE): L zool. *Colymbus*; I *colimbo*. Scienca termino prenita el L (kun Eo *i* el L *y* kiel normale, kp *oksigeno* < *oxygenium*, *silabo* < *syllaba*, *tipo* < *typus*). ¶ Io =, Ie *colimbe*; ne trovita en Ia.

El Gr *kólymbos* s.s., propr. "plonĝanto" (kp semantike la modernlingvajn nomojn de la birdo: A *diver*, F *plongeon*, G *Taucher*, ĉiuj = 'plonĝanto'), kp *kolymbán* "plonĝi".

**KOLIZI/O** (4; Jü): AF *collision*, I *-e*, G *Kollision*, Po *kolizja*, R *kollizija*, (H *colisión*); L *collis/io -ionis*. Eo *-z-* sendube influita de la slavaj formoj. Ps-pf *kon-*, var. *ko-*; ps-sf *-cio*, var. *-zio*.

Propr. "kunpuŝiĝo", de L *collidere* "kunpuŝiĝi": *con-* "kun" (vd. la ps-pf *kon-*), *laedere* "puŝi; difekti, lezi" (kun nekonata etimologio).

**KOLODI/O** (2; Jü): AF *collodi/on*, I *-o*, G *Kollodium*, Po *kolodium*, R *kollodij*, (H *colodión*). Verŝajne farita laŭ la modelo de internaciaj elementnomoj finiĝantaj per *-ium* (> Eo *-i/o*), do surbaze de GPo. ¶ Io *kolodiono*, Ie *collodi/um*, Ia *-o*.

Kreita (19a jc) el Gr *kollô(i)dês* "glueca" el *kólla* "gluo" (vd. *protokolo*) k sufikso *-ô(i)dês* "-eca, -simila" el *eídos* "formo" (vd. *idolo*).

**KOLOFON/O** (kem.) (f; RE; *kolofoni-* N-ro 15 1888): A *colo/phony*, F *-phane*, I(H) *-fonia*, G *Kolophonium*, Po *kalafonia*, R *kanifol'*; L *colophonia*. Eblas heziti inter formo kun aŭ sen *-i-*, kiel i.a. montras la

propono de Z 1894: *kolofoni-*. (Homonima radiko eo *kolofon-* (tip.) Wü,PIV, por kiu la fontlingvoj montras iom diferencajn formojn: AF *colophon*, I *colofone*, H *colofón.*) ¶ Io =, Ie *colo/fonie*, Ia *-phonia**.

El Gr *kolophônía* s.s., propr. "(rezino) el Kolofono", adj. de *Kolophôn*, nomo de urbo en Lidio. (La homonima radiko el Gr *kolophôn* "pinto; finatingo".) .

**KOLOMB/O** (f; RE): F *colomb/e*, I *colomb/o, -a*; L *columb/a, -us*. Latinida vokalismo (*o* anst. *u*); kontraste eo *palumb/o* PV. ¶ Io =, Ie *columb/e*, Ia *-a, pipion* (< A *pigeon*, I *piccione*).

Nomita laŭ sia malhela koloro, de (H)E rad. **kel-/kol-* "malhela", kp Gr *kelainós* "nigra".

**KOLON/O** (f; Un) 1) ark. , 2) mil. (ekde GE), 3) tip. (ekde RE): A *column* (1, 2, 3; kp *colonnade* "-aro"), F *colonne* (1, 2, 3), G *Kolonne* (1, 2), *Kolumne* (3), I *colonna* (1, 2, 3), Po *kolumna* (1, 2, 3), R *kolonna* (1, 2), (H *columna* 1, 2, 3); L *columna* (1). La vorto montras en la diversaj fontlingvoj du formojn, unu latinan (L *column-* > AGHPo) kaj unu romanan (FI *colonn-* > GR). Z elektis ĉi tiun; tamen, kredeble por iom malpliigi la multsencecon de la radiko, ekuzis *kolumn-* por la senco 3 (en Jer 36:23, Z unue skribis *kolonojn* sed poste ŝanĝis al *kolumnojn*). La diferencigo verŝajne estas bazita sur G. La (envere identa) radiko *kolumn-* estis oficialigita en OA8. ¶ Io *kolono* (1, 2), *kolumno* (3); Ie *colonne* (1), *columne* (3); Ia *colonna* (1, 2), *columna* (1, 2, 3).

Probable de HE rad. **kel-* "alt/a, -aĵo", kp L *celsus* "alta", *(ex)cellere* "esti alta" (vd. *ekscelenco*), *collis* "altaĵo", *culmen* "pinto, kulmino"; Gr *kolônós* "altaĵo"; A *hill* "altaĵo, monteto". Kp spec. sekv. ; etimologie identa estas *kolumno*.

**KOLONEL/O** (1; Jü): AF *colonel*, I *colonnello*, (H *coronel*). Pro la speciala A prononco, FI devas esti rigardataj kiel bazo de la Ea formo. ¶ Io =, Ie *colonel*, Ia *colonnello*.

Der. de I *colonna* en la senco "militista kolono"; vd. plue *kolono*.

**KOLONI/O** (1; RE): A *colon/y*, F *-ie*, I(H) *-ia*, G *Kolonie*, Po *kolon/ia*, R *-ija*; L *colonia*.

Orig. "(nov)kulturejo", der. de L *colonus* "terkulturisto" de *colere* "kulturi, kultivi", vd. *kult(ur)o*.

**KOLOR/O** (f; Un): A *col/our* (Us *-or*), F *couleur*, I *col/ore* (H *-or*), Po *kolor*; L *col/-or -oris*. Kp G *kolorieren* "-igi", R *kolorit* "kolor/aro, -igo". ¶ Io =, IeIa *color*.

Orig. "kovraĵo, eksteraĵo", de HE rad. **kel-* "kaŝi, kovri" (vd. *okulta*).

**KOLOS/O** (1; RE): A *coloss/us*, F *-e*, I *-o*, G *Koloss*, PoR *kolos*, (H *coloso*); L *colossus*. Nevoĉa [s] en ĉiuj fontlingvoj.

El Gr *kolossós* "kolosa statuo"; la sufikseca *-ss-* indikas negrekan originon.

**KOLPORT/I** (f; RE): F *colporter*, G *kolportieren*, Po *kolportowac'*. ¶ Io *kolportar*, Ie *colportar*. Mankas en Ia (*facer le commercio ambulante* 'fari ĉirkaŭiran komercon' Ruhrig).

Modifo de F ant. *comporter* "(trans-, ĉirkaŭ)porti" laŭ F *col/cou* "kolo" (ĉar la kolportistoj portis siajn varojn pendantaj de la kolo), el L *comportare* "(kun)porti": pref. *con-* (ofte intensiga; vd. la ps-pf *kon-*) k *portare* "porti" (vd. tiun).

**KOLUBR/O** (f; RE): L *coluber, colubra*; F *couleuvre*, I *colubro*, (H *culebra*). Zoologia termino prenita el L.

Eble propr. "fleksiĝanta, kurbiĝanta", se de HE rad. **(s)kel-* "fleksi, kurbigi", ekz. en Gr *skélos* "kruro", *kylíndein* "ruli" (vd. *cilindro*).

**KOLUMN/O** (8; Jer, Wü): A *column*, F *colonne*, G *Kolumne*, I *colonna*, Po *kolumna*, (H *columna*). Reprezentas sencon 3 de *kolon/o*, vd. tiun.

Vd. *kolono*, etimologie identan.

**KOLZ/O** (1; Jü): AFI(H) *colza*. Eo *-lz-* tutsimple kopias la fontlingvan ortografion. ¶ Io =, IeIa* *colza*.

El Nd *koolzaad* s. s. , propr. "brasiksemo":

*kool* "brasiko" (kp G *Kohl*, F *chou*, I *cavolo* s. s. el L *caulis* "brasiko; tigo", kp Gr *kaulós* "tigo"); pri *zaad* "semo" (= G *Saat* "semado", A *seed* "semo"), vd. tiun.

**KOM/O** (f; RE): A *comma*, G *Komma*, (H *coma*); L *com/ma -matis*. Ps-sf *m(at)-*. ¶ Io =, IeIa *comma*.

El Gr *kóm/ma -matos* "frazparto" (> "signo dividanta la frazon en partojn"), propr. "(dis)hakado", subst. de *kóptein* "haki, bati" de HE rad. **kap-/kop-* "tranĉi, haki", kp Li *kàpti* "haki", L *capo* "kapono" (vd. tiun), R *kopat'* "haki†, fosi" (vd. *kopeko*).

**KOMAND/I** (1; RE): A *command*, F *-er*, G *kommandieren*, I *comand/are* (H *-ar*), Po *komenderowac'*, R *komandovat'*. Kp G *Kommando*, I *comando* "-o". Ps-pf *kon-*, var. *ko-*. – La vokalalterno *a* : *e* originas en L (vd. sube; *a* aperis en akcentata silabo, *e* en neakcentata). Kp la formojn sub *rekomendi*.

Orig. "trandsoni (taskon, ordonon), komisii", el L *commendare* "transdoni, konfidi": *con-* intensiga pref. (vd la ps-pf *kon-*), *mandare* "transdoni, konfidi, komisii, ordoni" (vd. *mandato*). Kp spec. *komandito, rekomendi*.

**KOMANDIT/O** (3; Jü): F *commandite*, G *Kommandite†*, I *accomandita*, Po *komandyta*, (H *comandita*). Kp G *Kommanditgesellschaft*, R *kommanditnoe tovariŝĉestvo* 'komandita societo'. Akceptita malgraŭ ebla konfuzo kun *komand/it/o*. Ps-pf *kon-*, var. *ko-*. ¶ Io *komandit-ala societo*, Ie *comandite*, Ia *societate in commandita**.

I komerca termino (I > F > HGRPo), orig. "depono, gardo" (ĉar la komanditantoj deponis monon por la bono de la societo), der. de I *accomandare†* "konfidi", kunm. de *a-* "al" k *comandare*, orig. "konfidi" (vd. *komandi*).

**KOMB/I** (f; Un): A *comb*, G *kämmen*. Kp Nd *kammen*, Sv *kamma*. La Ea formo kopias A. Unu el multaj ĝermanaj radikoj por ĉiutagaj okupoj, vd. Collinson 1959, 8. La romana ekvivalento (F *peigner*, H *peinar*, I *pettinare*, L *pectere*) estas evidente pli malfacile asimilebla sed preferita de la ceteraj planlingvoj: Io *pektar*, IeIa *pectinar* (sed Vp *köbön*, vd Golden en Li kaj Ni, 407). ¶ 1881 *penc'-* (PVZ 5, 143: el F *peigner*; Mattos 1987, 29: el fanditaj L *pecten* "-ilo" kaj F). – 1894 *pektin-* "kombil-".

Der. de la ĝerm. vorto por "-ilo" (A *comb*, G *Kamm* el pĜ **kamba-*, propr. "dentitaĵo"), el HE **gombhos* "dento" (kp Sa *jambha-* "dento", Gr *gómphos* "najlo", eĉ Fi *kampa* "kombilo").

**KOMBIN/I** (f; EG): A *combin/e*, F *-er*, I *-are*, (H *-ar*), G *kombin/ieren*, Po *-owac'*, R *-irovat'*. Ps-pf *kon-*, var. *kom-*.

El L *combinare* "kunigi, parigi", propr. "duopigi", el *con-* "kun-" (vd. tiun k ps-pf *kon-*) k *bini* "duopaj" (vd. *du*). Kp spec. *binoklo*.

**KOMEDI/O** (1; RE): A *comed/y*, (H *-ia*), F *comédie*, G *Komödie*, I *commedia*, Po *komed/ia*, R *-ija*; L *comoedia*. Ps-sf *-i* 1.

El Gr *kômô(i)día* s. s. , el *kômos* "(dioniza) festprocesio" (vd. *komika*) k *ô(i)dê* "kanto" (vd. *odo*); la atenaj komedioj estis ligitaj kun dionizaj festoj. Kp spec. *tragedio*.

**KOMENC/I** (f; Un): A *commenc/e*, F *-er*, I *cominciare*, (H *comenzar*). Kp P *comecar*. Bazita sur (A)F. Ps-pf *kon-*, var. *kom-*. ¶ 1881 *kojp-* (< L *coepisse* "esti komenc(iĝ)inta"). – 1894 *komenz-*. ¶ Io *komencar*, Ie *comensar* (pri tiu formo vd. Spiritu 120), Ia *comenciar*.

El L vulg. **cominitiare* s. s. , kunm. de intensiga pref. *con-* (vd. ps-pf *kon-*) k *initiare* "inici, komenci", de *initium* "komenco", propr. "eniro" (vd. *iniciati*).

**KOMENTARI/o** (f; UV; *komentar-* RE): A *comment/ary*, F *-aire*, I *-ario*, G *Kommentar*, Po *komentarz*, R *kom(m)entarij*. Certe la L fontvorto (vd. sube) influis la Ean formon (Szerdahelyi 1987, 135 pensas pri rusa influo). Anstataŭ la peza verbo *komentari/i* estis ekuzata malpli longa radikformo *koment/i* (Ka; Z 1894, kp sube), kp A *comment*, F *-er*, I *-are*, G *kommentieren*, Po *koment/owac'*, R *-irovat'*, (H *comentar*). Ps-pf *kon-*, var. *kom-*; ps-sf

*-ar(i)*. ¶ 1894 *koment-*. ¶ Io *koment/ar* "-i", *-aro, -uro* "-o"; Ie *coment/ar* "-i", *-arie* "-o"; Ia *comment/ar* "-i", *-ario* "-o".

El L *commentar/ius, -ium* "not/oj, -libro, kroniko; ekspliko, komentario" der. de *commentari* "konsideri, primediti; ekspliki, komenti", intensa verbo de *comminisci* "elpensi, inventi" el intensiga pref. *con-* (vd. ps-pf *kon-*) k la radiko de *me/ns -ntis* (vd. *menso*).

**KOMERC/O** (f; Un): AF *commerce*, G *Kommerz*† [-ts] (kp *kommerziell* "-a"), I *commercio*, R *kom(m)ercija*, (H *comercio*); L *commercium*. Kp Po *komercyjny* "-a". La radiko povas esti bazita sur AF, sed *-c/o* estas ankaŭ la normala rezulto en Eo de L *-cium, -tium* (kp spec. *negoco, ofico*). Rimarku krome la prononcon [ts] en la apartenantaj vortoj de GPoR. Ps-pf *kon-*, var. *ko-*. ¶ 1894 *komerz-*. ¶ Io =, Ie *comercie*, Ia *commercio*.

L *commercium* orig. "interŝanĝado de varoj", el *con-* "kun-" (vd. ps-pf *kon-*) k *mer/x -cis* "varo" (vd. *merkato*).

**KOMET/O** (1; RE): A *comet*, I(H) *-a*, F *comète*, G *Komet*, PoR *kometa*; L *cometa*.

El Gr *komêtês* s. s. , propr. "longhara (stelo)" (pro la hararsimila vosto), der. de *kómê* "hararo" kun necerta etimologio.

**KOMFORT/O** (f; EG): A *comfort*, F(H) *confort*, G *Komfort*, I *conforto*, PoR *komfort*. La ĝermanaj kaj slavaj fontlingvoj apogas Eo *-m-* kontraŭ la *-n-* de la romanaj. Ps-pf *kon-*, var. *kom-*. ¶ Io =, Ie *comfort*, Ia *conforto*.

A vorto, el F ant. *confort* "help(aĵ)o", propr. "fortigo" (kp A *comfort* "konsolo"), subst. de *conforter* el L *confortare* "fortigi" el faktitiva pref. *con-* (vd. ps-pf *kon-*) k *fortis* "forta" (vd. tiun).

**KOMIK/A** (1; Jü): A *com/ical*, F *-ique* [-ík], I *-ico*, G *kom/isch*, Po *-iczny*, R *-iĉeskij*, (H *cómico*). Ps-sf *-ik*.

Pere de L *comicus* "komedia" el Gr *kômikós* "komedia", der. de *kômos* "(dioniza) festprocesio" (el kiu ankaŭ *komô(i)día* "komedio", vd. tiun) kun nekonata etimologio.

**KOMISAR/O** (1; RE; *komisari-* Jü): A *commiss/ioner, -ary*, F *-aire*, I *-ario*, G *Kommissar*, Po *komisarz*, R *kommissar*, (H *comisario*). Definitiva formo sen fina *-i*, tie ĉi laŭ GR (analoge *korsaro, veterinaro*, kontraste *kancelario, notario, sekretario, vikario*). Ps-pf *kon-*, var. *ko-*; ps-sf *-ar(i)*. ¶ Io *komisario*, Ie *comissario*, Ia *commissario*.

El L mez. *commissarius* "komisiito, rajtigito", formita el L *commissum* "(io) komisiita", ptc. perf. de *committere* "komisii" (vd. plue *komisio*).

**KOMISI/o** (f; Be; *komision-* N-ro 15 1888): AF *commiss/ion*, I *-ione*, R *komissija*, (H *comisión*). Kp G *Kommissionär*, Po *komisjoner* "komisiisto, agento". Ps-pf *kon-*, var. *ko-*; ps-sf *-cio*, var. *-sio*. La vorto havas en la fontlingvoj AFIR (H) du ĉefajn sencojn: (1) io konfidita al iu; (2) aro da personoj, al kiuj io estas konfidita. Z tiris el ĝi radikon per la normala Ea respondaĵo al la enestanta pseŭdosufikso (*komisi/o*) kun senco 1; post Z oni kreis por la senco 2 alian per pli plena pseŭdosufiksa formo: **KOMISION/O** (4; Wü): vd. supre AFI R, aldonu G *Kommission*, Po *komisja*. La novan radikon altrudis internacia uzado. Rilate la diferencigon, kp la analogan paron *pensio* : *pensiono*. ¶ Io *komis/o* "komisio", *-itaro* "komisiono" (kp *komisiono* "komerca komisio"); Ie *comission*, Ia *commission* (sencoj 1, 2).

El L mez. *commiss/io -ionis* "komisio" (> "grupo de personoj havanta certan komision"), formita el L *commissum* "(io) komisiita [konfidita]", ptc. perf. de *committere* "komisii, konfidi", orig. "transdoni": *con-* intensiga pref. (vd. ps-pf *kon-*), *mittere* "doni, sendi" (vd. *meti*). Samfamiliaj vortoj en Eo: *komisaro, komitato, komizo*.

**KOMITAT/O** (f; Ald, RE): A *committee*, F(H) *comité*, G *Komitee*, I *comitato*, PoR *komitet*. La Ea formo ŝajnas influita de I; eventuala **komitet-* estus neoportuna por sufikssimila fino. PoR formoj finiĝantaj per *-tet* foje respondas al Eo *-tat*,

vd. ekz. *aŭtoritato, fakultato, universitato.* Ps-pf *kon-*, var. *ko-*. ¶ Io =, Ie *comité*, Ia *committee.*

A vorto, der. de *commit* "komisii, konfidi" el L *committere* s. s. (vd. *komisio*).

**KOMIZ/O** (f; RE): F *commis*, G *Kommis*†, I *commesso*, R *kommi*†. Eo [z] estas sen modelo en la fontlingvoj kaj evidente ŝuldiĝas al la tendenco voĉigi intervokalan *s* (vd. *avizo*). Ps-pf *kon-*, var. *ko-*. ¶ 1894 *komis-*. ¶ Io =, Ie *commí*, Ia *commisso.*

F vorto, propr. "komisiito", ptc. perf. de *commettre* (I *commettere*) "komisii, konfidi", el L *committere* s. s. (vd. *komisio*).

**KOMOD/O** (f; RE): AF *commode*, G *Kommode*, I *comò*, Po *komoda*, R *komod*, (H *cómoda*). Ps-pf *kon-*, var. *ko-*. ¶ Io =, Ie *comode*, Ia *commoda.*

F subst. -igo de adj. *commode* "oportuna, komforta" el L *commodus* "oportuna, konvena", propr. "kun la ĝusta mezuro": *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*), *modus* "mezuro" (vd. *modo*).

**KOMPANI/O** (1; RE; pri ev. fundamenteco de tiu ĉi radiko, vd. Ciliga en ScR XII, 41) 1) kom. 2) kunesto: A *company* (1, 2), F *compagnie* (1, 2), G *Kompanie* (1), I *compagnia* (1, 2), Po *kompan/ia* (1, 2), R *-ija* (1, 2), (H *compañia* 1, 2). Romana [n'] estas redonata per *-n-* (vd. *akompani*). Ps-pf *kon-*, var. *kom-*. ¶ Io = (1), Ie *compan/ie* (1, 2), Ia *-ia* (1, 2).

Orig. signifo "societo, kuneco"; el L mez. *compan/ium, -ia* "societo, trupo ktp", kp L mez. *companio* "kunulo, kompano", propr. "kunmanĝanto" el L *con-* "kun-" (vd. ps-pf *kon-*) k *panis* "pano" (vd. tiun). Kp spec. *akompani.*

**KOMPAR/I** (f; RE): A *compar/e*, F *-er*, I *-are*, (H *-ar*); L *comparare.* Kp ank. la sekvan (gram.). Ps-pf *kon-*, var. *kom-*.

Propr. "parigi" (> "meti unu apud la alia por komparo"), el L *con-* "kun-" (vd. ps-pf *kon-*) k *par* "paro" (vd. tiun). Kp spec. sekv.

**KOMPARATIV/O** (1; Jü): A *comparat/ive*, F *-if*, I(H) *-ivo*, G *Komparativ*; L *comparativus (gradus).* Ps-pf *kon-*, var. *kom-*; ps-sf *-iv.*

Propr. "kompara (grado)", adj. de L *comparare* "kompari" (vd. tiun).

**KOMPAS/O** (1; RE): A *com/pass*, F *-pas*, G *Kompass*, PoR *kompas.* ¶ Io *busolo* (< F *boussole*, I *bussola*); Ie *compasse*, (mar.) *bussol*; Ia *bussola*, (mar.) *compasso.* Ps-pf *kon-*, var. *kom-*.

El I *compasso* "kompaso†, cirkelo", orig. "cirklo, rondo" (la kompaso estis tiel nomata pro la ronda skatoleto, en kiu la nadlo pendas), subst. de *compassare*† "mezuri (per cirkelo)" el L vulg. **compassare* "mezuri (per paŝoj)" el *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*) k *passus* "paŝo" (vd. tiun).

**KOMPAT/I** (f; Un): F *compat/ir*, I *-ire*, (H *compadecerse*, refl.); L *compati.* Kp A *compassion* "-o". Ps-pf *kon-*, var. *kom-*. ¶ 1881 *piti-* (< F *pitié* "kompato": PVZ 5, 144; kp ank. A *pity* s. s.). ¶ Io *kompatar*, IeIa *compatir.*

Propr. "kun-suferi": L *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*) k *pati* "suferi" (vd. *pasio*). Kp semantike *kondolenco.*

**KOMPENS/I** (1; Jü): A *compens/ate*, F *-er*, I *-are*, (H *-ar*), G *kompens/ieren*, Po *-owac'*, R *-irovat'*; L *compensare.* Ps-pf *kon-*, var. *kom-*.

Propr. "ekvilibrigi, kontraŭpezigi", el L *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*) k *pensare* "pesi" (vd. tiun).

**KOMPETENT/A** (f', 1, 7; Du, RE; *kompetenc-* E-isto 8/1890): A *compet/ent*, I(H) *-ente*, F *compétent*, G *kompetent*, Po *-ny*, R *-nyj.* Ps-pf *kon-*, var. *kom-*; ps-sf *-ent.*

El L *compet/ens -entis*, ptc. prez. de *competere* "kune (kun alia) aspiri [ion]" (do unue "konkuranto", poste ank. "kapabla konkuri, kompetenta"): *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*), *petere* "aspiri, serĉi, peti" (vd. *peti*).

**KOMPIL/I** (1; Jü): A *compil/e*, F *-er*, I *-are*, (H *-ar*), G *kompil/ieren*, Po *-owac'*, R *-irovat'*. Ps-pf *kon-*, var. *kom-*.

El L *compilare* "plagiati", propr. "prirabi,

priŝteli": *con-* "kun" (tie ĉi kredeble intensiga pref. ; vd. ps-pf *kon-*), *pilare* "rabi" (de pridisputata origino).

**KOMPLEMENT/O** (2; Be): A *complement*, I(H) *-o*, F *complément*, G *Komplement*. Ps-pf *kon-*, var. *kon-*; ps-sf *-ment*.

El L *complementum* "plenigaĵo", de *complere* "plenigi" (vd. la sekvan). Etimologie identa estas *komplimento*; kp ank. *suplemento*.

**KOMPLET/A** (2; RE): A *complet/e*, I(H) *-o*, F *complète*, G *komplett*, Po *kompletny*, R *komplektnyj*. Ps-pf *kon-*, var. *kom-*.

El L *completus* "plenigita", ptc. perf. de *complere* "plenigi": *con-* "kun" (tie ĉi eble intensiga pref. ; vd. ps-pf *kon-*), *plere* "plenigi" (vd. *plena*). Kp spec. *kom/plemento*, *-plimento*.

**KOMPLEZ/O** (f; RE): F *com/plaisance* [-plez-], I *-piacenza*, (H *-placencia*). Kp A *complaisance* [-plέjz-] "-emo, -eco". Deirpunkto por la Ea formo estas sendube F (Eo *-e-* laŭ F prononco). Z ellasis la sufiksecan vortfinon, kredeble por ebligi facilan verbigon (analoge ĉe *petol/a*). (Ne malofte F subst. kun *-ance* respondas al Eaj vortoj sen pseŭdosufikso, ekz. *abondance – abundo, tolérance – tolero.)* Ps-pf *kon-*, var. *kom-*. ¶ Io = (espismo); Ie *complesentie*, Ia *complacentia*.

Latinida subst. de la verbo F *com/plaire*, H *-placer*, I *-piacere* "komplezi, plaĉi" el L *complacere* "(tre) plaĉi", kunm. de intensiga pref. *con-* (vd. ps-sf *kon-*) k *placere* "plaĉi" (vd. tiun).

**KOMPLIK/I** (1; Jü): A *complic/ate*, I *-are*, (H *-ar*), F *compliquer* [-k-], G *komplizieren* (kp *Komplikation* "-aĵo"), Po *komplikowac'*. Ps-pf *kon-*, var. *kom-*.

El L *complicare* "kun/faldi, -volvi" (ptc. perf. *complicatus* "komplikita"): *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*), *plicare* "faldi, volvi" (vd. plue sub *plekti*). Kp spec. *apliki*, *impliki*.

**KOMPLIMENT/O** (1; Du, RE): AF *compliment*, I *-o*, G *Kompliment*, Po *komplement*, R *kompliment*, (H *cumplimiento*). Ps-pf *kon-*, var. *kom-*; ps-sf *-ment*.

H vorto, propr. "plenumo (de la sociaj devoj)", der. de H *cumplir* "plen/umi, -igi" el L *complere* "plenigi" (vd. la etimologie identan *komplemento*).

**KOMPLOT/O** (2; Jü): A *(com)plot*, F(H) *complot*, G *Komplott*, I *complotto*. ¶ Io =, IeIa* *complot*.

F vorto kun nekonata etimologio.

**KOMPON/I** (1; Jü): A *compos/e*, F *-er*, G *komponieren*, I *comporre*, Po *kompon/owac'*, R *-ovat'*, (H *componer*). Ps-pf *kon-*, var. *kom-*. La formo de la dua elemento estas tiu normala en Eo, kp *de-*, *dis-*, *im-*, *o-*, *pro/poni*. Tie ĉi G kaj la slavaj formoj servis kiel modeloj; kp ank. G *Komponist* "-isto". ¶ Io *kompozar*, Ie *composir*, Ia *componer*.

Vd. sub *komposti*.

**KOMPOST/I** (f; RE): A *compos/e*, F *-er*, I *comporre*, (H *componer*). Kp A(H) *composit/or*, F *-eur*, I *-ore* "-isto". – La ĝenerala latinida vorto por "kunmeti" estas adoptita en Eo en du diversaj formoj kiel fakterminoj (*kompon-* 'kunmeti muzikon', *kompost-* 'kunmeti litertipojn'), diferencigo neekzistanta en la fontlingvoj. Tiu ĉi radiko enhavas *-s-* (kp AF) kaj *-t*, ambaŭ troviĝantaj en la agantnomo, kiu supozeble estas la rekta fonto; kp spec. la I ptc. perf. *composto*. Ps-pf *kon-*, var. *kom-*. ¶ 1894 *kompos-*. ¶ Io *kompostar*, Ie *composter* (espismoj), Ia *componer*.

El L *componere* "kunmeti": *con-* "kun-" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*), *ponere* "meti" (vd. *pozitiva*). Etimologie identaj estas *komponi* k *kompoto*.

**KOMPOT/O** (2; Jü): AF *compot/e*, (H *-a*), G *Kompott*, I *composta*, PoR *kompot*. Ps-pf *kon-*, var. *kom-*. ¶ Io =, Ie *compot/te*, Ia *-a*.

F kulinara termino el L vulg. *composita* "miksaĵo, kunmetitaĵo", subst. -igita ptc. perf. de L *componere* "kunmeti" (vd. *komposti*).

**KOMPREN/I** (f; Un): A *com/prehend* (pli ofte: *understand*), F *-prendre*, I *-pren-*

*dere* (pli ofte: *capire*), (H *-prender*); L *compre(he)ndere* (pli ofte: *intelligere*). Bazita sur F; la ĉefelemento forme konformiĝis al *preni*. Ps-pf *kon-*, var. *kom-*. ¶ 1894 *komprend-*. ¶ Io *komprenar*, IeIa *comprender*.

L *comprehendere* propr. "(ĉirkaŭ)preni, kapti" (kp semantike G *greifen* "kapti": *begreifen* "kompreni"): *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*), *prehendere* "preni, kapti" (vd. *preni*).

**KOMPRES/O** (f; RE): A *compress*, F *-e*, I *-a*, G *Kompresse*, Po *kom/pres*, R *-press*, (H *compresa*). Eo *-s-* bazita sur fontlingva *-ss-*. Ps-pf *kon-*, var. *kom-*.

F vorto, propr. "kunpremitaĵo", el L *compressus*, ptc. perf. de *comprimere* "kunpremi": *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*), *premere* "premi" (vd. tiun). Kp spec. *ekspreso*, *impreso*, *presi*.

**KOMPROMIS/O** (2; Jü): F *compromis*, A *-e*, (H *-o*), G *Kompromiss*, I *compromesso*, Po *kompro/mis*, R *-miss*. Eo *-s-* pro fontlingva *-ss-*. Ps-pf *kon-*, var. *kom-*; *pro-*. ¶ Io *transakto* (< F *transaction*); Ie *compromiss/e*, Ia *-o*.

El L *compromissum* s. s., propr. "reciproka promeso (obei la juĝon de arbitracianto)", subst. -igita ptc. perf. de *compromittere* "reciproke promesi": *con-* "kun(e)" (vd. *kun* kaj la ps-pf *kon-*), *promittere* "promesi". Kp la sekvan, etimologie identan.

**KOMPROMIT/I** (3; Mart, Wü): A *compro/mise*, F *-mettre*, I *-mettere*, (H *-meter*), G *kompromettieren*, Po *kompro/mitowac'*, R *-metirovat'*. La diferenco disde *kompromis-* baziĝas forme kaj sence sur la fontlingvoj (formo kun *s* ĉefe substantiva, kun *-t-* ĉefe verba: vd. detale Wiener 1950, 101 s.). Z ne utiligis la eblon plue diferencigi per *-met-*, kiel sugestas FGIR. – Ps-pf *kon-*, var. *kom-*; *pro-*. ¶ Io *kompromisar*, Ie *compro/metter*, Ia *-mitter*.

F vorto, el L *compromittere* "promesi obei la juĝon de arbitracianto" (> "riski, meti en danĝeran pozicion"); vd. sub la etimologie identa *kompromiso*.

**KOMUN/A** (f; RE): A *common*, F *commun*, I *comune*, (H *común*); L *communis*. Ankaŭ alilingve konata per la vortoj por "komunumo" (ekz. G *Kommune*, R *kommuna*) kaj "komunisto" (ekz. G *Kommunist*, R *kommunist*). (Ps-pf *kon-*, var. *ko-*). ¶ Io *komuna*, Ie *comun*, Ia *commun*.

Orig. kredeble "kun la samaj devoj" (malvorto: *immunis*, vd. *imuna*), el *con-* "kun" (vd. tiun) k *munia* "oficaj devoj" (sing. *munus* "devo, ofico"), kies radiko estas identa kun tiu de G *ge-mein-sam* "komuna", Gt *ga-mains* "ĝenerala, komuna". Origina signifo proksimume "reciprokaj prestaĵoj", de HE rad. **mei-* "(inter)ŝanĝi, reciproki", kp Sa *máyate* "interŝanĝas", L *mutare* "ŝanĝi", *mutuus* (A *mutu/al*, F *-el*) "reciproka". Samfamiliaj vortoj en Eo: *eks-komuniki*, *komunio*, *komuniki*.

**KOMUNI/O** (f; RE): AF *communion*, I *comun/ione*, (H *-ión*); L ekl. *commun/io -ionis*. Kp F *communier*, G *kommunizieren* "-iĝi". (Ps-pf *kon-*, var. *ko-*; la vortfino *-i/o* povas esti rigardata kiel var. de ps-sf *-cio.)* ¶ Io = (*komuniar* "-iĝi"), Ie *comuni/-on* (*-er* "-iĝi"), Ia *communion* (*communicar* "-iĝi").

Orig. "komuneco, unuiĝo (de samkredanoj)", der. de L *communis* "komuna" (vd. tiun).

**KOMUNIK/I** (f; RE): A *commun/icate*, F *-iquer* [-k-], I *comun/icare*, (H *-icar*); L *communicare*. Kp G *kommunizieren* "-iĝi" (tekn.), R *kommunikacija* "-ado". Int. der. AF *communiqué*, G *Kommuniqué*, R *kommjunike* "-aĵo". (Ps-pf *kon-*, var. *ko-*).

Propr. "komunigi" ([ion] > "sciigi [ion] al alia[j]"), der. de L *communis* "komuna" (vd. tiun).

**KON/I** (f; Un): F *connaître*, I *conoscere*, (H *conocer*); L *cognoscere*. Kp la praparencajn A *know*, G *kennen*, Ji *konen*. Unusilaba radiko supozeble bazita sur la unua silabo de la romanaj formoj; la forstrekon de la dua (sufikseca) elemento kredeble inspiris la mallongaj ĝermanaj formoj (rimarku spec. Ji). ¶ 1894 *kog-*

*cer.*

L *cognoscere* konsistas el intensiga pref. *con-* (vd. ps-pf *kon-*) k *noscere* (L ant. *gnoscere*) "koni" de HE rad. *gen/gno-* "koni", ekz. en Sa *jánati* "konas"; Gr *gignôskein* "koni", *gnôsis* "kono, scio" (kp *diagnozo, fizionomio*); L *gnarus* "scianta" (kp *ignori*), *nobilis* "fame konata" (kp *nobela, nobla*), *incognitus* "nekonata" (vd. *inkognito*); A *know* "koni", *can* "povas, scias"; G *kennen* "koni", *können* "povi"; R *znat'* "scii, koni", Po *znac'* "koni".

**KONCED/I** (8; Wü; antaŭe *konsent/i, konfes/i, koncesi/i*): A *con/cede*, F *-céder*, I *-cedere*, (H *-ceder*); L *concedere*. Ps-pf *kon-*. ¶ Io *koncesar*, IeIa *conceder*.

Propr. "cedi [al iu, io]": L intensiga pref. *con-* (vd. ps-pf *kon-*) k *cedere* "cedi" (vd. tiun). Etimologie identa: *koncesio.*

**KONCENTR/I** (8; Ve, Wü) kun nuligo de la oficialeco de *koncentr/a* (1; RE), vd. OA8, p. 13: A *concentr/ate*, F *-er*, I *-are*, (H *-ar*), G *konzentrieren* [-ts-], Po *koncentr/owac'*, R *-irovat'*. Ps-pf *kon-*.

Propr. "kuncentrigi", formita el L *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*) k *centrum* "centro" (vd. tiun).

**KONCEPT/O** (2; Jü): AF *con/cept*, I *-cetto*, (H *-cepto*), Po *koncep/cja*, R *-cija*; L postkl. *conceptus*. Ps-pf *kon-*. ¶ Io =, Ia *concepto.*

Orig. "gravediĝo" (> "pensokreaĵo"), subst. (resp. subst. -igita ptc. perf.) de L *concipere* "gravediĝi" (> eo *koncip/i* Wü), propr. "akcepti/preni en sin": intensiga pref. *con-* (vd. ps-pf *kon-*) k k *capere* "preni" (vd. *kapti*). Por la dua elemento kp spec. *escepto, recepto.*

**KONCERN/I** (f; EG): A *concern*, F *-er*, I *-ere*, (H *-ir*). Ps-pf *kon-*. ¶ Io *koncernar*, IeIa *concerner.*

El L mez. *concernere* "konsideri", propr. "kunkribri": L pref. *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*) k *cernere* "kribri" (vd. tiun). – Wiener 1950, 102 traktas pri tiu ĉi radiko kaj eo *konzern-* PV.

**KONCERT/O** (1; RE): AF *concert*, I *-o*, G *Konzert* [-ts-], PoR *koncert*, (H *concierto*). Ps-pf *kon-*.

I muzika termino, orig. "konkurado (de voĉoj/instrumentoj)" (> "kunludado"), der. de L *concertare* "konkuri", kunm. de *con-* "kun(e)" (vd. *kun* k la ps-pf *kon-*) k *certare* "konkuri, disputi", orig. "decidigi" (kp *certus* "decidita, certa"), samradika kun *cernere* "decidi", propr. "kribri" (vd. tiun).

**KONCESI/O** (6; Jü): AF *concess/ion*, I *-ione*, G *Konzession* [-ts-], Po *koncesja*, R *-cessija*, (H *concesión*). Antaŭ la oficialigo de *konced/i, koncesi/i* estis uzata en ties senco, vd. spec. Wü s.t.v. Ps-pf *kon-*; ps-sf *-sio*, var. de *-cio*. ¶ Io *koncesiono*, IeIa *concession.*

El L *concess/io -ionis* "permeso", propr. "cedo", subst. de *concedere* "cedi" (vd. *koncedi*, etimologie identan).

**KONCIZ/A** (2; Jü): F *concis* (fem. *-e* [-z]), A *-e*, I(H) *-o* [I -z-], G *konzis* [-ts-]; L *concisus*. Eo *-z-* normale en intervokala pozicio. Ps-pf *kon-*.

L stila termino, orig. "abrupta, dismembrigita", propr. "kunhakita" (= 'hakita ĝis malpli granda longo', kp *kun-* en *kunpremita* ktp): *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*), *caedere* "haki" (kun necerta etimologio). Samfamiliaj vortoj en Eo: *cemento, preciza.*

**KONDAMN/I** (f; RE): A *con/demn*, F *-damner*, I *-dannare*, (H *-denar*); L *condemnare*. Bazita sur F; al la a-vokalo eble kontribuis la senprefiksa L *damnare*, vd. sube. Ps-pf *kon-*: ¶ Io *kondamnar*, Ie *con/damnar*, Ia *-demnar.*

El L intensiga pref. *con-* (vd. ps-sf *kon-*) k *damnare* "kondamni" (orig. al monpuno), der. de *damnum* "elspezo, perdo, damaĝo" (vd. *domaĝi*).

**KONDICIONAL/O** (4; Jü): A *con/ditional (mood)*, F *-ditionnel* [-sjo-], I *-dizionale* [-tsio-], (H *-dicional*), G *Konditional(is)* [-tsio-]. Ps-pf *kon-*; ps-sf *-al*. La radikformo kontrastas kun la etimologie identa *kondiĉ-*, vd. la sekvan. ¶ Io =, Ie *condition/ale*, Ia *-al.*

*tion/ale*, Ia *-al.*

Propr. "kondiĉa (modo)", el L *conditionalis*, adj. de *conditio* "kondiĉo" (vd. tiun).

**KONDIĈ/O** (f; Un): AF *con/dition* [A -ŝ-, F -sj-], I *-dizione* [-ts-], (H *-dición* [-th-]; L *condit/io (condic/io) -ionis.* Unika traktado de la radikfino: oni atendus *-ci/o* (vd. Silfer, PL 10/1984, 19; Szerdahelyi 1987, 117). Eo *-ĉ-* ne respondas al la prononco en iu el la fontlingvoj; versajne temas pri cirkumfleksigo de la *c* en la L formo *condicio.* La plej proksima analogaĵo kun forfalo de la sufiksa *-i-* estas *donac-.* Estas kredeble, ke Z volis plifaciligi pluan derivadon (*kondiĉ/a, -e* pli oportunaj ol **kondici/a, -e*). Endas ankaŭ rimarki, ke tiu ĉi vorto en L (ktp) estas iel diverskaraktera de la plimulto de vortoj finiĝantaj per *-io* (agnomoj). – Ps-pf *kon-.* ¶ 1894 *kondizi-.* ¶ Io *kondiciono*, IeIa *condition.*

Orig. "(kondiĉa) akordo, kontrakto", der. de L *condicere* "akordi, kontrakti": *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*), *dicere* "diri" (vd. tiun).

**KONDOLENC/o** (f; RE): A *condol/ence*, F *-éance*, (H *-encia*), G *Kondolenz* [-ts], I *condoglianza*, Po *kondolencja.* Prezentita kiel verbo sed evidente bazita sur la substantivo en la fontlingvoj. Efektive sufiĉus verba radiko **kondol-* (Szerdahelyi 1987, 135). Ps-pf *kon-*; ps-sf *-enc.* ¶ 1894 *kondolenzi-.* ¶ Io *kondolo*, Ie *condolent/ie*, Ia *-ia.*

Latinida subst. de la verbo F ant. *condouloir*, H *condoler/se* (refl.), I *-si* (refl.) "kondolenci" el L *condolere* "malĝoji, funebri kun [iu])": *con-* "kun-" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*), *dolere* "suferi, senti doloron" (vd. *doloro*).

**KONDOR/O** (2; Jü): AF(H) *condor*, I *-e*, G *Kondor*, PoR *kondor.*

H vorto el Keĉua *kuntur* s. s.

**KONDUK/I** (f; Un): A *con/duct*, F *-duire* (kp *-ducteur* "-isto; -ilo"), I *-durre*, (H *-ducir*). Tamen la L originformo *conducere* (vd. sube) eble estas la senpera fonto. La formo *-duki* kongruas kun *traduki* (kaj *eduki*) sed kontrastas kun *de-, in-, re/dukti*, kie tamen la fundamenta signifo "konduki" apenaŭ estas rekonebla; alie statas *produkto, viadukto*, bazitaj sur substantivo. Ps-pf *kon-.* Pro la neglektebla rolo de la prefikso, la ceteraj planlingvoj preferas la simplan verbon: Io *duktar*, Ie *ducter*, Ia *ducer.*

El L *conducere* (en L klas. "kolekti" sed, kiel evidentiĝas el la latinidaj vortoj, en L vulg. ank. "konduki"): intensiga pref. *con-* (vd. ps-pf *kon-*) k *ducere* "konduki; gvidi", kp *dux* "gvidanto, estro" (vd. *duko*) de HE rad. **deŭk- /duk-*"tiri", kp G *ziehen* "tiri", A *tow* "treni". Samfamiliaj vortoj en Eo: *konduktoro, konduti; dedukti, duko* (kun *dukato*), *duŝo, eduki, indukti, produkto, redukti, traduki, viadukto.*

**KONDUKTOR/O** (6; RE): A Us (H) *con/ductor*, I *-duttore*, (G *Kondukteur*), PoR *konduktor.* Kp F *conducteur* "kondukisto". Ps-pf *kon-*; ps-sf *-or* 1.

Propr. "kondukisto, gvidisto", el L *conductor*, agantnomo de *conducere* "konduki" (vd. tiun).

**KONDUT/o** (f; RE; *kondukt-* N-ro 15 1888): F *con/duite*, I *-dotta*, (H *-ducta*). Kp P *conduta.* malgraŭ la ŝajna kongruo kun P la Eo-radiko estas bazita sur F; la F diftongo *ui* estas reduktita ĝis nura *u* same kiel en *kulero* (male en *kuiri*). Ps-pf *kon-.* ¶ 1894 *konduit-.* ¶ Io = (espismo), Ie *conduida*, Ia *conducta.*

Latinida subst. de la verbo F *se conduire*/H *conducirse*/I *condursi* (refl.) "konduti", propr. "sin konduki, sin porti" (vd. *konduki*).

**KONFEDERACI/O** (2; RE): A *confeder/ation, -acy*, I *-azione*, (H *-ación*), F *confédération*, G *Konföderation*, Po *konfeder/acja*, R *-acija*; L *confoederat/io -ionis.* Ps-pf *kon-*; ps-sf *-cio.*

Subst. de L *confoederare* "kunigi per traktato" (= eo *konfeder/i* Grabowski, Wü), el *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*) k *foed/us -eris* "traktato". Vd. la paralelan *federacio.*

**KONFEKCI/O** (3; Jü): F *con/fection*, I

*-fezione*, (H *-fección*), G *Konfektion*, Po *konfekcja*. Ps-pf *kon-*; ps-sf *-cio*.

El L *confect/io -ionis* "fabrikado", subst. de *conficere* "(fin)fari, fabriki": intensiga pref. *con-* (vd. ps-pf *kon-*) k *facere* "fari" (vd. tiun). Kp spec. *konfiti*.

**KONFERENC/O** (2; N-ro 15 1888, Be): A *confer/ence*, I *-enza*, (H *-encia*), F *conférence*, G *Konferenz*, Po *konferenc/ja*, R *-ija*. Ps-pf *kon-*; ps-sf *-enc*.

El L mez. *conferentia* "diskutado", subst. de L *conferre* "kunporti" ( > "kunporti ideojn/pensojn" > "diskuti"): pref. *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*) k *ferre* "porti" (vd. *oferi*). Kp spec. *diferenco*.

**KONFES/I** (f; Un): A *confess*, F *-er*, I *-are*, (H *confesar*). Kp ank. G *Konfession*, Po *konfesja* "kredkonfeso". Eo *s* el fontlingva *ss*. Ps-pf *kon-*. ¶ Io *konfesar*, Ie *confess/er*, Ia *-ar*.

El L vulg. **confessare* s. s. , formita el L *confessus* "konfesinta", ptc. perf. de *confiteri* "konfesi", kunm. de intensiga pref. *con-* (vd. ps-pf *kon-*) k *fateri* "konfesi", orig. "anonci", samradika kun L *fari* "diri, paroli" (vd. *infano*). Kp *profesio*.

**KONFID/I** (f; RE) 1) plene fidi 2) transdoni, lasi (al iu): A *con/fide* (1, 2), F *-fier* (2; kp *-fiance* "-o"), I *-fidare* (2; kp *-fidenza* "-o"), (H *-fiar* 1, 2; kp *-fianza* "-o"); L *confidere* (1). Ps-pf *kon-*. ¶ Io *konfidar* (2), Ie *confider* (2), Ia *confider* (1, 2).

Propr. "fidi (je iu)" (poste, en la latinidaj lingvoj, "transdoni al ies fido"), kunm. de L intensiga pref. *con-* (vd. ps-pf *kon-*) k *fidere* "fidi" (vd. tiun). Kp spec. sekv.

**KONFIDENC/O** (3; Wü; *konfidenci-* Be, Jü, Ka): AF *confid/ence*, I *-enza*, (H *-encia*), Po *konfidencja*. La responda adj. estas internacia: A *confid/ential*, F *-entiel*, I *-enziale*, (H *-encial*), G *konfidentiell*, R *konfidencial'nyj*. Ps-pf *kon-*; ps-sf *-enc*. La origina Z-a formo, kiu montras nenormalan traktadon de la pseŭdosufikso, sendube baziĝas sur la varianto troviĝanta antaŭ la adjektiva sufikso (en Be, la radiko prezentiĝas kiel adjektiva). ¶ Io *konfidenc-ajo*, Ie *confident/ie*, Ia *-ia*.

El L *confidentia* "(kon)fido" (poste, en la latinidaj lingvoj, "io konfidita al iu"), subst. de *confidere* "fidi" (vd. *konfidi*).

**KONFIRM/I** (f; RE) 1) proklami la verecon de io 2) rel. (= eo *konfirmaci-* RE): A *confirm* (1, 2), F *-er* (1, 2), (H *-ar* 1, 2), I *confermare* (1), Po *konfirm/owac'* (2), R *-ovat'* (2); L *confirmare* (1, en L mez. ank. 2). Ps-pf *kon-*. ¶ Io *konfirmar* (1, 2), IeIa *confirmar* (1, 2).

Propr. "firmigi, sekurigi", kunm. de L intensiga pref. *con-* (vd. ps-pf *kon-*) k *firmare* "firmigi" de *firmus* "firma" (vd. tiun).

**KONFISK/I** (1; RE): A *confisc/ate*, I *-are*, (H *-ar*), F *confisquer* [-k-], G *konfiszieren* (kp *Konfiskation* "-o"), Po *konfisk/owac'*, R *-ovat'*; L *confiscare*. Ps-pf *kon-*.

Propr. "enkasigi, enfiskigi", el L pref. *con-* (tie ĉi en senco de Eo *-ig-*; vd. ps-pf *kon-*) k *fiscus* "fisko" (vd. tiun).

**KONFIT/I** (f; RE): F *confire* (ptc. perf. *confit*; kp *confiture* "-aĵo"), I *confettare*, (H *confitar*). Kp A *confection* "-aĵoj", G *Konfitür* "-aĵo", Po *konfitury* "-aĵo", R *konfeta* "-aĵo". malgraŭ la verba klasigo en UV ŝajnas evidente, ke la radiko baziĝas sur F subst. *confiture*, kiu havas certan internacian disvastigitecon (kp GPo), kun forstreko de la sufikseca *-ure* (kp *konjekti*). Ps-pf *kon-*. ¶ Io *konfitar*, Ie *confiter*; kp Ia *confectura* "-aĵo".

Latinida vorto kun orig. signifo "prepari", el L *conficere* "fabriki, finfari" (sup. rad. *confect-*, kp L mez. *confectum* "konfitaĵo" k AR supre): vd. la etimologie identan *konfekcio*.

**KONFLIKT/O** (2; Be): A *con/flict*, F *-flit*, I *-flitto*, (H *-flicto*), G *Konflikt*, PoR *konflikt*. Kp ank. la L formon sube. Ps-pref. *kon-*.

El L *conflictus* "kunpuŝiĝo, kolizio", subst. de *confligere* "kunpuŝ(iĝ)i", kunm. de pref. *con-* "kun" (vd. ps-pf *kon-*) k *fligere* "(teren)bati, puŝi", par. al Gr *thlíbein* "premi". Samfamilia vorto en Eo: *aflikti*.

**KONFORM/A** (f; RE): A *conformable*

(kp *to conform* "-igi", *conformity* "-eco"), FI(H) *conforme*, G *konform*. Ps-pf *kon-*.

El L *conformis* "tute simila, samforma [kun]", el *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*) k *forma* "formo" (vd. tiun).

**KONFUZ/I** (f; RE): A *con/fuse* [-z], F *-fondre* (kp *-fusion* "-o" [-z-], *-fus* "-(it)a"), I *-fondere* (kp *-fusione* [-z-] "-o", *-fuso* [-z-] "-a"), (H *-fundir*, kp *-fusión* "-o", *-fuso* "-a"); L *confundere* (kp *confus/io -ionis* "-o", *confusus* "-a"). Kp G *konfus* "-ita". Bazita sur la L supina radiko (videbla en la subst. kaj ptc. perf.), evidente de pli granda internacieco. Kp spec. *infuzi*. Ps-pf *kon-*. ¶ 1894 *konfus-*. ¶ Io *konfundar* (kp *konfuza* 'malklara, malpreciza'), Ie *confuser*, Ia *confunder* (kp *confuse* "-ita").

Propr. "kunverŝi" (> "kunmiksi, konfuzi"), kunm. de L *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*) k *fundere* "verŝi; fandi" (vd. *fandi*).

**KONGLOMERAT/O** (2:E-isto 3/1889, Jü): A *conglomer/ate*, I *-ato*, (H *-ado*), F *conglomérat*, G *Konglomerat*, Po *konglomerat*. Ps-pf *kon-*; ps-sf *-at*.

El L *conglomeratum* "(io) amasigita", subst.-igita ptc. perf. de *conglomerare* "amasigi, buligi" (> eo *konglomer/i* Wü) el pref. *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*) k *glom/us -eris* "(faden)bulo", par. al *globus* "globo" (vd. tiun).

**KONGREGACI/O** (2; E-isto 4/1894, Jü): A *congreg/ation*, I *-azione*, (H *-ación*), G *Kongregation*, Po *kongregacja*. Ps-pf *kon-*; ps-sf *-cio*.

El L *congregat/io -ionis* "kuniĝo, asocio", subst. de *congregare* "kunigi, kolekti", propr. "kun-greg-igi", el L *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*) k *grex* (gen.: *gregis*) "grego" (vd. tiun).

**KONGRES/O** (f, 1, 7; Ald, Be): A *con/gress*, F *-grès*, I *-gresso*, (H *-greso*), G *Kongress*, Po *kon/gres*, R *-gress*. Eo *s* el fontlingva *ss*. Ps-pf *kon-*.

El L *congressus* "kunveno, renkontiĝo", subst. de *congredi* "kunveni": *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*), *gradi* "iri" (vd. *grado*). Kp spec. *progreso*.

**KONJAK/O** (2; Jü): AFI *cognac* [konj-], G *Kognak* [konj-], Po *koniak*, R *kon'jak*, (H *con'ac* [konj-]). Ea radiko laŭ F prononco. F [n'] redonata per *nj*, vd. *kastanjeto*.

Laŭ la nomo de la franca urbo *Cognac*, hejmloko de tiu brando. Kp la analogan vinnomon *ĉampano*.

**KONJEKT/I** (f; RE): A *conjectur/e*, F *-er*, I *congetturare*, (H *conjeturar*); L *coniectare*. Kredeble farita surbaze de la latinidaj formoj kun forĵeto de la sufikseca elemento; kp tiuokaze *konfiti*. Ps-pf *kon-*. ¶ Io *konjektar*, Ie *con/jecter*, Ia *-jicer*, *-jecturar*.

L *coniectare* (kun subst. *coniectura* "-o", el kiu AF *con/jecture*, H *-jetura*, I *-gettura*, bazo de la supre cititaj verboj) propr. "kunmeti" (per kunmeto de konataj faktoj oni faras konjekton), verbo intensa de *coniicere* "kun/meti, -ĵeti", kunm. de pref. *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*) k *iacere* "ĵeti; meti" (vd. *ĵeti*; kp *adjektivo*).

**KONJUGACI/O** (f; RE; *konjug-* Wü, kp *konjug/ad/o* LR II): A *conjug/ation*, F *-aison*, (H *-ación*), G *Konjugation*, I *coniugazione*, Po *konjugacja*; L *coniugat/io -ionis*. Ps-pf *kon-*; ps-sf *-cio*. ¶ 1894, 1906b *konjug-*.

Propr. "kunigo (de la finaĵoj kun la radiko)", subst. de L *coniugare* "kun/igi, -jungi" el *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*) k *iugum* "jugo" (vd. tiun k *jungi*). Samelementa kun la sekva.

**KONJUNKCI/O** (f; RE): A *con/junction*, F *-jonction*, I *-giunzione*, (H *-junción*), G *Konjunktion*; L *coniunct/io -ionis*. Ps-pf *kon-*; ps-sf *-cio*. ¶ 1894 *konjunkzi-*.

Propr. "kunig(il)o (de propozicioj)", subst. de *coniungere* "kunigi, kunjungi": *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*), *iungere* "kunigi, jungi" (vd. *jungi*). Kp spec. la samelementan *konjugacio*.

**KONK/O** (f; RE): F *conque* [kôk], *coquille*, I *conchiglia* [konk-], (H *concha*); L *concha* [kónka]. Kp A *conch* [konk]

"konkego; orelkonko". Kredeble bazita sur LF, eble kun konsidero al Gr (vd. sube). ¶ Io =, Ie *conch/e*, Ia *-a*.

El Gr *kónkhê* s. s. (kun dim. *konkhylion* > L *conchylium* > F *coquille*, I *conchiglia*), identa kun Sa *cankhá-* s. s.

**KONKAV/A** (2; Jü): AF *concav/e*, I *-o*, G *konkav*, (H *cóncavo*); L *concavus*. Ps-pf *kon-*.

Formita el L pref. *con-* (tie ĉi intensiga? vd. ps-pf *kon-*) k *cavus* "kava" (vd. tiun).

**KONKER/I** (4; Sentis 1906, Boirac 1909, Jes, Wü; antaŭe *al/milit/i*, *milit/akir/i*): A *con/quer* [-k-], F *-quérir* [-k-], I *-quistare*, (H *-quistar*). Bazita ĉefe sur F. La formo *konker-* estis tiu preferata de Z; en la frua epoko oni provis plurajn alijajn formojn: *konkir/i* (Presa Societo 1908, Grabowski, Ka), paralela al *akiri*; *konkver/i* (Ve), alia transskribo de la AF formo; *konkvest/i*, inspirita de A *conquest* "-o" kaj HI (Wü interkrampe; ank. Boirac 1909, kiu avertas pri "la ebla vortludo: *konk-vesti*"). [Mi ĉerpis la indikojn pri la fruaj formoj el Ciliga en ScR XII:1-2, 43 s. ] Ps-pf *kon-*. ¶ Io *konquestar*, Ie *conquestar*, Ia *conquirer*.

El L *conquirere* (sup. rad.: *conquisit-*) "elserĉi, provi kolekti", kunm. de intensiga pref. *con-* (vd. ps-pf *kon-*)k *quaerere* "serĉi, deziri; demandi" (subst.: *quaestio* "demandado, esplorado" > AF *question* "demando") kun nekonata etimologio. Samfamiliaj vortoj en Eo: *akiri*, *enketo*, *inkvizicio*, *kvestoro*.

**KONKLUD/I** (f; RE): A *con/clude*, F *-clure*, I *-cludere*, (H *-cluir*); L *concludere*. LAI kune formas solidan bazon por la Ea formo. Ps-pf *kon-*. ¶ 1881 *klur/i* (< F). ¶ Vp *kludön* (vd. Golden en Li kaj Ni, 408), Io *konkluzar*, IeIa *concluder*.

L *concludere* propr. "ŝlosfermi" (kp semantike G *schliessen* "ŝlosfermi; konkludi"), kunm. de intensiga pref. *con-* (vd. ps-pf *kon-*) k *claudere* "ŝlosfermi" (rim. la kunmetojn *includere* "enfermi", *excludere* "ne enlasi"), "rigli", kp *clavis* "ŝlosilo, riglilo", identa kun Gr *kleis* "ŝlosilo", kp *kleíein* "ŝlosi" (HE rad. **klaŭ-* "fermi"). Samfamiliaj vortoj en Eo: *eks-*, *in/kluziva*, *klavo*.

**KONKORD/O** (3; Par VIII, Wü; antaŭe *akord/o*, *harmoni/o*): A *concord*, F *-e*, I(H) *-ia*; L *concordia*. Eo alprenis la iom pli mallongan formon de AF, certe kun konsidero al *akord/o*. Ps-pf *kon-*. ¶ Io =, Ie *concord/ie*, Ia *-ia*.

Der. de L *con/cors -cordis* "-a", propr. "kun sama kor(inklin)o", el pred. *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*) k *cor* (gen: *cordis*) "koro" (vd. tiun).

**KONKRET/A** (2; Jü): F *concret*, A *-e*, I(H) *-o*, G *konkret*, Po *-ny*, R *-nyj*. Ps-pf *kon-*.

El L *concretus* "densa, solida", orig. "kunkreskinta", ptc. perf. de *concrescere* "kunkreski": *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*), *crescere* "kreski" (vd. tiun).

**KONKUR/I** (f:RE): F *con/courir*, I *-correre*, (H *-currir*), G *konkurrieren*, Po *konkur/owac'*, R *-irovat'*. Ps-pf *kon-*. ¶ Io *konkurencar*, IeIa *concurrer*. – Agosubstantivo 1: **KONKURENC/O** (3; Be; antaŭe *konkur/ad/o*): F *concurr/ence*, (H *-encia*), G *Konkurrenz*, I *concorrenza*, Po *konkurenc/ja*, R *-ija*. Ps-pf *kon-*; ps-sf *-enc*. ¶ Io *konkurenc(ad)o*, Ie *concurrent/ie*, Ia *-ia*. – Agosubstantivo 2: **KONKURS/O** (f; Ald, Be): F *con/cours*, I *-corso*, (H *-curso*), Po *konkurs*. Ps-pf *kon-*. ¶ Io =, Ie *concurs/e*, Ia *-o*.

El L subst. *concurrentia* resp. *concursus*, ambaŭ de *concurrere* "kunkuri" (> "strebi por atingi la saman celon"): *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*), *currere* "kuri" (vd. tiun).

**KONSCI/a** (f; RE): A *con/scious*, F *-scient*, (H *-sciente*), I *conscio*, *cosciente*; L *conscius*. Derivita subst.: A *con/sciousness*, F *-science*, (H *-ciencia*), I *coscienza*; L *conscientia* "-o". Kiel verbo nur en L: *conscire* "-i". Kreante la radikon, Z deiris aŭ de la verbo (kp *sci/i*) aŭ de la latinida adjektivo, forstrekante la sufiksecan vortfinon. Ĉiuokaze estis necese diferencigi tiun ĉi radikon disde la alia (religia, filo-

zofia) senco de L *conscientia* (vd. sekv.). Ps-pf *kon-*. ¶ 1894 *konszi-*. ¶ Io *konciar* "-i"; Ie *conscier* "-i"; Ia *conscie* "-a".

L *conscius* propr. "kun-scia" (t. e. partoprenanta en la scio, kp semantike G *be-wusst* "konscia": *wissen* "scii"; R *soznat'* "konscii" el *so-* "kun" k *znat'* "scii") el *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*) k *scire* "scii" (vd. tiun).

**KONSCIENC/O** (f; RE): AF *con/science*, (H *-ciencia*), I *coscienza*; L *conscientia*. Ps-pf *kon-*; ps-sf *-enc*. La radiko enkorpigas la fontlingvan sufikson por diferenciĝi disde *konsci-*, kp tiun. ¶ 1894 *konszienz-*. ¶ Io *koncienco*; Ie *conscient/ie*, Ia *-ia* (ambaŭ ank. "konscio").

Propr. "kun-scio, konscio", subst. de *conscire* "konscii" (vd. tiun). La vorto estas efektive traduko de Gr *syn-eídêsis* s. s. ; kp ank. G *Gewissen* "konscienco": *wissen* "scii".

**KONSEKR/I** (4; El, Wü; antaŭe *sankt/ig/i*): A *con/secrate*, F *-sacrer*, I *-sacrare*, (H *-sagrar*), G *konsekr/ieren*, Po *-owac'*; L *consecrare*. Oni povas heziti pri la vokalismo; Eo *-e-* eble estas prenita rekte el la L originvorto. Ps-pf *kon-*. ¶ Io *konsakrar*, Ie *con/sacrar*, Ia *-secrar*.

Propr. "sanktigi", el L intensiga pref. *con-* (vd. ps-pf *kon-*) k *sacrare* "sanktigi" de *sacer* (fem.: *sacra*, neŭtra: *sacrum*) "sankta" (vd. sub *sakro*).

**KONSEKVENC/O** (f; RE): A *con/sequence* [-kŭ-], F *-séquence*, I *-seguenza*, (H *-sequencia*), G *Konsequenz* [-kv-], Po *konsekwencja* [-kv-]. Pri Eo *kv*, vd. *akvo*. Ps-pf *kon-*; ps-sf *-enc*. ¶ 1894 *konsekvent-*.

El L *consequentia* "sekvo, rezulto", subst. de *consequ/ens -entis* (> A *con/sequent*, F *-séquent*, H *-secuente*, I *-seguente*, G *konsequent*, Po *konsekwentny* "konsekvenca"), ptc. prez. de *consequi* "(senpere) sekvi, sekvi post [pro] io": *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*), *sequi* "sekvi" (vd. tiun).

**KONSENT/I** (f; Un): A *consent*, F(H) *-ir*, I *-ire*; L *consentire*. Kp G *Konsens* "-o". Ps-pf *kon-*.

Propr. "kun-senti" (t. e. 'havi la saman senton/opinion kiel iu alia'): L *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*), *sentire* "senti" (vd. tiun).

**KONSERV/I** (f; Un): A *conserv/e*, F *-er*, I *-are*, (H *-ar*), Po *konserwowac'*; G *konserv/ieren* (ĉefe kul.), R *-irovat'* (kul.); L *conservare*. Ps-pf *kon-*.

Kunm. de L intensiga pref. *con-* (vd. ps-pf *kon-*) k *servare* "konservi, gardi", eble par. al Gr *hêrôs* "heroo" (kp tiun) k Li *sérgmi* "(mi) gardas" (HE rad. **ser-*?). Samfamiliaj vortoj en Eo: *konservat/iva, -orio, observ/i* (kun *-atorio*), *rezervi*.

**KONSERVATIV/A** (3; RE; antaŭe *konserv/em/a*): A *conservative*, G *konservat/iv*, Po *-ywny*, R *-ivnyj*. (La ceteraj fontlingvoj uzas anstataŭe la agantnomon "konservanto": F *conserv/ateur*, I *-atore*, ank. H *-ador.)* Ps-pf *kon-*; ps-sf *-iv*.

El L mez. *conservativus* "konservema", adj. de L *conservare* "konservi" (vd. tiun).

**KONSERVATORI/O** (2; RE): AF *conservat/oire*, I(H) *-orio*, G *Konservatorium*, Po *konservat/orium*, R *-orija*. Ps-pf *kon-*; ps-sf *-ori*.

I muzika termino, orig. signifanta infanzorgejon (kun instruado pri muziko), propr. "gardejo", der. de L *conservare* "gardi, konservi" (vd. tiun).

**KONSIDER/I** (f; RE): A *consider*, I *-are*, (H *-ar*), F *considérer*; L *considerare*. Ps-pf *kon-*.

Orig. "(zorge) rigardi, inspekti", kunm. de L pref. *con-* (vd. ps-pf *kon-*) k (kredeble) *sid/us -eris* "stelo, konstelacio", sed kun necerta semantika evoluo (orig. "observi la stelojn"?). Analoga problemo ĉe la parenca *deziri*, kp tiun.

**KONSIL/I** (f; Un): A *counsel*, F *conseiller* [-ejé], I *consigliare* [-il'-], (H *aconsejar*): kp L *consilium* "-o", ank. A *counsel*, F *conseil*, I *consiglio*, (H *consejo*) "-o". Kredeble bazita sur la L subst. kun apokopo de la sufikseca *-ium*; Eo *-l-* estas apenaŭ redono de la latinida [l']. ¶ Io *konsilar*, Ie *consili/e*, Ia *-o*.

Verbo der. de la subst. – L *consilium* "konsil(iĝ)o; konsilantaro; saĝeco; projek-

to" estas samfamilia kun *consulere* "konsulti" k *consul* "konsulo" (vd. tiujn); ĝia plua etimologio estas necerta.

**KONSIST/I** (f; EG): A *consist*, F *-er*, I *-ere*, (H *-ir*); L *consistere*. Ps-pf *kon-*.

Propr. "kunteniĝi, kunstar(iĝ)i" (kp semantike G *stehen* "stari": *bestehen* "konsisti"), kunm. de L pref. *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*) k *sistere* "stariĝi" (samradika kun *stare* "stari", vd. tiun). Kp spec. sekv. k *ekzisti*, *rezisti*.

**KONSISTORI/O** (2; RE): A *consist/ory*, F *-oire*, (H *-orio*), G *Konsistorium*, I *concistoro*, Po *kon/systorz*, R *-sistorija*. Ps-pf *kon-*; ps-sf *-ori*.

El L postkl. *consistorium* "kunvenejo", der. de *consistere* "kunveni", propr. "kunstariĝi" (vd. *konsisti*).

**KONSOL/I** (f; Un): A *consol/e*, F *-er*, I *-are*; (H *-ar*); L *consolari*. Ps-pf *kon-*.

Kunm. de L intensiga pref. *con-* (vd. ps-pf *kon-*) k *solari* "konsoli", kredeble par. al G *selig* "feliĉega".

**KONSONANT/O** (f; RE): A *consonant*, I(H) *-e*, F *consonne*, G *Konsonant*; L *conson/ans -antis*. Ps-pf *kon-*; ps-sf *-ant*.

Propr. "kun-sona (litero)" (t. e. litero kiu aŭdiĝas nur kune kun vokalo), ptc. prez. de L *consonare* "kunsoni": *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*), *sonare* "soni" (vd. tiun).

**KONSPIR/I** (f; RE): A *conspir/e*, F *-er*, (H *-ar*), G *konspir/ieren*, Po *-owac'*, R *-irovat'*, I *cospirare*; L *conspirare*. Ps-pf *kon-*.

Propr. "aspiri al la sama celo, kune aspiri": L *con-* "kune" (vd. *kun* k la ps-pf *kon-*), *spirare* "spiri" (vd. tiun; kp *aspiri* pri la semantika evoluo).

**KONSTANT/A** (f; Un): AF *constant*, (H *-e*), G *konstant*, I *costante*; L *const/ans -antis*. Ps-pf *kon-*; ps-sf *-ant*.

Ptc. prez. de L *constare* "firme stari": intensiga pref. *con-* (vd. ps-pf *kon-*) k *stare* "stari" (vd. tiun). Kp spec. sekv.

**KONSTAT/I** (f; RE): F *constat/er*, (H *-ar*), G *konstat/ieren*, Po *-owac'*, R *-irovat'*, I *co(n)statare*. Ps-pf *kon-*.

Der. de L *constat* "estas certe, estas fakto", 3-a pers. sing. prez. de *constare* "esti certa, stari firme" (vd. *konstanta*).

**KONSTERN/I** (f; EG): F *constern/er*, (H *-ar*), Po *konsternowac'*; L *consternare*. Kp A *consternation* "-o", G *konsterniert* "-ita", I *costernato* "-ita". Ps-pf *kon-*.

Orig. kredeble "terenfaligi" (kp L *prosternere* kun tiu signifo), kunm. de la intensiga pref. *con-* (vd. la ps-pf *kon-*) k la radiko en *sternere* "etendi teren" (vd. *sterni*).

**KONSTITUCI/O** (2; RE): AF *constitu/tion*, (H *-ción*), G *Konstitution*, I *costituzione*, Po *konstytucja*, R *konstitucija*. Ps-pf *kon-*; ps-sf *-cio*.

El L *constitut/io -ionis* "konstitucio; statuto; fiksado", propr. "starigo", subst. de *constituere* "starigi, fiksi": intensiga pref. *con-* (vd. ps-pf *kon-*) k *statuere* "starigi" (vd. sub *statuo*; kp spec. eo *statut/o* E-isto 1/1893, PV 'starigita regulo').

**KONSTRU/I** (f; Un): A *construct*, F *construi/re*, (H *-ir*), I *costruire*; G *konstru/ieren*, Po *-owac'*, R *-irovat'* (GPoR ĉefe tekn.); L *construere*. Bazita sur la L infinitiva radiko (= ĉiuj fontlingvoj krom A; kp ank. *detru/i*, *instru/i*). Ps-pf *kon-*. ¶ Io *konstruktar*, Ie *constructer* (bazitaj sur L supina radiko *construct-*, kp A); Ia *construer*.

Kunm. de L pref. *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*) k *struere* "konstrui, amasigi, stapli, staki" (kp *strues* "staplo, stako"). Aliaj kunmetoj: *destruere* "malkonstrui" (vd. *detrui*), *instruere* "konstrui, aranĝi, instrui" (vd. *instru/i*, *-mento*), *obstruere* "barikadi, malhelpi" (vd. *obstrukcio*). Deverba subst.: *structura* "konstruaĵo" (vd. *strukturo*). Adj.: *industrius* "agema, diligenta" (vd. *industrio*). De HE rad. **st(e)r-* "etendi" (vd. *sterni*).

**KONSUL/O** (2; RE): 1) antikva regnestro 2) diplomatia agento: AF(H) *consul*, G *Konsul*, I *console*, PoR *konsul* (ĉiuj 1, 2); L *consul -is* (1).

Orig. "konsultanto" (tiel nomata, ĉar "li devas konsulti la popolon kaj la senaton"

[Varro]), samradika kun L *consultare* (vd. sekv.).

**KONSULT/I** (3; Jü): A *consult*, F *-er*, I *-are*, (H *-ar*), G *konsult/ieren*, Po *-owac'sie* (refl.), R *-irovat'*; L *consultare*.

L *consultare* ank. "konsultiĝi, interkonsiliĝi", verbo intensa de *consulere* s. s., par. al *consilium* "konsilo" (vd. *konsili*).

**KONSUM/I** (f; RE): A *consum/e*, F *-er*, I *-are*, (H *-ir*), G *konsum/ieren*, Po *-owac'*; L *consumere*. Ps-pf *kon-*.

Propr. "preni al si", kunm. de L pref. *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*) k *sumere* "preni (al si, sur sin)", kunm. de *sub-* "de malsupre supren" (vd. sub *sub*) k *emere* "preni" (vd. *ekzemplo*). Kp spec. *resumo*.

**KONT/O** (3; Jü): A *account*, F *compte* [kô:t], G *Konto*, I *conto*, Po *konto*, (H *cuenta*). Kp P *conta*. Bazita sur la I formo, kiu iom disvastiĝis internacie. ¶ Io =, Iela *conto*.

I komerca termino, el L *computus* "kalkulo", der. de *computare* "kalkuli" (> eo *komput/i* GD), orig. "netigi kalkulon", kunm. de intensiga pref. *con-* (vd. ps-ps *kon-*) k *putare* "netigi, purigi" (vd. *amputi*). Kp spec. *kontanta, kontoro*.

**KONTAKT/O** (1; Be; proponita de de Beaufront, vd. LZ I, 23): AF *con/tact*, I *-tatto*, (H *-tacto*), G *Kontakt*, PoR *kontakt*. Ps-pf *kon-*.

El L *contactus* "tuŝo", subst. de *contingere* "(kun)tuŝi": *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*), *tangere* "tuŝi" (vd. *tangento*).

**KONTANT/A** (f; RE): F *comptant* [kôtâ], G *kontant*, I(H) *contante*. Ps-pf *kon-*; ps-sf *-ant*. ¶ Io =, Ie *contant*, Ia *-e*.

Propr. ptc. prez. de la verbo F *compter*/I *contare* "kalkuli" (do origine proks. "tuj paganta") el L *computare* s. s. (vd. *konto*).

**KONTENT/A** (f; Un): A *content(ed)*, F *content* I(H) *-o*; L *contentus*. Ps-pf *kon-*. ¶ Io =, Ie *content*, Ia *-e*.

Orig. "kontentiĝanta (per), limiganta sin (je), entenita (en)", ptc. perf. de L *continere* "kunten(iĝ)i": *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*), *tenere* "teni" (vd. tiun). Kp spec. *kontinento, kontinua*.

**KONTEST/I** (8; Wü; ne ĉe Z; antaŭe *pri/disput/i, kontraŭ/dir/i* k. s.): A *contest*, F *-er*, I *-are*; kp P *-ar*. Ps-pf *kon-*. Influo de Io ebla. ¶ Io *kontestar*, Iela *contestar*.

El L *contestari* (jur.) "ekprocesi, alvokante atestantojn", kunm. de *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*) k *testari* "atesti" (vd. tiun).

**KONTINENT/O** (1; RE): AF *continent*, I(H) *-e*, G *Kontinent*, Po *kon/tynent*, R *-tinent*; L *contin/ens -entis*. Ps-pf *kon-*; ps-sf *-ent*.

Propr. "kunteniĝa, kontinua (lando)", ptc. prez. de L *continere* "kunten(iĝ)i": *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*), *tenere* "teni" (vd. tiun). Kp spec. sekv.

**KONTINU/A** (4; ER): F *continu*, A *-ous*, I(H) *-o*, G *kontinuierlich*; L *continuus*. Kp Po *kontynuowac'* "-igi". Por la radikfino, kp *individu-*. ¶ Io =, Ie *continu/i*, Ia *-e*.

Propr. "kunteniĝa", adj. de L *continere* "kunten(iĝ)i" (vd. *kontinento*).

**KONTOR/O** (f; N-ro 15 1888, RE): F *comptoir* [kôt-], G *Kontor*, Po *kantor*, R *kontora*. Kp A *counting-house*, ank. Sv *kontor*. Bazita sur GR (kiuj siavice estas simpligoj de la F prononco). (Ps-pf *kon-*; ps-sf *-or*, var. de *-ori.*) ¶ Io =, Ie *contor*, Ia *officio* (< A *office*), *bureau* (< F).

Propr. "kalkulejo", der. de F *compter* "kalkuli" (vd. *kont/o, -anta*).

**KONTRABAND/O** (2; RE): A *contra/-band*, I *-bbando*, (H *-bando*), F *contrebande*, G *Konterbande*, PoR *kontrabanda*. Ps-pf *kontra-*.

I komerca termino, orig. prepozicia esprimo signifanta "kontraŭ dekreto": *contra* "kontraŭ" (vd. tiun), *bando* "dekreto, proklamo" (kp *bandire* "proklami", vd. sub *bandito*).

**KONTRABAS/O** (1; RE): AI *contra/basso*, (H *-bajo*), F *contrebasse*, G *Kontrabass*, PoR *kontrabas*. La dua elemento konformiĝas al *bas/o*. Ps-pf *kontra-*.

I muzika termino, kunm. de pref. *contra-* "kontraŭ" (vd. tiun; ĝi signas ĉi tie la plej

malaltan oktavon, la kontraŭ-oktavon – tiel nomita, ĉar ĝi estis markata per streketo sub la signo de la granda oktavo, kontraŭe al la altaj oktavoj) k *basso* "baso" (vd. tiun).

**KONTRAKT/O** (f; RE; *kontrat-* Ve): A *con/tract*, F *-trat* (kp *contracter* "-i"), I *-tratto*, (H *-trato*), G *Kontrakt*, PoR *kontrakt*; L *contractus*. Ps-pf *kon-*. ¶ Io *kontrato* (kp *kontraktar* "kuntiri"), Ie *con/trate*, Ia *-tracto*.

Subst. de L *contrahere* "kuntiri; kaŭzi, sekvigi; finfari [komercon], kontrakti": *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*), *trahere* "tiri" (vd. *ekstrakto*).

**KONTRALT/O** (1; ER): AFI(H) *contralto*, G *Kontraalt*, PoR *kontralt*. Ps-pf *kontra-*, var. *kontr-*.

I muzika termino, mallongigo de L mez. *contratenor altus* "alta kontraŭvoĉo" (vd. *kontraŭ* resp. *alta*; kp spec. *aldo*).

**KONTRAPUNKT/O** (1; RE): A *counterpoint*, F *contrepoint*, G *Kontrapunkt*, I(H) *contrapunto*, PoR *kontrapunkt*. La formo de la dua elemento (= GR) certe estas influita de la simpla *punkt/o*, eble ankaŭ de la L formo (vd. sube). Ps-pf *kontra-*. ¶ Io *kontrapunto*, Ie *contrapunct/u*, Ia *-o*.

El L mez. *contrapunctum* "kontraŭnoto" (la akompano orig. estis markata per punktoj metitaj kontraŭ la notoj de la ĉefa melodio): *contra-* "kontraŭ", *punctum* "muziknoto; punkto" (vd. *punkto*).

**KONTRAST/O** (1; RE): A *contrast*, F(H) *-e*, I *-o*, G *Kontrast*, PoR *kontrast*. Ps-pf *kontra-*.

Subst. de I *contrastare* "kontesti, kontraŭstari": *contra-* "kontraŭ", *stare* "stari" (vd. tiujn).

**KONTRAŬ** (f; Un): L *contra*; F *contre*, I *contro*, (H *contra*). Kp A *contrary* "kontraŭa" k pref. *counter-* "kontraŭ-" (ekz. *counteract* "kontraŭagi"). L *contr(a)-* estas plurlingve uzata kiel prefikso, ekz. A *contradict* "-diri", Po *kontrkandydat* "-kandidato", R *kontrrevoljucija* "-revolucio" (kp ps-sf *kontra-*). Pri la vortfino *-aŭ*, vd. la liston de pseŭdosufiksoj; kp spec. *ĉirkaŭ* < L *circa*. Formo **kontra* estus neebla pro la adjektivsimila *a* kaj la maloportunaj pluformaĵoj **kontraa*, **kontrae*. ¶ 1881 *blo* (sen etimologio PVZ 5, 132; laŭ Mattos 1987, 30, el Vp *plo*, kiu tamen signifas la malon: "por"). – 1894 *kontru*. ¶ Io *kontre*, IeIa *contra*.

En L orig. adverbo ('je la kontraŭa flanko, vid-al-vide'), formita el adj. **con-ter-* "apartenanta al du kune" (kp L *al-ter* "unu el du, unu aŭ la alia", vd. *alterni*) de *com/con/cum* "kun(e)" (vd. *kun* k la ps-pf *kon-*).

**KONTRIBU/I** (3; *-o* Jü, *-i* Wü): A *contribu/te*, F *-er*, I *-ire*, (H *-ir*); L *contribuere* (sup. rad.: *contribut-*). La ĉefelemento konforma al *atribu/i* (OA 1); poste ankaŭ *distribu/i* (OA 8). Ps-pf *kon-*. ¶ Io *kontributar*, IeIa *contribuer*.

Kunm. de L *con-* "kun(e)" (vd. ps-pf *kon-*) k *tribuere* "disdoni, interpartigi" (vd. *tributo*). Kp. spec. sekv.

**KONTRIBUCI/O** (3; RE): G *Kontribution*, Po *kontrybucja*, R *kontribucija*. En la latinidaj lingvoj, kie la vorto signifas "kontribuaĵo" ĝenerale, oni aldonas 'de milito': F *contribution de guerre*, I *contribuzione di guerra*, (H *contribución de guerra*). Do latinida vorto akceptita kun ĝermana-slava senco. Ps-pf *kon-*; ps-sf *-cio*. ¶ Mankas radiko por tiu nocio en la aliaj planlingvoj, kp Io *militimposto*, (Ie *indemnisation de guerre*), Ia *indemnitate de guerra* (kp A *war indemnity* "kontribucio", F *indemniser* "monkompensi").

El L *contribut/io -ionis* "kontribuaĵo", subst. de *contribuere* "kontribui" (vd. tiun).

**KONTROL/I** (1; RE): F *contrôler*, G *kontrol/lieren*, Po *-owac'*, R *-irovat'*, I *control/lare*, (H *-ar*). Kp A *control* "regi; kontroli". (Ps-sf *kontra-*, var. *kontr-*.)

Der. de F *contrôle* "-o" el F ant. *contrerole*, propr. "kontraŭ-listo" (kopio de listo por kontrolo): *contre* "kontraŭ" (vd. tiun), *rôle* "listo, registro", propr. "(skrib)rulo", el L *rotulus* "rulo" (vd. *rolo*).

**KONTUR/O** (f; RE): AF *con/tour* [F

-úr], I(H) *-torno*, PoR *-tur*, G *Kontur*. La F formo disvastiĝis internacie ortografie (A) aŭ prononce (GPoR). Ps-pf *kon-*. ¶ Io =, Ie *con/tur*, Ia *-torno*.

Orig. subst. de I *contornare* "ĉirkaŭi": intensiga pref. *con-* (vd. ps-pf *kon-*), *tornare* "(ĉirkaŭ-, re/)turni" (vd. sub *turni*).

**KONTUZ/I** (f; RE): A *con/tuse* [-z], F *-tusionner* [-z-], I *-tundere* (kp *-tusione* [-z-] "-o"), (H *-tusionar, -tundir*), Po *kontuz/jowac'*, R *-tuzit'*; L *contundere* (sup. rad.: *contus-*). Kp G *Kontusion* "-o". La subst. estas sendube pli internacia (ĝi donus en Eo **kontuzi/o*), sed Z preferis akcepti malpli longan verban radikon, forme influitan de la subst. kaj la AR verbo. Ps-pf *kon-*. ¶ 1894 *kontus-*. ¶ Io *kontuzar*, Ie *con/tuser*, Ia *-tunder*.

Kunm. de L intensiga pref. *con-* (vd. ps–pf *kon-*) k *tundere* (sup. rad.: *tuns-*, *tus-*) "frapi, frakasi" de HE rad. **teŭd-*, kp Sa *tudáti* "frapas" k (kun komenca *s-*) G *stossen* "puŝi". Samfamilia vorto en Eo: *obtuza*.

**KONUS/O** (f; RE): L *conus*; A *cone*, F *cône*, G *Konus*, I(H) *cono*, R *konus*. Pro alisignifa radiko *kon-* Z estis devigita adopti formon kun konservita L *-us* (vd. analogajn kazojn ĉe *fokuso*), sugestitan ankaŭ de GR. ¶ Io *kono*, Ie *con/e*, Ia *-o*.

El Gr *kônos* "(pin)konuso, keglo", kredeble identa kun Sa *câna-* "akriga ŝtono", kp ank. L *cos* "akrigilo".

**KONVAL/O** (f; RE): L bot. *Convallaria majalis*; Po *konwalia*. Kp P *lírio convale*, ank. Sv *konvalj*. La dua elemento estas rekonebla en la nomo de la floro en kelkaj aliaj fontlingvoj: A *lily of the valley*, (F *lis de la vallée*), kp H *lirio del valle* (propr. 'lilio de la valo'). Kredeble bazita sur L kun apokopo de la sufikso laŭ Po (vd. Szerdahely 1987, 135). Ps-pf *kon-*. ¶ Io *mai-floro*, Ie *may-flor* (laŭ G *Maiblume*); Ia *lilio del valles*.

Scienca termino farita de Lineo, propr. "(rond)vala (floro)", der. de L *convallis* "(rond)valo", kunm. de *con-* "kun" (kiel en 'kunpremita'; vd. *kun* k la ps-pf *kon-*) k *vallis* "valo" (vd. tiun).

**KONVEKS/A** (2; Jü): A *convex*, F *-e*, (H *-o*), G *konvex*, I *convesso*; L *convexus*. Ps-pf *kon-*.

Orig. "volba, arka", el L *con-* (kiel en la mal-vorto *konkava*, kp tiun; vd. ps-pf *kon-*) k la radiko en L *vacillare* "ŝanceliĝi" (HE rad. **ŭa(n)k-* "kurbiĝi", vd. sub *vango*).

**KONVEN/I** (f; Un): F(H) *conven/ir*, I *-ire*; L *convenire*. Kp A *convenient* "-a". Ps-pf *kon-*. ¶ Io *konvenar*, Ie *conven/er*, Ia *-ir*.

Propr. "kunveni" (> "konsiliĝi" > "akordiĝi", kun aĵa subjekto "esti interkonsentita, esti konvena, esti deca"): L pref. *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*), *venire* "veni" (vd. tiun). Kp spec. sekv.

**KONVENCI/O** (2; Jü): AF *conven/tion*, I *-zione*, (H *-ción*), G *Konvention*, Po *kon/wencja*, R *-vencija*. Ps-pf *kon-*; ps-sf *-cio*.

Orig. "akordiĝo", subst. de L *convenire* "akordiĝi" (vd. *konveni*).

**KONVERSACI/O** (3; Be; *konvers-*, *konversacion-* N-ro 20 1889): AF *conversa/tion*, I *-zione*, (H *-ción*), G *Konversation*, Po *konwersacja*. Ps-pf *kon-*; ps-sf *-cio*.

El L *conversat/io -ionis* "interrilatado, kunestado", subst. de *conversari* "interrilati, kunesti", propr. "turniĝi (kun iu, inter iuj)" el *con-* "kun" (vd. tiun k ps-pf *kon-*) k *versare* "turni"(vd. *verso*). Kp spec. sekv.

**KONVERT/I** (f; EG): A *convert*, F(H) *-ir*, I *-ire*. Kp G *konvertieren* "-iĝi", Po *konwertyta* "-ito". Ps-pf *kon-*.

El L *convertere* "(ĉirkaŭ)turni", kunm. de (kolektiva aŭ intensiga) pref. *con-* (vd. ps-pf *kon-*) k *vertere* "turni" (vd. *verso*, kp spec. *konversacio*).

**KONVINK/I** (f; RE): A *con/vince*, F *-vaincre* [-kr], I *-vincere*, (H *-vencer*). La L formo *convincere* [-vink-], kvankam semantike iom malsama (vd. sube), certe kuninfluis la formon de la dua elemento. Ps-pf *kon-*. ¶ Io *konvinkar*, Ie *con/victer*, Ia *-vincer*.

L *convincere* "pruvi [iun] kulpa, plene pruvi", kunm. de intensiga pref. *con-* (vd. ps-pf *kon-*) k *vincere* "superi, venki" (vd.

*venki*).

**KONVOLVUL/O** (2; Jü): L *convolvulus*; A *con/volvulus*, I *-volvolo*, (H *-vólvulo*). Botanika termino prenita el L; *-ul-* konservita kiel en *betul/o*, *kalendul/o*. Ps-pf *kon-*. ¶ Io =, Ie *convolvul*, Ia *-o*.

Propr. "kunvolva (kreskaĵo)", der. de L *convolvere* "kunvolvi": *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*), *volvere* "volvi" (vd. tiun).

**KONVULSI/O** (f; RE): AF *colvuls/ion*, I *-ione*, (H *-ión*), G *Konvulsion*, Po *kon/wulsja*, R *-vulsija*; L *convuls/io -ionis*. Ps-pf *kon-*; ps-sf *-cio*, var. *-sio*.

Orig. "krampfo, skuiĝo, ŝiriĝo", subst. de L *convellere* (sup. rad.: *convuls-*) "for-, dis/-ŝiri", kunm. de intensiga pref. *con-* (vd. ps-pf *kon-*) k *vellere* "(for)ŝiri", par. al L *vellus* "(lan)floko" (vd. sub *lano*).

**KOPEK/O** (f', 1, 7; Un kovrilo, RE): A *copeck* [-ek], F *kopek*, G *Kopeke*, I *copeco*, Po *kopiejka*, R *kopejka*, (H *copec*). La Ea formo respegulas la prononcon de la okcidenteŭropaj formoj. ¶ Ie *copek*, Ia *kopeka*; mankas speciala formo en Io.

Dim. de R *kop'ë* "lanco" (la unuaj kopekmoneroj surhavis bildon de la caro kun lanco en la mano), par. al R *kopat'* "haki†" (vd. *komo*).

**KOPI/I** (f; RE): A *cop/y*, F *-ier*, I *-iare*, (H *-iar*), G *kopieren*, Po *kopjowac'*, R *kopirovat'*. Kp la subst. A *cop/y*, F *-ie*, I(H) *-ia*, G *Kopie*, Po *kop/ia*, R *-ija* "-o".

La verbo estas der. de la subst., el L *copia* "provizo, abundo, multeco" (poste, en L mez., "multobligita folio, kopio"), el pref. *co(n)-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*) k *ops* (gen.: *opis*) "riĉaĵo, forto, rimedo", kp Sa *ápnas* "posedaĵoj" (HE rad. **op-*, vd. *operacio*).

**KOR/O** (f; Un): L *cor* (gen.: *cordis*); F *coeur* (kp *cordial* "-a"), I *cuore* (var. *core* [lit.]), (H *corazón*). Kp A *cordial* "-a". Bazita sur la L nominativo kun apogo de FI; rimarku, ke *kVr-* estas la parto komuna al la diversaj latinidaj formoj. Kolizio kun la radiko de L *chorus* estas evitita per adopto de *ĥ-* por tiu lasta, vd. *ĥoro*.

¶ Io *kordio*, Ie *cordie*, Ia *corde*.

El HE **kerd-* s. s., kp Gr *kardía*; A *heart*, G *Herz*; R *serdce*, Po *serce*. Etimologie identa estas *kero*; ceteraj samfamiliaj vortoj en Eo: *agordi/akordo*, *konkordo*, *kuraĝo*, *rekordo*.

**KORAL/O** (1; RE): A(H) *coral*, I *-lo*, F *corail*, G *Koralle*, Po *koral*, R *korall*; L *corallium*. ¶ Io *koralio*, Ie *corall/e*, Ia *-o*.

El Gr *korállion* s. s. kun necerta etimologio.

**KORAN/O** (f; *K-* RE, EG, *k-* UV): AG-PoR *Koran*, F *Coran*, I *-o*, (H *Corán*).

El Ar *(al-)qur'ân* s. s., propr. "legaĵo", der. de *qara'a* "legi, deklami".

**KORB/O** (f; RE): F *corbeille*, G *Korb*, R *korob*; L *corbis*. ¶ Io =, IeIa *corbe*.

L vorto (L > FG, G > R, kp ank. Li *karbas* s. s.), orig. kredeble "plektaĵo" (vd. sub *logogrifo*).

**KORD/O** (f; RE): A *chord* [k-], F *cord/e*, I *-a*, (H *cuerda*); L *chorda* [k-]. ¶ Io =, Ie *corde*, Ia *chorda*.

El Gr *khordê* s. s., orig. "(kordo el) intesto", de HE bazo **ghor-* "intesto", kp Li *z'árna* "intesto", G *Garn* "fadeno, reto", L *hernia* "hernio" (kp tiun), Sa *híra-* "ligilo, bendo". Kp *agordi/akordo*.

**KOREKT/I** (f; RE, kp *-a* Wü): A *correct*, F *corriger*, G *korrigieren*, I *correggere*, Po *korygowac'*, R *korektirovat'*, (H *corregir*); L *corrigere*. Apartenanta adjektivo: AF *correct*, (H *-o*), G *korrekt*, I *corretto*, R *korrektnyj*. Z utiligis la L supinan radikon, kiu internacie manifestiĝas precipe en la adjektivo (pro tio la ofta uzo de Eo *korekt/a* en la senco 'ĝusta, laŭregula': Be, Jü, Wü, PV, GD – uzo evitinda laŭ PIV kaj AdA II, 54). Ps-pf *kon-*, var. *ko-*. ¶ Verbo: Ido *korektigar*, Ie *correcter*, Ia *corriger*. Adj.: Io *korekta*, Ie *correct*, Ia *-e*.

L *correctus* "korektita", ptc. perf. de *corrigere* "korekti", propr. "rektigi", kunm. de faktitiva aŭ intensiga pref. *con-* (vd. ps-pf *kon-*) k *regere* "direkti" (vd. *regi*). Kp spec. *direkti*, *rekta*; samfamilia estas ank. *eskorti*.

**KORELATIV/A** (2; Jü): A *correlativ/e*, I(H) *-o*, F *corrélatif*, G *korrelat/iv*, Po *-ywny*. Ps-pf *kon-*, var. *ko-*; ps-sf *-iv*.

El L mez. *correlativus* s. s. , propr. "kun-rilata" (= rilata unu al la alia[j]), kunm. de L pref. *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-sf *kon-*) k *relativus* "rilata" (vd. plue *relativa*).

**KORESPOND/I** (f; Du, RE): A *correspond*, F *-re*, I *-ere*, (H *-er*), G *korrespondieren*, Po *korespondowac'*. Kp R *korrespondent* "-anto". Ps-pf *kon-*.

El L mez. *correspondere* "kun-respondi" (= respondi unu al la alia), kunm. de L pref. *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*) k *respondere* "respondi" (vd. tiun).

**KORIDOR/O** (1; RE): AF *corrid/or*, I *-oio*, G *Korridor*, Po *korytarz*, R *koridor*, (H *corredor*). Ps-sf *-or*, var. de *-ori*. ¶ Io =, Ie *coridor*, Ia *corridor*.

Propr. "kurejo", der. de I *correre* "kuri" (vd. tiun).

**KORIFE/O** (2; Jü): A *coryphaeus* [kori-], F *coryphée* [korifé], G *Koryphäe*, I(H) *corifeo*, Po *koryfeusz*, R *korifej*, L *coryphaeus*. Z sekvis la kutimajn regulojn por transskribo el Gr (vd. sube) en Eon: *y* > Eo *i*, *ae (ai)* > Eo *e*. ¶ Io =, Ie *corifé*, Ia *coryphe*o*.

El Gr *koryphaíos* "ĉefo, estro", der. de *koryphê* "pinto", kp *kórys* "kasko" (vd. ev. *korno*).

**KORK/O** (f; RE) 1) ŝtopilo 2) ŝelo de korkokverko: A *cork* (1, 2), G *Kork* (1, 2), Po *korek* (1, 2), (H *corcho* 2); L *cort/ex -icis* (2). Bazita sur AG. ¶ Io = (1, 2), Ie *corc* (2), Ia *-o* (1, 2).

La AGHPo formoj el L *cortex*, orig. "(arbo)ŝelo" (el kiu ank. F *écorce*, I *corteccia* "(arbo)ŝelo", R *korka* "krusto") de HE rad. **(s)ker-* "tranĉi": Sa *krtí-* "tranĉilo"; Gr *keírein* "tranĉi" (vd. sub *akaro*); L *caro* "karno" (orig. 'detranĉaĵo', vd. *karno*), *carpere* "deŝiri, pluki" (kp sub *ĉarpio*), *carpinus* "karpeno" (vd. tiun), *corium* "ledo" (orig. "felo", t. e. 'aĵo detranĉita'; vd. *kiraso*), *curtus* "mallonga" (orig. 'detranĉita'; > F *court*, HI *corto* "mallonga"); A *share* "dividi", *sharp* "akra", *short* "mallonga"; G *kurz* "mallonga", *Schere* "tondilo".

**KORN/O** (f; Un): F *corn/e*, I *-o*, (H *cuerno*); L *cornu*. Eble bazita rekte sur L; kp tamen la malsaman traktadon de la samtipa *genu/o* (< L *genu*). ¶ Io =, Ie *corn/e*, Ia *-o*.

La latin(id)a vorto estas prapar. al A *horn*, G *Horn* s. s. , de HE bazo **ker-* "korno; pinto; kapo", kp Sa *crnga-* "korno" (kp *zingibro*), Gr *kéras* "korno" (kp *karato*), L *cervus* "cervo" (vd. tiun), *crabro* "krabro" (vd. tiun); Gr *kórys* "kasko" (kp ev. *korifeo*); L *cerebrum* "cerbo" (vd. tiun). Kp spec. *korneo*, *korneto*.

**KORNE/O** (1; Ka, Ve): L *cornea*; AI (H) *corn/ea*, F *-ée*. Anatomia termino prenita el L. ¶ Io =, IeIa *cornea*.

Orig. (L) *cornea (tunica)*, propr. "korna (membrano)" (kp G *Hornhaut* s. s. , propr. "korna haŭto"), adj. de *cornu* "korno" (vd. tiun).

**KORNET/O** (1; RE): AF *corn/et*, I *-etta*, (H *-eta*), G *Kornett*, PoR *kornet*. Akceptita malgraŭ homonimeco kun *korn/et/o*, kp *balet/o*, *(facet/o)*, *korvet/o*. Ps-sf *-et*. ¶ Io =, Ie *cornett/e*, Ia *-a*.

Propr. "korn-et-o", dim. de F *corne*/I *corno* "korno" (vd. tiun).

**KORNIC/O** (f; RE): AI *corn/ice*, F *-iche*, (H *-isa*), G *Karnies* [-í:s], R *karniz*. Eo *-ic* evidente laŭ AI ortografio. ¶ Io =, Ie *corn/iche*, Ia *-ice*.

El Gr *korônís* "kron(et)o" (la supraj formoj kredeble influitaj de L *corn/ix -icis* "korniko"), der. de *korônê* "krono; korniko" (vd. *krono*).

**KORNIK/O** (1; Jü): L *corn/ix -icis*; F *corneille*, I *cornacchia*, (H *corneja*). Zoologia termino prenita el L. ¶ Io =, Ie *cornille*, Ia *cornic/e, -ula*.

L *cornix* (la FHI formoj el dim. *corn/icula, -acula*) estas par. al Gr *korônê* s. s. (kp sub *kornico*). La sama bazo (kredeble onomatopea) en L *corvus* "korvo" (kp tiun).

**KOROL/O** (4; Ka, Ve): AI *coroll/a*, F *-e*, Po *korona*, (H *corola*); L bot. *corolla*. Eble prenita rekte el L kiel botanika termino. ¶ Io =, Ie *corol*, Ia *-la*.

Propr. "kroneto", dim. de L *corona* "krono" (vd. tiun).

**KORP/O** (f; Un): F *corps*, G *Körper*, I *corpo*, (H *cuerpo*, kp *corporal* "-a"); L *corp/us -oris*. Kp A *corpor(e)al* "-a". Z preferis la pli mallongan modernan formon (FI) antaŭ la L radiko same kiel en *temp/o* = I *tempo*, L *temp/us -oris*. El la L nominativo kreiĝis *korpus/o*. ¶ 1881 *korp-*. ¶ Io =, Ie *córpor*, Ia *corpore*.

Par. al Sa *krp* "formo, figuro". Etimologie identa kun k*orpuso*; aliaj samfamiliaj vortoj en Eo: *korporacio, korsaĵo, korseto*.

**KORPORACI/O** (f; RE): AF *corpor/ation*, I *-azione*, (H *-ación*), G *Korporation*, Po *korpor/acja*, R *-acija*. Ps-sf *-cio*. ¶ 1894 *korporazi-*.

A vorto, formita el L mez. *corporari* "formi korpuson, korp(us)iĝi", der. de L *corp/us -oris* "korpo" (vd. tiun k *korpuso*).

**KORPUS/O** (f; RE): AF *corps*, G *Korps*, I *corpo*, PoR *korpus*, (H *cuerpo*); L *corp/us -oris*. La vorto origine estas identa kun tiu signifanta "korpo" kaj forme koincidas kun ĝi en LFHI. En AGPoR ekzistas formo diferencigita; kredeble PoR sugestis al Z utiligi *korpus-*, kiu egalas al la L nominativo (rimarku *s* ank. en AFG). ¶ Ie *corpo*; IoIa ne diferencigas inter "korpo" kaj "korpuso".

Pri la etimologio, vd. *korpo* (sem. evoluo: > "tutaĵo" > "korpuso"). Kp. ank. *kaporalo*.

**KORSAĴ/O** (2; Jü): AF *corsage* [-aĵ], R *korsaĵ*. Sama bazo en I *corpetto*, (H *corpiño*) s. s. Bazita sur la fontlingva prononco (kio estas neordinara ĉe vortoj kun *-age*). ¶ Io *korsajo*, IeIa *corsage*.

F modtermino, der. de *corps* "korpo" (vd. tiun; kp *korseto*). (La HI vortoj estas derivitaj de la responda vorto por "korpo" pere de aliaj sufiksoj.)

**KORSAR/O** (1; Jü): A *cors/air*, F *-aire*, I *-aro*, (H *-ario*), G *Korsar*, Po *kors/arz*, R *-ar*. GIR konformas al la Ea formo. Ps-sf *-ar(i)*. ¶ Io *korsar(ul)o*, Ie *cors/are*, Ia *-ario**.

El L mez. *cursarius* "pirato", der. de *cursus, cursa* "rabatako", specialigita senco de L *cursus* "kurado" (vd. *kurso* k plue *kuri*). Etimologie identa estas *husaro*.

**KORSET/O** (1; RE): AF *cors/et*, I *-etto*, (H *-ê*), G *Korsett*, Po *gorset*, R *korset*. Ps-sf *-et*. ¶ 1881 *gors-* (< Po, kp Ji *gorsedl*). ¶ Io =, Ia *corset*, Ie *-e*.

F modtermino, der. de *corps* "korpo" (vd. tiun; kp *korsaĵo*).

**KORT/O** (f; Un): A *court* [ko:t], F *cour* [kur], I *corte*; L *co/hors* (var. *chors, cors*) *-hortis*. La senco "kort/eg/o" enestas en AFI (kaj H *corte*). La Ea radiko ŝajnas prenita el I; *kur-* (laŭ F) estis okupita de alia signifo. ¶ 1882 *kos'an-* "kortegan-" – ¶ Io =, IeIa *corte* (ĉiuj ank. "kortego").

L *cohors* orig. "enfermejo", el pref. *co-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*) k la radiko en *hortus* "ĝardeno" (vd. tiun). Kp ev. *ĥoro*. – Proksimuma semantika evoluo: > "korto" > "bieno" > "palaco" > "kortego" (unue en F); kp semantike G *Hof* "kort(eg)o".

**KORUPT/I** (3; Ka; antaŭe *ŝmir/i, sub/aĉet/i*): A *cor/rupt*, F *-rompre* (kp *-ruption* "-o", *-ruptible* "-ebla"), I *-rompere* (kp *-ruttibile* "-ebla"), G *korrumpieren* (kp *Korruption* "-o"), (H *-romper*), Po *korumpowac'* (kp *korupcja* "-o"); L *corrumpere* (sup. rad.: *corrupt-*, el kiu *corrupt/io -ionis* "-o"). Bazita sur la L supina radiko, kiu precipe manifestiĝas en la apartenanta substantivo. Ps-pf *kon-*, var. *ko-*. ¶ Io *koruptar*, Ie *corupter*, Ia *corrumper*.

Orig. "difekti, detrui", el L intensiga pref. *con-* (vd. ps-pf *kon-*) k *rumpere* "frakasi, rompi" (vd. tiun).

**KORV/O** (f; RE): L *corvus*; F *corveau*, I *corvo*, (H *cuervo*). Bazita ĉefe sur L. ¶ Io =, IeIa *corvo*.

Kredeble de onomatopea origino. Kp L *cornix* "korniko" (vd. tiun) k la similajn A *crow* "korniko", Po *kruk* "korvo", Sv *korp* "korvo".

**KORVET/O** (1; Jü): AF *corvett/e*, I *-a*, G *Korvette*, Po *korweta*, R *korveta*, (H *corbeta*). Teorie, konfuzo kun *korv/et/o* estas ebla; kp *korneto*. Ps-sf *-et*.

F vorto, probable der. de Nd mez. *korf* "speco de ŝipo".

**KOSM/O** (8; Jü): AF(H) *cosmos*, I *cosmo*, G *Kosmos*, PoR *kosmos*; L postkl. *cosmos*. Kp ank. la Gr originformon sube. Apokopo de fina *-s* (Gr nominativa finaĵo), kredeble por konformigi la radikon al la jam pli frue oficialigitaj internaciaj kunmetoj (*kosmografi/o* ktp, vd. sube). ¶ Io =, IeIa *cosmo*.

El Gr *kósmos* "kosmo, la ordigita mondo" (kontraste al *kháos*, vd. *ĥaoso*), orig. "ordo, harmonio, deco, ornamo", malgraŭ multaj hipotezoj sen kontentiga etimologio. Samfamiliaj vortoj en Eo: *kosmetiko, kosmo/gonio, -graf(i)o, -polito.* – Vd. ank. sub *mondo.*

**KOSMETIK/O** (2; Jü) 1) arto 2) aĵo: A *cosmet/ics* (1), *-ic* (2), I *-ica* (1), *-ico* (2), F *cosmétique* (1, 2), G *Kosmetik* (1), *-um* (2), Po *kosmet/yk* (2), *-yka* (1), R *kosmetika* (1), (H *cosmétic/a* 1, *-o* 2). Ps-sf *-ik*. ¶ Io *kosmetik/o* (1), *-ajo* (2); IeIa *cosmetic/a* (1), *-o* (2).

El Gr *kosmêtikê (tékhnê)* "beliga, ornama (arto)", adj. de *kosmeín* "ordigi, ornami, beligi", der. de *kósmos* "ordo, ornamo" (vd. *kosmo*).

**KOSMOGONI/O** (2; Be): A *cosmogon/y*, F *-ie*, I *-ia*, (H *-ía*), G *Kosmogonie*, Po *kosmogon/ia*, R *-ija*. Ps-sf *-i* 1.

Propr. "mondonaskiĝo", termino farita el Gr *kósmos* "mondo" (vd. *kosmo*) k *gónos* "nask(iĝ)o", samradika kun *gígnesthai* "fariĝi, naskiĝi" (vd. sub *gento*).

**KOSMOGRAF/O** (7; GD; antaŭe *kosmografi/ist/o*): A *cosmograph/er*, F *-e*, G *Kosmograph*, I *cosmografo*, PoR *kosmograf*, (H *cosmógrafo*); L *cosmographus*. – Nomo de scienco: **KOSMOGRAFI/O** (2; RE): A *cosmo/graphy*, F *-graphie*, I *-grafia*, (H *-grafía*), G *Kosmographie*, Po *kosmograf/ia*, R *-ija*; L *cosmographia*. Ps-sf *-i* 1.

Propr. "mondpriskrib/anto" resp. "-ado", terminoj faritaj el Gr *kósmos* "mondo" (vd. *kosmo*) k *gráphein* "(pri)skribi" (vd. *telegrafo*; kp spec. *geografio*).

**KOSMOPOLIT/O** (2; Be): AF *cosmopol/ite*, I(H) *-ita*, G *Kosmopolit*, Po *kosmopol/ita*, R *-it*. Ps-sf *-it* 2.

El Gr *kosmopolítês* s. s. , propr. "mondcivitano", kunm. de *kósmos* "mondo" (vd. *kosmo*) k *polítês* "civitano", der. de *pólis* "civito, urbo" (vd. *polico*).

**KOST/I** (f; Un): A *cost*, I *-are*, (H *-ar*), F *coûter*, G *kosten*, Po *kosztowac'*; L *constare*. Bazita sur AG. Ps-sf *kon-*, var. *ko-*. ¶ Io *kostar*, IeIa *costar*.

Propr. "stari" (el la frazo 'la varo staras je tiu prezo' evoluis la senco 'la varo kostas tiom'), el L intensiga pref. *con-* (vd. ps-pf *kon-*) k *stare* "stari" (vd. tiun).

**KOSTARIK/O** (8; ĉ. 1905, vd. EdE s. t. v.): AFI(H) *Costa Rica*, G *Kostarika*, Po *Costarica*, R *Kosta-Rika*. ¶ Io *Kostarika*, Ie *Costa-Rica*, Ia *Costa Rica*.

La nomo (donita de Kolumbo) signifas "(la) riĉa marbordo": H *costa* "marbordo" (el L *costa* "ripo; flanko", vd. *kotleto*; la senco ['marflanko >] 'marbordo' estiĝis en la romanaj lingvoj), *rico* "riĉa" (vd. tiun).

**KOSTUM/O** (f; RE): AFI *costume*, G *Kostüm*, Po *kostium*, R *kostjum*. ¶ Io =, Ie *costum*, Ia *-e*.

I vorto, identa kun *costume* "kutimo, moro" (do orig. pri kostumo adaptita al la modo de certa epoko, ekz. maskerada, teatra kostumo ktp). Vd. plue *kutimo.*

**KOT/O** (f; RE): G *Kot*. ¶ IoIeIa *fango* (< F *fang/e*, I *-o*).

Ĝermana vorto (kp Nd *kwaad* "malbona") de HE rad. **gŭu(dh)-* "koto, fekaĵo", kp Sa *gûtha-* "fekoj", R *govno* "feko, koto", *gadit'* "malpurigi, makuli".

**KOTIZ/I** (1; Be): F *cotiser* [-z-], I *quotizzarsi* (refl.), (H *cotizar*). Bazita sur F. Ps-sf *-iz*. ¶ Ie *cotisar*, Ia *quotisar se* (refl.); mankas en Io (kp *kontributo, quoto* "kotizo").

Der. de F *cote* "kvoto" resp. I *quota* "kotizo", el L mez. *quota (pars)* "kontribuenda parto" (kp F *quote-part* "kvoto") el L *quotus* "kioma" (vd. *kvociento*).

**KOTLET/O** (1; Jü): A *cutlet*, F *côtelette* [kotlét], G *Kotelett*, I *co(s)toletta*, Po *kotlet*, R *kotleta*, (H *chuleta, costilla*). Eo imitas,

same kiel PoR, la F prononcon. Ps-sf *-et.* ¶ Io =, Ie *cotlette*, Ia *cotelette.*

F kulinara termino, propr. "ripaĵo", der. de *côte* (I *costa*) "ripo", el L *costa* "ripo; flanko" (kp *Kostariko*), identa al R *kost'* "osto".

**KOTON/O** (f; RE): A *cotton*, F *coton*, I *-e*, (H *algodón*). ¶ Io =, IeIa *coton.*

El Ar *qut'un* s. s. (la citita H vorto enhavas la araban artikolon); el tiu semida vorto ank. Gr *khitôn* "tuniko" k ev. G *Kittel* "kitelo" (kp tiun). Etimologie identa estas *katuno.*

**KOTURN/O** (f; RE): L *coturn/ix -icis*; I *cotornice*†, (H *codorniz*). Zoologia termino prenita el L. Apokopo de *-ix* same kiel en *cikatr/o, tetr/o* (kp Wüster Esp. princ. 58). ¶ Io *qualio* (< A *quail*, F *caille*, I *quaglia*); Ie *cotórnice*; Ia *coturnice*, qualia*.*

Pli frua formo *cocturnix*; la bazo estas de onomatopea origino (same kiel la respondaj G *Wachtel*, F *caille* ktp).

**KOV/I** (f; EG): F *couver* [kuvé], I *covare.* Kp A *covey* "-itaro". Eo *-o-* estas aŭ simpligita el F *-ou-* (kp *kovri, trovi*) aŭ prenita el I; ĉiuokaze la o-vokalo helpis eviti kolizion kun *kuv/o.* ¶ Io *kovar*, IeIa *covar.*

El L *cubare* "kuŝi" de HE rad. **kub-* (vd. *kubuto*).

**KOVERT/O** (f; RE): G *Kuvert*, Po *koperta*, R *konvert.* La radikformo aperas kompromisa: *-o-* laŭ PoR, *-v-* laŭ GR. La vokalo *o* estas eble elektita por asociigi la vorton al *kovr/i.* ¶ 1894 *envelop-* (< A *envelope*). ¶ Io *kuverto*, Ie *coverte*; Ia *inveloppe.*

El F *couvert*† s. s., propr. "kovrita (letero)", ptc. perf. de *couvrir* "kovri" (vd. tiun).

**KOVR/I** (f; Un): A *cover*, F *couvrir* [ku-], I *coprire*, (H *cubrir* [-v-]); L *cooperire.* Verŝajne bazita sur F; la procedo F *ou* [u] > Eo *o* estas neordinara, sed troviĝas ankaŭ en *kovi, trovi* (kp tiujn). ¶ 1882 *kopr-*. ¶ Vp *kövön* (vd. Golden en Li kaj Ni, 408), Io *kovrar* (espismo?), Ie *covrir*, Ia *coperir.*

L *cooperire* el intensiga pref. *co(n)-* (vd. ps-pf *kon-*) k *operire* "kovri, fermi", probable el **ob-verire* (kp. *aperire* "malfermi", vd. *aperturo*), el *ob* "kontraŭ" (vd. *objekto*) k verbo de HE rad. **ŭer-* "fermi", ekz. en Sa *apavrnóti* "malfermas", R *vorota* "pordego".

**KOZAK/O** (1; RE): A *cossack* [-ak], F *cosaque* [kozák], G *Kosak*, I *cosacco* [-z-], Po *kozak*, R *kazak*, (H *cosaco*). Eo *-z-* respegulas la prononcon en la plimulto de fontlingvoj. ¶ Io =, IeIa *cosaco.*

R vorto, el Tu *kazak*† "vagabondo, nomado" de radiko *kaz-* "vagi".

**KRAB/O** (1; Jü): A *crab*, F *-e*, G *Krabbe*, PoR *krab.* ¶ Io =, Ie *crabe*, Ia *crabba.*

Ĝermana vorto, par. al G *Krebse* "kankro" k *krabbeln* "sin movi kiel krabo, rampeti gratante" (> eo *krabl/i* PVS), kp A *crawl* "rampi": formaĵo paralela al pĜ **krattôn* "grati" (vd. tiun) kaj prapar. al Gr *gráphein* "ĉizi" (vd. *telegrafo*).

**KRABR/O** (2; Jü): L *crabr/o -onis*; F *crabron*, (H *-ón*), I *calabrone.* Zoologia termino prenita el L; la finvokalo de la L nominativo funkcias kiel Ea substantivsigno (vd. *homo*). ¶ Io *horniso* (< G *Hornisse*); Ie *calabron*, Ia *crabro*.*

Par. al R *ŝeršen*, Po *szerszeń* s. s., Li *ŝirŝuo* "vespo", kredeble de HE bazo **ker-* "korno" (pro la genuhavaj antenoj, kp G *Horn* "korno", *Hornisse* "krabro").

**KRAĈ/I** (f; Un): F *cracher.* Bazita ekskluzive sur F (la ceteraj fontindikoj en Bastien, ekz. I *scaracchiare*, H *gargajear*, estas tro malsimilaj por esti konsideritaj). F *ch* > Eo *ĉ*, vd. *aĉeti* kaj Cherpillod 1990, 16. Supozeble Z rigardis tiun ĉi vorton pli elvokiva ol la latindevena alternativo, preferata en la aliaj planlingvoj: IoIe *sputar*, Ia *spuer, sputar* (< L *spuere*, I *sputare*, A *spit*). ¶ 1894 *krac-.*

Vorto de onomatopea origino (eble el L vulg. **craccare*, kp *kraki*).

**KRAD/O** (f; RE): A *grate*, I *grata*, Po *krata*, (H *grada*). Kp Ji *krate.* La estiĝon de tiu ĉi radiko klarigas Waringhien (LV 77) jene: "la I *grata* (al kiu verŝajne por

Zamenhof aldoniĝis la skriba formo de A *grate*) povis nek resti **grato* (pro la verbo *grati*) nek fariĝi *grado* (pro la homonimo *grado*): li tial senvoĉigis la unuan konsonanton (Kp L *crates* "hurdo") kaj voĉigis la duan, el kio rezultis nia *krado.* " Estas kredeble, ke almenaŭ la unua el tiuj sonŝanĝoj ne okazis arbitre sed estis rekte inspirita de Po kaj Ji. Pri sonŝanĝo *t* > *d*, vd. *aldo.* ¶ 1894 *krat-.* ¶ Io *greto* (laŭ A prononco), Ie *grate*, Ia *grillia* (< F *grille*).

El L *crates* "hurdo, plektaĵo" (de dim. *craticula* devenas F *grille*), de HE rad. **kert-* "plekti", kp Sa *krnátti* "ŝpinas", Gr *kyrtía* "plektaĵo", L *cartilago* "kartilago" (kp tiun), G *Hürde*/A *hurdle* "hurdo" (> eo *hurd/o* Wü).

**KRAJON/O** (f; Un): F *crayon.* Kp A *crayon* "paŝtelo". Bazita sur F skribo. F *ay* > Eo *aj* ŝajnas unika (vd. Szerdahelyi 1987, 121; Cherpillod 1990, 15); oni povas kompari *oy* > *oj* en *boji, fojo, vojaĝo.* Ps-sf *-on.* ¶ Io *krayono*, Ie *crayon*, Ia *stilo (de graphite)* (vd. sub *stilo*).

Dim. de F *craie* "kreto" (vd. tiun).

**KRAK/I** (f; RE): A *crack* [kräk], F *craquer* [kraké], G *krachen* [-ĥ-]. Kp Nd *kraken.* Bazita ĉefe sur F. ¶ Io *krakar*, Ie *cracar*, Ia *craccar.*

Onomatopea vorto (kp F *crac* "krak!"), almenaŭ parte el L vulg. **craccare* (kp *kraĉi*). Ank. la sekva apartenas ĉi tie.

**KRAKEN/O** (f; EG): A *cracknel*, F *craquelin* [krake'lê]. Kp Nd *krakeling.* Radiko montranta arbitran formŝanĝon ne ekzakte klarigeblan. Eo *-en* verŝajne baziĝas sur F *-in* (kun literŝanĝo *i* > *e* apogata de la F prononco, vd. sub *abomeni*), kaj *krak-* estas elemento komuna al AF; la *l* forfalis, eble pro malsama pozicio en A kaj F? ¶ 1894 *krakelin-.* ¶ Io *kraknelo*, Ie *cracnel*; mankas en Ia.

A < F < Nd *krakeling* "krakeno, kringo", der. de *kraken* "kraki" (vd. tiun), do propr. "krakant(a biskvit)o".

**KRAMP/O** (f; RE) 1) tekn. 2) tip.: A *cramp*, F *crampon*, G *Krampe(n)*, I *grappa*, (H *grapa*) (ĉiuj 1; la ideon aldoni la sencon 2 'parentezo' eble inspiris G *Klammer* aŭ F *crochet*, kiuj havas ambaŭ sencojn). Wiener 1950, 102, pritraktas *kramp/o* kaj la preskaŭhomonimon eo *kram(p)f/o* PV (med.) < A *cramp*, F *crampe*, G *Krampf.* ¶ Io *krampono* (tekn., tip.), *krampo* (med.); Ie *crampon* (tekn.), *crampe* (med.); Ia *crampa* (tekn.), *crampo* (med.).

La terminoj teknika kaj medicina estas etimologie samaj ("la kuntiriga efiko estas la komuna elemento", Wiener), orig. signifantaj "(io) kurbigita" (kp G *krumm* "kurba"): el pĜ **krimpan* "kurbiĝi" de HE **gre(m)b-* "kurbigi", kp Gr *grypós* "kurba", R *gorb* "ĝibo", orig. plivastigo de rad. **ger-* "kurbigi, tordi" (kp sub *kringo, kripla, kroĉi*).

**KRAN/O** (f; RE): G reg. *Kran*, PoR *kran.* Kp Ji *krant, kram*, ank. Sv *kran.* La GPoR vortoj signifas 1) krano, 2) gruo, argano (la dua signifo estas pli frua, vd. sube). La diferencigo en Eo do estas sen apogo en la koncernaj fontlingvoj. – Unu el la ĝerman-slavaj vortoj en Eo ĉe Collinson 1959, 7. ¶ Io *robineto* (< F *robinet*), Ie *clave* (propr. "ŝlosilo", Ia *valvula* (propr. "valvo").

G vorto, orig. identa kun *Kranich* "gruo" (oni komparis la fleksitan tubon de la aparato kun la kolo de la gruo; vd. plue pri la semantika evoluo k la etimologio sub *gruo*).

**KRANI/O** (f; RE): A *cran/ium*, I *-io*, F *crâne*, (H *cráneo*); L med. *cranium.* ¶ Io =, Ie *crani/e*, Ia *-o.*

El Gr *kraníon* s. s. , der. de *kára* "kapo" el HE bazo **ker-* "kapo" (vd. *cerbo*).

**KRATAG/O** (f; EG): L bot. *Crataegus.* Botanika termino prenita el L. Laŭ L *-ae-* oni atendus Eo *-e-* (kp Io); Z adoptis *a* (la alia litero de la L diftongo), sendube por eviti sufikssimilan radikfinon. ¶ Io *kratego*; Ie *blancospine*, Ia *spino blanc* ('blanka dorno', laŭ F *épine blanche*).

El Gr *krátaigos* s. s. , probable el *kratys* "malmola" (vd. sub *demokratio*) k *aig(ílôps)* "speco de kverko", par. al A *oak*, G *Eiche* "kverko".

**KRATER/O** (f; RE): A *crater*, I *-e*, F *cratère*, G *Krater*, PoR *krater*, (H *cráter*); L *crat/er -eris* (ank. "speco de vazo" [PIV 1]).

El Gr *krat/êr -êros* (PIV 1; la geografia signifo estiĝis en L, pro la simileco de la vazo kratero k la funelo de vulkano), propr. "miksujo" (> 'vazo por miksado de vino k akvo'), der. de *kerannynai* "miksi" de HE rad. **k(e)ra-* "miksi", kp Sa *crînâti* "miksas", G *rühren* "kirli, movi".

**KRAVAT/O** (f; Un): A *cravat*, F *-e*, I *-ta*, G *Krawatte*, Po *krawat*, (H *corbata*). Io =, Ie *crav/atte*, Ia *-ata*.

F vorto, orig. identa kun la popolnomo *croate* "kroato" (kravatoj, en formo de ĉirkaŭkolaj tolbendoj, estis unue portataj de kroataj kavaliroj) el SK *hrvat* "kroato".

**KRE/I** (f; Un): A *cre/ate*, I *-are*, (H *-ar*), F *créer*; L *creare*. Kp G *Kreatur* "kreitaĵo". ¶ Io *krear*, IeIa *crear*.

Orig. probable "kreskigi", de la radiko en L *crescere* "kreski" (vd. tiun). Kp spec. *kreolo*.

**KRED/I** (f; Un): L *credere*; F *croire* (kp *crédule* "-ema"), I *credere*, (H *creer*, kp *crédulo* "-ema"). Kp A *credible* "-ebla". Kiel katolika termino, L *credo* "mi kredas" estas internacie konata en la senco "kredkonfeso" (A *creed*, F *crédo*, G *Kredo*, HI *credo*). ¶ Io *kredar*, IeIa *creder*.

Orig. "fidi je", el la HE bazo **kred-dhê* "fidi", kp Sa *crad-dhá* "fido", Ir *cretim* "(mi) kredas" (unua elemento *dhê-* "meti" [vd. sub *fari*]; la dua elemento povas esti identa kun **kerd-* "koro"; orig. signifo do estus "meti [ion] je sia koro"). Samfamiliaj vortoj en Eo: *kredit/o*, *-oro*.

**KREDIT/O** (1; letero 88-07, RE): A *credit*, I *-o*, F *crédit*, G *Kredit*, Po *kredyt*, R *kredit*, (H *crédito*).

I komerca termino, el L *creditum* "pruntaĵo", propr. "(io) konfidita (al iu)", ptc. perf. de *credere* "(kon)fidi" (vd. *kredi*). Kp spec. sekv.

**KREDITOR/O** (4; Be): A *credit/or*, I *-ore*, G *Kreditor*, R *kreditor*, (H *acreedor*). Ps-pf *-or* 1.

I vorto, propr. "persono kiu konfidis (pruntedonis) monon (al iu)", kp I *credito* sub *kredito*.

**KREM/O** (f; RE): A *cream*, F *crème* [krem], I(H) *crema*. Kp G *Creme*, *Krem*, PoR *krem* "-aĵo". ¶ Io =, Ie *crem*, Ia *-a*.

F *crème* (ank. "-aĵo, ŝmiraĵo") probable el (L tardepoka *crama* s. s. , de gaŭla origino, krucigita kun) L *chrisma* "ŝmiraĵo" (> F *chrême* "sankta oleo") el Gr *khrísma* s. s. , subst. de *khríein* "ŝmiri" (vd. *Kristo*).

**KREN/O** (f; RE): G reg. *Kren*, I *cren*, Po *chrzan* [ĥr-], R *ĥren*. Kp Ji *khreyn*. Bazita sur G; la kombino *ĥr-* estis evitata de Z vortkomence. ¶ Io *armoraci/o*, Ie *-a* (< L bot. *Armoracia*); Ia *cren**.

Slava vorto (kp Če *kr'en*, Bg ant. *chrenu*), kredeble samorigina kun Gr *keráis* s. s.

**KREOL/O** (2; RE): A *creol/e*, I *-o*, F *créole*, G *Kreole*, PoR *kreol*, (H *criollo*).

El P *crioulo*, orig. "servanto estanta en la domo jam de sia infanaĝo", propr. "ennaskita", der. de P *criar* "naski, krei" (vd. *krei*).

**KREOZOT/O** (2; Be): A *creosot/e*, I *-o*, (H *-a*), F *créosote* [-z-], G *Kreosot*, PoR *kreozot*. Intervokala Ea *-z-*, apogata de FPoR prononco. ¶ Io =, Ie *creosot*, Ia *-o*.

Farita (en G, 1832, de Reichenbach) el Gr *kréas* "karno" (vd. *kruda*) k *sôtêr* "savanto" (anagntnomo de *sôzein* "savi" de *sôs*, *sáos* "sana, nedifektita"); la intencita signifo estas "karnokonserva" pro la antisepsaj ecoj de la substanco.

**KREP/O** (f; RE): A *crepe*, *crape* [krejp], F *crêpe*, G *Krepp*, I *crespo*, R *krep*, Po *-a*, (H *crespón*). ¶ Io =, Ie *crepon*, Ia *crepe*.

F vorto, subst.-igo de F ant. *crespe* "krispa" (propr. do "krispaĵo") el L *crispus* s. s. (vd. *krispa*).

**KREPUSK/O** (f; RE): F *crépuscule*, I *crep/uscolo*, (H *-úsculo*); L *crepusculum*. Kp A *crepuscular* "-a". La L sufikso *-cul-*

estas reduktita je *-k-* en la Ea formo (por analogaĵoj, vd. sub *artikolo*), sendube por eviti tro longan radikformon kaj sufikssimilan radikfinon. ¶ 1894 *krepuskl-*. ¶ Io *krepuskulo*, Ie *crepuscul*, Ia *-o*.

Der. de L *creper* "malhela" kun nekonata etimologio.

**KRES/O** (2; Jü): A *cress*, F *-on*, G *Kresse*, I *crescione*, R *kress*; L mez. *cress/o -onis*. Eo *-s* pro fontlingva *-ss-*. ¶ Io =, IeIa *cresson*.

El pĜ **krasjo-* kun necerta etimologio.

**KRESK/I** (f; Un; en Un R sin. *vaks-*): L *crescere* [krésk-]; F *croître* (kp *croissance* "-o"), I *crescere* [kréŝ-], (H *crecer* [kreth-]). Kp P *crescer*; ank. A *in/crease* "kreski, pliiĝi". Z evidente hezitis inter la latin(id)a kaj la ĝermana radikoj (G *wachsen* [vaks-], kp Da *vokse*) sed fine preferis la unuan en pure L formo, sendube pli internacian (oni povas kompari ank. la I muzikan terminon *crescendo* (> eo *kresĉendo* PV), propr. "kreskante"). ¶ 1882 *kresk-*. ¶ Io *kreskar*, IeIa *crescer*.

Samradika kun L *creare* "krei" (kp tiun), formita per komenca sufikso *-sc-* (kp *naski*) surbaze de HE rad. **k(e)re-* "kresk(ig)i", kp Gr *korennynai* "satigi", L *Ceres* (diino de la kreskado). Kp spec. *konkreta*.

**KREST/O** (1; Jü): A *crest*, I(H) *-a*, F *crête*; L *crista*. La elekto inter *e* kaj *i* estis facila: *krist-* devis esti rezervita por alia signifo. ¶ Io =, Ie *creste*, Ia *crista*.

Samradika kun L *crinis* "hararo", kredeble par. al G *Reis* "branĉet(ar)o".

**KRESTOMATI/O** (2; Jü; pri ev. fundamenteco de tiu ĉi radiko vd. Ciliga en ScR XII, 41): A *chrestoma/thy* [kr-], F *-thie* [kr-], Po *-tia* [ĥr-], G *Chrestomathie* [kr-], I *crestoma/zia*, (H *-tía*), R *ĥrestomatija* (en pluraj el la fontlingvoj apenaŭ uzata nuntempe). Kiel ordinare, Z evitis vortkomencan *ĥr-* malgraŭ RPo prononco kaj AFG ortografio (kp sub *ĥaoso*). (Ps-sf *-i* 1.) ¶ Io =, Ie *crestomatíe*, Ia *chrestomathia*.

El Gr *khrêstomátheia* s. s. , propr. "utila instruaĵo", el *khrêstós* "utila" (der. de *khrêsthai* "uzi" de *khrê* "bezono") k la radiko de *manthánein* "lerni" (vd. *matematiko*).

**KRET/O** (f; Un): L *creta*; F *craie*, G *Kreide*, I(H) *creta*, Po *kreda*. Kp A *cretaceous* "-eca". ¶ Io =, Ie *cret/e*, Ia *-a*.

Necerta etimologio. Samfamilia vorto en Eo: *krajono*.

**KREV/I** (f; RE): F *crever*, G *krepieren*, I *crepare*. Kp Sv *krevera*; ank. H *quebrar* "romp(iĝ)i". Bazita sur F. ¶ Io *krevar*, IeIa *crepar*.

El L *crepare*, orig. "kraki", poste "krevi kun krako". Onomatopea vorto (kp Sa *krpate* "ĝemas").

**KRI/I** (f; Un): A *cry*, F *crier*, I *gridare*, (H *gritar*). Bazita sur F. ¶ 1882 *kri-*. ¶ Io *kriar*, Ie *criar*, Ia *critar*.

El L *quiritare* "voki por helpo", propr. "voki la civitanojn" el L *Quirites* "plenrajtaj civitanoj", tradicie asociita kun la sabina urbo *Cures*, kies loĝantoj transloĝiĝinte Romon fariĝis parto de ĝia civitanaro.

**KRIBR/I** (f; RE): L *cribrare*; F *cribler*, I *crivellare*, (H *cribar*). Bazita sur L. ¶ Io *kribl-agar*, Ie *cribellar*, Ia *cribrar*.

Der. de L *cribrum* "-ilo", il-derivaĵo de *cernere* (sup. rad.: *cret-*, kp *dekreto, diskreta, sekreta*) "kribri, disigi, distingi (per la vido), prijuĝi" (kp *koncerni*), de HE rad. **kri-* "kribri, disigi", kp Gr *krínein* "disigi; prijuĝi" (vd. *krizo* kun pluraj parencoj); L *certus* "certa", propr. "distingita" (vd. *certa*), *excrementum* "feko, ekskremento (kp tiun); Li *krôjas* "kribrilo"; G *rein* "pura", orig. "kribrita".

**KRIM/O** (f; RE): AF *crime*, I *crimine*, (H *crimen*); L *cri/men -minis*. mallonga formo laŭ AF. La radiko estas konata internacie per la apartenanta adjektivo (vd. sekv.). ¶ Io *krimino*, IeIa *crimine*. – Adj.:

**KRIMINAL/A** (f; RE): A(H) *crimin/al*, F *-el*, I *-ale*, G *krimin/al*, R *-al'nyj*, Po *kryminalny*; L postkl. *criminalis*. Ps-sf *-al*.

L *criminalis* adj. de *crimen* "krimo; akuzo, kulp(ig)o" kun necerta etimologio.

**KRING/O** (f; RE): G *Kringel*, R *krendel'*. Kp Sv *kringla*. Bazita sur G; apokopo de

(senakcenta) *-el* kiel en *ŝind/o* (kp sub *cirkelo*). ¶ Mankas en la aliaj planlingvoj.

Orig. "ringeto, rondeto", dim. de G mez. *Kring* "ringo, rondo", kp Sv *(om)kring* "ĉirkaŭ", el pĜ bazo **kreng-*, paralela al la ĝerm. radiko citita sub *krampo*. Kp sekv.

**KRIPL/A** (f; RE): A *crippled* (kp *cripple* "-ulo"), G *krüppelig, verkrüppelt* (kp *Krüppel* "-ulo"). Kp Sv *krympling* "-ulo". Verŝajne la A (kaj G) subst. estis la deirpunkto de Z (tute speciale A, ĉar G *ü* > Eo *i* estas tre neordinara, vd. Cherpillod 1990, 23; kp tamen *kisi*!). Adjektiva radiko eble pro influo de *blind-* kaj *lam-*, kun kiuj *kripl-* formas vortfamilion (Collinson 1959, 8). Laŭ Collinson, *kripl-* estas akceptita 'pro manko de komuna romana formo', aserto de duba vereco (F *estropié*, H *estropeado*, I *storpiato*); maksimume oni povas diri, ke la ĝermana radiko estas pli facile asimilebla kaj donas pli oportunan formon. ¶ 1894 *stropiat-*. ¶ Io = (espismo); Ie *mutilat*, Ia *-e* (< F *mutil/é*, I *-ato*).

Orig. "kurba", sennazala formo de la radiko en pĜ **krimpan* "kurbiĝi" (vd. *krampo*).

**KRIPT/O** (2; Jü): A *crypt*, F *-e*, G *Krypta*, I *critta*, Po *krypta*, (H *cripta*); L *crypta*. Eo *i* normale el fontlingva *y*. ¶ Io =, Ie *cripte*, Ia *crypta*.

El Gr *kryptê* s. s. , propr. "kaŝita" (ĉambro)", adj. de *kryptein* "kaŝi", radike identa kun R *kryt'* "tegi". Etimologie identa estas *groto*, samfamilia ank. *apokrifa*. – Vorthistorio (kun pliaj ekzemploj de praparencaj vortoj) ĉe Carlevaro, PL 15/1985, 13.

**KRISP/O** (f; RE) 1) kolumo 2) anat.: G *Krause* (1), *Gekröse* (2), Po *kreza* (1), *krezki* (plur.) (2). Adjektivo: A *crisp*, F *crêpé, crépu*, I *increspato, crespo*, (H *crespo*); L *crispus* "krispa". Estas evidente, ke Z utiligis la sufiĉe internacian adjektivon por formi la radikon, al kiu li donis du substantivajn sencojn laŭ la cititaj G kaj Po vortoj (kaj la kolumo kaj la peritonea faldo ricevis sian nomon pro krispeco, kp G *kraus* "krispa"); ankaŭ F *fraise* (1, 2) probable kuninfluis. La *i*-vokalo povas veni rekte de L aŭ esti intencita kiel klara diferencigo de la etimologie identa *krep/o*. – La anatomia senco (2) estas fake esprimata per eo *mezenter/o* Ve, Briquet, GD, (PIV) (< L med. *mesenterium*). ¶ Subst.: Io *plisita kolumo* (1), *mezentero* (2); Ie *colarette* (1) (< A *-ll-*); Ia *collaretto espaniol* ('hispana kolumo') (1), *mesenterio* (2). Adj.: Io *krispa*, Ie *crisp*, Ia *-e*.

L *crispus* estas samradika kun *crista* "kresto", *crinis* "hararo". Kp *kresto* k la etimologie identan *krepo*. – G *kraus* estas par. al A *curl* "buklo"; *Gekröse* estas kolektiva formaĵo de la sama radiko. Po *kreza* el G.

**KRIST/O** (f; Du, RE): AF *Christ* [k-], G *-us* [k-], I(H) *Cristo* [k-], Po *Chrystos* [ĥ-], R *Hristos*; L *Christus* [k-]. Komenca [k-] estas evidenta elekto laŭ la plimulto de la fontlingvoj kaj la klasika prononco de la Gr originformo (vd. sube). ¶ Io =, Ie *Cristo*, Ia *Christo*.

El Gr *Khristós* [antikve kr-, poste ĥr-] s. s., propr. "la Ŝmirito, la Sanktoleito", adj. de *khríein* "ŝmiri", par. al A *grime* "fulgoŝmiri, malpurigi" (HE rad. **ghrei-*). La Gr vorto estas traduko de la responda aramea termino, vd. *Mesio*. – Samfamilia vorto en Eo: *kremo*. – Pri *Kristo* k *krist-ano* vd. Carlevaro, "Slipoj", PL 6/1983, p. 5.

**KRISTAL/O** (f; RE): A *crystal*, F(H) *cristal*, I *-lo*, G *Kristall*, Po *krysztal'*, R *kristall*; L *crystall/us, -um*.

El Gr *krystallos* s. s. , orig. "glacio" (kp *kryos* "frosto") de HE rad. **krus-* "malmola, koagulita" (vd. *krusto*).

**KRITERI/O** (2; Jü): A *criter/ion*, I(H) *-io*, F *critère, critérium*, G *Kriterium*, Po *kryterium*, R *kriterij*. Gr *-ion* (vd. sube) normale reprezentiĝas per *-i/o* en Eo, vd. *idilio*.

(Pere de L tardepoka *criterium* "juĝo") el Gr *kritêrion* "kriterio, juĝilo; juĝejo", der. de *krínein* "juĝi" (vd. *krizo*).

**KRITIK/I** (f; Du, RE): A *crit/icize* (kp *-ical* "-a"), F *-iquer* [-iké], I *-icare*, (H

*-icar*), G *kritisieren* (kp *Kritik* "-o"), Po *krytykowac'*, R *kritikovat'*. Prezentita kiel verbo, sed la respondaj substantivo kaj adjektivo havas same grandan internaciecon; ĉiuj donus en Eo *kritik-*. Ps-sf *-ik.*

Verbo der. de subst. (vd. G supre, kp F *crit/ique*, I *-ica*, R *kritika*), el Gr *kritikê (tékhnê)* "(la) prijuĝa (arto)" de *kritikós* "kapabla prijuĝi", adj. de *krínein* "(pri)juĝi" (vd. sekv.).

**KRIZ/O** (f; EG): A(H) *cris/is*, F *-e* [-z-], I *-i* [-z-], G *Krise*, Po *kryzys*, R *krizis*. Ps-sf *-z.* ¶ 1894 *kris-*.

El Gr *krísis* "decido, juĝo" (laŭ PIV, *krizo* estas 'la dediciga momento en iu afero'), subst. de *krínein* (mediala formo *krínesthai*) "decidi, (pri)juĝi", orig. "distingi, disigi, apartigi", identa kun L *cernere* "kribri, distingi, prijuĝi" (vd. *kribri*). Samfamiliaj vortoj en Eo: *hipokrita, kriterio, kritiki.*

**KRIZANTEM/O** (2; Jü): A *chrys/anthemum*, F *-anthème*, G *Chrysantheme*, I(H) *crisantemo*, Po *chryzantema*, R *ĥrizantema*; L *chrysanthemum*. Eo *kr-* laŭ AFGIL, *-z-* laŭ FIPoR.

El Gr *khrysánthemon* "orfloro" (nomo de pluraj florspecioj), kunm. de *khrysós* "oro" (de semida orig. , kp He *ĥârûc* "oro") k *ánthemon* "floro", var. de *ánthos* s. s. (vd. *antologio*).

**KROĈ/I** (f; RE): F *accrocher*. Kp A *crook*, F *croc*, R *krjučok* "-ilo", ank. Sv *krok* s. s. Probable Z prenis la bazon de la F paro *accrocher* "(al)kroĉi": *décrocher* "malkroĉi" por formi tiun ĉi radikon (F *ch* > Eo *ĉ*, vd. *aĉeti*); kp similan procedon ĉe *prunt/i.* ¶ 1894 *kroc-*. ¶ Io *akrochar*, Ie *acrocar* (*croc* "-ilo"), Ia *accrocar** (*croc* "-ilo").

F *ac-, dé/crocher* der. de *croc* "hoko, kroĉilo", el Fk **krok* (kp ASv supre), el pĜ **kroka-* "(io) kurbigita", apofonia kaj sennazala formo de la radiko citita sub *kringo.*

**KROKODIL/O** (f; RE): AF *crocodile*, G *Krokodil*, I *coccodrillo*, Po *kroko/dyl*, R *-dil*, (H *cocodrilo*); L *crocodilus*. – La verbo *krokodil/i* signifas "paroli nacilingve en esperantista medio" (PIV). La ekeston de tiu figura uzo tre detale pritraktis Golden en Fonto 39/1983, p. 21-31. Ĝin iniciatis iu Ferrari, italdevena ĝisosta esperantisto kaj ĉiama propagandisto loĝanta en Parizo, kiu proksimume dum la jaroj 1931-33 laboris kiel kelnero en kafejo Talma, kie junaj esperantistoj kutimis kunveni (persona komunikaĵo de R. Bernard al Golden; kp Jossinet en HdE 5/1983, 4). Tiuj vortaroj, kiuj registras la esprimon (krom PIV: Wells 1969, Middelkoop 1971, Bokarev 1974, GD 1976 [suplemento], Nordenstorm 1982) prezentas ĝin verbe, kvankam ŝajnas, ke Ferrari uzis la substantivon: "Kiuj estas tiuj krokodiloj?"; same rakontas Waringhien (ĉe Gregor en BEsp 738/1967, 207) ke la junaj parizaj esperantistoj parolis pri 'maljunaj krokodiloj' france parolantaj. Evidente temas pri pejorativo, sed tute konvinka klarigo de la vortelekto mankas. Laŭ Golden (l. c. 29) *krokodilo* estas analogaĵo al F *reptile* "reptilio", kiu povas signifi "malnoble humilega persono" (tamen temas ne nur pri insulto; la vorto devus iel aludi la paroladon). Oni ankaŭ alportis la internacian esprimon "krokodilaj (=hipokritaj) larmoj", ĉar "la nekapablaj E-istoj... hipokrite plendas pri tempomanko ktp, kiu malhelpas ilin lerni la lingvon" (Albault, MK 8/1964, 242) – tro serĉita klarigo, ĉar tiuj larmoj ja nur tre nerekte koncernus la parolsituacion. Middlemast (BEsp 740/1968, 254) citis paroladon dum la Berna kongreso, en kiu iu (Ferrari mem?) diris ke krokodiloj havas grandajn buŝojn, kiujn ili malbone uzas. El la proponitaj klarigoj tiu ĉi eble estas la plej bona: la makzeloj moviĝas, tamen elvenas ne la atendata Esperanto sed nur nekomprenebla nacilingvaj vortoj. . .

El Gr *krokódilos* "lacerto; krokodilo", kunm. de *krókê* "(rul)ŝtoneto(j)" k *drílos* "vermo" (okazis forfalo de *r* pro malasimilado); la nomo aludas la kutimon de la la-

HI formoj okazis metatezo de *r*.

**KROM** (f; RE): R *krome*. Kp Ĉe *kromé*. Apokopo de *-e* por ebligi formadon de Ea adverbo *krom/e*. (Inter la Eaj prepozicioj, ankaŭ *po* havas slavan originon.) ¶ Kp 1881 *hor* "krom se" (< F *hormis que*: PVZ 5, 136). – 1894 *hors* (kp F *hors* "ekster"). ¶ Io *ultre*, IeIa *ultra* (< L *ultra*, kiu tamen signifas "trans"; kp F *outre*, I *oltre a* "krom").

Orig. "ekster", lok. sing. de R *kroma*† (R mod. *kromka*) "rando, bordero".

**KRON/O** (f; Un teksto "El Heine'", kp *koron-* Un RPoFG vortaro) 1) kunplektaĵo 2) kapornamaĵo: A *crown* (1,2), F *couronne* [kurón] (1,2), G *Krone* (2), I(H) *corona* (1,2), PoR *korona* (2); L *corona* (1,2). Z evidente hezitis inter la mallonga formo de G(A) kaj la longa de LFIPoR; pri la du apudaj formoj en Un, vd. PVZ 4, 173. Kp 1881 *kron-*; 1894 *koron-*. La formo *koron/o* revenis kiel astronomia termino (PIV). ¶ Io =, Ie *coron*, Ia *-a* (ĉiuj 1,2).

El Gr *korôn/ê* "speco de krono", kp der. *-ís* "krono". Gr *korônê* signifis orig. "korniko" kaj poste estis uzata pri diversaj aĵoj kurbaj kiel la beko de la korniko (kp *korniko* k *kornico*). Samfamilia vorto en Eo: *korolo*.

**KRONIK/O** (f; RE): A *chronicle* [kr-], F *chronique* [kroník], G *Chronik* [kr-], I *cronaca*, Po *kronika*, R *ħronika*, (H *crónica*). Komenca [ĥr-] (ĉiam evitita de Z) nur en R. La homonima radiko *kronik/a* "longtempa" (Konj, PV) estas etimologie identa. Ps-sf *-ik*.

El Gr *khroniká (biblía)* "historiaj libroj", propr. "tempaj (libroj)", adj. de *khrónos* "tempo" kun necerta etimologio. Samfamiliaj vortoj en Eo: *krono/logio*, *-metro*.

**KRONOLOGI/O** (2; Jü): A *chrono/logy* [kr-], F *-logie* [kr-], G *Chronologie* [kr-], I *crono/logia*, (H *-logía*), Po *chronologia* [ĥr-], R *ħronologija*. Pri komenca [ĥr-], vd. *kreno*. Ps-sf *-i* 1.

Scienca termino farita el Gr *khrónos* "tempo" (vd. *kroniko*) k *-logia* "scienco" de *-logos* "esploristo" (vd. *logiko*). Kp spec. sekv.

**KRONOMETR/O** (2; Jü; *ħr-* E-isto 8/1892): A *chrono/meter* [kr-], F *-mètre* [kr-], G *Chronometer* [kr-], I *cron/ometro*, (H *-ómetro*), Po *chronometr* [ĥr-], R *ħronometr*. Pri komenca [ĥr-], vd. *kreno*.

Scienca termino farita (18a jc.) el Gr *khrónos* "tempo" (vd. *kroniko*) k *métron* "mezur(il)o" (vd. *metro*).

**KROP/O** (f; RE) 1) zool. 2) med.: A *crop* (1), G *Kropf* (1,2). Kp Nd *krop* (1), *kropgezwel* (2; propr. 'kropŝvelaĵo'). Z alprenis la ĝermanan radikon (en "neŭtrala" formo, kun *p* reprezentanta G *pf*, kp *ŝrumpi*, *ŝtrumpo*); komuna romana radiko ne ekzistas. La sencojn 1 kaj 2 havas, krom G, ankaŭ R *zob* kaj Po *wole*. ¶ 1894 *ingluvi-* (< L *ingluvies*). ¶ Io = (1), Ie *croppe* (1), Ia *ingluvie* (1); Io *strumo* (2), IeIa *struma* (2); kp eo sin. *strum/o* PV (< L *struma*).

Ĝerm. vorto (pĜ **kroppa-*, orig. "bulo" aŭ sim.), identa al Sv *kropp* "korpo" kaj disvastiĝinta en romanajn lingvojn, ekz. F *croupe* "pugo", I *groppo* "fasko, nodo, bulo", *gruppo* "grupo" (vd. tiun, kiu do estas etimologie identa).

**KROZ/I** (f; RE): A *cruise* [kru:z], F *croiser* [krŭazé], G *kreuzen*, I *incrociare*, Po *kraz'yc'*, R *krejsirovat'*, (H *cruzar*). Verŝajne bazita precipe sur F (kun F *oi* > Eo *o* kiel en *tolo*); Eo *-z-* havas fortan apogon prononce en AF, ortografie en GPo(H). La vokalo *-o-* kredeble intence kontrastas kun *-u-* en *kruc/o*. ¶ 1894 *kros-*. ¶ Io *krozar*, Ie *cruc/ear*, Ia *-iar*.

Propr. "marveturi ĉiudirekten-transversen kvazaŭ sur branĉoj de kruco" (Bastien), der. de la vorto por *kruco*, vd. tiun.

**KRUC/O** (f,Un): L *cru/x -cis*; A *cross*, F *croix*, G *Kreuz*, I *croce*, Po *krzyz'*. (R *krest*, citita de Bastien, apogas la radikkomencon sed ne estas parenca.) Bazita sur L; radikfino *-c* laŭ L ortografio, responda al la mola prononco en la modernaj fontlingvoj. L *cruc-* estas internacie konata per la kunmeto *crucifix-*, vd. sekv.

nata per la kunmeto *crucifix-*, vd. sekv. Je du punktoj *kruc-* diferencas de *kroz-*, kp tiun. ¶ 1894 *kruz-*. ¶ Io =, IeIa *cruce.*

La L vorto signifas orig. la krucon kiel torturilon; etimologio pridisputata. Samfamiliaj vortoj en Eo: *krozi, krucifikso.*

**KRUCIFIKS/O** (1; Jü): AF *crucifix*, G *Kruzifix* [-ts-], I *crocifisso*, Po *krucyfiks*, (H *crucifijo*); L mez. *crucifixus.*

Propr. "(la) krucumito", ptc. perf. de L postkl. *crucifigere* "krucumi", propr. "fiksi je kruco": *figere* "fiksi" (vd. tiun), *cruci* "al kruco", dat. de L *crux* "kruco" (vd. tiun).

**KRUĈ/O** (f; RE): F *cruche* [-ŝ], G *Krug*, R *kruĵka.* Kp A *cruse*†. La Ea formo estas la franca (specifa F *ch* > *ĉ*, vd. *aĉeti*, sed *ĉ* ankaŭ helpas aludi al R *ĵ*). ¶ 1894 *kruc-*. ¶ Io *krucho*, Ie *cruche*; Ia *urceo* (< L *urceus*).

Ĝerm. vorto (F *cruche* < Fk **krûka*, kp G mez. *kruche*, Sv *kruka*, ank. A *crock* "terpoto". Kredeble samorigina kun Gr *krôssós* "kruĉo" (pruntita de nekonata lingvo).

**KRUD/A** (f; RE): L *crudus*; A *crude*, F *cru* (kp *crudité* "-eco"), I(H) *crudo.* ¶ Io =, Ie *crud*, Ia *-e.*

L *crudus* orig. "sanga (pp viando)", kp L *cruor* "(koagulita) sango", de HE rad. **kru-* "sang(a viand)o": Sa *krûrá-* "sanganta", *kravíh* "kruda viando"; Gr *kréas* "karno" (vd. *kreozoto*); A *raw* (A ant. *hreaw*) "kruda", G *roh* "kruda"; R *krov'* "sango". Kp sekv. k *krusto.*

**KRUEL/A** (f; RE): AF(H) *cruel*, I *crudele*; L *crudelis.* La Ea formo portas la stampon de la modernaj lingvoj. ¶ Io =, IeIa *cruel.*

L paralelformaĵo al *crudus* "kruda" (kp *fidus* : *fidelis* "fidela") kaj do samradika kun tiu.

**KRUP/O** (f; RE): AF *croup* [-u-], G *Krupp*, I(H) *crup*, PoR *krup.* ¶ Io =, Ie *crupe*, Ia *croup.*

Skota vorto, par. al A dial. *croup* "paroli raŭke, korvobleki" (onomatopea).

**KRUR/O** (f; EG): L *cru/s -ris* (anat.) "la parto de la malsupra membro de genuo ĝis piedo", en L klas. okaze "la tuto de la malsupra membro". Tiel ankaŭ en Eo, vd. PIV 1 resp. 2. La sencoj tiel diferenciĝis, ke la neologismo eo *gamb/o* Christaller 1923, PV (ne ĉe Z; < F *jambe*, I *gamba*) grandparte transprenis la duan sencon. ¶ Io *gamb/o*, Ie *-e*, Ia *-a* (ĉiuj senco 2; vorto responda al senco 1 mankas). Rim.: Io *kruro*, Ie *crure* signifas "femuro".

Nekonata etimologio.

**KRUST/O** (f; RE): A *crust*, F *croûte* (kp *crustacé* "-ulo"), G *Kruste*, I *crosta*, (H *costra*, kp *crustáceo* "-eca"); L *crusta.* Vokalismo laŭ AFGL. ¶ Io =, Ie *crust/e*, Ia *-a.*

Orig. "sangokrusto", de (H)E **krus-* "koagulita" (kp Gr *krystallos* "glacio", *kryos* "frosto"), plivastigo de HE **kru-* "sango" (vd. sub *kruda*; kp *kristalo*).

**KRUT/A** (f; RE): R *krutoj.* ¶ 1894 *ripid-* (< I *ripido*). ¶ Io *eskarpa*, Ie *scarpat*, Ia *-e* (< F *escarpé*, H *escarpado*); Ia ank. *ardue* (< L *arduus*).

R vorto, signifanta "kruta; subita; severa", identa al Ĉe *kruty'* "kruela,senkompata", Po *krety* "tordita" (pSl **krot-*, par. al Li *krantas* "kruta bordo").

**KSILOFON/O** (2; Jü): AF *xylophone*, G *Xylophon*, I *silofono*, Po *ksylofon*, R *ksilofon*, (H *xilófono*). La konsekvenca transskribo de *x* kiel *ks* funkcias ankaŭ vortkomence; kp tiurilate PoR. ¶ Ie *xilofon*, Io *-o*, Ia *xylophono.*

Farita (19a jc) el Gr *xylon* "ligno" (la instrumento konsistas el lignaj tabuletoj), par. al G *Säule* "kolono" k A *sill* "(fenestra) sojlo" (kp ev. tiun), k *phônê* "sono" (vd. *fonetiko*, kp sub *infano*).

**1 KUB/O** (f; RE): AF *cube*, G *Kubus*, I(H) *cubo*, R *kub*; L *cubus.*

El Gr *kybos* s.s., orig. "ĵet-, lud/kubo", de nekonata origino.

**2 KUB/O** (8; E-isto 1/1893): AFI(H) *Cuba*, G *Kuba*, PoR *Kuba.* ¶ Io *Kuba*, IeIa *Cuba.*

Indiĝena nomo kun nekonata signifo.

**KUBUT/O** (f; RE): L *cubit/us, -um*; F *coude* (kp *cubitus* "-osto", *cubital* "-a"), I *gomito* (kp *cubito* "-osto"), (H *codo*, kp *cúbito* "-osto"). Kp A *cubital* "-a". Deirpunkto estas la L formo (anatomia termino); Z tamen ŝanĝis *i* al *u* pro neklara motivo (Waringhien LV 79: "L *cubitus* fariĝis *kubuto* – pro la ekzisto de... *-it*", sed *-it* ja estas verba sufikso, kaj misanalizo *kub/it-* tial estas praktike ekskludita). Pri analogaj vokalŝanĝoj *i* > *u*, vd. *dungi*. ¶ 1894 *kubit-*. ¶ Io *kudo*, Ie *cude*, Ia *cubito*.

L *cubitus* signifas "kubuto, antaŭbrako, ulno" (kp A *cubit* "ulno"), orig. kredeble "kurbo, flekso" (kp L *cubare* "kuŝi", propr. "fleksiĝi"), de HE rad. **kub-* "fleksi, kurbigi", kp A *hip*, G *Hüfte* "kokso".

**KUDR/I** (f; Un): F *coudre* [kudr], I *cucire*, (H *coser*). Bazita ekskluzive sur F (eble ĉar moda termino; rim. ke la responda subst. F *couture* "kudrado; modkreado" estas iom konata internacie, ekz. en A). Enestas en la radiko la F infinitivsigno *-r-* (analogaj kazoj, vd. sub *diri*; kp spec. *kuiri*, *pentri*). ¶ Io *sutar*, IeIa *suer* (vd. malsupre).

El L vulg. **cos(e)re* (F *-d-* estas parazita sono enŝoviĝinta inter *s* k *r*), el L *consuere* "kunkudri": *con-* "kun" (vd. tiun k la ps-pf *kon-*), *suere* "kudri" de HE rad. **sju-* "kudri" ekz. en Sa *syutá-* "kudrita", A *sew* "kudri", G *Saum* "bordero", R *šit'* "kudri".

**KUF/O** (f; RE): A *coif*, F *coiffe* [kŭáf], I *cuffia*, (H *cofia*). La *u*-vokalo de Eo retroviĝas nur en I; certaj ekzemploj de F *oi* > Eo *u* mankas en la Ea radikaro. ¶ Io *kofio*, Ie *cofie*; Ia *bonetto* (< F *bonnet*), *cofia**.

El L mez. *cofea* s.s. de necerta origino.

**KUGL/O** (f; RE): G *Kugel*, Po *kula*. Kp Da *kugle*, Nd *kogel*. Bazita sur G; *-el* traktita kiel en *keglo*, *pantoflo*, *vaflo* (kp sub *cirkelo*). Tiu ĉi speciala radiko 'helpas diferencigi disde *glob* kaj la slava *pilk*' (Collinson 1959, 6). Kp Waringhien LV, 79: "la franca komplekso *le bal* kaj *la balle* estis lerte dissolvita en *balo*, *kuglo* kaj *pilko* (respektive pruntitaj de F, D kaj P)" (t.e. F, G kaj Po). La specialigo estas de Z; neniu el la cititaj vortoj signifas nur "kuglo" (GPo ank. "globo, bulo"). ¶ 1894 *balu-* (< F *balle*). ¶ Io = (espismo); Ie *ball/e* (ank. "pilko"), Ia *-a* (ank. "globo").

G *Kugel* "globo" estas identa kun A *cudgel* "nodbastono" k probable var. de G *Keule* "klabo", el plivastigo de HE rad. **geŭ-* "kurbigi"; alia plivastigo en G *kauern* (vd. *kaŭri*), Gr *gyros* (vd. *ĝiro*).

**KUIR/I** (f; Un): F *cuire*. Kp A *cook*, G *kochen*, I *cuocere*, *cucinare*, (H *cocer*, *cocinar*); L *coquere*. Bazita ekskluzive sur F (F *cuisine* "kuir/ejo, -arto" estas konata ankaŭ ekster franclingva teritorio, ekz. en A). Enestas la F infinitivsigno *-r-* (vd. analogajn kazojn sub *diri*; kp *kudri*). – Pritraktita de Carlevaro, "Slipoj por etimologia vortaro", PL 14/1985. ¶ 1894 *kokv-*. ¶ Io *koquar*, Ie *cocinar*, Ia *cocer*, *cocinar*.

Latin(id)a vorto (kun der. L *coquina* "-ejo" > F *cuisine*, H *cocina*, I *cucina*, G *Küche*, Po *kuchnia*, R *kuĥnja*), de HE rad. **pekŭ-* "kuiri": Sa *pácati* "kuiras, bakas, rostas"; Gr *péttein* "kuiri", *pépsis* "digesto" (kp *dispepsio*); Li *kèpti* "baki, rosti"; R *peč'* "forno". Samfamiliaj vortoj en Eo: *abrikoto*, *biskvito*.

**KUK/O** (f; RE): A *cake*, (Us) *cookie* [kúki], G *Kuchen*. Kp Nd *koek* [kuk]. Laŭ Waringhien (LV 80), la Ea radiko estas kompromisa formo inter A *cake* kaj G *Kuchen*. Tamen, ĉar la ununura A traduko en UV estas *cookey*, tiu formo (= nuntempa *cookie*) ŝajnas esti la vera fonto (kun apogo de G, kompreneble). Atentinda estas ankaŭ Li *kuk* s.s., se oni rekonas supraĵan konon de la litova lingvo ĉe Z. ¶ 1894 *gat-* (< F *gâteau*). ¶ Io = (espismo); neniu ekzakta ekvivalento en IeIa.

Ĝerm. vorto kun apofoniaj variantoj (G *Kuchen* : A *cake*, Sv *kaka*); eble orig. infanvorto (parenceco al *kuiri*, kiel indikas

Bastien, estas ĉiuokaze duba).

**KUKOL/O** (f; RE): L *cuculus*; A *cuckoo*, F *coucou* [kukú], G *Kuckuck* [kúkuk], I *cuculo*, Po *kukul'ka*, R *kukuŝka*, (H *cuclillo*). Zoologia termino prenita el L; la unua silabo havas solidan apogon en pluraj modernaj fontlingvoj. Radikfino *-ol* el L *-ulus* same kiel en *garol/o*, *regol/o* (vd. kompletan liston sub *artikolo*); tie ĉi, **kukul/o* almenaŭ teorie estus misanalizebla kiel *kuk/ul/o*. ¶ 1894 *kukul-*. ¶ Io *kukulo*, Ie *cucú*, Ia *cucu*.

Vorto de onomatopea origino kun similaj ekvivalentoj en pluraj aliaj HE lingvoj (kp Sa *kokilá-*, Gr *kókkyx* s.s.).

**KUKUM/O** (f; RE): L *cucum/is -eris*; A *cucumber*, F *concombre*, (H *cohombro*). Deirpunkto estas la L formo (botanika termino), modifita ĉefine: se oni konsideras la L stemon *cucumer-*, oni trovas apokopon de sufikssimila *-er* (kp spec. *pulv-*, ank. *akcel-*, *adult-*, *papav-*). Tamen estas ankaŭ eble rigardi la Ean formon kiel apokopitan nominativon, kiu normale perdas sian *-is* (kp *febro* < L *febris*, *turo* < L *turris* kaj multajn aliajn). La indikon de Wüster, Esp. princ. 59, ke *kukumo* estas farita laŭ AF, mi ne komprenas. ¶ Io *kukombro*, IeIa *cucumbre*, Ia ank. *cucumere*.

Kredeble pruntita el la sama nekonata fonto kiel Gr *síky(o)s* s.s., R *tykva* "kukurbo".

**KUKURB/O** (f; RE): L *cucurbita*; F *courge* (kp *cucurbitacées* "-acoj"), G *Kürbis*. Botanika termino prenita el L; apokopo de *-it-* por eviti asociadon al Ea participsufikso (kaj por mallongigi la radikon), kp. *limo*, *sago*. ¶ 1894 *kukurbit-*. ¶ Io *kukurbito*, Ie *cucurbit/e*, Ia *-a*.

La L vorto havas duobligitan *cu-* kredeble laŭ *cucumis* "kukumo"; la resto respondas al Sa *ĉarbat'a-* "kukumo".

**KUL/O** (f; RE): L *cul/ex -icis*; F *cousin* [ku-]. Zoologia termino prenita el L; la apokopo de *-ex* retroviĝas en *cimo*, *pulo* kaj ankaŭ en *atriplo* (bot.), *verto* (anat.). ¶ Io *kulo* > *kulco*, Ia *culice*, Ie nur *mosquito* (kp *moskito*).

La L vorto (> F pere de **culic-inus*) kredeble enhavas la saman bazon kiel *cuneus* "kojno" (kp tiun) k estas par. al Ir *cuil* "kulo"; kp ank. Sa *cûla-* "pikstango" (HE **ku-*).

**KULER/O** (f; Un): F *cuill/er*, *-ère* [kyijé:r], I *cucchiaio*, (H *cuchara*); L *coc(h)lear*. Kp Oc *culher*, P *colher*. Bazita sur F. Al la F diftongo [yi] respondas Eo *ui* en *kuiri*; tie ĉi ĝi ŝajnas monoftongigita (kiel en *konduto*). La situacio komplikiĝas pro la sekvanta F [j] (reprezentanta originan [l']), kiu estas skribata *-ll-* kaj Esperante redonata *-l-* kiel en *abelo* (kp tiun). ¶ Io *kuliero*, Ie *coclare*, Ia *coclear*.

L *cochlear* signifis orig. kuleron uzatan ĉe la manĝado de helikoj k estas der. de *coc(h)lea* "heliko" el Gr *kokhlías* s.s., der. de *kókhlos* "konko".

**KULIS/O** (2; Jü): F *coulisse* [kulís], G *Kulisse*, Po *kulisy* (plur.), R *kulisa*. Eo *-s* el fontlingva *-ss-*. ¶ Io =, Ie *culisse*, Ia *coulisse*.

F teatra termino, orig. "glitfoldo" (do pri la foldo, en kiu ŝoviĝas la kuliso), der. de *couler* "gliti; flui; filtri" el L *colare* "filtri" de *colum* "filtrilo".

**KULP/o** (f; Un): L *culpa*; I *colpa*, (H *culpa*). Kp F *culpabilité* "-eco". Prezentita kiel adjektivo; ties formo tamen montras aldonitan sufikson en la fontlingvoj: A(H) *culpable*, F *coupable*, I *colpevole*, L *culpabilis*. ¶ 1881 *kulp-*. ¶ Io =, IeIa *culpa*.

L vorto kun nekonata etimologio.

**KULT/O** (1; Jü): A *cult*, F *-e*, I(H) *-o*, G *Kultus*, Po *kult*, R *kul't*; L *cultus*.

L *cultus* ank. "omaĝo; flegado, kultivado", subst. de *colere* "kultivi, flegi" (kp *kolonio*), orig. "loĝi (en)", de HE rad. **kŭel-* "turni" (el "turniĝi en regiono" evoluis la senco "loĝi en regiono"), vd. *poluso*. Kp spec. sekv.

**KULTUR/o** (1; Be) 1) konkr. (pri tero,

vegetaĵoj ktp) 2) abstr. (pri spirita evoluo): A *culture* (1, kp *agriculture* "terkulturado"; 2), F *culture* (1,2), G *Kultur* (2), I *coltura* (1), *cultura* (2), Po *kultura* (2), R *kul'tura* (2), (H *cultura* 1,2). Prezentita kiel verbo; ties formo tamen montras alian sufikson en la fontlingvoj: A *cultiv/ate*, F *-er*, G *kultivieren*, I *coltivare*, Po *kultywowac'*, R *kul'tivirovat'*, (H *cultivar*), el kiuj la sinonima eo *kultiv/i* Z, PV. – Ps-sf *-ur*. ¶ Io *kulturo* (2), *kultivo* (1); IeIa *cultura* (1,2).

El L *cultura* "kultur(ad)o, flegado, edukado", subst. de *colere* "kultivi, flegi" (vd. *kulto*). – Pri la vorto *kulturo* pli detale Collinson, Esperantologio II, 94 s.

**KUMIN/O** (2; Jü): AF *cumin*, G *Kümmel*, I *cumino, comino*, Po *knimek*, (H *comino*); L *cuminum*. Bazita sur L (botanika termino) kun apogo de AF. ¶ Io =, Ie *cúmine*, Ia *cumino*.

El Gr *kyminon* s.s., pruntita el semida lingvo (kp He *kammôn*, Ak *kamûnu* s.s.: vd. Cherpillod 1989, 31).

**KUN** (f; Un): L *cum* (kiel pref. *com-, con-, co-*); I(H) *con*. Kp P *com*. Bazita sur L kun anstataŭigo de fina *m* per *n* (laŭ la precipa formo de la L prefikso aŭ laŭ I), evidente por atingi pli grandan kombineblecon en kunmetoj. Eventuala **kon* (< I kaj L pref.) estus neoportuna, ĉar *con-* troviĝas en tre multaj internaciaj vortoj, kie ĝi perdis sian originan signifon kaj donus okazon al misanalizoj (ekz. *konkur-* kolizius kun *kun/kur-*, *konven-* kun *kun/ven-*). ¶ Kp 1878 *kon/un/ig/are* "kun/unu/ig/i". – 1881 *ko*. – 1894 *kum*. – 1906b *kum-* (pref., malo de *dis-*). ¶ Io = (espismo; kp ank. Nl *kun*, vd. Jespersen AIL 160), IeIa *con*.

El HE **kom* "kune", kp Ir *co n-* "kun", Gr *koinós* (< **komjos*) "komuna", G *ge-*, ekz. en *gemein* "komuna". Samfamilia vorto en Eo: *kontraŭ*. Vd. ank. la ps-pf *kon-*.

**KUNIKL/O** (f; RE): L *cuniculus*; G *Kaninchen*, I *coniglio*, (H *conejo*). Kp A *con(e)y* "kuniklo, -pelto". Zoologia termino prenita el L. L *-cul-* estas traktita kiel en *cirklo, miraklo, spektaklo* (vd. pri L *-ul-* sub *artikolo*). ¶ Io =, Ie *cunicul*, Ia *conilio*.

L dim., kies bazvorto probable estas de ibera origino.

**KUP/O** (f; RE): A *cup, cupping-glass*, I *coppetta*; kp Sv *koppglas* (A *glass*, Sv *glas* "vitraĵo"). La Ea radiko estas transskribo de la A formo (ankaŭ uzata kiel verbo: *to cup* "almeti kupojn"). ¶ Io *ventuzo* (< F *vent/ouse*, HI *-osa*), Ia *ventosa**, *cupp(ett)a**.

Orig. "kaliko, pokalo" (la instrumento ricevis tiun nomon pro sia vazosimila formo), kp F *coupe*, H *copa*, I *coppa* "pokalo", kredeble el L mez. *cupa* "pokalo", identa kun L *cupa* "barelo", par. al Gr *kypellon* "pokalo", Sa *kûpa-* "kavo, puto". Etimologie identa estas *kuvo*. Samfamilia vorto en Eo: *kupolo*.

**KUPE/O** (1; Jü): F *coupé* [kupé], (G *Coupé*†), R *kupe*. Kp Sv *kupé*. ¶ Io *vagonfako*, Ie *cupé*, Ia *compartimento* (< I, A *compartment*).

Propr. "detranĉita (parto)", ptc. perf. de F *couper* "(de)tranĉi, (de)haki" (kp semantike G *Abteil* s.s., propr. "disdivido"), kredeble orig. "dehaki per bato", der. de *coup* "bato, frapo" el L vulg. *colpus*, kp L *colaphus* "pugnobato" el Gr *kólaphos* "pugnobato, vangofrapo". Samfamilia vorto en Eo: *kupono*.

**KUPOL/O** (f; RE): AI *cupola*, F *coupole* [ku-], G *Kuppel*, Po *kopul'a*, R *kupol*, (H *cúpula*). La Ea radiko laŭ AIR. ¶ Io =, Ie *cupol*, Ia *-a*.

I ark. termino, el L *cupula* "bareleto; tomba kripto", dim. de *cupa* "barelo" (vd. *kupo*).

**KUPON/O** (1; Jü): AF *coupon* [F ku-], G *Kupon*, PoR *kupon*, (H *cupón*). Ps-sf *-on*. ¶ Io =, Ie *cupon*, Ia *coupon*.

Propr. "detranĉaĵo", der. de F *couper* "detranĉi" (vd. *kupeo*).

**KUPR/O** (f; Un; kp *kuper-* N-ro 15 1888): L *cuprum*; A *copper*, F *cuivre*, G

*Kupfer*, (H *cobre*). Bazita sur L kiel nomo de kemia elemento. ¶ Io =, Ie *cu-pr/e*, Ia *-o*.

L vorto kun pli antikva paralela formo *(aes) cyprium* "(bronzo) el Cipro", el Gr *kyprion* s.s., der. de *Kypros* "Cipro".

**KUR/I** (f; Un): L *currere*; F *courir* [ku-], I *correre*, (H *correr*). Bazita sur L. ¶ Io *kurar*, IeIa *currer*.

L *currere* (sup. rad.: *curs-*) de (H)E rad. **kers-* "kuri", kp L *currus* "veturilo" k (el Gaŭla) *carrus* "ĉaro" (vd. tiun k *kariero, karikaturo, kariolo, ŝarĝi*), Gr *epí-kouros* "helpanto" (propr. "alkuranto"). Samfamiliaj vortoj en Eo: *ekskurso, husaro, konkur/i, -enco, konkurso, korsaro, kurento, kuriero, kurso, kursiva.*

**KURAC/I** (f; Un): L *curare* (kp *curatio* "-o"); A *cure* "(el)-i, -ado", G *kurieren* (kp *Kur* "-ado"), I *curare*, (H *curar*). Kp F *cure* "-ado", *curable* "-ebla". Transskribo de la fontlingva radiko donus **kur-*, kiu estis neebla pro *kur/i*. Z tial deiris de la L subst. *curatio* (postklasika prononco [kurátsio]), donante al *-i-* la funkcion de Ea infinitiva finaĵo (sendube por eviti la pezajn formojn *kuraci/i, -as* ktp). Same escepta traktado de L *-tio* en *donac/i, kapitulac/i*; vd. ps-sf *-cio*. ¶ 1882 *med-* (< L *mederi*); 1894 *kurazi-*. ¶ Io *kuracar* (espismo), IeIa *curar*.

Orig. "zorgi pri (iu)", der. de L *cura* "zorgo" kun necerta etimologio. Samfamiliaj vortoj en Eo: *akurata, asekuri, kuratoro, kurioza, sekura.*

**KURAĜ/O** (f; Un): AF *courage* [F kur-], G *Courage*† [kur-], I *coraggio*, (H *coraje*). Prezentita kiel adjektivo, sed, kiel montras la substantiva ps-sf *-aĝ-*, bazita sur la substantivo de la fontlingvoj. ¶ 1894 *kurag-*. ¶ Io *kurajo*, IeIa *corage*.

Propr. "kor/aĵo" (oni rigardis la koron kiel sidejon de la kuraĝo), der. de F *coeur* resp. I *cuore* "koro" (vd. tiun).

**KURATOR/O** (f; RE): A *curat/or*, F *-eur*, I *-ore*, G *Kurator*, PoR *kurator*, (H *curador*); L *curator*. Ps-sf *-or* 1.

Propr. "prizorganto", agantnomo de L *curare* "prizorgi" (vd. *kuraci*).

**KURB/A** (f; RE): A *curved*, F *courbe* [kurb], I(H) *curvo*; L *curvus*. Kp G *Kurve* "-o"; ank. R *krivoj*, Po *krzywy* "-a". Bazita sur F. Ne estas klare, kial Z preferis *-b-* antaŭ *-v-*, pli internacia. La radiko devenas sen ŝanĝo de pEo (1881 *kurb-*); kp 1894 *kurv-*. ¶ Io *kurva*, Ie *curv*, Ia *-e*.

La latin(id)a vorto estas par. al Gr *kyrtós* "kurba, volba" k al la slavaj formoj cititaj supre, ev. ank. al Gr *kírkos* "ringo" (vd. *cirko*): HE rad. **ker-* "tordi, fleksi".

**KURENT/O** (8; PV; antaŭe *flu/o*): A *current*, F *courant*, I *corrente*, (H *corriente*). Ps-sf *-ent*. ¶ Io *korento*, IeIa *currente*.

Propr. "kuranta (fluo)", ptc. prez. de la resp. verbo por "kuri" (vd. s.t.v.).

**KURIER/O** (f; RE; ank. *kurjer-* RE): A *courier* [ku-],F *courrier* [ku-], G *Kurier*, I *corriere*, Po *kurier*, R *kur'er*, (H *correo*). Ps-sf *-i(e)r*. ¶ Io =, Ie *curr/iero*, Ia *-ero*.

I vorto, propr. "kur/anto, -isto", agantnomo de *correre* "kuri" (vd. tiun).

**KURIOZ/A** (1; RE): A *curi/ous*, F *-eux*, G *kurios*†, I(H) *curioso*, R *kur'ëznyj*. Ps-sf *-oz*, var. *-ioz*. ¶ Io =, Ie *curios/i*, Ia *-e* (ank. "scivolema").

El L *curiosus* "zorgema; scivolema" (> "ekscitanta scivolemon"), der. de *cura* "zorgo" (vd. *kuraci*).

**KURS/O** (1; RE) 1) serio da lecionoj 2) vojdirekto 3) fin.: A *course* (1,2), F *cours* [kur] (1,2,3), G *Kurs* (1,2,3), *-us* (1), I *corso* (1,3), Po *kurs* (1,3), R *kurs* (1,2,3), (H *curso* 1,2). Eo *-s* laŭ [s] en AGIPoR. Por la senco 3 oni kreis, per arbitra ŝanĝo de *s* al *z*, novan radikon *kurz/o* (PV; ne ĉe Z). ¶ Io = (1,3), Ie *curs/e* (2,3), *-u* (1), Ia *-o* (1,2), *cambio* (3) (< I).

El L *cursus* "kur(ad)o; kurso (2)" (senco 1 tra "paŝado" > "grada antaŭeniro" > "serio", senco 3 tra "cirkulado [de mono]" > "prezo de cirkulanta mono"), subst. de *currere* (sup. rad.: *curs-*) "kuri" (vd. tiun). Kp spec. sekv.

**KURSIV/O** (1; RE): A *cursive script* ('-a skribo'), F *écriture cursive* ('-a skribo'), G *Kursive*, I *corsivo*, Po *kursywa*, R *kursiv*, (H *cursivo*). Ps-sf *-iv*.

El L mod. *(scriptura) cursiva* "kura (skribo)" (ĉar la kursivo estis skribebla rapide, per kuranta mano), adj. de L *currere* "kuri" (vd. tiun).

**KURTEN/O** (f; Un) A *curtain*, F *courtine* [kur-], G *Gardine*, I(H) *cortina*, Po *kurtyna*, R *gardina*. Bazita sur AF kun ŝanĝo *-in* > *-en* por eviti kolizion kun la ina sufikso (vd. *abomeni*; tie ĉi kun ioma apogo de A prononco [-te'n]). La semantika sfero de la Ea vorto estas pli vasta ol en la plimulto de fontlingvoj (en F "litk.", en GR "fenestra k.", en Po "teatra k."), eble laŭ modelo de A. ¶ 1894 *kortin-*. ¶ Io = (espismo), Ie *cortin/e*, Ia *-a*.

El L mez. *cortina* s.s., en L klas. "kaldrono". – La senco "kurteno" estiĝis en la biblio kiel paŭsaĵo de Gr *aulaía* "kurteno", videble el *aulê* "korto": analoge oni asociis L *cortina* kun *coho/rs -rtis* "korto" (vd. tiun).

**KUSEN/O** (f; Un): A *cushion*, F *coussin* [kusê], G *Kissen*, I *cuscino*, (H *cojín*). Bazita precipe sur F. Eo *-s-* el fontlingva *-ss-*. La radikfino *-en* povas esti simpla ŝanĝo por eviti asociadon kun la sufikso *-in* (*kuz/in/o* estas riske proksima!) sed estas apogata skribe de G, prononce de G(F). ¶ 1894 *kusin-*. ¶ Io = (espismo), Ie *cussine*, Ia *cossino*.

F vorto, orig. pri kuseno destinita por kuŝbenko, el L vulg. **coxinus* de L *coxa* "kokso".

**KUŜ/I** (f; Un): F *coucher* [kuŝé] "-igi" (kp *se coucher* "-iĝi", *être couché* "-i"). (Cetera apogo sensignifa: kp A *couch*, I *cuccetta* "-ejo".) Z faris la verbon netransitiva, eble konsiderante L *cubare* "kuŝi". ¶ 1881 *kus'-*. – 1894 *kuc-*. ¶ Io *jacar* (< L *iacere*; kp *kushar* "kuŝigi"); Ie *jacer*; Ia *cubar*.

El L *collocare* "meti, loki": *con-* intensiga pref. (vd. ps-pf *kon-*), *locare* "loki" de *locus* "loko" (vd. tiun). Samfamilia vorto en Eo: *akuŝi*.

**KUTIM/O** (f; Un): A *custom*, F *coutume* [kutym], I *costume*, (H *costumbre*). Bazita sur F prononco (kun *i* por F *u* [y], kio estas malofta, kp *grio*; tie ĉi eble por atingi maksimuman diferencigon disde la etimologie identa *kostumo*). ¶ Io *kustumo*, Ie *custom*, Ia *costume*.

El L *consuetudo* s.s., subst. de *consuescere* "alkutimiĝi": *con-* intensiga pref. (vd. ps-pf *kon-*); *suescere* "alkutimiĝi" (kp. *suetus* "alkutimiĝinta"), propr. "alproprigi al si (ion)", de la radiko en L *se* "si", *suus* "sia" (vd. *etiko* k plue *si*).

**KUV/O** (f; RE): F *cuve*, G (reg.) *Kufe*, (H *cuba*). Bazita sur F. ¶ Io =, Ie *cuve*, Ia *cupa*.

El L *cupa* "barelo" (kp A *cooper* "barelfaristo"): vd. sub *kupo*, etimologie identa.

**KUZ/O** (f; Un): AF *cousin* [-z-], G *Cousin*† [-z-], I *cugino*, Po *kuzyn*. La radiko estas retrograde formita, prenante la vortfinon de la fontlingvoj kiel Ean virinan sufikson: **kuzin-* > *kuz/in-*. Ĝi tiel formas grupon kune kun du aliaj familianecaj vortoj: *fraŭl-* kaj *edz-*. Gregor 1982, 18 s. konstatas, ke antaŭ kelkaj jarcentoj la mallongigita formo *cuz* estis uzata en A. ¶ Io *kuzo* (mask. *kuzulo*, fem. *kuzino*); Ile *cusin* (mask. *-o*, fem. *-a*); Ia mask. *cosin/o*, fem. *-a*.

El L *consobrinus* s.s., orig. "infano de patrinflanka onkl(in)o", el *con-* "kun" (vd. ps-sf *kon-*) k *soror* "fratino".

**KVADRAT/O** (1; RE): A *quadrat/e*, I *-o*, F *carré* (kp *quadrature* "-uro"), G *Quadrat*, Po *kwadrat*, R *kvadrat*, (H *cuadrado*); L *quadratum*. Pri Eo *kv*, vd. sub *akvo*. Ps-sf *-at*.

Subst.-igita neŭtra formo de L *quadratus*, ptc. perf. de *quadrare* "igi kvarangula" de *quadrus* "kvarangula" (vd. *kadro*), samradika kun *quattuor* "kvar" (vd. tiun). Kp spec. sekv.

**KVADRATUR/O** (2; Jü): AF *quadratur/e*, I *-a*, G *Quadratur*, Po *kwadratura*, R

*kvadratura,* (H *cuadratura*); L *quadratura.* Pri Eo *kv,* vd. *akvo.* Ps-sf *-ur.*

Subst. de L *quadrare* "igi kvarangula" (vd. *kvadrato*).

**KVADRIL/O** (2; Jü): AF *quadrille* [A kŭadríl, F kadríj], G *Quadrille* [kadríl-je'], I *quadrigla* [kŭadríl'a], Po *kadryl,* R *kadril',* (H *cuadrilla* [kŭadríl'a]). Ev. **kadril/o* (kun komenca *ka-* laŭ FGPoR prononco) estis probable konsiderata neoportuna pro *kadr/o;* Z tial preferis *kv-,* normala Ea ekvivalento de *qu* (vd. *akvo*). La radikfino aperas bazita sur la ortografio (AFG); pri *-l-* respondanta al romana [l'], vd. sub *abelo.* ¶ Io *quadrilo,* Ie *quadrill/e,* Ia *-a.*

H vorto, orig. "kvaropo" (la danco estas dancata de 'du grupoj el po du paroj', PIV), der. de *cuadro* "kvarangulo" el L *quadrus* "kvarangula" (vd. *kvadrato*).

**KVALIT/O** (1; Be): A *qual/ity,* F *-ité,* I *-ità,* G *Qualität* [kv-], (H *calidad*); L *quali/tas -tatis.* Kp Po *kwalitatywny* "-a". Bazita sur la mallongaj AFI formoj. Pri Eo *kv,* vd. *akvo.* Ps-sf *-t(at).* Tute paralela en la fontlingvoj estas *kvant-,* kvankam ĝi ricevis alian traktadon en Eo. ¶ Io *qual-eso,* Ie *qual/ità,* Ia *-itate.*

Propr. "kia-eco", de L *qualis* "kia" (laŭ Gr *poiótês* "kvalito" de *poîos* "kia"), el HE demanda pronomstemo **kŭali-,* kp Gr *pêlíkos* "kiom granda?", Ĉe *kolik* "kiom?" (rad. **kŭo-/kŭa-,* vd. *kiu*).

**KVANKAM** (f; Un): L *quamquam* (malofte skribita *quanquam*). Prenita el L kiel ĉefa fonto por kon- kaj subjunkcioj (vd. Gregor 1982, 11). Formo fonetike oportunigita per simpligo de la dua *qu* (normale = Eo *kv,* vd. *akvo*) al *-k-* kaj dentaligo de la antaŭa nazalo. ¶ Io *quankam* (espismo); Ie *benque* (< F *bien que*), Ia *ben que,* ank. *quam/quam, quan-.*

Orig. "kiel ajn", formita per duobligo de L *quam* "kiel" (analoge ekz. *quis* "kiu", *quisquis* "kiu ajn"), akuz. fem. de demanda-rilativa radiko *quo-* (vd. *kiu*). Parencaj vortoj en Eo: *kvanto, kvazaŭ.*

**KVANT/O** (f; RE): A *quant/ity,* F *-ité,* G *Quantität* [kv-], I *quantità,* (H *cantidad*); L *quanti/tas -tatis.* Surbaze de tiuj formoj oni atendus **kvantit/o* analoge al *kvalit/o* (kp 1894). Tial ŝajnas preferinde serĉi la veran fonton de *kvant/o* en L *quantum* "kvanto, kiomo" (> I *quanto,* H *cuánto* "kiom?"); kp G *Quantum* "kvanto". Pri Eo *kv,* vd. *akvo.* ¶ 1894 *kvantit-.* ¶ Io *quant(es)o,* Ie *quant/e, -ità, -ité,* Ia *quant/o, -itate.*

L *quantitas* propr. "kiom-eco", *quantum* "kiom(o)", ambaŭ de L *quantus* "kiel granda?", korelativa al *tantus* "tiel granda" (*tantum* "tiom") k der. de *quam* "kiel" (vd. *kvankam*).

**KVAR** (f; Un): L *quattuor* (kp *quartus* "-a"); F *quatre* (kp *quarante* "40"), I *quattro* (kp *quarto* "-a", *quaranta* "40"), (H *cuatro,* kp *cuarto* "-a", *cuarenta* "40"). Kp A *quarter* "-ono". Radiko krome konata per internaciaj derivaĵoj, ekz. A *quartet,* G *Quartett,* Po *kwartet,* R *kvartet* > eo *kvartet/o* EG. Laŭ Waringhien 1946, 24, *kvar* reprezentas L *quattuor* kun la finaĵo de G *vier.* Sed ne estas bezone eliri el la romanaj lingvoj por klarigi la formon. Ĝi povas esti rigardata en du manieroj: (a) kiel mallongigo de IF, pli precize asimilo *tr* > *r* (aŭ *dr* > *r,* se oni konsideras L pref. *quadri-* "kvar-" kiel fonton); (b) kiel ekstraktaĵo el la L orda numeralo *quar-tus* (se tiel, *kvin* el *quin-tus* povus esti ekzakta paralelo) aŭ el la romana fundamenta numeralo "40": F *quarante* ktp. Ĉiuokaze estas klare, ke Z deziris unusilaban vorton (el la bazaj numeraloj, nur *unu* estas dusilaba). Pri Eo *kv,* vd. *akvo.* ¶ 1881 *kvar.* ¶ IoIe *quar* (espismoj), Ia *quatro* (kp *quarte* "-a").

El HE **kŭetŭor-* "4": Sa *ĉatvârah;* Gr *téttares, -ss-* (vd. *trapezo*); Ir *cethir;* A *four,* G *vier,* Gt *fidwor* (pĜ **fidhwor-*); R *četyre,* Po cztery (pSl **četyr/e, -i*). Samfamiliaj vortoj en Eo: *eskadro, kadro, kajero, kvadrat/o, -uro, kvadrilo, kvaranteno, kvarto, kvartalo, skadro.*

**KVARANTEN/O** (f; RE): A *quaran-t/ine,*

F *-aine* [-én], G *Quarantän* [kv-, -én], I *quarantena*, Po *kwarantanna*, R *karantin*, (H *cuarantena*). Pri Eo *kv*, vd. *akvo*. Radikfino *-en* laŭ FGI (*-in* evitita pro sufikssimileco). ¶ Ie *quaranten*, Io *-o*, Ia *-a*.

Propr. "kvardeko (da tagoj)" (40 tagoj estis iam, en Venecio, la normala kvarantenperiodo), der. de F *quarante* (I *quaranta*, H *cuarenta*) "kvardek" el L *quadraginta* s.s. (kies unua elemento estas par. al *quattuor* "kvar", dua [el **-dkmt-*] al *decem* "dek", vd. tiujn).

**KVARC/O** (f; RE): AF *quartz* [-ts], G *Quarz* [kvarts], I *quarzo* [-ts-], Po *kwarc* [kvarts], R *kvarc*, (H *cuarzo*). Pri Eo *kv*, vd. *akvo*. Transskribo de la internacia prononco [ts] per *c* (kun apogo de Po, kp *caro*, *maco*). ¶ 1894 *kvarz-*. ¶ Io *quarco*, Ie *quartz*, Ia *quarz*.

G vorto kun pridisputata etimologio.

**KVART/O** (f; RE): A *quart*, F *-e*, I *-a*, G *Quarte*, Po *kwarta*, R *kvarta*, (H *cuarta*). Pri Eo *kv*, vd. *akvo*.

Propr. "(la) kvara (tono)", el L *quart/us*, *-a* "kvara" (vd. sub *kvar*). Analoga estas *kvinto*, kp tiun.

**KVARTAL/O** (f; RE): A *quart/er*, F *-ier*, I *-iere*, G *Quartier*†, R *kvartal*. Pri Eo *kv*, vd. *akvo*. Kredeble por eviti sufikssimilan finon (**kvarter-*), Z bazis la radikon sur R, kio estas unu el pluraj eblaj solvoj (**kvartir-*, **kvartier-*). Ps-sf *-al*. ¶ Io *quart/ero*, Ie *-ere*, Ia *-iero*.

Propr. "kvarono (de urbo)", el L mez. *quartale* (> R, kp G *Quartal* "jarkvarono") resp. *quartarium* (> AFGI), der. de L *quartus* "kvara" (vd. sub *kvar*). Pli detale ĉe Carlevaro, PL 6/1983.

**KVAST/O** (3; Jü): G *Quaste* [kv-], Po *kwast* [kv-]. Kp Nd *kwast*. ¶ Io *tufo* (kp tiun); Ie *quaste* (espismo); Ia *pompon* (< F).

Ĝerm. vorto (pĜ **kwastu-*) kun orig. signifo "tufo, fasko"; kredeble par. al R *ħvost* "vosto" (vd. tiun).

**KVAZAŬ** (f; RE; antaŭe *kiel (se)*, vd. Waringhien LV 210): L *quasi*; I *quasi* [-z-] (adv.), *quasi che* (konj.). Kp F *quasiment* [-z-] "kvazaŭe". Kiel pref., la vorto havas pli grandan internaciecon: A *quasi-scientific* "-scienca", F *quasi-contract* "-kontrakto", G *Quasivertrag* "-kontrakto"; Sv *kvasifilosofisk* "-filozofia". Pri Eo *kv*, vd. *akvo*. Eo *-z-* normala inter vokaloj, tie ĉi apogata de FI. *Kvazaŭ* estas la ununura konjunkcio kun la vortfino *-aŭ* (pri kiu vd. la liston de pseŭdosufiksoj). "Tie ĉi la aŭ-formo estas bezonata, ĉar *i* donus impreson de verbo" (Gerdman, manuskripte). Pri la senco donita de Z al *kvazaŭ*, vd. Waringhien LV 211: "sub la latindevena *kvazaŭ* Zamenhof enmetis la substancon de rusa *budto*". ¶ 1882 *vel* (< L *velut* [ne *vel* kiel en PVZ 5, 149]). – 1894 *kvasu*. ¶ Io *quaze* (adv.), *quale se* (konj., 'kiel se'); Ie *quasi* (adv., konj.); Ia *quasi que* (konj.).

L *quasi* (orig. konj., poste ank. adv. k kvazaŭprep., vd. LV 211) el *quam si* "kiel se" (kp A *as if*, F *comme si*, G *als ob*): *quam*, vd. *kvankam*; *si*, vd. *se*.

**KVEREL/I** (4; El,PV; antaŭe *inter/disput/i*): A *quarrel*, F *se quereller* (refl.; kp *querelle* "-o"), (H *querellarse*, refl.). Bazita sur F (kun senrefleksivigo, vd. *aboni*; tie ĉi eble laŭ modelo de A). Pri Eo *kv*, vd. *akvo*. ¶ Mankas en Io (kp *disputar*); Ie *querellar*; Ia *querelar* "plendi; kvereli".

Verbo der. de la resp. subst.: F *querell/e* "-o", H *-a* "-o; plendo", ank. I *querela* "plendo", el L *querela* s.s., subst. de *queri* "plendi", kredeble par. al Sa *cvásati* "suspiras" (HE rad. **kŭes-*).

**KVERK/O** (f; RE): L *quercus*; I *quercia*. Botanika termino prenita el L. ¶ Io *querko*, IeIa *querco*.

Identa kun G *Föhre*, A *fir* "pino", el HE arbonomo **perkŭus*.

**KVESTOR/O** (2; Jü): L *quaestor*; A *quaestor*, F *questeur*, G *Quästor*, I *questore*, Po *kwestor*, R *kvestor*, (H *cuestor*). L titolo, kiun transskribis ĉiu moderna fontlingvo laŭ sia metodo. Pri Eo *kv*, vd. *akvo*. L *ae* > Eo *e*, vd. Szerdahelyi 1987, 113. Ps-

sf *-or* 1.

Orig. "esplorjuĝisto ĉe kriminala tribunalo", propr. "esploristo", agantnomo de L *quaerere* "esplori, serĉi, demandi" (vd. *konkeri*).

**KVIET/A** (f; RE): A *quiet*, I(H) *-o*; L *quietus*. Kp F *inquiet* "malkvieta". ¶ Ie *quiet*, Io *-a*, Ie *-e*.

Orig. "ripozanta", ptc. de L *quiescere* "ripozi" (kp *qui/es -etis* "ripozo"), de HE rad. **kŭie-* "ripozi", ekz. en R *po-koj* "ripozo"; Gt *hweila* "temp(et)o", G *Weile* "temp(et)o", A *while* "tempo; dum". Samfamiliaj vortoj en Eo: *kvit/a* (etimologie identa), *-anco*, *trankvila*.

**KVIN** (f; Un): L *quinque* [kŭínkŭe] (kp *quintus* "-a"); F *cinq* (kp *quintuple* "-obla"), I *cinque* (kp *quinto* "-a", *quindici* "15"), (H *cinco*, kp *quinto* "-a"). Kp A *quintuple* "-obla". Internaciaj derivaĵoj: *kvint/o* 'intervalo de unu tono al la kvina' (vd. tiun); ank. A *quintet*, F *-te*, I *-to*, G *Quintett*, Po *kwintet*, R *kvintet* > eo *kvintet/o* PV '(muzika) kvinopo'. La Ea formo estas la latina, reduktita ĝis unusilabeco (ĉiuj numeraloj en la serio 2-10 estas unusilabaj), kreita per apokopo el aŭ *quinque* aŭ *quintus*. Pri Eo *kv*, vd. *akvo*. Kp *kvar*, kiu estas eksplikebla en analoga maniero. IoIe *quin*, Ia *cinque* (kp *quinte* "-a").

En L okazis alsimiligo de la komenca sono laŭ la fina *-que*. El HE **penkŭe* "5", kp Sa *pán'ca*; Gr *pénte* (kp *pentametro*, *pentekosto*); Gt *fimf*, G *fünf*, A *five* (kp *fingro*); R *pjat'*, Po *piec'*. Aliaj samfamiliaj vortoj en Eo: *kvint/o*, *-esenco*.

**KVINT/O** (1; RE): A *quint*, F *-e*, I(H) *-a*, G *Quinte*, Po *kwinta*, R *kvinta*. Pri Eo *kv*, vd. *akvo*.

Propr. "(la) kvina (tono)", el L *quint/us -a* "kvina" (vd. sub *kvin*). Kp spec. la analogan *kvarto*.

**KVINTESENC/O** (1; Jü): AF *quintess/ence*, I *-enza*, G *Quintessenz*, Po *kwintesencja*, R *kvintessencija*, (H *quinta esencia*). Pri Eo *kv*, vd. *akvo*. Ps-sf *-enc*.

El L mez. *quinta essentia* "la kvina elemento [estaĵo]" (la antikva greka filozofio supozis la ekziston de nur kvar elementoj: tero, akvo, aero, fajro; ĉe Artistotelo aldoniĝis la kvina, la plej subtila: etero): *quint/us -a* "kvina" (vd. *kvin*), *essentia* subst. de *esse* "esti" (vd. tiun).

**KVIT/A** (f; EG): A *quit*, F *-te*, (H *-o*), G *quitt*, R *kvit*. Pri Eo *kv*, vd. *akvo*. ¶ Io *quit/a*, Ie *-t*, Ia *-e*.

El L mez. *quit(t)us* s.s., propr. "kvieta (ĉar paginta)", el L *quietus* (vd. *kvieta*, etimologie identan). Kp spec. sekv.

**KVITANC/o** (f; RE): F *quitt/ance*, G *Quittung*, I *quietanza*, Po *kwit*, R *kvitancija*. Pri Eo *kv*, vd. *akvo*. Ps-sf *-anc*. ¶ Io *quit-igo*, Ie *quit/tantie*, Ia *-antia*.

El L mez. *quit(t)antia*, propr. "kvitigo", subst. de *quit(t)are* "kvitigi" el *quit(t)us* "kvita" (vd. tiun).

**KVOCIENT/O** (2; Jü): AF *quotient* (F [-si-]), G *Quotient* [-tsi-], I *quoziente* [-tsi-], (H *cociente*). Pri Eo *kv*, vd. *akvo*. Por Eo *-ci-* el fontlingva *-ti-* [(t)si], vd. Cherpillod 1990, 10 (precipe en la ps-sf *-anco*, *-enco*, *-cio*). ¶ Io *quociento*, Ie *quotient*, Ia *-e*.

Subst.-igo de L adv. *quotie(n)s* "kiomfoje?", der. (per fojindika suf. *-ie(n)s*) de *quot* "kiom da?" (kp *quotus* "kioma?", vd. *kotizi*), pli frue **quoti*, identa kun Sa *káti* "kiom da?", kp Gr *pós(s)os* "kiom granda?".

# L

**LA, L'** (f; Un): FI(H) *la* (fem.); eliziaj formoj: F *l'* (mask. k fem., antaŭvokala), I(H) *-l* (postprepozicia, ekz. *del* "de l'"). Ĉar Eo ĉefe baziĝas sur romanaj morfemoj, estis nature preni la difinan artikolon el tiu lingvogrupo. Tamen ne ekzistas formo komuna por ĉiuj genroj. Z elektis la feminan *la*, eble ĉar ĝi estas komuna al pluraj romanaj lingvoj (la respondaj masklaj formoj estas F *le*, I *il*, H *el*) aŭ ĉar ĝia *-a* egalas al la Ea adjektiva *-a* (la difina artikolo povas esti rigardata kiel kvazaŭadjektivo). La lastan argumenton kontestas Piron (citita en Gold 1980, 335): '*A* ne povas esti rigardata kiel la adjektiva finaĵo, ĉar ĝi ne varias (la patroj kaj ne *laj patroj)'. Sed la artikolo *la* ekzistis jam en pEo, kaj tie ĝi alprenis pluralan finaĵon: *las nacjes*! Piron plue asertas (l.c.), ke He *ha* "la" ludis rolon por Z: ĝi estas fonologie proksima kaj morfologie nefleksebla ('se la influo de He *ha* ne estus forta ĉe Z, li ne estus elektinta *la*, kiu riskis soni strange al personoj parolantaj iun romanan lingvon, ekz. la patro'). Eble He estis la modelo, kiam Z decidis havi difinan sed ne nedifinan artikolon (Piron l.c., 334); la saman modelon ankaŭ prezentis Gr. La demando, ĉu la lingvo havu aŭ ne havu difinan artikolon, laŭlegende estis decidita per sonĝo de Z, vd. Gregor 1982, 6. ¶ 1878 *la* (plur.: *las*). – 1881 *la* (postprepozicia formo *-l*, vd. PVZ 5, 103). – 1894 neniu artikolo. ¶ Io *la*; Ie *li* (vd. de Wahl, Spiritu 31 s. k Berger 1947, 9); Ia *le*.

La romana art. *la* el L *illa* "tiu (fem.)", kp *ille* "tiu (mask.)", vd. *ili*. Kp spec. *li*.

**LABIRINT/O** (1; RE): A *labyrinth*, F *-e*, G *Labyrinth*, I *labirinto, laberinto*, Po *labirynt*, R *labirint*, (H *laberinto*); L *labyrinthus*.

El Gr *labyrinthos* s.s., vorto de pregreka deveno (kp *absinto*), orig. pri la palaco en Knoso (Kreto); eble ligita kun Lidia *lábrys* "hakilo" (dueĝa hakilo estis la simbolo de la Kreta Zeŭso).

**LABOR/I** (f; Un): L *laborare*; I *lavorare*. Kp F *collaborer* "kun-", *élaborer* "el-", (H *colaborar* "kun-", *elaborar* "el-"). Subst.: A *labour* (Us *labor*), I *lavoro*. Ps-sf *-or* 2. ¶ IoIeIa *laborar*, Ia ank. *travaliar* (< F *travailler*, H *trabajar*).

L *laborare* orig. "klopodi, penegi" de *labor* "(peza) laboro, penego" (> F *labeur* "penega laborado") kun necerta etimologio. Kp sekv.

**LABORATORI/O** (8; PV): A *laborat/ory*, F *-oire*, I(H) *-orio*, Po *-orium*, R *-orija*, G *Laboratorium*. Ps-sf *-ori*.

Propr. "laborejo", der. de L *laborare* "labori" (vd. tiun).

**LAC/A** (f; Un): F *las*, I *lasso*, (H *laso*); L *lassus*. Kp A *lassitude* "-eco". La fontlingvoj do indikas *las-*, kiu estis neebla pro

*las/i*; pro tio Z ŝanĝis *s* al *c* (Waringhien LV 77, Modrijan 41, Szerdahelyi 1987, 131). La ŝanĝo estas unika sed sufiĉe natura, ĉar *c* enhavas en si la originan sonon (*c* taŭgis ankaŭ kiel anstataŭaĵo de *t*, vd. *atenci*). ¶ 1894 *fatigat-* (< F *fatigué* ; kp A *fatigue* "-igi, -eco", I *faticare* "-igi", H *fatiga* "-iĝo"). ¶ Io *fatig-ita*, Ie *fatigat*, Ia *lasse, fatigate.*

Orig. probable "malstreĉita, malvigla" aŭ sim. (kp G *lasch* "senenergia, inerta"), de HE rad. **led-* "malstreĉi" (kp *lasi*).

**LACERT/O** (f; RE): L *lacert/us, -a*; A *lizard*, F *lézard*, I *lucertola*, (H *lagarto*). Formo laŭ L (zoologia termino). ¶ Io *lacert/o*, Ie *-e*, Ia *-a.*

Laŭdire ligita kun L *lacertus* "(muskoloj de) la supra brako" (eble pro la fleksebla, moviĝema naturo de la besto), de HE rad. **lek-* "fleksi", ekz. en A *leg* "kruro".

**LAĈ/O** (f; RE): A *lace, latchet* [läĉ-], F *lacet, lacs*, I *laccio* [läĉo], *laccetto* [-ĉ-]. Pluraj el la fontlingvaj formoj estas diminutivaj (AF *-et*, I *-etto*); se oni deprenas la sufikson, restas *lac-*, formo neebla pro la jama *lac/a.* Tamen la prononco de AI montras la vojon al sonŝanĝo *c* > *ĉ* (vd. plurajn ekzemplojn sub *feĉo*). ¶ 1894 *lac-*. ¶ Io *laco*, Ie *lace*, Ia *lacio**.

El L *laqueus* "maŝ(kaptil)o", kp *lacere* "logi" (vd. tiun k *delikata*).

**LAD/O** (f; RE): I *latta.* Kp P *lata*, H *(hoja)lata* s.s. (*hoja* "lameno"). La radiko estas ĝemelo de *lat/o*, vd. Waringhien LV 79: "[F] *latte* [disiĝis] en *lato* (el ligno) kaj *lado* (el metalo)" (F *latte* signifas ankaŭ "ferstango"). Konsonantŝanĝo *t* > *d* por eviti homonimon estas ofta (ĉiam en radikfino), vd. *aldo.* ¶ Io *lad/o*, Ie *-e* (espismoj); Ia *latta.*

Pri la etimologio, vd. *lato.*

**LAF/O** (f; RE): AIR(H) *lava*, F *lave*, G *Lava*, Po *lawa.* La evidenta radikformo **lav-* estis neebla pro *lav/i*; Z ŝanĝis *v* al la responda senvoĉa sono *f* (nur tie ĉi; kutime la konsonantŝanĝoj okazas en mala direkto: de senvoĉa al voĉa konsonanto, vd. *aldo, agordi*). ¶ Io *lavao*, Ieła *lava.*

I vorto kun pridisputata etimologio.

**LAG/O** (f; RE): A *lake*, F *lac*, I(H) *lago*; L *lacus.* Z alprenis la sudromanan formon por eviti kolizion kun *lak/o.* ¶ IoIe *lago*, Ia *laco.*

El HE **lak-* "lago aŭ sim.", kp Ir *loch* "lago", Gr *lákkos* "kavo, cisterno", G *Lache* "flako". Samfamilia vorto en Eo: *laguno.*

**LAGUN/O** (2; Jü): A *lagoon* [-ú:n], F *lagun/e*, IPoR(H) *-a.*

I (orig. venecia) vorto, el L *lacuna* "marĉo, kavo" de *lacus* "lago" (vd. tiun).

**LAIK/O** (3; Jü): A *layman* (*man* "viro") (kp *laic, -al* "-a"), F *laïque* [laík], G *Laie*, I(H) *laico*, Po *laik*; L ekl. *laicus.* Ps-sf *-ik.*

El Gr *laikós* s.s., propr. "ano de la popolo" (kontraste kun la pastraro), de *laós* "popolo" kun nekonata etimologio. Samfamilia vorto en Eo: *liturgio.*

**LAK/O** (f; RE): A *lac(quer)* [-k-], F *laque* [lak], G *Lack*, I *lacca*, Po *lakier*, R *lak*, (H *laca*). ¶ 1894 *vernis-* (< F). ¶ Io =, Ieła *lacca.*

Pere de Hi *lâkh* el Prakrita **lakkha*, identa kun Sa *lâkṣâ* s.s., der. de *lakṣá-* "100 000" (tiel estis nomataj, pro sia ege granda nombro, la insektoj kiuj per siaj pikoj kaŭzas la sekrecion de rezino).

**LAKE/O** (f; RE): A *lackey*, F *laquais* [laké], G *Lakai*, I *lacchè* [laké], Po *lokaj*, R *lakej*, (H *lacayo*). Bazita sur F(I) prononco, apogata de la *e*-vokalo en AR (**lakej-* estus neoportuna pro sufiksimila radikfino). ¶ Io =, Ie *lacayo*, Ia *lacai.*

H vorto kun pridisputata etimologio.

**LAKS/O** (f; RE): La fonto de tiu radiko estas serĉenda en diversaj derivaĵoj: A *lax/ative* "-iga, -igilo", F *-atif* "-etiga", G *Laxativ* "-igilo", I *lassativo* "-etiga", Po *laksacja* "-o", (H *laxante* "-iga, -igilo"); L med. *laxans* "-iga, -igilo". El tiuj derivaĵoj Z, eble kun aparta konsidero al L (medicina termino), ekstraktis la komunan bazon *laks-*, al kiu li donis la signi-

fon "eligado de fluaj ekskrementoj", centra ideo de tiu vortgrupo. ¶ 1894 *diare-*. Kp eo *diare/o* PV (ne ĉe Z), laŭ PV sinonimo de *laks/o*, laŭ Albault (Fund., p. 328) ne konfuzenda kun tiu. ¶ Io *lax-igar*, IeIa *laxar* "-igi".

Derivaĵoj de L *laxare* "malstreĉi" de *laxus* "malstreĉ(it)a" (> A *lax*, F *lâche* s.s.), de HE rad. **(s)leg-* "malstreĉita, pendanta", ekz. en A *slack* "malstreĉita". Vd. ank. sub *lasi.*

**LAKT/O** (f; Un): L *lac* (gen.: *lactis*); F *lait* (kp *lact/é, -aire* "-a"), I *latte*, (H *leche*, kp *lácteo* "-a"). Kp A *lact/eal, -ic* "-a". ¶ Io =, IeIa *lacte.*

El HE **glakt-* s.s., kp Gr *gál/a -aktos* (kp *galanto*). Samfamiliaj vortoj en Eo: *laktuko, selakto.* – Pri sinonima HE radiko, vd. *melki.*

**LAKTUK/O** (Jü): L *lactuca*; A *lettuce*, F *laitue*, G *Lattich*, I *lattuga*, R *latuk*, (H *lechuga*). Bazita sur L (botanika termino). ¶ Ie *latug*, Io *-o*, Ia *lactuca.*

Propr. "lakta (herbo)" (pro la lakteca suko), der. (sufikso kiel en *kaduka*) de *lac lactis* "lakto", vd. tiun.

**LAM/A** (f; Un): A *lame*, G *lahm* [la:m]. Vorto prenita el ĝermanaj lingvoj 'manke de komuna romana formo' (Collinson 1959, 8); ĝi formas triopon kune kun du aliaj adjektivoj signifantaj korpajn difektojn: *blind/a, kripl/a.* – Kolizias radike kun eo *lam/o* Jü, plene internacia (AH *llama*, FIPoR *lama*, G *Lama*; kp Io *lamao*, IeIa* *lama*). Kp ank. *lama/o.* ¶ Io *klaudik-anta*, Ie *claudicant*, Ia *claude* (< L *claud/us* "lama", *-icare* "-i").

Orig. "difekthava", kp Nd,Sk *lam* "paralizita"; par. al R *lomat'* "rompi" (HE rad. **lem-* "rompi, difekti").

**LAMA/O** (2; Jü): AFIPoR(H) *lama*, G *Lama.* Konservita fina *-a* pro *lam/a* (pri aliaj vortoj finiĝantaj per *-a/o*, vd. sub *boao*). ¶ Io =, IeIa *lama.*

El Tibeta *(b)lama* s.s.

**LAMEN/O** (4; Ka): AI *lamina*, F *lame, lamelle* (kp *laminer* "-igi"), G *Lamelle*, (H *lámina*); L *lamina.* Sonŝanĝo *i* > *e* por eviti sufikssimilan radikfinon (vd. sub *abomeni*). ¶ Io *lamo*, Ie *lamin/e*, Ia *-a.*

Latin(id)a vorto (sinkopita formo *lamna* > F; dim. *lamella* > FG) kun nekonata etimologio.

**LAMENT/I** (4; Kabe, Jer, PV): A *lament*, F *se lamenter* (refl.), G *lamentieren*, I *lamentarsi* (refl.), (H *lamentarse*, refl.); L *lamentari.* ¶ IoIeIa *lamentar.*

Der. de L *lamentum* "-o"; la radiko estas par. al L *latrare* "boji" k R *lajat'* "boji" (HE rad. **la-*, kredeble onomatopea).

**LAMP/O** (f; Un): A *lamp*, F *-e*, I *-ada*, PoR *-a*, G *Lampe*, (H *lámpara*); L *lamp/as -adis.* Eo adoptis la mallongan formon reprezentatan per AFGPoR. ¶ Io =, Ie *lamp/e*, Ia *lamp/a, -ada.*

El Gr *lamp/ás -ádos* "torĉo", de *lámpein* "lumi, brili". Samfamiliaj vortoj en Eo: *lampiro, lanterno.*

**LAMPIR/O** (f; RE): L *lampyr/is -idis*; F *lampyre.* Kp P *pirilampo.* Zoologia termino prenita el L (kun *y* > *i* kiel normale, vd. sub *kolimbo*). Z deiris de la nominativa formo kaj eĉ plimallongigis ĝin per apokopo de *-is* kiel en *meleagro, okzalo* (Wüster Esp. princ. 58), tie ĉi eble laŭ F modelo. ¶ Io =, Ie *lampire*, Ia *lampyride.*

El Gr *lampyr/ís -ídos* s.s., de *lámpein* "lumi, brili" (vd. *lampo*).

**LAN/O** (f; RE): F *laine*, I(H) *lana*; L *lana.* ¶ Io =, Ie *lan/e*, Ia *-a.*

El HE **ŭlna* s.s., kp Sa *ûrnâ*, Gr *lênos*, A *wool*, G *Wolle*, Po *wel'na*, Ki *gwlân*, ĉiuj s.s., krome L *vellus* "lanfloko" (vd. *konvulsio*), *villus* "vilo, hirto" (vd. *vila*). Samfamiliaj vortoj en Eo: *flanelo, lanugo.*

**LANC/O** (1; RE): AF *lanc/e*, I *-ia*, Po *-a*, G *Lanze* [-ts-], (H *lanza*); L *lancea.* Eo *-c* havas apogon ortografian de AFIPoL, prononcan de GPo (kp *danci*). ¶ Io =, Ie *lanse*, Ia *lancea.*

Vorto de kelta (gaŭla) origino.

**LAND/O** (f; Un): A *land*, G *Land.* Kp NdSk *land.* Ekster ĝermanaj lingvoj konata kiel elemento de landnomoj, ekz. F *Finlande, Irlande*, I(H) *Finlandia, Irlan-*

*da*, Po *Finlandia, Irlandia*, R *Finlandija, Irlandija*. ¶ 1881 *gur/o* (sen etimo: PVZ 5, 136). – 1894 *paes-* (< F *pays*, I *paese*, kp H *país*). ¶ Io =, Ie *land*; Ia *pais*.

El pĜ **landha-* (kp Gt *land*), par. al Ir *land* "libera spaco" (> A *lawn* "gazono", F *lande* "erikejo"). Etimologie identa kun la dua elemento en *Irlando, Islando*.

**LANG/O** (f; Un): F *langue* [lâ:g], I *lingua*, (H *lengua*); L *lingua*. Kp A *lingual* "-a". Specifa formo laŭ F prononco (la F skribo rezultigus **langv-*) por diferencigi disde la senco "lingvo" de la sama vorto (vd. Wiener 1950, 99; Szerdahelyi 1987, 128). ¶ Io = (espismo); Ie *lingu/e*, Ia *-a* (ambaŭ ank. "lingvo").

Pri la etimologio, vd. la ĝemelan *lingvo*.

**LANTERN/O** (f; Un): A *lantern*, F *-e*, I *-a*, G *Laterne*, Po *latarnia*, (H *linterna*); L *la(n)terna*.

El Gr *lamptêr* "kandelingo, torĉo, lanterno", agantnomo de *lámpein* "lumi, brili" (vd. *lampo*).

**LANUG/O** (f; RE): L *lanug/o -inis*; I *lanugine*. Kp F *lanugineux* "-a", ank. P *lanugem* "-o". Bazita sur la L nominativo kun *-o* transprenita kiel Ea substantivsigno (vd. liston de analogaĵoj sub *homo*). ¶ Io =, Ie *lanug/e*, Ia *-ine*.

Der. de L *lana* "lano" (vd. tiun).

**LAP/O** (8; ER): L *lappa* (L bot. *Arctium lappa*); I *lappa*. Botanika termino prenita el L. ¶ Io *bardan/o*, Ie *-e*, Ia *-a* (< F *bardan/e*, HI *-a*).

Necerta etimologio; kp ev. R *lopuĥ* s.s.

**LAPIS/O** (2; Jü): L *lapis infernalis*; Po *lapis*, R *ljapis*. Kp Sv *lapis*. La Ea radiko estas probable la L nominativo (kiel en *ibis/o, iris/o*). La ideon uzi nur parton de la L esprimo por la tuta nocio donis evidente la slavaj lingvoj; la ceteraj fontlingvoj prezentas tradukojn de la L esprimo (F *pierre infernale*, G *Höllenstein*, I *pietra infernale*, kp H *piedra infernal*; ank. en Eo *infera ŝtono* Ka). ¶ Mankas speciala vorto en la ceteraj L.I. (Io *arjento-nitrato*, Ie *lápide infernal*, Ia *petra infernal*).

L *lap/is -idis* "ŝtono", par. al Gr *lépas* "roko, monto".

**LARD/O** (f; RE): F *lard*, I(H) *-o*; L *lar(i)dum*. Kp A *lard* "porkograso". ¶ IoIa =, Ie *larde*.

Probable par. al Gr *larinós* "grasa".

**LARĜ/A** (f; Un): F *large* [-ĵ], I *largo*. Kp P *largo*. Eo *ĝ* respegulas la ortografion de FI kaj la molan prononcon de F (kp ank. A *large* [la:ĝ] "granda", kiu eble kuninfluis). ¶ 1894 *larg-*. ¶ Io *larja*, Ie *larg*, Ia *-e*.

El L *largus* "sufiĉega, abunda" kun necerta etimologio.

**LARIK/O** (1; Jü): L *lar/ix -icis*; A *larch*, G *Lärche*, I *larice*, (H *alerce*). Botanika termino prenita el L (kun normala traktado de L *-ix*, kp spec. bot. *filiko, saliko*, zool. *heliko, histriko, korniko*: Wüster Esp. princ. 58). ¶ Io *laric/o*, Ia *-e*, Ie *lárice*.

Kredeble de kelta origino.

**LARING/O** (f; RE): L med. *laryn/x -gis*; AF *larynx*, I(H) *laringe*. (Plenan internaciecon havas la derivaĵoj *laring/ito, laringo/logio*.) Estis eble elekti inter L nominativo (AF) kaj stemo (I; ank. en A *larynq/eal, -ic* "-a", F *laryng/é, -ien* "-a"); kiel ĉe la samtempe aperanta *faring/o*, Z preferis la duan. ¶ 1882 *laring-*. ¶ Io =, Ie *lar/ing(e)*, Ia *-ynge*.

El Gr *láryn/x -gos* "laringo, gorĝo", kredeble kreita per kunfandiĝo de *laimós* "gorĝo" k *phárynx* "gorĝo, faringo" (vd. tiun).

**LARM/O** (f; Un): F *larme*, I *lacrima*, (H *lágrima*); L *lacrima*. Kp A *lachrymal* "-a". Bazita ekskluzive sur F por eviti maloportunan homonimecon **lakrim/o* : *la krim/o*. ¶ 1881 *larm-*. – 1894 *lakrim-*. ¶ Io *lakrimo*, Ie *lácrime*, Ia *lacrima*.

En L ant. *dacruma* (pri la alterno *d/l*, kp. sub *lingvo*), el Gr *dákryma* s.s., der. de *dakryein* "plori" de *dákry* "larmo" el HE **dakru*, kp A *tear*, G *Träne* "larmo".

**LARV/O** (f; RE): AI(H) *larv/a*, F *-e*, G *Larve*, Po *larwa*.

El L *larva* "masko" (G *Larve* ank. "masko"),

kiel zoologia termino unuafoje ĉe Lineo (larvo estas kvazaŭ alivestiĝo de papilio), ank. "fantomo, malbona spirito", der. de *Lar* "protekta (familia) spirito", eble de etruska origino.

**LAS/I** (f; Un): F *laisser* [lesé], I *lasciare* [laŝ-]; G *lassen* (inter la kunmetoj, kp G *ver/lassen* = Eo *for/lasi*). Bazita sur la akordo de G kun F; eble I kontribuis al adopto de la G vokalismo. Eo *-s* el fontlingva *-ss-*. ¶ 1881 *lass-*. ¶ Io *lasar*, IeIa *lassar*.

La simileco de FI k G estas nur hazarda, ne dependanta de parenceco (kp la kazon *havi*): FI el L *laxare* "mal/ligi, -streĉi" (vd. sub *lakso*); la G formo reprezentas specifan evoluon (*ss* < *t*) de pĜ **letan* (Gt *letan*, A *let*, Nd *laten*, Sv *låta* "lasi"), par. al L *lassus* "laca" (vd. tiun), Gt *lats* "malvigla" (kp *lasta*) de HE rad. **led-* "malstreĉi".

**LAST/A** (f; Un): A *last*, G *letzt*. Kp Nd *laatst*. Bazita sur A. Kp Collinson 1959, 7:'por *last*...ebla alternativo estus *ultim* kiel en la itala kaj hispana (sed F *dernier*)'. ¶ 1881 *trem/a* (< L *extremus* "plej ekstera; lasta"). ¶ Vp *lätik* (vd. Golden en Lin kaj Ni, 407), Io = (espismo); Ie *ultim*, Ia *-e* (< I *ultimo*, H *úl-*).

Superlativo (suf. *-st*) de ĝerm. adj. signifanta "malfrua": A *late*, Nd *laat*, kp Gt *lats* "malvigla" (vd. *lasi*).

**LAT/O** (4; Jü): A *lath*, F *latte*, G *Latte*, Po *l'ata*. Kp Nd *lat*. ¶ Io =, Ie *latte*; mankas en Ia (*longe planca tenue* Ruhrig).

El pĜ **latto*, **lattho*, par. al G *Laden* "butiko" (orig. "tabulo" > "vendotablo") k Ki *llath* "vergo". Ĝemela radiko: *lado*.

**LATER/O** (; Jü): L *lat/us -eris*; I *lato*, (H *lado*). Kp A(H) *later/al*, I *-ale*, (H *-al*), F *latéral* "-a". La fonto povas esti la internacia adjektivo aŭ la L stemo. Tiu ĉi latindevena vorto estas utiligita kiel specialiga diferencigo disde *flank/o* (de ĝermana origino). ¶ Io =, Ie *látere*; Ia *latere* (ank. "flanko").

L *latus* "latero" k ĝenerale "flanko"; ĉu samradika kun *latus* "larĝa" (vd. sekv.) aŭ par. al Ir *leth* "flanko"? .

**LATITUD/O** (8; Ve,PV): AF *latitud/e*, I *-ine*, (H *latitud*). Ps-sf *-tud*.

El L *latitud/o -inis* "larĝo" (kp G *geographische Breite* 'geografia larĝo') de *latus* "larĝa", orig. "sternita", el **stlatos* de HE rad. **stla-*, ekz. en R *stelit'* "sterni". Kp ev. la antaŭan.

**LATUN/O** (1; Jü; kp *flava kupro* UV): F *laiton*, I *ottone*, R *latun'*, (H *latón*). Kp A *latten*† s.s.; la traduko *Latun* en Jü indikas, ke la vorto iam ekzistis ankaŭ en G. Bazita sur R (plus G?), kvankam formo finiĝanta per *-on* estus tute ebla: parala la kazo ŝajnas esti *katun-* (vd. tiun), sed tie necesis diferencigo disde *koton-*. ¶ Io =, Ie *latune* (espismoj); Ia *laton*.

Kredeble el Ar *lâtûn* "kupro", de turka origino (kp Tu *altin* "oro").

**LATV/O** (8; N-ro 29 1889; *lett-* E-isto 5/1895, ank. *Leton-* GD,PIV): A *Latvian*, Po *L'otysz* (kp *L'otwa* "-io"), R *latyŝ* (kp *Latvija* "-io"); kp F *Letton*, G *Lette*, I *lettone*, (H *letón*). Z evidente bazis la radikon sur la unua grupo, al kiu estas aldonendaj la latvaj formoj: *latvis* "-o", *Latvija* "-io". La postaj provoj ŝanĝi la radikon sin apogas sur ĝermana-latinida internacieco (eble kontribuis deziro pli klare diferencigi tiun ĉi radikon disde *litov-*). ¶ Io *Latvi-ano*, Ie *Letton*, Ia *latviano*.

Eble laŭ rivernomo *Late* (analoge al la popolnomo *litov-*, pri kiu detale Albault, PL 12/1984, 13/1985).

**LAŬ** (f; Un): G *laut* 'konforme al' (Waringhien 1946, 23). Kp Ji *loyt* s.s. Apokopo de *-t* (*laŭt-* havas alian signifon; fina *-aŭ* bone kombiniĝas kun la artikolo *la*, ofta ĉe tiu ĉi prep.). La plivastigo de la senco (en Eo ank. 'laŭlonge de') supozeble estis inspirita de la ekvivalentoj en aliaj fontlingvoj (L *secundum*, I *secondo*, Gr *katá*). Pri la eventuala influo de *laŭ* al kreado de la "neŭtrala" vortfino *-aŭ*, vd. la liston de pseŭdosufiksoj. ¶ 1881 *laŭl* "laŭ la". – 1894 *sekondu*. ¶ Io *segun*,

Ie *segun* > 1926 *secun* (vd. Berger 1947, 15), Ia *secundo* (< LI, vd. supre; H *segun*).

Mallongigo de formulo en G mez. *nâch lût* (ekz. *des brieves*) "laŭ la teksto [la sono] (de la letero)", kie *nach* signifas "laŭ" k *lût* "sono" (> G *Laut*, vd. *laŭta*).

**LAŬB/O** (f; RE): G *Laube*. ¶ 1894 *fraskat-* (< I *frascato*). ¶ Io =, Ie *laube* (espismoj); Ia *pergola* (< I).

El G mez. *loube* "portiko, galerio" (nuna senco influita de *Laub* "folio"), penetrinta en romanajn lingvojn (> F *loge*, I *loggia* "loĝio"), el pĜ **laub(ja)* "subtegmentejo", orig. kredeble "tegmento el arboŝelo" (tiuokaze de HE **lubh-* "basto", vd. *libro*). Etimologie identa: *loĝio*, samfamilia ank. *loĝi*. Kp ank. *lifto*.

**LAŬD/I** (f; Un): L *laudare*, F *louer*, I *lodare*. Kp A *laud/atory*, F *-atif* "-a", I *-abile*, (H *-able*) "-inda". ¶ 1894 *lavd-*. ¶ IoIeIa *laudar*.

De L *lau/s -dis* "-o", orig. "laŭda mencio", par. al G *Lied* "kanto", Gt *liuthon* "prikanti, himni".

**LAŬR/O** (f; RE): L *laurus*; A(H) *laur/el*, F *-ier*, G *Loorber* (kp *Beere* "bero"), I *alloro*, *lauro*, Po *laur*, R *lavr*. Bazita sur L (botanika termino). ¶ 1894 *lavr-*. ¶ IoIa =, Ie *laure*.

Iel ligita kun Gr *dáphnê* s.s. (pri alterno *d/l*, vd. sub *lingvo*): ambaŭ povas esti pruntitaj el mediteranea lingvo. Samfamilia vorto en Eo: *laŭreato*, ev. *oleandro*.

**LAŬREAT/O** (2; Jü): A *laure/ate*, I *-ato*, Po *-at*, (H *-ado*), F *lauréat*. Ps-sf *-at*.

El L *laureatus* "laŭrokronita" de *laurea* "laŭrokrono" (ofta premio de venkinto), der. de *laurus* "laŭro" (vd. tiun).

**LAŬT/A** (f; Un): A *loud* [laŭd], G *laut*. Kp Nd *luid*. Bazita sur G kun apogo de A prononco. Kp Collinson 1959, 8: '*laŭt*...estas pli mallonga kaj pli specifa ol It. alto aŭ forte, Sp.[=H] altavoz, Fr. haut'. (H *altavoz* signifas "laŭtparolilo"; legu *en voz alta*). Endas aldoni, ke Eo *alt-* havas esence alian signifon kaj ke F *haut* [o] estas preskaŭ neasimilebla. ¶ Io = (espismo). Mankas vorto specifa en Ie (*vocosi*, *fort*) kaj Ia (*alte*, *forte*).

Propr. "aŭdata", ĝerm. participo (pĜ **ĥlûdhaz*) identa kun Gr *klytós*, L *in-clutus*, Sa *crutá-* "fama", orig. "priparolata", de HE rad. **kleŭ-/klu-* "aŭdi", kp Sa *crnóti* "aŭdas", L *cluere* "aŭdi certan nomon, nomiĝi" (kp *aŭskulti*), A *listen* "aŭskulti", G *Laut* "sono" (kp *laŭ*), R *slušat'* "aŭskulti".

**LAV/I** (f; Un): L *lavare*, F *lav/er*, I *-are*, (H *-ar*). Kp A *lavatory* "-ejo†; necesejo", G *Lavoir*† "lavomeblo". ¶ IoIeIa *lavar*.

De HE rad. **loŭ-* "lavi", kp Gr *loúein* "bani sin"; A *lye*, G *Lauge* "lesivo". Samfamilia vorto en Eo: *lavendo*.

**LAVANG/O** (f; RE; *lavin-* Grabowski): AF *avalanch/e*, (H *-a*), G *Lawine*, I *valanga*, Po *lawina*, R *lavina*. Ne tute klara formestiĝo; tri ebloj prezentas sin: (a) la Ea formo estas miksformo el ĝermana-slava komenco (*lav-* laŭ GPo R) kaj romana fino (*-ang-* laŭ I *-anga*, F *-anche*). Tamen la plimulto de Eaj kompromisaj formoj ne estas faritaj laŭ tiu modelo sed konsistas el intermiksiĝo de unuopaj sonoj. (b) la formo baziĝas sur I kun metatezo de *v-l* (tio ŝajnas esti la opinio de Szerdahelyi 1987, 126); la motivo kompreneble estus adapto al la formoj de la ceteraj fontlingvoj. (c) Z konstruis la formon laŭ F *lavange*† (18a jc); la F tradukoj *lavanche/lavange* en UV indikas, ke la fontverko de Z prezentis tiujn formojn. Persone mi inklinas al tiu klarigo. Ĉiuokaze, la ĝermana-slava fino kun *-in-* ne estis akceptebla por Z. – Detala pritrakto de Albaut en FE 225/1964, 35. ¶ Io *avalanch/o*, IeIa *-e*.

La AFI formoj el iu alpa latinida dialekto, kp Oc ant. *lavanca*, Savoja *(a)valantse* (la formojn kun *a-* influis F *aval* "valen"), el **labinca*, supozeble de prelatina origino. – La GPoR formoj el L postkl. *labina* "defalo", der. de *labi* "defali, gliti" (vd. sub *lobo*).

**LAVEND/O** (1; Jü): A *lavend/er*, R *-a*, F *lavand/e*, I *-a*, G *Lavendel*, Po *lawenda*,

(H *lavándula*); L bot. *Lavandula.* Radiko bazita sur la komuna vortparto en la diversaj fontlingvoj; la vokalo *-e-* aperas havi iom pli grandan apogon ol *-a-*. ¶ Io =, Ie *lavende*, Ia *lavandula.*

El L mez. *lavandula*, der. de L *lavare* "lavi" (la kreskaĵo estis uzata ĉe lavado k banado pro sia bonodoro); vd. *lavi.*

**LAZUR/O** (1; Jü): F *azur*, A *-e*, G *Azur*, I *azzurro*, Po *lazur*, R *lazur'*, (H *azul*). Radikkomenco laŭ la slavaj formoj; komenca *l-* aperas ankaŭ en la apartenanta mineralnomo ('lazur/ŝtono, -ito'): F *lazurite*, G *Lasurstein*, kp AF *lapis(-)lazuli.* ¶ Ie *azur*, IoIa *-o.*

La romana formo estis orig. *lazur* (*l-* estis poste erare konsiderata kiel difina artikolo) el Ar *lâzuward* "lazurŝtono" el Pe *lâĵward* s.s.

**LECION/O** (f; Un): A *lesson*, F *lecon*, G *Lektion*, I *lezione* [-ts-], Po *lekcja*, (H *lección*). La vorto estas etimologie identa kun *lekci/o* (kiu envenis la lingvon pli malfrue). Oni do konstatas ke la traktado de la ps-sf *-cio* ĉi tie estas nenormala (oni atendus **leci/o* laŭ Silfer, PL 10/1984). Sed la L originformo en tiu ĉi vorto jam de longe perdis sian propran sencon ("legado"), kaj la formo estas bazita sur modernaj lingvoj: unuavice I, duavice F kaj A. (Du aliaj radikvortoj, kie Eo montras la saman traktadon de la ps-sf, estas faritaj por eviti homonimojn: *komision/o* pro *komisi/o*, *pension/o* pro *pensi/o.*) ¶ 1894 *lezion-*. ¶ Io =, Ie *lecion*, Ia *lection.*

Orig. "prelego, legado", el L *lect/io -ionis* "legado" de *legere* "legi" (vd. tiun; kp la etimologie identan *lekcio*).

**LED/O** (f; RE): A *leather* [lédhe'], G *Leder.* Kp Nd *leder.* Bazita sur G kun apokopo de neakcentata vortfino (kp *glimo, kelo, klafto*). Laŭ Collinson 1959, 5, 'pli facile asimilebla ol formo bazita sur L corium (It. cuoio, Sp. [=H] cuero, F cuir)'. ¶ 1894 *kori-*. ¶ Io *ledro*; Ie *cute* (< L *cutis*); Ia *corio.*

El pĜ **lethra-*, identa kun Ir *lethar* s.s.

**LEG/I** (f; Un): L *legere*; F *lire* (kp *lecture* "-ado"), I *leggere*, (H *leer*, kp *legible* "-ebla"). Kp A *legible* "-ebla", G *Lektüre* "-ado, -aĵo". Egala al la L prezenca radiko; la supina radiko (*lect-*) estis proponata de Z en 1894: *lekt-*. ¶ Io *lektar*, Ie *leer*, Ia *leger.*

Orig. "kolekti, pluki" ("kolekti literojn" > "legi", kp semantike G *lesen* "kolekti; legi"), ank. "elekti", identa kun Gr *légein* "kolekti; paroli" (vd. *logiko*). Parencaj vortoj en Eo: *leciono, legendo, legio, legomo, lekcio; akvilegio, diligenta, eleganta, elekti, inteligenta, kolekti, neglekti, negliĝo.*

**LEGAT/O** (2; Jü): PoR *legat*, A *-e*, I *-o*, F *légat*, G *Legat*, (H *legado*); L *legatus.* Ps-sf *-at.*

Propr. "komisiito", subst.-igita ptc. perf. de L *legare* "komisii" (kp *delegare* "delegi"), propr. "leĝe deputi", der. de *le/x -gis* "leĝo" (vd. tiun).

**LEGEND/O** (f; Du,RE): A *legend*, PoR *-a*, F *légende*, G *Legende*, I *leggenda*, (H *leyenda*); L mez. *legenda.* Ps-sf *-end* (Eo *-end-* oficialiĝis nur en 1952).

Mezepoka L vorto el L *legenda* "leg/endaĵoj, -indaĵoj", gerundivo de L *legere* "legi" (vd. tiun).

**LEGI/O** (f; RE): L *leg/io -ionis*; AR *legion*, I *-e*, F *légion*, G *Legion*, Po *legia, legion*, (H *legión*). Anstataŭ la stemo de la modernaj lingvoj finiĝanta per *-n*, Z bazis la radikon rekte sur la L nominativo; tio konformas al la traktado de la ps-sf *-cio* kaj al kelkaj aliaj: *opini/o, religi/o.* ¶ IeIa *legion*, Io *-o.*

Propr. "elektit(a soldat)aro", der. de *legere* "elekti, kolekti" (vd. *legi*).

**LEGITIM/I** (3; Jü): A *legitim/ate*, G *-ieren*, (H *-ar*), F *légitimer*, I *legittimare*, Po *legitymowac'.*

Propr. "fari (laŭ)leĝa", der. de adj. G *legitim*, A *-ate*, F *légitime*, I *legittimo*, H *legítimo* "(laŭ)leĝa" el L *legitimus* s.s., der. de *le/x -gis* "leĝo" (vd. tiun). Por la sufikso, kp F ktp *maritime* "mara".

**LEGOM/O** (f; RE): F *légume*, I *legume*, (H *legumbre*); A *legumes* (plur.) "-oj". Ea vokalismo *-o-* sen apogo en la fontlingvoj, supozeble por evitigi asociadon al la sufikso *-um*; la ŝanĝo *u* > *o* okazas plej ofte en la analoga kazo *ul* > *ol*, vd. *artikolo*. Kontrastas *volumo*. ¶ Io *legum/o*, Ie *-e*, Ia *-ine*.

El L *legu/men -minis* "legumenaco" (kp L bot. *Leguminosae* "-acoj"), spec. "fabo, pizo", orig. kredeble "pluk/aĵo, -ebla frukto", der. de *legere* "kolekti, pluki" (vd. *legi*).

**LEĜ/O** (f; Un): L *le/x -gis*; F *loi*, I *legge* [léĝe], (H *ley*). Kp AG(H) *leg/al*, I *-ale*, Po *-alny*, R *-al'nyj*, F *légal* "(laŭ)leĝa". Jene Silfer, PL 10/1984, 19: "...en la kampo de la monosilabaj nominativoj apartenantaj al la tria deklinacio, kun finaĵo 'x', ni rimarkas ke Zamenhof preferis la akuzativon [= la stemon], se ĝi enhavis 'ĝ': *precem* > *preĝo*, *legem* > *leĝo*". La *ĝ* estas ĉi tie por eviti homonimon (*leg-*!); ĝi trovas apogon en I prononco. Tute paralela estas *reĝ/o* (pro *reg-*). Se tia risko ne troviĝas, restas la stemfina *-g*: *strig/o*. Kp Cherpillod 1990, 11; Szerdahelyi 1987, 120. ¶ 1881 *ledz'-*. – 1894 *leg-*. ¶ Io *lego*, Ie *ley* > *lege*, Ia *lege*.

Eble par. al A *law*, Sv *lag* "leĝo", orig. "(io) metita = (io) fiksita", kp A *lay*, Sv *lägga*, G *legen* "meti" (kp semantike G *Gesetz* "leĝo" : *setzen* "meti", Gr *thémis* "leĝo" : *tithénai* "meti"). – Aliaj asertas, ke L *lex* estas samradika kun *legere* "kolekti" (vd. *legi*), ĉe kio la semantika evoluo restas neklara ("kolekto de leĝoj" > "leĝaro" > "leĝo"?). – Samfamiliaj vortoj en Eo: *delegi*, *kolego*, *legato*, *legitimi*, *lojala*.

**LEK/I** (f; RE): A *lick*, F *lécher*, G *lecken*, I *leccare*. Verŝajne bazita sur G (ankaŭ I donus la saman rezulton). ¶ Io *lekar*, IeIa *leccar*.

Ĝerm. vorto (F < Fk **lekkôn*; kp Gt *laigôn*) de HE rad. **l(e)igh-* "leki", kp Sa *lehmi* "mi lekas"; Gr *leíkhein* (vd. *likeno*), L *lingere*, Po *lizac'*, R *lizat'*, ĉiuj "leki".

**LEKANT/O** (f; EG): L bot. *Chrysanthemum leucanthemum*. Bona klarigo de la Ea formo ĉe Waringhien 1980, 133: "La latina nomo...donus normale en nia lingvo **levkantemo* (kp *levkojo* kaj *krizantemo*); sed la ŝajna akumuliĝo de tri homonimaj radikoj (lev + kant + em) malplaĉis al Zamenhof, kiu simpligis per *lekanto*, ne evitante tamen konfuzon kun la participo de *leki*; kial li ne elektis ian **leŭkanto*...estas neklare." Kurioze ekzistas ankaŭ unu (zoologia) ekzemplo de la inversa monoftongigo kiu donas la saman rezulton: L *carduelis* > Eo *kardelo*. ¶ Io *màrgrito*, Ie *margarit/e*, Ia *-a* (< F *marguerite*, H *margaritón*, I *margherita*).

Bot. specia nomo, propr. "blanka floro", kreita el Gr *leukós* "blanka" (vd. sub *lumo*; kp *levkojo*) k *ánthemon* "floro" (vd. *krizantemo* k plue *antologio*).

**LEKCI/O** (3; E-isto 2/1891,FK,PV): F *lecon* (ank. "leciono"; sin. *conférence*), I *lezione* (ank. "leciono"; sin. *conferenza*), R *lekcija*. Kp A *lecture*, (H am. *lectura*). Verŝajne ekzemplo de latindevena vorto (vd. sube) akceptita kun rusa semantiko. Ps-sf *-cio* (kp *leciono* kun alia formo de la sufikso). – Pri la konkurenco kaj (kvazaŭ)sinonimeco de *lekcio/prelego*, vd. Albaut, FE 239/1966, 53. ¶ Io *leciono*, Ie *lection*, Ia *conferentia*.

El L mez. *lect/io -ionis* s.s., en L klas. "leg-(ad)o", de *legere* "legi" (vd. tiun).

**LEKSIKON/O** (f; RE): A *lex/icon*, F *-ique* [-ík], G *Lexikon*, I *lessico*, Po *leksykon*, R *leksikon*, (H *léxico*). Adopto (kial?) de la plena internacia formo, enkorpigante ankaŭ la originan Gr nominativan finaĵon *-on* kiel en *stadion/o* (kutime *-on* forfalas kiel en *embri/o*, vd. tiun). ¶ Io *lexiko*, IeIa *lexico*.

El Gr *lexikón* s.s., propr. "vorta (libro)", adj. de *léxis* "vorto, gloso, parolo", subst. de *légein* "paroli" (vd. *logiko*).

**LENS/O** (4; Ve,Ka): A *lens*, F *lentille*, G *Linse*, I(H) *lente*, R *linza*. Ĉar la formo *lent-* jam havis alian signifon, oni por la optika senco ekuzis *lens-* laŭ A. Kp la

analogan kazon *mens/o* : *ment/o*. ¶ Io =, Ie *lentille*, Ia *lente*.

Etimologie identa kun *lento*, vd. tiun. La optika lenso estis tiel nomata pro ĝia simileco al lenta semo.

**LENT/O** (f; RE): L *len/s -tis*; A *lentil*, F *-le*, G *Linse*, I *lenticchia*, (H *lenteja*). Bazita sur la L stemo (analoga al *dent/o*, vd. s.t.v.). Tiu ĉi radiko estas pli frua ol la diferencigo *lens/o*, kp tiun (la FG vortoj havas ambaŭ sencojn). ¶ Io *lenso*, Ie *linse*, Ia *lente*.

L *lens* (dim.: *lenticula*, el kiu la AFHI formoj) estas de nekonata origino. – Etimologie identa: *lenso*; samfamilia ankaŭ *lentugo*.

**LENTUG/O** (f; RE): L *lentig/o -inis*; F *lentille*, I *lentiggine*. Medicina termino bazita sur L (kies finvokalo fariĝis Ea substantivsigno) kun vokalmodifo *i* > *u* (vd. sub *dungi*), evidente por eviti aspekton de vorto formita per sufikso *-ig*; nek ev. **lentigin-* estus oportuna pro la radikfino *-in*. ¶ Ie *lentig/e*, Io *-ino*, Ia *-ine*.

Propr. "lentec(a makul)o", der. de L *len/s -tis* "lento" (vd. tiun).

**LEON/O** (f; Un): L *le/o -onis*; A *lion* (kp *lenonine* "-a"), F *lion* (kp *léonin* "-a"), G *Löwe*, I *leone*, Po *lew*, R *lev*, (H *león*). Bazita sur la L stemo (zoologia termino), kiu aperas ankaŭ en AFI. ¶ Io =, IeIa *leon*.

El Gr *lé/ôn -ontos* s.s., pruntvorto de nekonata origino. Samfamiliaj vortoj en Eo: *leontodo*, *leopardo*.

**LEONTOD/O** (f; RE): L bot. *Leontodon*, nomo signifanta "leondento" kaj kreita laŭ modelo de F *dent-de-lion* (> A *dandelion*), I *dente di leone* (kp Po *lwi zab*) ktp. Z preferis la L nomon, ĉar temas pri botanika termino. Apokopo de fina *-n* por ne krei tro longan vorton; la antaŭa *o* oportune fariĝis Ea substantivsigno (iel analogaj estas la kazoj cititaj sub *embrio*; kp ank. *homo*). ¶ Io *leon-dento*, Ie *leontodon*, Ia *dente de leon*.

Kreita de Lineo el Gr *lé/ôn -ontos* "leono" (vd. tiun) k *od/oús -óntos* "dento" (vd. s.t.v.). La kreskaĵo estis tiel nomata pro la grandaj, akraj 'dentoj' de la folioj.

**LEOPARD/O** (f; RE): AR *leopard*, I(H) *-o*, F *léopard*, G *Leopard*, Po *lampart*; L postkl. *leopardus*.

El Gr *leópardos* s.s., kunm. de *léôn* "leono" (vd. tiun) k *párdos* (normale *párdalis*) "pantero", vorto el nekonata orientlanda fonto.

**LEPOR/O** (f; RE): L *lep/us -oris*; F *lièvre*, I *lepre*, (H *liebre*). Kp A *leveret* "-ido". Zoologia termino bazita sur la L stemo. Alia traktado ol en *corp/us -oris* > *korp/o*, *temp/us -oris* > *temp/o*, kie tamen aliaj fontlingvoj prezentas mallongan formon; tie ĉi, kiel montras la formoj FI(A), la *r* estas esenca parto de la nomo (kp ank. L zool. *Leporidae* "-edoj"). ¶ Io =, Ie *lépor*, Ia *lepore*.

L vorto de ibera origino; kp F *lapereau* "kuniklido", *lapin* "kuniklo".

**LEPR/O** (f; RE): L *lepra*; A *leprosy*, F *lèpre*, G *Lepra*, I *lebbra*, (H *lepra*).

El Gr *lépra* s.s., propr. "fava, skvama (malsano)", de *leprós* "skvama", kp *lépein* "sen/ŝeligi, -skvamigi".

**LERN/I** (f; Un): A *learn*, G *lernen*. Kp Nd *leren*. La ĝermana radiko estas elektita, laŭ Collinson 1959, 10, 'ĉar uzado de It. apprendere, Sp. [= H] apprender [tiele!], F. apprendre konfliktas kun la signifo de apprehend en la angla' (A *apprehend* "aresti; kompreni"). Al tio aldoniĝas pli oportuna fonetika formo. ¶ 1894 *aprend-*. ¶ Io *lernar* (espismo); Ie *aprender*, Ia *apprender*.

El pĜ **liznan*, apofonia formo de la radiko troviĝanta en Gt *lais* "mi scias", propr. "mi sekvis spuron" = "mi esploris", kp Gt *laists* "spuro", G *(Ge)leise* "reloj" k L *lira* "sulko" (vd. *deliri*).

**LERT/A** (f; Un): Laŭ komuna opinio (Waringhien LV 76, Blanke 1985, 250, Szerdahelyi 1987, 135) el F *alerte* (kp A *alert*) "vigla, rapidmova", modifita forme kaj sence: forme per aferezo (oni

komparas *boji* < F *aboyer*, *kluzo* < F *écluse*, *terni* < F *éternuer*); sence per proksimuma semantika evoluo "vigla" > "viglintelekta" > "lerta" (la kaŭzo estus, laŭ Waringhien l.c. 81, "deziro proksimigi tiun vorton al la rusa *lovkij* ['lerta']". Entute ne tre konvinka klarigo; eble estus pli bone serĉi la fonton en L *soll/ers -ertis* "lerta" (kun ellaso de la unua elemento): oni trovas tie la sonsekvon *-lert-* kaj la ĝustan sencon. ¶ Io *habila*, Ie *habil*, Ia *– e* (< F *habile*, H *hábil*, I *abile*).

(F *alerte* el I *all'erta*, propr. "sur la altaĵon" (orig. vokkrio de gardsoldatoj = 'atentu!') – (L *sollers* kunm. de *sollus* "tuta" k *ar/s -tis* "arto".).

**LESIV/O** (f; RE): F *lessive*, I *lisciva* [-ŝ-], (H *lejía*); L *lixiv/ia*, *-(i)um*. Bazita sur F (kun intervokala *-s-* el F *-ss-*). ¶ Io *lesivaquo*, Ie *lixiv/e*, Ia *-ia**.

Der. de L *lixa* "lesivakvo", propr. "fluidaĵo", par. al *liquor* "fluidaĵo" (vd. *likvoro*).

**LETARGI/O** (1; RE): A *lethargy*, Po *letarg*, I *-ia*, R *-ija*, (H *-ía*), F *léthargie*, G *Lethargie*; L *lethargia*. Ps-sf *-i* 1.

El Gr *lêtharg/os*, *-ía* s.s., kredeble kunm. de *lêthê* "forges(em)o" k *argós* "neagema" el *a-* "ne-" k *érgon* "ago, laboro" (vd. ps-pf *a[n]-* resp. *verko*).

**LETER/O** (f; Un): A *letter*, F *lettre*, I *lettera*; L *litterae* (plur.). Radikfino laŭ AI; vokalismo laŭ la tri modernaj fontlingvoj (komparu tamen la ĝemelan *liter/o*). ¶ 1881 *briv/o* (< G *Brief*). – 1894 *letr-*. ¶ Io *letro*, Ie *lettre*, *epístul* (< L *epistula*), Ia *littera*, *epistola*.

Pri plua etimologio, vd. *litero*.

**LEŬTENANT/O** (f; RE): AF *lieutenant*, G *Leutnant*, I *luogotenente*, R *lejtenant*, (H *teniente*). La F formo disvastiĝis en AGR (kp ank. Sv *löjtnant*) kaj do estas iomgrade internacia, tamen malfacile asimilebla: Eo *leŭ-* povas esti simpligo de F *lieu-* (ekzaktaj paraleloj mankas) aŭ transskribo de G *Leu-*. Z evidente evitis la R formon, facile transpreneblan. Ps-sf *-ant*. ¶ 1894 *lietenant-*. ¶ Io *lietnanto*, Ie *leutenante*, Ia *locotenente*.

Propr. "tenanta la lokon (de iu)" (do "anstataŭanto"): F *lieu* "loko" (vd. tiun), *tenant* ptc. prez. de *tenir* "teni" (vd. tiun). La I vorto estas analoga, same kiel la plena H formo *lugarteniente*.

**LEV/I** (f; Un): F *lever*, I *levare*, (H *levantar*); L *levare*. Kp A *elevate* s.s. ¶ 1881 *lev-*; kp 1882 *lef-* "leviĝi". ¶ IoIeIa *levar*.

L *levare* (kunm. *elevare* s.s.) orig. "malpezigi", der. de *levis* "malpeza", par. al A *light*, G *leicht*, R *lëgkij* s.s., Sa *laghú-* "malpeza, malgranda", Gr *elakhys* "malgranda, malmulta" (HE adj. **leghu-*). Kp ev. *karnavalo*.

**LEVKOJ/O** (f; RE): G *Levkoje*, Po *lewkonia*, R *levkoj*. Kp Sv *lövkoja*. Aperas kiel nura transskribo de G, sed la R formo donas identan rezulton. ¶ Io *jilfloro* (< A *gillyflower*, F *giroflée*), Ie *gilliflor*, Ia *matthiola* (< L bot. *Matthiola*).

El Gr *leukóïon* s.s., propr. "blanka violo" (pro la heleco de la folioj resp. la odoro): *leukós* "blanka" (vd. sub *lumo*; kp *lekanto*), *íon* "violo" (vd. tiun).

**LI** (f; Un): Konsistas el *-i*, vokalo finanta ĉiujn pronomojn personajn (vd. *mi*), kaj la konsonanto *l-*, troviĝanta en la triapersona maskla pronomo en la romanaj fontlingvoj: F *il* "li", *le* "lin", *lui* "li; al li, lin"; I *egli* "li", *lo* "lin", *lui* "li(n)", (kp H *él* "li", *le* "al li, lin", *lo* "lin"). Kredeble F *il* ludis elstare gravan rolon ĉe la elekto. La ceteraj fontlingvoj ne prezentas komunan konsonanton (A *he*, G *er*, R *on*). ¶ 1881 *ro* "li", kp *ra* "lia" (sen etimo en PVZ 5, 145; ĉu G *er*?). – 1894 *lu* "li". ¶ Io *il(u)*; Ie *il* "li", *le* "lin"; Ia *ille* "li" (< L, vd. sube), *le* "lin".

F *il*, H *él*, I *egli* el L **illi*, vulgara formo (farita laŭ L *qui* "kiu") de *ille* "tiu" (vd. *ili*, kp *la*).

**LIAN/O** (f; RE): AIPoR(H) *lian/a*, F *-e*, G *Liane*.

F vorto kun dial. var. *lierne*, probable kruciĝo de F *lier* "ligi" k *viorne* "viburno" (vd. tiujn).

**LIBAN/O** (8; Ps,ZR): A *Lebanon*, FPo

*Liban*, G *-on*, I *-o*, R *Livan*, (H *Líbano*). ¶ IoIa *Libano*, Ie *Liban(o)*.

La lando (Ar *Lubnân*) estas nomita laŭ sia ĉefa montaro (eo *Lebanon/o* Jeĥ); la nomo devenas de radiko signifanta "blanka" (He *laban*), "verŝajne pro la neĝaj pintoj de la montoj" (Cherpillod 1989, 34).

**LIBEL/O** (f; RE): F *libell/ule*, I *-ula*, G *Libelle*, (H *libélula*); L zool. *Libellula*. Apokopo de *-ul* (laŭ modelo de G) por eviti sufikssimilan radikfinon (kaj ripeton de *l*). ¶ Io *libelulo*, Ie *libéllul*, Ia *libellula**.

Termino kreita el L *libella* "nivelilo" (pro la horizontala teniĝo de la aloj dum flugado de la insekto), dim. de *libra* "pesilo; funto" (vd. sub *litro*; kp ank. *nivelo*).

**LIBER/A** (f; Un): L *liber*; F(H) *libre*, I *libero*. Kp A *liberty* "-eco". La L adjektivo konservas *-e-* en ĉiuj formoj (kp *mizera*); pri homonima L vorto, vd. *libro*. ¶ Io =, Ie *líber*, Ia *libere*.

Identa kun Gr *eleútheros* s.s., ambaŭ el HE **leŭdhero-*, propr. "apartenanta al la (libera) popolo", de **leŭdho-* "popolo", kp R *ljud*, Po *lud* "popolo", G *Leute* "homoj". Samfamiliaj vortoj en Eo: *liberala*, *Liberio*; parenca estas ank. *liveri*.

**LIBERAL/A** (2; Jü): AG(H) *liber/al*, I *-ale*, Po *-alny*, R *-al'nyj*, F *libéral*. Ps-sf *-al*.

El L *liberalis* "digna je libera homo, humana, nobla" (*artes liberales* "-aj artoj"), ekuzita kun politika senco ('favora al libereco') ĉ. 1800, der. de *liber* "libera" (vd. tiun).

**LIBERI/O** (8; GD): AIPo(H) *Liberia*, F *Libéria*, G *Liberien*, R *Liberija*. Ps-sf *-i* 3. ¶ IoIeIa* *Liberia*.

Propr. "lando de liberaj (homoj)" (la usona kolonio estis konstituita komence de la 19a jc por liberiĝintaj sklavoj), der. de L *liber* "libera" (vd. tiun).

**LIBI/O** (8; *Lib/uj/o* FK): A *Libya*, F *Libye*, G *Libyen*, IPo(H) *Libia*, R *Livija*. La vokalo *y* estas kiel ordinare anstataŭita per *i* kaj tiel koincidas kun la ps-sf *-i* 3. ¶ IoIe *Libia*, Ia *Libya*.

Pere de L *Libya* el Gr *Libyê*, nomo unue de la nordafrika marborda regiono (spec. inter Egiptujo kaj Sirtoj), poste de la tuta afrika kontinento.

**LIBR/O** (f; Un): L *lib/er -ri*; F *livre*, I(H) *libro*. Kp A *library* "biblioteko", propr. "libraro". Traktita kiel la samtipa L *apr/o* (kun *-er* nominativa, *-r-* oblikva), vd. tiun; dank' al tio la radiko klare diferenciĝas disde la homonima *liber-*. ¶ 1882 *libr-*. ¶ IoIa =, Ie *libre*.

L *liber* orig. "basto" (sur kiu oni skribis antaŭ la ekuzo de la papiruso; kp semantike A *book*, G *Buch*, orig. identaj kun A *beech*, G *Buche* "fago"), identa kun R *lub* "basto" (HE **lubh-*). Kp *laŭbo*.

**LICE/O** (1; Jü): F *lycée* [li-], G *Lyzeum*, I(H) *liceo*, Po *liceum*, R *licej*. Kp la samtipan *muzeo*. ¶ IoIe =, Ia *lyceo**.

Pere de L *Lyceum* el Gr *Lykeion*, nomo de fama gimnazio apud Ateno, tiel nomita laŭ la dio *Apóllôn Lykeios*, al kiu estis dediĉita templo en la sama regiono.

**LICENC/O** (8; PVS; ne ĉe Z; antaŭe *permes/o*): AF *lic/ence*, I *-enza*, (H *-encia*), Po *-encja*, G *Lizenz*. Ps-sf *-enc*.

El L *licentia* "permeso, rajto, libereco", subst. de *licet* "estas permesate", de nekonata origino.

**LIEN/O** (f; RE): L *lien*. Anatomia termino prenita el L. Kp *spleno*, kiu reprezentas la Gr ekvivalenton. ¶ Io *spleno*, IeIa *splen*.

Paralela al Gr *splên* s.s., kp Sa *(p)lîhán-*, R *selezënka* s.s. (HE bazo **slighen-* aŭ sim.).

**LIFT/O** (2; Jü): AR *lift*, G *Lift*. Kp Nd *lift*. ¶ Io *acens-ilo* (*acensar* "levi", kp F *ascenseur*), IeIa *lift*.

A vorto, orig. "levilo", subst. de *lift* "levi" el Sk, ekz. Sv *lyfta* "levi", kp G *lüften* "lev(et)i", orig. "levi en la aeron", samradika kun Sv *luft*, G *Luft* "aero" (kiu orig. probable signifis "tegmento" k tiuokaze estas par. al *laŭbo*).

**LIG/I** (f; Un; dukateg. *-o/-i* laŭ AdA II, 42): L *ligare*; F *lier*, I *legare*, (H *ligar*). Subst. "ligo" ('unuiĝo por komuna celo'): A *league* [li:g], F *ligue* [lig], G

*Liga*, I *lega*, PoR *liga*. ¶ IoIeIa *ligar* "-i"; Io *lig/o*, IeIa *-a* "-o".

Subst. formita (en L mez. k I ant.) el la verbo. *ligare* estas par. al Nd *lijk* "raliko". Samfamilia vorto en Eo: *obligacio*, kp ev. *religio*.

**LIGN/O** (f; Un): L *lignum*; I *legno*, (H *leña*). Kp F *ligneux* "-eca". Forme bazita sur L kun *-gn-* anstataŭanta la romanan [n'] (vd. *digna*). ¶ IoIa =, Ie *ligne*.

El **leg-nom*, propr. "plukitaĵo, kolektitaĵo", der. de L *legere* "pluki, kolekti" (vd. *legi*).

**LIKEN/O** (f; RE): L *lichen* [-ke-]; AF *lichen* [-ke-], I *-e* [-ke-], (H *liquen* [-ke-]). La scienca L vorto estas adoptita en la modernaj fontlingvoj. R *lišaj* (citita de Bastien) kaj Po *liszaj* kredeble ne estas parencaj. ¶ Io =, IeIa *lichen*.

El Gr *leikhên* s.s., propr. "lekanto" ('kreskaĵo kiu lekas la arbojn'), de *leíkhein* "leki" (vd. tiun).

**LIKV/O** (8; *-a* PV; ne ĉe Z; antaŭe *fluid/aĵ/o*): A *liqu/id*, F *-ide*, I *-ido*, (H *líquido*); L *liqu/idum*, *-or*. Pri Eo *kv* responda al romana *qu*, vd. *akvo*. Apokopo de la pseŭdosufikso por eviti radikkolizion kun *likvid-*. ¶ Io *liquid-ajo*, Ie *liquage*, Ia *liquido*.

De L adj. *liquidus* "-a, fluida, klara" (kp ank. la sekvan) de *liquere* "esti likva [fluida, klara]" kun parencoj en keltaj lingvoj (kp Ir *fliuch* "humida"). Samfamiliaj vortoj en Eo: *likvidi*, *likvoro*. Kp ank. *lesivo*.

**LIKVID/I** (f; RE): A *liquid/ate* [-kŭi-], F *-er* [-ki-], G *-ieren* [-kvi-], I *-are* [-kŭi-], (H *-ar* [-ki-]), Po *likwidowac'*, R *likvidirovat'*. Pri Eo *kv*, vd. *akvo*. Ps-sf *-id.* ).

Der. de FI adj. *liqu/ide* resp. *-ido* kun la senco "kontanta, disponebla (pp mono)", orig. "likva, klara" (por la semantika evoluo, kp A *clear* "klara", *clear off* "elsaldi"), el L *liquidus* s.s. (vd. *likvo*).

**LIKVOR/O** (f; RE): AF *liqueur* [A -kjúe', F -kö:r], G *Likör*, I *liquore* [-kŭ-], Po *likier*, R *likër*, (H *licor*); L mez. *liquor*. Eo *kv* estas normala reprezentiĝo de romana *qu* (vd. *akvo*) sed ne respondas tie ĉi al la prononco de iu fontlingvo (vd. Szerdahelyi 1987, 118). Ps-sf *-or* 2. ¶ IeIa *liquor*, Io *-o*.

El L *liquor* "likvaĵo, fluidaĵo", subst. de *liquere* "esti fluida" (vd. *likvo*).

**LILI/O** (f; RE): L *lilium*; A *lily* [-i], F *lis* (kp *lilial* "-a", *liliacées* "-acoj"), G *Lilie*, I *giglio*, Po *lil/ia*, R *-ija*, (H *lirio*). Principe la Ea radiko estas transskribo de la L stemo (botanika termino), sed la formoj de GPoR donus la saman rezulton. ¶ IoIa =, Ie *lilie*.

L *lilium* estas, same kiel Gr *leírion* s.s., pruntita el iu orientmediteranea lingvo (eble Eg, kp Kopta *hrêri*).

**LIM/O** (f; RE): L *lim/es -itis*; A *limit*, FI *-e*, (H *límite*). La radiko redonas nur la L bazon; radikfino *-it* estis konsiderata neoportuna pro la participa sufikso, kp *kukurbo*, *sago*. Kp la pli malfruan fakterminon eo *limit/o* PV (ne ĉe Z) 'prezlimo'. ¶ 1894 *limit-*. ¶ Io *limit/o*, Ia *-e*, Ie *límite*.

Propr. "(linio) iranta oblikve (tra la tereno)", kunm. de L *limus* "oblikva, straba" (kun necerta etimologio) k *-it-* "iranta" (el *ire* "iri", sup. rad. *it-*). Kp *oblikva*.

**LIMAK/O** (f; RE): L *lim/ax -acis* [-ák-]; F *limace*, I *lumaca*, (H *limaza*). Zoologia termino prenita el L. Normala traktado de tiutipa L substantivo, vd. Szerdahelyi 1987, 120. ¶ Io =, IeIa *limace*.

El Gr *leím/ax -akos* s.s., identa kun Po *s'limak* "heliko": HE **(s)leimak-* "ŝlimulo" de rad. **(s)lei-* (vd. *ŝlimo*).

**LIMONAD/O** (f; RE): A *lemon/ade*, Po *-iada*, F *limon/ade*, I *-ata*, R *-ad*, (H *-ada*), G *Limonade*. Eo *-i-* laŭ la plimulto de fontlingvoj. Ps-sf *-ad*.

Propr. "citronaĵo", der. de vorto signifanta "citrono": FR *limon*, I *-e*, H *limón* (kp L bot. *Citrus limonum* "citronujo"), el Pe *lîmûn* s.s.

**LIN/O** (f; RE): L *linum*; F *lin*, I(H) *-o*, G *Lein*, Po *len*, R *lën*. Kp A *linen* "-tolo", *linseed* "-semo". La L vokalismo estis decidiga ĉe botanika termino. ¶ IoIa =, Ie

*lin.*

La L vorto estas ligita kun la ekvivalentoj ĝermanaj (kp ank. Gt *lein*, Sk *lin*) k slavaj; ne estas konate, ĉu la vorto estas de hindeŭropa origino aŭ pruntita el alia (mediteranea?) fonto. Samfamilia vorto en Eo: *linio.*

**LINGV/O** (f; Un): L *lingua* [-gŭ-] (ank. "lango"); A *language* [-gŭ-], F *langue* [-g] (ank. "lango"), I *lingua* [-gŭ-] (ank. "lango"), (H *lengua* [-gŭ-], ank. "lango"). Kp A *lingu/ist*, F *-iste*, I *-ista*, G *Linguist*, Po *lingwista*, R *lingvist*, (H *lingüista*) "-isto". El inter la du signifoj de la latin(id)a vorto, Z elektis la L formon por 'idiomo' kaj la specife F formon por la anatomia senco (Wiener 1950, 99; Szerdahelyi 1987, 128). La L *gu* [gŭ] (ĉiam aperanta post *n*) estas redonata en Eo per *gv* interne de radiko (kp *ingveno*, *ungvento*), per *g* ĉe radikfino (*distingi*, *estingi*, *ungo*); esceptoj estas *angilo* resp. *lingvo*. La transskribo *gv* estas tute paralela al *kv* < *qu* [kŭ] kaj analoga al *sv* < *su* [sŭ] (*persvadi*). Ĝi estas okaze uzata ankaŭ por romana *gu* [I gŭ, F g], kie ĝi ofte estas apogata de PoR *gv* (vd. *gvardio*, *Gvatemalo*, *gvidi*). ¶ 1878 *lingw/e*. 1881 *lingv/o*. ¶ Io *lingu/o*, Ie *-e*, Ia *-a*.

La senco "lingvo" estas figura uzo de la origina "lango" (kp semantike A *tongue* "lango; lingvo"). L *lingua* respondas al L ant. *dingua* (*l-* ev. laŭ *lingere* "leki"; tamen ekzistas ankaŭ fonetika variado *d/l*, vd. ekz. sub *larmo*) el HE **dnghŭa* "lango", kp A *tongue*, G *Zunge*, Ir *teng*, Sa *jihvâ*, ĉiuj "lango". De formo sen *d-* " (**nghû*) devenas R *jazyk*, Po *jezyk* "lango; lingvo". Vd. Carlevaro, Slipoj de etimologia vortaro, PL 10/1984, 18. – Etimologie identa: *lango.*

**LINI/O** (f; RE): A *line*, F *ligne* (kp *linéaire* "-a"), G *Linie*, I *linea*, Po *linia*, R *linija*, (H *línea*); L *linea*. Z deiris ne de L sed de G kaj la slavaj formoj. ¶ Io *line/o*, IeIa *-a*.

Orig. "ŝnuro el lintolo" (kp eo *line/o* PVS 'maldika ŝnuro tre zorge elfarita'), der. de L *linum* "lino" (vd. tiun).

**LINK/O** (f; RE): L *lyn/x -cis* [-k-]; AF *lynx*, G *Luchs* [luks], I(H) *lince*. Bazita sur la L stemo (zoologia termino). ¶ Io *linco*, Ie *linxe*, Ia *lynce**.

El Gr *lyn/x -kós* s.s., par. al la citita G vorto k al Li *lúšis* s.s., kredeble ank. al RPo *rys'* (kun *r-* anst. *l-*). Oni asocias la vorton kun HE rad. **leŭk-/luk-* "hela" (pro la hela felo de la besto), vd. sub *lumo.*

**LIP/O** (f; Un): A *lip*, G *Lippe*. Kp F *lippe* "-ego", ank. Nd *lip* "-o". Kp plue (kun sama aŭ simila konsonantismo) L *labium*; F *lèvre*, I *labbro*, (H *labio*). Unu el malmultaj ĝermandevenaj nomoj de korpopartoj, vd. Collinson 1959, 5. ¶ IoIa *labi/o*, Ie *-e*.

El pĜ **lepjôn-*, **lepjan-*, par. al L *labium* (var. *labrum*), kredeble de HE rad. **leb-* "pendi" (vd. *lobo*).

**LIR/O** (f; RE): AF *lyre*, G *Leier*, *Lyra*, IPoR(H) *lira*; L *lyra*. ¶ Io =, Ie *lire*, Ia *lyra.*

El Gr *lyra* s.s., de nekonata origino. Kp sekv.

**LIRIK/O** (1; Jü): A *lyric*, G *Lyrik*, Po *liryka*, R *lirika*, (H *lírica*). Kp F *poésie lyrique*, I *poesia lirica*, ank. A *lyric poetry* 'lirika poezio'. La Ea radiko baziĝas sur la ĝermana-slava ĝenronomo, kiu reprezentas mallongigon de la romana esprimo. Kp la paralelan kazon *beletristiko*. Ps-sf *-ik*. ¶ Io =, Ie *lírica*, Ia *lyrica.*

El Gr adj. *lyrikós* "lira" (ĉe la helenoj, 'lirika' poezio estis tiu akompanata de lirmuziko), der. de *lyra* "liro" (vd. tiun).

**LIST/O** (1; Jü): A *list*, F *-e* IPo(H) *-a*, G *Liste.*

Orig. "strio, bendo" (semantika evoluo: > "bendo kun nomoj" > "serio de nomoj"), de ĝerm. origino (kp G *Leiste* "listelo, lato", Sv *list* "listelo").

**LIT/O** (f; Un): F *lit*, I *letto*, (H *lecho*); L *lectus*. Kp P *leito*. Bazita sur F (ev. **lekt-* ĉefe asociiĝus kun la verbo *legi*, vd. tiun). Ankaŭ la ĝermana ekvivalento (A

*bed*, G *Bett*) estis utiligata de Z, vd. *bedo*. ¶ Io =, Ie *lette*, Ia *lecto*.

Propr. "kuŝejo", de HE rad. **legh-* "kuŝi", kp Gr *lékhos* "kuŝejo", A *lie* "kuŝi", G *liegen* "kuŝi", R *leĵat'* "kuŝi", Po *l'óz'ko* "lito".

**LITANI/O** (f; RE): A *litan/y*, F *-ie*, IPo *-ia*, R *-ija*, G *Litanei*, (H *letanía*); L ekl. *litaniae* (plur.). (Ps-sf *-i* 1.).

El Gr *litaneía* "preĝado" de *litaneúein* "preĝi" de *litanós* "preĝanta", der. de *litaí* "preĝo" kun nekonata etimologio.

**LITER/O** (f; Un; *litr-* N-ro 15, 1888): L *lit(t)era*; A *letter* (kp *literal* "laŭlitera"), F *lettre* (kp *littéral* "laŭlitera"), I *lettera*, Po *litera*, (H *letra*). Kp G *Letter*, R *litera* (tip.) "(pres)litero". La romanaj vortoj signifas ankaŭ "letero"; Z distingis la du signifojn, bazante unu radikon sur AFI (*leter-*), alian sur L (*liter-*); tiu lasta estas apogata de la cititaj AF adjektivoj kaj la PoR formoj. ¶ 1906a *letro*. ¶ Io =, Ie *líttere*; Ia *lit(t)era* (ank. "letero").

La L vorto signifas "litero" (sing.), "letero, literaturo" (plur.); kredeble orig. "(io) pentrita, (io) surŝmirita", ligita kun L *linere* "ŝmiri" (vd. tiun). Etimologie identa: *letero*; samfamiliaj: *beletristiko*, *literaturo*.

**LITERATUR/O** (f', 1,7; Ald, Be): A *literat/ure*, PoR(H) *-ura*, F *littérature*, G *Litteratur*, I *letteratura*. Ps-sf *-ur*.

El L *litteratura* "skrib/aĵo, -arto", der. de *lit(t)era* "litero" (vd. tiun); kp L *lit(t)erae* (plur.) "literaturo".

**LITOGRAF/I** (f; RE): A *litho/graph*, F *-graphier*, G *-graphieren*, I *litograf/are*, Po *-owac'*, R *-irovat'*, (H *-iar*). En Eo verbkategoria radiko (same kiel *fotograf/i*, *stenograf/i*). En la fontlingvoj tamen la verbo estas sekundara, der. de la responda substantivo: **LITOGRAFI/O** (8; Ve): A *litho/graphy*, F *-graphie*, G *Lithographie*, IPo *litograf/ia*, R *-ija*, (H *-ía*). Ps-sf *-i* 1.

Termino farita el Gr *líthos* "ŝtono" (kun nekonata etimologio) k *gráphein* "skribi, desegni" (vd. *telegrafo*).

**LITR/O** (2; N-ro 15 1888, Be): AF *litr/e*, I(H) *-o*, G *Liter*, PoR *litr*.

La aktuala senco unue en F (1793); el Gr *lítra* "funto", ank. "mezuro de volumeno, responda al *kotylḗ*" (proks. kvarono de litro), orig. sicilia vorto, identa kun L *libra* "funto; pesilo" (> F *livre* "funto"). Parencaj vortoj en Eo: *ekvilibro*, *libelo*, *nivelo*.

**LITURGI/O** (1; Be): A *liturg/y*, F *-ie*, IPo *-ia*, R *-ija*, (H *-ía*), G *Liturgie*; L ekl. *liturgia*. Ps-sf *-i* 1.

Orig. "publika eklezia funkcio", el Gr *leitourgía* "publika, ŝtata ofico", subst. de *leitourgeín* "plenumi publikan oficon": la unua elemento estas **leítos* "publika" (de *laós* "popolo", vd. *laiko*), la dua *érgon* "laboro, funkcio, ofico" (vd. *verko*). Kp spec. *kirurgio*.

**LIUT/O** (f; RE): A *lute*, F *luth*, G *Laute*, I *liuto*, Po *lutnia*, R *ljutnja*, (H *laúd*). Z elektis la I formon (kun apogo de R), evidente por eviti kolizion kun la radikoj *lut-* kaj *laŭt-*. Klasifikita kiel 'epentezo' de Ŝerdahelyi 1987, 134. ¶ Io =, Ie *lute*, Ia *lut*.

El Ar *al-'ûd*, orig. "ligno", poste "ligna instrumento", "liuto" (*al-* estas dif. art., vd. sub *algebro*).

**LIVER/I** (f; RE): A *deliver*, F *livrer*, G *liefern*. Kp Ji *livern*. Kompromisa formo kun *liv-* laŭ AF, *-er* laŭ FG (Szerdahelyi 1987, 125). ¶ IoIa *livrar*, Ie *liverar*.

F vorto, el L *liberare* "liberigi" (semantika evoluo: > "liberigi sin de (io)" > "ekspedi, forsendi" > "liveri") de *liber* "libera" (vd. tiun). Kp spec. sekv.

**LIVRE/O** (f; RE): A *livery*, F *livrée*, G *Livree*, I *livr/ea*, R *-eja*, Po *liberia*, (H *librea*). Bazita sur F. ¶ Io =, Ie *livr/é*, Ia *-ea*.

F vorto, orig. signifanta vestaĵon kiun mastro (spec. reĝo) je grandaj festoj donacis al siaj subuloj, propr. "donitaĵo", der. de F *livrer* "liveri, transdoni" (vd. *liveri*).

**LOB/O** (4; Ve, PV) 1) anat. 2) bot. 3) ark.: AF *lob/e* (1,2,3), I *-o* (1,2,3), (H *lóbulo* 1,2); L *lobus* (1,2).

El Gr *lobós* (1) s.s., probable par. al G *Lappen* s.s., de HE rad. **leb-* "(malstrikte) pendi", kp Sa *lámbate* "pendas", *labi* "defali,

gliti", G *Lippe* "lipo" (vd. tiun). Kp *lavango.*

**LOD/O** (f; RE): G *Lot*, Po *l'ut*, R *lot.* Kp Nd *lood*, Sv *lod.* Konsonantŝanĝo *t* > *d* (vd. sub *aldo*) por eviti kolizion kun *lot-*, kiu estis bezonata por alia signifo. Pri tria kolizianta radiko, vd. *lojto.* ¶ 1894 *duon/unz-.* ¶ Ia *medie-uncia* ('duona unco'); analoge esprimebla en IoIe.

Ĝerm. vorto (pĜ **laudha-*), orig. signifanta "plumbo" (kp A *lead* "plumbo"), eble de kelta origino. Kp sub *luti.*

**LOG/I** (f; RE): G *locken* [lók-]. Kp Nd *lokken*, Da *lokke.* Sama konsonantismo (*l-k*) ankaŭ en L *al-licere* (kp F *allécher*) "allogi". Bazita sur G; konsonantŝanĝo *k* > *g* por eviti kolizion kun la jama *lok-* (Waringhien LV 77, Szerdahelyi 1987, 131). ¶ 1894 *laces-* (< L *lacessere* "provoki, inciti"). ¶ Respondas al pluraj radikoj en la aliaj L.I., kp IoIe *lurar* "logi" (< A *lure*), Io *atraktar*, Ie *atraer*, Ia *attraher* "allogi" (< L *attrahere* ktp); Io *se/ duktar*, Ie *-ducter*, Ia *-ducer* "delogi" (< A *seduce*, F *séduire* ktp).

Kredeble samradika kun G *lügen* "mensogi".

**LOGARITM/O** (2; RE): A *logarithm*, F *-e*, G *Logarithmus*, I(H) *logaritmo*, Po *logarytm*, R *logarifm.*

El L mod. *logarithmus*, kreita de Napier en 1614 el Gr *lógos* "rilato" (vd. *logiko*) k *arithmós* "nombro" (vd. *aritmetiko*).

**LOGIK/O** (1; Du, Be): A *log/ic*, F *-ique*, I *-ica*, PoR *-ika*, G *Logik*, (H *lógica*); L *logica.* Ps-sf *-ik.*

El Gr *logikê* s.s., propr. "racia, rezona (arto, scienco)", subst.-igo de *logikós* "racia, rezona", adj. de *lógos* "kalkulado, pripensado, rezonado, raci(a motiv)o, rilato, proporcio; parolado, vorto, eldiro, aserto, interkonsiliĝo, diskuto, debato, skribaĵo, literaturo, studaĵo, scienca esploro" (kp *analoga, apo-, dia-, ek-, epi-, filo-, kata-, mono-, nekro-, pro/logo, logogrifo*), subst. de *légein* "kolekti; nombri, kalkuli; rakonti, paroli, diri" (kp *antologio*; pri la semantika evoluo, kp G *zählen* "nombri" : *erzählen* "rakonti"), verbo identa kun L *legere* "kolekti" (vd. *legi*). Kunm. *dialégein* "interparoli" (vd. *dialekto*). La apartenanta agantnomo *-lógos* "parolanto" ekhavis la sencon "diskutanto (pri io), esploranto (de io)" videblan en la antikvaj kunmetoj: *arkeo-, astro-, etimo-, (etio-), fizio-, genea-, teo/logo*, laŭ kies modelo oni kreis *antropo-, bio-, geo-, grafo-, minera-, ornito-, paleonto-, pato-, psiko/ logo* ktp; el tiuj la respondaj nomoj de sciencoj (Gr *-logía*, en Eo *-logi/o*; tiu vortfino do evoluigis memstaran signifon "esplorado, scienco"). – Paralela subst. formita el *légein* estas *léxis* "parolo, vorto" (vd. *leksikono*).

**LOGOGRIF/O** (2; RE): A *logogriph*, F *-e*, G *Logogriph*, I(H) *logo/grifo*, Po *-gryf*, R *-grif.*

Kreita (16a jc.) el Gr *lógos* "vorto" (vd. *logiko*) k *gríphos* "enigmo", orig. "naso, retkaptilo" (sem. evoluo: "kunplektaĵo" > "komplikaĵo"), kredeble par. al L *corbis*, G *Korb* (vd. tiun).

**LOĜ/I** (f; Un): A *lodge* [loĝ], F *loger* [loĵé], I *alloggiare* [-loĝ-]. Konata kiel fremdvorto en G (*logieren* [-ĵ-]). Kp H *alojar* "loĝigi". Eo *-ĝ-* respegulas kaj la A prononcon kaj la F ortografion (kp la ekzemplojn sub *aĝo*). La radiko havas relative grandan internaciecon sed ne reprezentas la plej oftan vorton por tiu ĉi nocio en la fontlingvoj (A *dwell, live*, F *habiter*, G *wohnen*, I *abitare*, kp H *habitar*). ¶ 1882 *loz'.* – 1894 *habit-.* ¶ Io *habitar* (daŭre), *lojar* (maldaŭre); Ie *habitar, logiar*; Ia *habitar.*

Der. de F *loge* "kabano" (vd. sekv.).

**LOĜI/O/** (f; RE) 1) teat. 2) ark. 3) fram. : A *lodge* (3), *loggia* (2), F *loge* [-ĵ] (1,2,3), G *Loge* [-ĵ-] (1,3), *Loggia* [-ĝ-] (2), I *loggia* [-ĝ-] (2,3), Po *loz'a* [-ĵ-] (1,2,3), R *loja* (1,3), *lodjija* (2), (H *logia* 3). Radikformo laŭ I, sed semantiko laŭ F: la F formo ne taŭgis, ĉar ĝi koincidus kun *loĝ-.* ¶ Io *lojio* (1,2,3); Ie *loge* (1,3), *loggia* (2); Ia *logia* (1,2,3), *loggia* (2).

F *loge* "kabano, barako; ĉambreto, ĉelo" (de tie senco 1, 'aparta ĉambreto'; senco 2

el I: 'ĉambro eksteren malfermita'; senco 3 el A, kie la vorto i.a. signifis la kabanojn de la masonistoj sur konstruejoj, kp sub *framasono*), el Fk **laubja*, proks. "subtegment(a galeri)o" (pri la supozata orig. signifo, vd. *laŭbo*, etimologie identan). Samfamilia ank. *logĝi*; kp ev. *libro, lifto.*

**LOJAL/A** (1; Jü): AFG *loyal* [AG loj-], I *leale*, Po *loj/alny*,R *-al'nyj*, (H *leal*). Por Eo *oj* < F *oy*, kp *boji, vojaĝo.* Ps-sf *-al.* ¶ IeIa *loyal*, Io *-a.*

Propr. "leĝa" (> "aganta laŭ la leĝoj de fideleco ktp"), der. de F *loi* "leĝo" el L *lex* s.s. (vd. *leĝo*).

**LOJT/O** (f; RE): L zool. *Lota lota*; F *lotte*, (H *lota*). La fontlingvaj formoj donas *lot-*, sed tiu radiko estis rezervita por alia signifo. La plej evidenta modifo, ŝanĝo *t* > *d*, ankaŭ jam estis utiligita (vd. *lodo*). Z sin helpis per diftongigo de la *o*-vokalo (oni povas kompari la modernan *Pajn/o* GD el Gr-L *Pan* por eviti similecon al *pan/o*). Szerdahelyi 1987, 131. ¶ 1894 *lotu-*. ¶ Io *lotao*, IeIa* *lota.*

El L mez. *lota* s.s., eble gaŭla vorto.

**LOK/O** (f; Un): L *locus*; F *lieu*, I *luogo*, (H *lugar*). Kp AF(H) *loc/al*, I *-ale*, G *lok/al*, Po *-alny*, R *-al'nyj* "-a". ¶ Io =, Ie *loc*, Ia *-o.*

El L ant. *stlocus*, kio indikas parencecon al G *Stelle* "loko". Samfamiliaj vortoj en Eo: *leŭtenanto, loko/mobilo, -motivo, lui.* Ankaŭ en *kuŝi* sin kaŝas samradika kunmeto.

**LOKOMOBIL/O** (1; Be): FI *loco/mobile*, (H *-móvil*), G *Lokomobile*, Po *loko/mobila*, R *-mobil'*. Kp la formojn sub *aŭtomobilo.* Ps-sf *-bil*, var. de *-bl.*

F vorto (19a jc), propr. "(maŝino) movebla de (iu) loko", subst.-igo de adj. formita (laŭ modelo de la sekva) el L *loco* ("de loko", abl. de *locus* "loko", vd. tiun) k *mobilis* "movebla" (de *movere* "movi", vd. tiun). Kp sekv.

**LOKOMOTIV/O** (f; RE): AF *locomot/ive*, I *-iva*, (H *-ora*), G *Lokomotive*, Po *lokomot/ywa*, R *-iv.* Ps-sf *-iv.*

A vorto (19a jc), propr. "(maŝino) moviga de iu loko", subst.-igo de adj. formita el L *loco* ("de loko", abl. de *locus* "loko", vd. tiun) k L (mez.,mod.) *motivus* "mova" (vd. *motivo* k plue *movi*).

**LOL/O** (F; RE): L *lolium*; G *Lolch*, I *loglio* [-l'-]. Eo *lol-* povus reprezenti la komunan bazon de LG; pli kredeble L estas la sola fonto (botanika termino). Pri L *-ium* en Eo, vd. Szerdahelyi 1987, 117. ¶ 1894 *loli-*. ¶ IoIa* *lolio*; ne trovita en Ie.

Nomita pro la semoj, kiuj kaŭzas kapturniĝon, kp Sa *lólati* "ŝanceliĝas" (analoge F *ivraie* "lolo" de *ivre* "ebria").

**LONG/A** (f; Un): AF *long*, G *lang*, I *lungo*; L *longus.* Kp P *longo*, Sv *lång* [-o-]. ¶ 1881 *long-*. ¶ Io =, Ie *long*, Ia *-e.*

Latin(id)a resp. ĝermana vorto (kp Gt *laggs*), el HE **(d)longhos*, plivastigo de rad. **d(o)l-*, kp R *dolgij*, Gr *dolikhós* "longa". Kp sekv.

**LONGITUD/O** (8; Ve,PV; ne ĉe Z): AF *longitud/e*, I *-ine*, (H *longitud*). Ps-sf *-tud.*

El L *longitud/o -inis* "longo" (kp G *geographische Länge* 'geografia longo') de *longus* "longa" (vd. tiun).

**LONICER/O** (f; RE): L bot. *Lonicera.* Botanika termino prenita el L. ¶ Io *kaprifolio*, Ie *caprifoli/e*, Ia *-o* (laŭ la plej konata specio, *L. caprifolium*, propr. "kapra folio"; kp ank. eo *kaprifoli/o* Fab I, PV, *kaprifoliac/oj* Ve, Ka).

Termino farita de Lineo laŭ la nomo de la germana botanikisto A. Lonitzer (†1586).

**LORD/O** (4; Bat, PV): AFIPoR(H) *lord*, G *Lord.*

El AS *hlâford*, propr. "pan-gardanto" (t.e. mastro, ĉefo de la familio), kunm. de *hlâf* "pano" (> A *loaf* "pan/o, -bulo", kp G *Laib* "[pan]bulo": pĜ **hlaiba-*, ligita per prunto aŭ praparenceco kun R *ħleb* "pano") k *weard* "gardanto" (kp A *warden* "gardisto"; kp sub *gardi*).

**LORN/O** (f; RE): AF *lorgnette* [A -nj-,F -n'-] "-eto", Po *lornet(k)a* "(du)lorneto", R *lorneta* "-eto". Retrograde formita el *lornet-*, analizita kvazaŭ *lorn/et/* (kp Szer-

dahelyi 1987, 135). Pri Eo *-n-* reprezentanta romanan [n'] (tie ĉi apogata de PoR), vd. sub *akompani*. ¶ Io = (espismo); Ie *lorniette* "-eto" (*ocul-tube* "lorno"); Ia *lorgnette* "-eto".

F vorto, formita (laŭ modelo de *lunette* "okulvitro") el F ant *lorgner* "alstrabi" el *lorgne* "straba" kun necerta etimologio.

**LOT/o** (f; RE): AF *lot*, G *Los*. Kp I *lotto* "-ado, -aĵo", (H *lote* "-aĵo"). Verbo: F *lotir* "-umi", G *losen* "-i", Po *losowac'* "-i". Verŝajne bazita sur AF substantivo kaj F verbo; prezentita kiel verba radiko. Por la elekto de *-t-* eble influis la internacia derivaĵo *loterio* (vd. sekv.). ¶ Io *loto* "-aĵo", *lotriar* "-i"; Ie *lot* "-o", *-ar* "-i"; Ia *lot* "-aĵo".

Ĝerm. vorto (kp Gt *hlauts* "-aĵo"), orig. "porcio, ricevata parto", subst. de pĜ **hleutan* "ricevi" kun necerta etimologio.

Samfamilia vorto en Eo: *loterio*.

**LOTERI/O** (1; RE): A *lott/ery* [-i], I *-eria*, F *lot/erie*, Po *-eria*, R *-ereja*, (H *-ería*), G *Lotterie*. Ps-sf *-eri*. ¶ Io *lotrio*, Ie *loterie*, Ia *lotteria*.

Der. de I *lotto* "lot/ado, -aĵo" (vd. *loto*).

**LOTUS/O** (8; Fab IV,PV; ank. *lotos/o* PV): AF *lotus*, G *Lotos*, I(H) *loto*, PoR *lotos*; L *lotus*. La finaĵo de la L originformo estas konservita (kp analogajn kazojn sub *fokuso*), ĉar *lot-* jam havis alian signifon. ¶ Io =, Ie *lotus*, Ia *loto*.

El Gr *lôtós*, nomo de pluraj furaĝaj kreskaĵoj k de la egipta nimfeo (L bot. *Nymphaea lotus*), de semida origino (kp He *lot'*, Ar *lâdan* "cista rezino").

**LOZANĜ/O** (2; Jü) 1) her. 2) geom. 3) cet. [PIV 2,3]: A *lozenge* [-z-,-ĝ] (1,2,3), F *losange* [-z-,-ĵ] (1,2), I *losanga* [-z-] (2), (H *losange* 2). Probable bazita sur F; Eo *-ĝ-* respondas, kiel ofte, al F *g* [ĵ] kaj A *g* [ĝ] (vd. *aĝo*). ¶ Mankas en la aliaj L.I.; kp *rombo*.

F vorto (unue her.), orig. "io forme simila al ŝtonplato", der. de Gaŭla **lausa* "ŝtonplato" (> H *losa* s.s.), eble par. al Gr *láas* "ŝtono".

**LU/I** (f; RE): F *louer* [luŭé] "-i, -igi". Kp L *locare* "-igi"; F *location* "lu(ig)o", I *locazione* "-ado", Po *lokator* "-anto". Bazita sur F prononco (F *ou* normale > Eo *u*, vd. Szerdahelyi 1987, 122); **lok-* estis neebla pro *lok/o*. ¶ Io *lokacar* "-i", *lugar* "-igi" (kp P *alugar*); Ie *luar* "-i", *locar* "-igi"; Ia *locar* "-i, -igi".

F el L *locare* (subst.: *locat/io -ionis* "-igo" > FI supre), propr. "meti, loki (iun ien)", der. de *locus* "loko" (vd. tiun).

**LUBRIK/I** (8; PV; ne ĉe Z): A *lubric/ate*, (H *-ar*), F *lubri/fier*, I *-ficare*. Oni preferis la mallongan formon de AH al **lubrifiki* laŭ FI; la procedo ŝajnas analoga al tiu aplikita de Z ĉe *fortik-* (ne **fortifik-*), kp tiun. ¶ Io *lubri/fikar*, Ie *-ficar*, Ia *lubri(fi)car*.

El L *lubricare* "fari glitema" (la verboj kun *-fi[c]-* estis formataj en la romanaj lingvoj), der. de L *lubricus* "glit/ema, -iga", supozeble (se orig. *sl-*) par. al G *schlüpfrig* "glitiga".

**LUCERN/O** (2; Jü): IL *lucerna* "(antikv-epoka) lampo", (H *lucerna* "lustro"). La sencospecialigo ('pendanta [preĝeja] lampo') verŝajne okazis en Eo (vd. Biblio, El 25:37, Sa 1, 3:3). ¶ Sen radikekvivalento en la aliaj L.I.: Io *suspendita lampo*, Ie *lampe pendent*, Ia *lampa a suspension*.

Der. de L *lucere* "lumi" (por la sufikso, kp *lanterno*). Vd. plue *lumo*.

**LUD/I** (f; Un): L *ludere* (subst.: *ludus* "ludo"). Radiko internacie konata per la derivaĵo *prelud/o* "antaŭludo", kp tiun. ¶ En 1882 Z hezitis inter *bav/i* (< Po *bawic' sie* [refl.]) k *lud/i* (vd. PVZ 5, 124). ¶ Io *ludar*, kp *plear* "ludi (muz., teat.)" (< A *play*); Ie *luder*; Ia *jocar* (< F *jouer*, H *jugar*, I *giocare*).

L *ludere* "ludi, ŝerci, moki", der. de L *ludus* "ludo ktp" el L ant. *loidos*, eble par. al Gr *loidoreín* "insulti". Samfamiliaj vortoj en Eo: *aludi, iluzio, preludo*.

**LUK/O** (8; PV; ne ĉe Z): G *Luke*, R *ljuk*. Kp Nd *luik*, Sv *lucka* [lúk-]. Koincidas

kun la radiko de F *lucarne* "luko, fenestreto", sed *luk-* probable estas prenita rekte el ĝerm. (G) kiel marista termino; kp la ekzemplojn en Collinson 1959, 6. Influo de Io ebla. ¶ Io =, Ie *luca*; Ia *trappa* (< A *trap*).

G *Luke* estas samradika kun G *Loch* "truo, aperturo" k *Lücke* "breĉo"; orig. signifo "fermilo", kp G ant. *lûhhan*, Gt *lukan*, Da *lukke* "ŝlosi". – (F *lucarne* estas neparenca, ligita kun la vortoj cititaj sub *lucerno.*).

**LUKS/O** (f; RE): A *luxury*, F *luxe*, G *Luxus*, I *lusso*, Po *luksus*, (H *lujo*); L *luxus*. ¶ IoIa *lux/o*, Ie *-u*.

L *luxus* (la A formo el der. *luxuria* s.s.) orig. "abundo, trograseco", ev. (se primare "eksceso") ligita kun la L adj. citita sub *lukti*.

**LUKT/I** (2; Jü): L *luctari*; F *lutter*, I *lottare*, (H *luchar*). Kp P *lutar*. Bazita sur L; *lut-* k *lot-* okupitaj de aliaj signifoj. ¶ Io *luktar*, IeIa *luctar*.

Orig. probable "turniĝi, tordiĝi, fleksiĝi", de HE rad. **lug-* "tordi, fleksi", kp L *luxus* "deartikigita", Gr *lygízein* "fleksi, tordi", A *lock*/G *Locke* "buklo".

**LUL/I** (f; RE): A *lull*, G *-en*, Po *lulać*; kp R *ljul'ka* "-ilo". Radiko kun ĝermana-slava bazo (Collinson 1959, 7). ¶ Io *lular*, Ie *lullar*; Ia *cunar* (*cuna* "-ilo" < L *cunae*).

Ĝerm. resp. slava vorto de onomatopea origino (la vorto signifis primare la lulkantadon); kp L *lallare* "lulkanti".

**LUM/O** (f; Un): L *lum/en -inis*; F *lumière*, I *lume*. Kp A *luminous* "-a", (H *luminoso* "-a"), plue la plene internacian *ilumini* "(orname) -igi". mallongigo de la L sufikso *-men/-min-* (kiel en *fulm/o*) kun apogo de I; kompreneble radiko finiĝanta per *-in* estus neoportuna. ¶ Io =, IeIa *lumine*.

Der. de L *lucere* "lumi, brili" (kun radiksubst. *lux*, gen. *lucis* "lumo" > H *luz*, I *luce* s.s.), de HE rad. **leŭk-* "brili, hela", ekz. en Gr *leukós* "blanka" (vd. *lekanto*, *levkojo*), L *lustrare* "lumigi", ( A *light* "lumo", G *Licht* "lumo", *leuchten* "lumi, brili", R *luč* "radio", ank. Sa *rócate* "lumas, brilas". Samfamiliaj vortoj en Eo: *alumeto*, *ilumini*, *ilustri*, *linko*, *lucerno*, *luno* kun *lunatiko* k *lundo*, *lustro*.

**LUMB/O** (f; RE): L *lumbus*; A *loin* (kp. *lumbar* "-a"), F *lombes* (plur.), I *lombi* (plur.), (H *lomo*, kp *lumbar* "-a"). Anatomia termino prenita el L kun forta romana apogo. ¶ IoIa =, Ie *lumbe*.

Identa kun G *Lende*, Po *ledz'wie* s.s. (HE bazo **londhŭ-*).

**LUMBRIK/O** (4; Jü): L *lumbricus*; F *lombric*, I *-o*, (H *lombriz*). Kp P *lombriga*. Prenita el L, kiel montras la vokalo *-u-* (zoologia termino). ¶ Io *lombriko*, Ie *lumbric*, Ia *-o*.

Necerta etimologio.

**LUN/O** (f; Un): L *luna*; F *lune*, I(H) *luna*, R *luna*. Kp A *lunar* "-a". ¶ Io =, Ie *lun/e*, Ia *-a*.

El **loŭksna* "luma (astro)", HE subst. de la rad. **leŭk-* "lumi, brili", kp Gr *lykhnos* "kandelingo". Vd. plue *lumo*; kp spec. *lunatiko*, *lundo*.

**LUNATIK/O** (f; RE) 1) somnambulo 2) kapriculo, frenezulo: A *lunat/ic* (2), F *-ique* (2), I *-ico* (2), Po *-yk* (1), R *-ik* (1), (H *lunático* 2). Kunigas en si la sencojn de la vorto en slavaj (1) kaj en romanaj (2) lingvoj. Ps-sf *-ik*. ¶ Io = (2), IeIa *lunatico* (2).

El L *lunaticus* "freneza; epilepsia", propr. "influata de la luno", der. de *luna* "luno" (vd. tiun).

**LUND/O** (f; Un): F *lundi*, I *lunedí*, (H *lunes*). Bazita, kiel la aliaj nomoj de semajnaj tagoj, sur F (kun apokopo de la fina *-i*, kp *mardo*, *merkredo* ktp). ¶ Io *lun/dio*, Ie *-edí*, Ia *-edi*.

El L *Lunae dies* "tago de la luno", kp la samsignifajn A *Monday*, G *Montag* (pri la ĝerm. vorto por "luno", vd. *monato*). Vd. *luno* resp. *hodiaŭ*.

**LUP/O** (f; RE): L *lupus*; F *loup*, I *lupo*, (H *lobo*). Kp A *lupine* "-a". Zoologia termino prenita el L. ¶ IoIa =, Ie *lup(o)*.

El HE **ŭlkŭos* "lupo", kp Sa *vrka-*; Gr *lykos*; Gt *wulfs*, A *wolf*, G *Wolf*, R *volk*, Po *wilk*.

Samfamilia vorto en Eo: *lupolo.*

**LUPOL/O** (f; RE): L bot. *Humulus lupulus*; I *luppolo*, (H *lúpulo*). Eo *-ol-* (laŭ I) por evitigi misanalizon *lup/ul/o*; vd. analogajn ekzemplojn sub *artikolo.* ¶ 1894 *lupl-.* ¶ IoIa *lupulo*, Ie *lúpul.*

L specinomo donita de Lineo; L *lupulus* signifas "lupeto" (dim. de *lupus* "lupo", kiu en L klas. ankaŭ signifas tiun ĉi planton); la kialo de la nomado estas nekonata.

**LUSTR/O** (f; RE): AF *lustre*, R *ljustra.* ¶ IoIa =, Ie *lustre.*

Propr. "brilo" (kp I *lustr/o*, H *-e*, G *Lüster* "brilo"), subst. de I *lustrare* "briligi" el L *lustrare* "heligi, lumigi", samradika kun L *lux* "lumo" (vd. tiun). Kp spec. *ilustri.*

**LUT/I** (f; RE) kunfiksi 1) per fandita metalo [2) per pasto/mastiko]: G *löten* (1), Po *lutowac'* (1). Senco 1 en RE, UV, Be, Jü, Ka, PV, PIV. [A *lute* (2), F *luter* (2), I *lutare*† (2). Senco 2 en UV (G *kitten*), Ve, PV.] Ĉiuokaze la formo de la radiko ŝajnas influita de AFI; se ne, ĝi apogas sin nur sur Po(G), kio estas tre neordinara. Kalkulante AFGIPo (kiuj ĉiuj esprimas la nocion 'kunfiksi'), oni havas radikon kun tre vasta apogo; restas necerte, ĉu Z sentis sin devigita adopti ankaŭ la du diversajn sencojn prezentatajn de la fontlingvoj. Kontraŭ tio argumentas la stato en UV, kie ĉiuj fontlingvoj tradukas per senco 1, nur G ankaŭ per senco 2. – Pri radikkolizio kaŭzata de tiu ĉi vorto, vd. *liuto.* ¶ (Senco 1) IoIa *soldar*, Ie *suldar* (< A *solder*, F *souder*, H *soldar*, I *saldare*). Por senco 2, kp *mastiko.*

G *löten* (> Po) signifis orig. "plumbizi", devenante de la ĝerm. vorto por "plumbo", vd. *lodo.* – [La romanaj formoj (> A) el L *lutare* "ŝtopi per argilo" de L *lutum* "argilo, ŝlimo".].

**LUTR/O** (f; RE): L *lutra*; F *loutre* [lutr], (H *nutria*). Kp P *lontra.* Zoologia termino bazita sur L. ¶ Io =, Ie *lutr/e*, Ia *-a**.

Orig. **utra* (*l-* laŭ L *lutum* "ŝlimo, marĉeto"), propr. "akva (besto)", kp Sa *udrá-* "akvobesto", Gr *hydra* "akvoserpento" (vd. *hidro*), A *otter*/G *Otter* "lutro", Po *wydra* "lutro" (HE bazo **ud-* "akvo", vd. sub *ondo*).

# M

**MAC/O** (f; RE): A *matzo* [-ts-], G *Matze* [-ts-], Po *maca*, R *matsa*. Kp Ji *maze* [-ts-]. Redono en Eo de la fontlingva prononco per *c* = [ts]; kp *caro*. ¶ Io *azimo*, Ie *azim*, Ia *azymo* (< F *azyme*, H *pan ácimo*).

El He *macah* s.s.

**MAĈ/I** (f; Un): F *mâcher* [maŝé]. Kp A *mastic/ate*, I *-are*, (H *-ar*); L postkl. *masticare*. Bazita sur F; F *ch* > Eo *ĉ*, kiam ne ekzistas samforma vorto en alia fontlingvo (vd. Cherpillod 1990, 16; kp *aĉeti*). ¶ Io *mastikar*, Ie *machar*, Ia *masticar*.

F < L < Gr *mastikhán* "dente grinci", kp *mastázein* "maĉi", *mástax* "buŝo", eble par. al L *mandere* "maĉi" (vd. *manĝi*; kp ank. *mastiko*).

**MADON/O** (1; Jü): AIPoR *madonna*, F *madon/e*, (H *-a*), G *Madonna*.

I vorto, propr. "mia sinjorino": *ma* (anst. *mia*) "mia", *donna* "sinjorino, virino" (vd. *mi* resp. *damo*). Kp spec. *beladono*.

**MAGAZEN/O** (f; Un) 1) (grand)vendejo 2) konservejo: F *magasin* [-zê] (1,2), G *Magazin* (1,2), I *magazzino* [-dz-] (1,2), Po *magazyn* (2), R *magazin* (1,2), (H *almacén* 1,2). Eo *-z-* kun solida apogo en la fontlingvoj (prononce FIPoR, ortografie GIPoR). Radikfino *-in* ŝanĝita al *-en* por eviti aspekton de virinsufiksa vorto; la F prononco eble influis (vd. sub *abomeni*). (Kp la pli postan eo *magazin/o* 'revuo' PVS el AF *magazine* plus la supre cititaj GI vortoj.).

El Ar *makhâzin*, plur. de *makhzân* "deponejo, varejo". La senco "butiko" evoluis en FG dum la 18a jc.

**MAGI/O** (f; RE): A *mag/ic*, F *-ie*, IPo(H) *-ia*, R *-ija*, G *Magie*, L *magia*. (Ps-sf *-i* 1.)

El Gr *mageía* "magio, sorĉado", de *mágos* "magiisto, sorĉisto", orig. "membro de meda pastrokasto", vorto de persa origino (kp Pe *Maguŝ*, nomo de meda tribo kun pastraj okupiĝoj).

**MAGNET/O** (f; RE): A *magnet*, I *-e*, G *Magnet*, Po *magnes* (kp *magnetyczny* "-a"), R *magnit*; L *magn/es -etis*. Kp F *magnét/-ique* (H *-ico*) "-a". – Scienca termino ampleksanta la fenomenojn de magnetoj:

**MAGNETISM/O** (1; RE): A *magnet/-ism*, I(H) *-ismo*, Po *-yzm*, R *-izm*, F *magnétisme*, G *Magnetismus*. Ps-sf *-ism*.

El Gr *Mágnês (líthos)* "(ŝtono) el Magnezio" (regiono en Tesalio). – La scienca termino estas derivaĵo de la vorto por *magneto* (17a jc). Kp *mangano*.

**MAHAGON/O** (1; Jü): A *mahogany*, G *Mahagoni*, I *mogano*, Po *mahon*'; L bot. *Swietenia mahagoni*. Ĉe tia diverseco de formoj, Z kredeble deiris de la scienca L nomo de la arbo. ¶ Io =, Ie *mahagon*, Ia *-i*.

Vorto de centramerika origino (indiana lingvo en Honduraso).

**MAIZ/O** (f; RE): A *maize* [mejz], F *maïs*

[maís], G *Mais* [majs], I *mais* [majs], R *mais* [maís], (H *maíz* [maíth]); L bot. *Zea mays.* Ŝajne bazita sur A ortografio (tamen, se *-z* ŝuldas sian ekziston al la tendenco voĉigi intervokalan *s* en Eo, la bazo vastiĝas al FGIR.) ¶ 1894 *mais-*. ¶ Io =, Ie *mais* [máis], Ia *mais* [maís].

Pere de H el lingvo en Haitio (*mahiz*).

**MAJ/O** (f; Du,RE): A *May* [mej], F *mai*, G *Mai* [maj], I *maggio*, PoR *maj*, (H *mayo* [májo]); L *(mensis) Maius* [maj-]. Ea radiko laŭ proksimuma prononco de LGPoR. ¶ Io *mayo*, Ie *may*, Ia *maio.*

Orig. adj. formita el L *Maia*, nomo de itala fekundiga diino, kies festo estis celebrata en majo. La nomo eble estas ligita kun L *magnus* "granda", *maior* "pli granda" (vd. *majoro*).

**MAJEST/o** (f; N-ro 15 1888,RE): A *majes/ty*, F *-té*, Po *-tat*, (H *-tad*), G *Majestät*, I *maestà.* Kun escepto de la A formo, la radiko estas en UV prezentita kiel adjektivo, kiu tamen en la fontlingvoj estas derivaĵo de la subst.: A *majest/ic*, F *-ueux*, Po *majestatyczny* (kp ank. G *majestätisch*, I *maestoso*). Ps-sf *-t(at)-*. ¶ Io =, Ie *majest/-ie*, Ia *-ate.*

El L *maies/tas -tatis* "-eco", propr. "pligrandeco", de *maior* "pli granda" (vd. *majoro*).

**MAJOLIK/O** (2; Jü): APoR *majol/ica*, F *-ique*, G *Majolika*, I *maiolica*, (H *mayólica*). ¶ Io *mayoliko*, IeIa* *majolica.*

I vorto, pli frue *maiorica*, propr. "de Majorko" (L *Maiorica*), ĉar tiu speco de fajenco estis unue fabrikata tie.

**MAJOR/O** (2; RE): AF *major*, G *Major*, I *maggiore*, PoR *major*, (H *mayor*). La Ea prononco respondas al GPoR, la skribo al AFPoR.

H vorto, el L *maior* "pli granda" (ĉar tiu oficiro havas pli altan gradon ol kapitano), orig. **mag-ior*, komp. de *magnus* "granda" (kp ank. *magis* "pli" k *maximus* "plej granda"; vd. *majstro* resp. *maksimumo*) de HE rad. **meg(h)-* "granda", kp Sa *mahánt-* "granda", Gr *mégas* "granda", A *much* "multe". Samfamilia estas ankaŭ *majesto*; kp ev. *majo, matadoro.*

**MAJSTR/O** (f; RE): A *master*, F *maître*, G *Meister* [máj-], I(H) *maestro*, Po *majster*, R *master.* Kredeble bazita sur I, kies vokalduopo *-ae-* ofte en la prononco proksimiĝas al [aj]; kompreneble la GPo formoj efike apogis (*-er* senakcenta!), dum A *master* formis bazon por la ĝemela *mastr/o.* La I formo estas internacie konata, precipe en la muziko. ¶ IoIa *maestro*, Ie *mastro.*

El L *magister* "instruisto; ĉefo, estro", der. de *magis* "pli" (vd. sub *majoro*); kp la antonimon *ministro.*

**MAKADAM/O** (2; Jü): AFI(H) *macadam*, G *Makadam*, Po *makadam.*

Laŭ la nomo de skota inĝeniero J.L. Mac Adam, kiu (ĉ. 1820) inventis la procedon de makadamizo.

**MAKARON/O** (1; Jü): A *macaroon*, F *macaron*, G *Makrone*, Po *makaronik*, R *makaron.* Formo laŭ FR(Po). Kp. sekv. ¶ Io =, Ie *macron*, Ia *macaron.*

F vorto, pruntita (kun ŝanĝo de senco) el I (ven.) *maccarone* "makaronio" (kp tiun, etimologie identan).

**MAKARONI/O** (1; Be): AF *macaroni*, G *Makkaroni*, I *maccheroni* [mak-], Po *makaron*, R *-y*, (H *macarrón*). En la plimulto de la fontlingvaj formoj enestas la I plurala finaĵo *-i*, kiu do estas parto de la internacia formo; tiu *i* ankaŭ oportune diferencigas tiun ĉi radikon disde *makaron-*. ¶ Io =, Ie *maccaroni*, Ia *macaroni.*

I vorto (la dialekta venecia formo *maccaroni* estas bazo de la aliilingvaj formoj) kun necerta etimologio.

**MAKLER/I** (f; RE): G *Makler* "-isto", PoR *makler* "-isto". Z do prenis agantnomon (kun sufikso *-er*) kaj faris el ĝi verbkarakteran radikon (la responda G verbo estas *makeln*). Forme oni povas kompari *kelner/o*, kiu ankaŭ havas germanslavan bazon. ¶ Io *kurtajar* (kp F *courtage* "-ado"); kp IeIa* *curtagero* "-isto".

Agantnomo de G *makeln* "makleri", orig. "negoci", der. de G basa *maken* "fari", re-

sponda al G *machen*, A *make* s.s.; probable de HE rad. **mag-* "(kun)knedi, formi" (vd. sub *maso*).

**MAKSIM/O** (3; Jü): A *maxim*, F *-e*, G *Maxime*, I *massima*, Po *maksyma*, R *maksima*, (H *máxima*). ¶ Ie *maxim/e*, Ia *-a*. Mankas en Io (*sentenco, regulo, principo*).

El L mez. *maxima (regula)* "plej grava (regulo, principo)", de *maximus* "plej granda, plej alta" (vd. *maksimumo*).

**MAKSIMUM/O** (3; Be): AF *maximum*, G *Maximum*, I *massimo*, PoR *maksimum*, (H *máximum*). L (kp sube) finaĵo *-um* konservita en Eo same kiel en la plimulto de fontlingvoj (vd. liston sub *forumo*); krome *-um* estas tie ĉi necesa por diferencigi disde *maksim-*. Kp la antonimon *minimum/o*. ¶ IoIa *maximo*, Ie *máximum*.

Subst.-igo de L *maximum* "(la) plej granda (alta)", neŭtra formo de *maximus*, superl. de *magnus* "granda" (vd. *majoro*; kp spec. *maksimo*).

**MAKUL/O** (f; Un): L *macula*; G *Makel*, I *macchia* [mákja], (H *mácula*). Kp A *immacul/ate*, F *-é* "senmakula", F *maculer* "-i". Fruaj ekzemploj pri senŝanĝa L *-ul-* en Eo, vd. sub *angulo*. ¶ Io =, Ie *macul*, Ia *-a*.

Necerta etimologio.

**MAKZEL/O** (f; RE): L *maxilla*; I *mascella*. Kp P *maxila*; ank. A *maxill/ary*, F *-aire*, (H *maxilar*) "-a". Radiko el L fonto (anatomia termino) kun du modifoj: (a) *el* anstataŭ *il*, sendube por eviti similecon al sufikso *-il* (laŭ modelo de I, vd. Waringhien 1946, 43; same ĉe *fringelo*, vd. tiun); (b) *kz* anstataŭ *ks*. Tiu varianto (ĉiam antaŭvokala) plej ofte troviĝas ĉe pseŭdoprefikso *eks-* (vd. *ekzameno*) kun apogo de R; esceptoj (neklarigitaj) estas *makzel-* kaj *okzal-*. Speciale rimarkinde estas, ke la ekzakta paralelo *aks-el/o* (< L *axilla*) aperas kun *ks*. – La modifoj de Z lasis liberan lokon al eo *maksil/o* PIV, Nom. anat. 'makzelosto'. ¶ 1894 *maksil-*. ¶ Io *maxilo*, Ie *machuore* (der. de *machar* "maĉi", kp F *mâchoir*), Ia *maxilla*.

L vorto, der. de *mala* s.s., kun necerta etimologio.

**MALAKIT/O** (2; Be): AF *malach/ite* [-k-], I *-ita* [-k-], Po *-it*, G *malachit* [-k-], R *malakit*, (H *malaquita* [-ki-]); L *molochites* [-k-]. Ps-sf *-it* 3.

El Gr *molokhítês* s.s., propr. "malveca" (la koloro similis al tiu de la malvaj folioj), de *malákhê* (var. *molókhê*) "malvo" (vd. tiun).

**MALARI/O** (2; Jü): AFIPo(H) *malaria*, G *malaria*, R *maljarija*.

I vorto, propr. "malbona aero" (kvazaŭ la malsano estiĝis pro marĉaj haladzoj): I *mal/o* (*-a*) "malbona" (el L *malus* s.s., vd. *malica*), *aria* "aero" (vd. tiun).

**MALEOL/O** (f; RE): F *malléole*, I *malleolo*, (H *maléolo*, kp P *maleolo*).

El L *malleolus* "marteleto" (pro la formo de la koncerna osto), dim. de *malleus* "martelo", kredeble par. al R *molot* "martelo".

**MALGRAŬ** (f; Un): F *malgré*, I *malgrado*. Pri la vortfino *-aŭ*, vd. la liston de pseŭdosufiksoj; aliaj prepozicioj kun la sama fino estas *antaŭ*, *anstataŭ*, *ĉirkaŭ*, *kontraŭ*, *(laŭ)*. Nek la F, nek la I formo estis uzebla senŝanĝe pro finaĵoj *-e*, *-o*. ¶ Io *mal/gre*, Ie *-gré*, Ia *-grado*.

Orig. subst. kun proksimuma origina signifo "kontraŭvolo, malinklino", propr. "malbona plaĉo" (kp F *bon gré* "vole"): F *mal*, I *-o* "malbona" (vd. *malica*), F *gré*, I *grado* "plaĉo" (kp *agrabla*).

**MALIC/A** (f; RE): A *malic/ious*, F *-ieux*, (H *-ioso*), G *maliziös*† [-ts-], I *malizioso* [-ts-]; L *malitiosus*. Aŭ la radiko estas bazita sur la F substantivo (*malice* "-o", kp I *malizia*, L *malitia*, ank. H *malicia*), aŭ Z deiris de la cititaj adjektivoj, ellasante la sufiksojn (kp la procedon ĉe *elektr/a* ktp, vd. tiun): la dua alternativo ŝajnas pli probabla, konsiderante la adjektivan prezenton en UV kaj la signifon de kvalito. ¶ Io *malic-oza*, Ie *malici-osi*, Ia *maliti-ose*.

L *malitiosus* der. de *malitia* de *malus* "malbona" (> F *mal*, HI *-o*) kun necerta etimologio. Samfamiliaj vortoj en Eo: *malario*,

*malgraŭ*; ank. pref. *mal-*.

**MALT/O** (3; Jü): AF *malt*, I *-o*, (H *-a*), G *malz* [-ts]. ¶ Io =, IeIa *malt*.

El pĜ **maltaz*, propr. "moligitaĵo", kp G ant. *malz* "mola, senforta" de HE rad. **(s)meld-* "fandiĝi, moliĝi", kp Gr *méldein* "moligi", A *melt* "fand(iĝ)i". Kp *emajlo* k plue *mola*.

**MALV/O** (1; Jü): A *mallow*, F *mauve*, G *malve*, IR(H) *malva*, Po *malwa*; L *malva*. La L formo estas apogata de GIRPo. ¶ Io =, Ie *malv/e*, Ia *-a**.

L vorto, kredeble same kiel Gr *malákhê* s.s. (vd. *malakito*) pruntita el mediteranea lingvo.

**MAM/O** (f; RE): L *mamma*; F *mamelle*, I *mammella*, (H *mama*). Kp A *mammal* "mambesto". Anatomia termino prenita el L; la sufiksoj en la ceteraj fontlingvoj estas neglektitaj. ¶ Io =, Ie *mamm/e*, Ia *-a*.

L *mamma* "mamo; panjo; nutristino" (kiel ank. Gr *mámmê*; kp F *maman*, G *Mama*, I *mamma*, R(H) *mama* "panjo"). Infanvorto; kp spec. *papo*. El la sama elemento (sen duobligo) estas formita la HE vorto por "patrino": **mâtêr*, kp Sa *mâtâ*, Gr *mêtêr* (kp *metropolo*), L *mater* (kp *materio*), A *mother*, G *Mutter*, R *mat'*.

**MAMUT/O** (2; Jü): A *mamm/oth*, F *-outh* [-út], I *-ut*, G *Mammut*, Po(H) *mamut*, R *mamont*. ¶ Io =, Ie *mámmut*, Ia *mammut*.

R vorto, eble de jakuta origino. (La F formo, el kiu AGIPo, estiĝis pro mislego de la rusa.).

**MAN/O** (f; Un): L *manus*; F *main* (kp *manuel* "-a"), I(H) *mano*. Kp A *manual* "-a", G *manuell* "permana". Radiko krome konata per pluraj internaciaj derivaĵoj (kp ekz. la formojn cititajn sub *manovri* kaj *manuskripto*, ank. G *Manikür* "manflegado", R *manĵeta* "manumo"). ¶ 1882 *man-*. ¶ IoIa =, Ie *manu*.

L vorto kun mortintaj ĝerm. parencoj (ekz. G ant. *munt* s.s.). Samfamiliaj vortoj en Eo: *mandato, maniero, manifest/o, -acio, maniko, manipuli, manovri, manufakturo, manuskripto; demandi, emancipi, komandi, rekomendi*.

**MANA/O** (f; RE): AIPoR *mann/a*, F *-e*, G *Manna*, (H *maná*); L *manna*. Radikfino *-a* estis necesa pro la jama *man/o*; kp *boao*. ¶ Io =, IeIa *manna*.

Pere de L *manna*, Gr *mánna* el He *man* s.s., ĝenerale interpretata '*man hû?*' "kio estas tio?" (vd. El 16:15) aŭ konsiderata kiel identa kun Ar *mann* "favoro, donaco".

**MANDAREN/O** (2; Be): AFR *mandar/in*, I *-ino*, Po *-yn*, (H *-ín*), G *Mandarin*. Eo *-en-* por eviti aspekton de virinsufiksa vorto; vd. liston sub *abomeni*.

El P *mandarim* s.s., pere de malaja *mantri* "ministro" el Hi *mantri* "konsilisto" (Sa *mantrin-* "konsilisto" de *mantra-* "konsilo" el la radiko de *mányate* "pensas", vd. *menso*). La P formo estas influita de *mandar* "komandi".

**MANDAT/O** (1; E-isto 11/1890, Be): FPoR *mandat*, A *-e*, I(H) *-o*. Ps-sf *-at*.

El L *mandatum* "komisio" de *mandare* "komisii, komandi", orig. "transdoni, konfidi (taskon al iu)" el *manus* "mano" k *dare* "doni" (vd. tiujn, kp spec. *komandi, mendi*).

**MANDOLIN/O** (1; Jü): AF *mandolin/e*, I *-o*, PoR(H) *-a*.

I dim. de *mandola* "mandolo (speco de mandolino)" el L postkl. *pandura* "trikorda instrumento" el Gr *pandoúra* s.s. (kp H *bandol/a* "mandolo" k ev. A *banjo* "amerika kordinstrumento").

**MANGAN/O** (f; RE): AI *mangan/ese*, F *-èse*, R *-ec*, (H *-eso*), G *Mangan*, Po *mangan*. Z adoptis la mallongan GPo formon, forstrekante la sufiksecan *-es* (analoge ĉe *burĝ/o, framb/o*). La radiko *mangan-* estas uzata kiel bazo por kemiaj derivaĵoj ankaŭ en la ceteraj fontlingvoj, ekz. A *mangan/ate* "-ato", *-ic* "-a", *-ous* "-oza". ¶ Io =, Ie *mangan/e*, Ia *-ese*.

I metatezo de pli frua formo L sc. *magnesium*, tiel nomita ĉar ĝi estis izolita el la mineralo $MnO_2$ "piroluzito", en L *magnesia nigra*, el Gr *Magnêsía líthos* "ŝtono el Mag-

nezio (regiono en Tesalio): 1) magnetŝtono, 2) piroluzito". Etimologie identa kun la nomo de la elemento Mg (eo *magnezi/o* Jü): L sc. *magnesium*, antaŭe *magnium*, izolita el MgO = L *magnesia alba* ('blanka m.'). Kp *magneto.*

**MANĜ/I** (f; Un): F *manger* [-ĵ-], I *mangiare* [-ĝ-]. Kp A *manger* [-ĝ-] "-ujo", H *manjar* [-ñ-] "-aĵo". La Ea formo konformiĝas al la modelo F *g* [ĵ] : A *g* [ĝ] > Eo *ĝ* (vd. *aĝo*), kvankam I verŝajne ludis pli gravan rolon tie ĉi ol A. ¶ 1894 *ed-* (< L *edere*). ¶ IoIe *manjar*, Ia *eder*, *mangiar.*

El L *manducare* "maĉi" (popola vorto kiu iom post iom forpuŝis *edere* "manĝi"), de *manducus* "glutemulo, manĝegemulo", der. de *mandere* "maĉi" (kp. ev. tiun).

**MANI/O** (1; Jü): AIPo *man/ia*, F *-ie*, R *-ija*, (H *-ía*), G *Manie*; L *mania.* Ps-sf *-i* 1.

El Gr *manía* "furiozo, frenezo", der. de *maínesthai* (el **manj-*) "furiozi, frenezi", steme identa kun Sa *mányate* "pensas" (HE rad. **men-*, vd. *menso*).

**MANIER/O** (f; RE): A *manner*, F *manière*, G *Manier*, I *maniera*, R(H) *manera.* Eo *-ie-* baziĝas sur FGI ortografio (kp ank. la R prononcon [man'éra]) kaj evitigas aspekton de derivaĵo de *man-*. ¶ Io =, Ie *manier/e*, Ia *-a*, *modo* (< L *modus*).

F vorto, orig. "kondutmaniero, gestado", subst.-igo de F ant. *manier* "mana", adj. de *main* "mano" (kp tiun).

**MANIFEST/i** (1; RE; *-o* Jü,PIV,*-i* PV): A *manifest*, F *-er*, G *-ieren*, I *-are*, Po *-owac'*, (H *-ar*). Kp subst. ('skriba deklaro'): PoR *manifest*, AI *-o*, F *-e*, G *Manifest*, (H *manifiesto*). Agosubstantivo ('publika manifestado'): **MANIFESTACI/O** (3; PV): AF *manifest/ation*, I *-azione*, Po *-acja*, R *-acija*, (H *-ación*). Ps-sf *-cio.*

El L *manifestat/io -ionis* "evidentigo, montrado", subst. de *manifestare* "evidentigi", der. de *manifestus* "evidenta; trovita ĉe freŝa faro", propr. "kaptebla per la mano" (kp semantike G *handgreiflich* "evidenta", propr. "mankaptebla"): la unua elemento estas *manus* "mano" (vd. tiun), la dua estas obskura.

**MANIK/O** (f; RE): L *manica*; F *manche*, I *manica*, (H *manga*). Bazita sur L. ¶ Io =, Ie *manche*, Ia *manica.*

L *manica* propr. "manumo", der. de *manus* "mano" (vd. tiun).

**MANIPUL/I** (2; Jü): A *manipul/ate*, F *-er*, G *-ieren*, Po *-owac'*, R *-irovat'*, (H *-ar*), I *manipolare.*

Der. de F farmaciista termino *manipule* "manpleno (da medicinaj herboj)", el L *manipulus* "manpleno", el *manus* "mano" k la radiko de *plenus* "plena" (vd. tiujn).

**MANK/I** (f; RE): F *manquer* [-ké], I *mancare.* Kp Nd *mankeren.* Kun mnemonika apogo de G *mangeln* "-i". ¶ Io *mankar*, IeIa *mancar.*

Der. de I *manco* "mankhava†" el L *mancus* "kripla" (eble orig. "mankripla", kp H *manco* "unubraka": tiuokaze de L *manus* "mano", vd. tiun). – G *mangeln* estas probable neparenca.

**MANOMETR/O** (2; Be): A *mano/meter*, F *-mètre*, I *-metro*, PoR *-metr*, G *Manometer*, (H *manómetro*).

Farita (en F de Varignon, 1706) el Gr *manós* "maldensa" (par. al *mónos* "sola", vd. *monaĥo*) k *métron* "mezurilo" (vd. *metro*).

**MANOVR/I** (f; RE): A *man/oeuvre*, F *-oeuvrer*, G *-övrieren*, I *-ovrare*, Po *-ewrowac'*, R *-evrirovat'*, (H *-iobrar*). Estas nature deiri de la F formo, ĉar el F la vorto disvastiĝis en aliajn lingvojn. malfacilon prezentas tamen la kombino *-oeu-* [ö]. Tiu kombino normale estas redonata per *e* en Eo (vkp. *kero*, *parkere*), sed Z elektis tie ĉi *o* (laŭ I?), konforma al la etimologio (vd. sube).

El L vulg. *manuoperare* "labori permane" el L *manus* "mano" (vd. tiun; pri la formo *manu*, vd. *manuskripto*) k *operare* "labori" (vd. *opero*).

**MANSARD/O** (2; Jü): A *mansard*, F *-e*, IPoR *-a*, G *Mansarde.*

F vorto, laŭ la nomo de la inventinto, arkitekto Mansard (1598– 1666).

**MANTEL/O** (f; RE) 1) hist., cer. 2)

mod.: A *mantle* (1), F *manteau* (1,2), G *Mantel* (1,2), I *mantello* (1,2), R *mantija* (1), (H *manto* 1). Bazita sur GI, semantike ankaŭ sur F. ¶ 1894 *mantl-*. ¶ Io = (1,2), Ie *mantel* (1), *mantó* (2), Ia *mantello* (1,2).

El L *mantellum*, dim. de *mantum* "mallonga mantelo", laŭdire de hispana origino.

**MANUFAKTUR/O** (2; N-ro 15 1888, Be): A *manu/factory*†, F *-facture*, PoR *-faktura*, (H *-factura*), G *Manufaktur*†, I *manifattura*. Bazita sur la akordo de F kaj la slavaj lingvoj. Ps-sf *-ur*. ¶ Io =, IeIa *manufactura*.

La vorto povas ankaŭ signifi "manufakturaĵo" (H) aŭ "fabrikado". (I): el L mez. *manufactura* "man/laboro, -fabrikado", kunm. de *manus* "mano" (vd. tiun; pri la formo *manu*, vd. *manuskripto*) k *factura* "farado", subst. de *facere* "fari" (vd. tiun).

**MANUSKRIPT/O** (1; RE): A *manu/script*, F *-scrit*, Po *-skrypt*, R *-skript*, (H *-scrito*), G *Manuskript*, I *manoscritto*. Forme influis ankaŭ L, vd. sube.

El L mez. *manuscriptum* s.s., propr. "(io) skribita permane", kunm. de *manu* "per la mano" (abl. de *manus* "mano", vd. tiun) k *scriptum* "skribita(ĵo)", ptc. perf. de *scribere* "skribi" (vd. tiun).

**MAP/O** (8; PV; ne ĉe Z; antaŭe [*land/*]*-kart/o*): A *map*, I *mappa*, (H *mapa*). Kp P *mapa*. Influo de Io ebla. ¶ Io =, Ie *carte (geografic)*, Ia *mappa, carta geographic.*

El L mez. *mappa mundi* "mondmapo", propr. "tuko de la mondo": *mappa* "viŝtuko", vorto de punika origino.

**MAR/O** (f; Un): L *mare*; F *mer* (kp *marin* "-a"), G *Meer*, I *mare*, Po *morze*, R *more*, (H *mar*). Kp A *marine* "-a", AF *maritime* "-a". L, apogata de HI, kaj plurlingvaj derivaĵoj montras la plej konvenan formon. ¶ Io =, Ie *mare*, Ia *mar*.

Komuna eŭropa vorto, kp ank. A *mere* "lageto", Ir *muir* "maro", Fi (!) *meri* "maro": (H)E praformo **mori*? Samfamiliaj vortoj en Eo: *marĉo, marini, rosmareno.*

**MARASM/O** (2; Jü): A *marasm/us*, F *-e*, I(H) *-o*, G *Marasmus*, PoR *marazm*; L med. *marasmus*. Ps-sf *-asm*.

El Gr *marasmós* s.s., subst. de *maraínein* "konsumi, (pas.) forvelki", probable par. al L *marcere* "esti velkinta". Kp *mordi*.

**MARCIPAN/O** (f; EG): A *marzipan (marchpane*†*)*, F *massepain*, G *Marzipan* [-ts-], I *marzapane* [-ts-], Po *marcypan*, R *marcipan*, (H *mazapán*). La Ea radiko respegulas GR. ¶ Io =, Ie *marcipane*, Ia *marzapane*.

I vorto (malnova venecia formo *matapàn*), pli frue "skatolo (por dolĉaĵoj), kesto", orig. kubmezuro k nomo de (bizanca) monero kun bildo de Kristo, el Ar mez. *mawt'abân* "tronant(a reĝ)o" (der. de *wat'aba* "sidi"). Popola etimologio en pluraj lingvoj modifis la formon per asociado al I *pane* "pano", F *masse* "(a)maso" ktp.

**MARĈ/O** (f; RE): A *marsh* [ma:ŝ], F *marais*. Kp G *Marsch* [-ŝ] "poldero". Bazita sur A(G?); anstataŭ *ŝ* aperas *ĉ* (la plej proksima sibla sono), ĉar *marŝ-* estis bezonata por alia signifo (vd. tiun). ¶ 1894 *maras-*. ¶ Io *marsho*; Ie *palude* (< L *pal/us -udis*), *morasse* (< A *morass*); Ia *palude, marisco* (< L mez. *mariscus*).

El pĜ **mariskô* (> Fk **marisk* > F *marais*), der. de **mari* "maro" (vd. tiun). A *moor* "erikejo" k G *Moor* "marĉo" estas apofonia formo de la sama vorto.

**MARĈAND/I** (f; RE): F *marchander*, I *mercanteggare*; G *markten*. Bazita sur F (Eo *ĉ* < F *ch*, vd. *aĉeti*). ¶ 1894 *marcand-*. ¶ Io *marchandar*, Ie *merc-achar*, Ia *mercantar**.

Propr. "agi kiel komercanto", der. de F *marchand*, I *mercante* "komercanto" (kp A *merchant* [-ĉ-] s.s.), subst.-igita ptc. prez. de L vulg. *mercatare* resp. L *mercari* "komerci" (vd. *merkato*). – (Simile G *markten* der. de *Markt* "vendplaco, merkato".).

**MARD/O** (f; Un): F *mardi*, I *martedí*, (H *martes*). Same kiel la aliaj nomoj de semajnaj tagoj bazita sur F (vd. sub *ĵaŭdo, lundo*). ¶ Io *mardio*, Ie *mardí*, Ia *martedi*.

El L *Martis dies* "tago de (la dio) Marso"

(vd. *marto*).

**MARGARIN/O** (1; Jü): AF *margar/ine*, I(H) *-ina*, Po *-yna*, R *-in*, G *Margarine*. Ps-sf *-in* 2.

Kreita (en F de Chevreul, ĉ. 1840) el F *margarique* "speco de acido, ingredienco de margarino", farita (komence de 19a jc) el Gr *márgaron* (var. *margarítês*) "perlo" (pro la koloro de la koncerna acido), vorto de orienta origino, kp Pe *marvârît* s.s.

**MARĜEN/O** (1; Jü): A *margin* [-ĝ-], F *marge* [-ĵ] (kp *marginal* "-a"), I *margine* [-ĝ-], (H *margen* [-ĥ-]); L *marg/o -inis*. Eo *ĝ* indikas la fontlingvan ortografion sed samtempe aludas al la mola prononco en ĉiuj modernaj fontlingvoj (vd. *aĝo*). Vokalŝanĝo *i* > *e* por eviti aspekton de virinsufiksa vorto, vd. *abomeni*. ¶ Io *marjino*, Ie *márgine*, Ia *margine*.

L *margo* ĝenerale "rando"; par. al G *Mark* "lim(region)o", vd. sub *marko*.

**MARIN/I** (2; Jü): A *marin/ade*, F *-er*, G *-ieren*, I *-are*, R *-ovat'*, (H *-ar*), Po *marynowac'*. (Ps-sf *-in* 1.)

Der. de L *marinus* "mara" (orig. do probable 'meti en salakvon'), adj. de *mare* "maro" (vd. tiun).

**MARIONET/O** (1; Jü): A *marion/ette*, F *-nette*, I *-etta*, PoR *-etka*, (H *-eta*), G *Marionette*. Ps-sf *-et*.

Propr. "Marieto" (t.e. "eta bildo de la Virgulino Mario", poste "pupo"), F der. de *Marion* "Marinjo", karesformo de F *Marie*, nomo devenanta (pere de LGr *Maria*) de Aramea *Mariâm* (kp He *Mirjâm*) kun pridisputata signifo.

**MARK/O** (f; RE): A *mark*, F *marque* [-k], G *Marke*, I(H) *marca*, PoR *marka*. La Ea radiko kombinas la originan sencon (1) "signo" (AFGHIPo) kun la sekundara (2) "signita objekto" (GRPo); al tio aldoniĝas (3) la homonima nomo de la monunuo (G *Mark*, Fi *markka*). ¶ Io *marko* (1,2), *"mark"* (3); Ie *marca* (1,2), *mark* (3); Ia *marca* (1,2), *marco* (3).

Kredeble orig. identa kun G *Mark* "lim(region)o" (pĜ **marko-*, par. al L *margo* "rando", vd. *marĝeno*). Probabla semantika evoluo: "limo" > "lim/ŝtono, -marko" > "marko, signo". La G monunuo *Mark* transprenis la nomon de la pezo *Mark* (= duona funto), tiel nomata probable pro la stampo (marko) sur la pezilo. Orig. pesita metalo servis kiel pagilo; pro tio nomoj de pezunuoj ofte fariĝis nomoj de monunuoj, kp A *pound* (orig. "funto"), Gr *tálanton* (vd. *talento*). – Parencaj vortoj en Eo: *marĝeno, markizo, rimarki*.

**MARKIZ/O** (f; RE): AF *marquis* [A *-kŭis*, F *-kí*] (F fem. *marquise* [-kíz]), G *Marquis* [-kí:], I *marchese* [-kéze'], PoR *markiz*, (H *marqués* [-kés]). Eo *-z-* kun solida apogo de PoRI(F). ¶ Io *markezo*, Ie *marquese*, Ia *marchese, marquis*. (La radiko kolizias kun alia internacia vorto: A *marquee*, F *marquise*, G *Markise*, H *marquesina*, PoR *markiza* 'ŝirmkurteno' > eo *markez/o* Jü, kp Io *marquizo*, Ia *marquise* [mankas en Ie].)

La vorto signifis orig. "komandanto de limregiono": el L mez. *marc(h)ensis*, der. de L mez. *marca* "limregiono" el G *Mark* s.s. (vd. sub *marko*).

**MARKOT/O** (f; RE): F *marcotte*, I *margotta*. Bazita sur F. ¶ 1906a *markodo*. ¶ Io *markot-ajo*, Ie *marcot*, Ia *-ta**.

F der. de L *marcus* "vito" (Kolumelo, 1a jc), laŭdire gaŭla vorto.

**MARMELAD/O** (1; Jü): A *marmalade*, F *marmel/ade*, I *-lata*, R *-ad*, G *Marmelade*, Po *marmolada*, (H *mermelada*). Vokalismo laŭ FGIR. Ps-sf *-ad*. ¶ Io =, Ie *marmel/ade*, Ia *-ada*.

H vorto, el Gr *melímêlon* "poma kompoto", kunm. de *méli* "mielo" (vd. tiun) k *mêlon* "pomo" (vd. *melono*). En la latinidaj lingvoj aldoniĝis la sufikso *-ad-/-at*, kiu troviĝas en multaj vortoj signifantaj manĝaĵojn/trinkaĵojn (kp *limonado*).

**MARMOR/O** (f; EG): L *marmor*, A *marble* (kp *marmoreal* "-[ec]a"), F *marbre* (kp *marmoréen* "-a"), G *Marmor*, I *marmo* (kp *marmoreo* "-a"), Po *marmur*, R *mramor*, (H *mármol*, kp *marmóreo* "-a"). Ea radiko

= LG, formo ankaŭ troviĝanta en la AFI adjektivoj. ¶ 1906a *marbo*. ¶ Io =, Ie *marmor*, Ia *-e*.

El Gr *mármaros* s.s., orig. "ŝtono, roko" (la senco "marmoro" estiĝis pro popoletimologia asociado al *marmaírein* "brili"); se pli frue "rompitaĵo", par. al la vortoj cititaj sub *mordi*. – AF *-b-* *estas* parazita; H *-l* estiĝis pro malasimilo.

**MARMOT/O** (f; RE): A *marmot*, F *-te*, I *-ta*, (H *-a*), G *Murmeltier* (*Tier* "besto"); L zool. *Marmota marmota*. La scienca L termino estas apogata de pluraj modernaj fontlingvoj. ¶ Io =, Ie *marmott/e*, Ia *-a**.

Kredeble modifo de Romanĉa *murmont* s.s., devenanta de L *mus* (stemo: *mur-*) *montis* "muso monta" (vd. *muso* resp. *monto*). La ŝanĝo al *marmot-* dependas de alsimiligo al F *marmotter* "murmuri" (simile *Murmel-* en G pro *murmeln* "murmuri").

**MAROK/O** (8; EdE): A *Morocco*, F *Maroc*, GR *Marokko*, I *Marocco*, Po *Maroko*, (H *Marruecos*). ¶ Io =, IeIa *Marocco*.

El Ar *Marrâkiŝ* "Maroko" (orig. nomo de unu el la kvar ĉefurboj de la lando: eo *Marakeŝo* Poŝatlaso). Kp sekv.

**MAROKEN/O** (f; RE): A *morocco*, F *maroquin* [-kê], G *Maroquin* [-kê], I *marocchino* [-k-], Po *marokin*, (H *maroquín* [-kín]). La fontlingva radikfino *in* estas ŝanĝita al *-en* (kun parta apogo de FG prononco) por eviti aspekton de virinsufiksa vorto (vd. sub *abomeni*). ¶ 1894 *marokin-*. ¶ Io *marokino*, Ie *maroquin*, Ia *marocchin*.

F vorto, propr. "maroka (ledo)" (kp F *marocain* "maroka"), der. de F *Maroc* "Maroko" (vd. tiun). – La A formo egalas al la landnomo.

**MARŜ/I** (f; RE): A *march* [-ĉ], F *marcher* [-ŝ-], G *marschieren* [-ŝ-], I *marciare* [-ĉ-], Po *maszerować* [-ŝ-] (kp *marsz* [-ŝ] "-o"), R *marŝirovat'*, (H *marchar* [-ĉ-]). Oni povas heziti inter *-ŝ* (FGPoR prononco) kaj *-ĉ* (AI prononco, kp AFI ortografion). La motivoj, kiuj igis Z doni al la radikoj *marŝ-* kaj *marĉ-* la respektivajn formojn, ne estas klaraj (efektive, oni male atendus **marŝ-* por la dua, kie [ĉ] nenie troviĝas en la fontlingvoj). ¶ 1894 *marc-*. ¶ IoIeIa *marchar*.

F vorto, ank. "paŝi", de pridisputata origino: ĉu el Fk **markon* "marki" (do orig. 'emfazi, signi la paŝojn')? aŭ el L vulg. **marcare* el *marcus* "martelo" (do orig. 'marteli la paŝojn')?.

**MARŜAL/O** (f; RE): A *marshal* [-ŝ-], F *maréchal* [-ŝ-], G *Marschall* [-ŝ-], I *maresciallo* [-ŝ-], Po *marszałek* [-ŝ-], R *marŝal*, (H *mariscal*). Eo *-ŝ-* laŭ ĉiuj fontlingvoj; la ĝermanaj kaj slavaj formon apogas ellason de la meza *-e-*. ¶ 1894 *marcal-*. ¶ Io *marshalo*, Ie *marchale*, Ia *marechal*.

F vorto, ank. (k orig.) "hufoferisto", de ĝerm. origino, kp G ant. *marahscalc* "stalisto" (> "[kortega] stalestro" > "kavaleriestro"): pĜ **marha-* "ĉevalo" (kp A *mare* "ĉevalino", G *Mähre* "ĉevalaĉo"), **skalka-* "servisto" (kp Gt *skalks* s.s.). – Eo-Post 1951, 140.

**MART/O** (f; Du, RE): L *(mensis) Martius*; A *March*, F *mars*, G *März* [-ts-], I(H) *marzo* [I -ts-], Po *marzec*, R *mart*. La nomoj de monatoj en Eo baziĝas precipe sur L (forfalo de *-ius* same kiel en *februaro*, *januaro*; tie ĉi la R formo eble servis kiel modelo). Formo kun *-t* lasas *Mars/o* (Haml) por la nomo de la dio kaj la planedo. ¶ Io =, Ie *mart/e*, Ia *-io*.

Propr. "Marsa (monato)", adj. de L *Mars* (gen.: *Martis*) "Marso" (nomo de la milita dio, pli frue *Mavors*; etimologio pridisputata). Samfamilia vorto en Eo: *mardo*.

**MARTEL/O** (f; RE): F *marteau* (kp *marteler* "-i"), I *martello*, (H *martillo*). Kp P *martelo*. ¶ Io =, Ie *martell/e*, Ia *-o*.

El L postkl. *martellus* "marteleto", dim. de *marculus* (var.: *martulus*) "martelo", dim. de *marcus* "martel(eg)o", par. al L *malleus* "martelo" k probable R *molot* s.s. Kp ev. *marŝi*.

**MARTIR/O** (1; Jü): AF *martyr*, G *Märtyrer*, I *martire*, (H *mártir*); L ekl. *martyr*.

Fontlingva *y* fariĝas normale *i* en Eo (vd. *kolimbo*). ¶ IoIe =, Ia *martyre.*

Propr. "atestanto pri sia kredo": el Gr *mártyr* "atestanto", orig. probable "atesto" < "rememoro" (tiuokaze par. al la vortoj citataj sub *memoro*).

**MAS/O** (f; RE): A *mass*, F *-e*, IR *-a*, G *Masse*, Po(H) *masa*; L *massa.* Eo *-s* el fontlingva *-ss-*. ¶ Io =, Ie *mass/e*, Ia *-a.*

El Gr *mâza* "bulo, pasto, hordea pano", propr. "kneditaĵo" el la radiko de *mássein* "knedi", de HE rad. **mag-* "knedi, formi", kp. A *make*, G *machen* "fari" (pĜ **makôn*, vd. sub *makleri*; kp ank. *masoni*), R *mazat'* "ŝmiri". Samfamiliaj vortoj en Eo: *amaso, masiva.*

**MASAĜ/O** (1; Jü): AF *mass/age*, I *-aggio*, R *-aĵ*, Po *mas/az'*, (H *-aje*). Eo *-s-* pro fontlingva *-ss-*. Ps-sf *-aĝ.*

Der. de F *masser* "-i", el Ar *massa* "tuŝi, tasti".

**MASIV/A** (f; RE): A *mass/ive*, F *-if*, G *-iv*, R *-ivnyj*, Po *masywny*; kp I *massiccio*, (H *macizo*). Ps-sf *-iv.*

Der. de F *masse* "maso" (vd. tiun). La HI formoj reprezentas varianton kun alia sufikso.

**MASK/O** (f; RE): A *mask*, F *masque* [-k], G *Maske*, I *maschera* [máskera], PoR *maska*, (H *máscara*). Z preferis la pli mallongan radikformon, kiu ankaŭ estas la plej disvastigita; la pli longa aperas en eo *maskerad/o* Z,PVS 'maskobalo'. ¶ Io *mask-ilo*, Ie *masca*, Ia *masca(ra).*

La mallonga formo estiĝis en F. Kredeble (pere de I) el Ar *maskhara* "ridindulo, burleskulo" de *sakhira* "moki, ridindigi".

**MASON/I** (f; EG): F *maconner* [masoné]; kp A *mason* "-isto", *-ry* "-ado, -aĵo". Eo *-s-* respegulas la prononcon [s] en F kaj A. ¶ Io *masonar*; IeIa *murar* (kp Ie *masson*, Ia *mason* "-isto").

Der. de F *macon* "-isto" el Fk **makjo* (kp L postkl. *mach/io -ionis* "-isto") de la radiko en pĜ **makôn* "fari" (vd. sub *maso*). Samfamilia vorto en Eo: *framasono.*

**MAST/O** (f; RE): A *mast*, F *mât*, G *Mast*, Po *maszt*, R *maĉta*, (H *mástil*). Unu el pluraj naŭtikaj terminoj de ĝermana origino (tie ĉi bazita sur AG), vd. Collinson 1959, 6. ¶ Io =, IeIa *mast.*

Orig. "stango", el pĜ **masto-*, responda al L *malus* "masto" (< **mazdos*; *-l-* laŭ *palus* "paliso" aŭ el *d*, kp sub *larmo*).

**MASTIK/O** (f; RE): AF *mast/ic*, I *-ice*, R *-ika*, G *Mastix*, (H *almáciga*). Kp ankaŭ la L originformon sube. Sama radikfino kiel en pluraj aliaj botanikaj terminoj (tie ĉi apogata de AFR), vd. sub *lariko.* ¶ IoIa *mastico*, Ie *mástic.*

Pere de L *mast/ix -icis* (var.: *mastiche*) "rezino de lentisko" el Gr *mastíkhê* s.s., propr. "maĉaĵo" (oni maĉis la bonodoran rezinon), kp *mastázein* "maĉi" (vd. tiun).

**MASTR/O** (f; Un): A *master*, F *maître.* Kp (spec. forme) I *(capo) mastro* "laborestro". Vd. cetere la formojn cititajn sub la ĝemela radiko *majstr/o* (orig. komuna senco "estro"). Eĉ trian fojon la sama vorto eniris Esperanton: eo *magistr/o* Jü). Koncerne *mastr/o* el A *master* (*e* senakcenta!) kp *pastr/o* el L *pastor* (*o* senakcenta!). ¶ Io =, Ie *mastre*, Ia *patrono* (< F *patron*), *domino* (< L *dominus*).

Etimologie identa kun *majstro*, vd. tiun.

**MAŜ/O** (f; RE): A *mesh* [-ŝ], G *Masche* [-ŝ-]. Kp Nd *maas.* La Ea formo estas ĝermana (pli precize germana); tamen hazarde ankaŭ la romana ekvivalento komenciĝas per la sama silabo: F *maille*, I *maglia*, (H *malla*); L *macula.* ¶ 1894 *mali-.* ¶ Io *masho*; Ie *mallie*, Ia *malia.*

Ĝerm. vorto (kp ank. Sv *maska*), par. al Li *mâzgas* "nodo".

**MAŜIN/O** (f; Du,RE): AF *machine* [-ŝ-], G *Maschine* [-ŝ-], I *macchina* [-k-], Po *maszyna* [-ŝ-], R *maŝina*, (H *máquina* [-k-]); L *machina* [-k-]. Eo *-ŝ-* reprezentas la prononcon de la plimulto de fontlingvoj (AFGPoR). ¶ 1894 *macin-.* ¶ Io *mashino*, Ie *machin/e*, Ia *-a.*

El Gr (dor.) *mâkhanâ*, (cet. dial.) *mêkhanê* "maŝino; invento; artifiko" (vd. *meĥaniko*).

**MAT/O** (f; RE): A *mat*, F *natte*, G *Matte*,

Po *mata*; L postkl. *matta*. – Kolizias kun internacia ŝaktermino eo *mat/o* E-isto 12/1892,PVS (< AH *mate*, FPoR *mat*, G *matt*, I *matto*). ¶ Io =, Ie *matt/e*, Ia *-a*.

Vorto de semida (punika?) origino, responda al He *mitt'âh* "kovraĵo" el *nât'âh* "sterni".

**MATADOR/O** (2; Jü): AFPoR *matador*, G *Matador*, I *mattadore*, (H *matador [de toros]*). Ps-sf *-or* 1.

Propr. "mortig/anto, -isto", agantnomo de H *matar* "mortigi" el L *mactare* "mortigi, oferi", orig. "omaĝi, honori (iun) per oferaĵoj", de *mactus* "honorata, laŭdata", kredeble de la radiko en *magnus* "granda" (vd. *majoro, maksimumo*).

**MATEMATIK/O** (1; Du,RE): A *mathematics*, F *mathématiques* [-ík] (plur.), G *Mathematik*, I *matemat/ica*, Po *-yka*, R *-ika*, (H *matemáticas*, plur.); L *mathematic/a, -e*. Ps-sf *-ik*.

El Gr *mathêmatikê (tékhnê)* s.s., propr. "scienca (disciplino)", adj. de *máthê/ma -atos* "scio, (plur.) sciencoj", subst. de *manthánein* (aor.: *matheín*) "lerni, ekkoni", kredeble par. al R *mudryj* "saĝa", Sa *medhâ* "saĝo, kono". Samfamilia vorto en Eo: *krestomatio*.

**MATEN/O** (f; Un): F *matin* [-ê], I *mattin/a, -o*. Kp A *matins* "-a diservo". Bazita sur F kun ŝanĝo *in* > *en* por eviti aspekton de virinsufiksa vorto (rimarku la F prononcon; vd. sub *abomeni*). – La ĝermana ekvivalento sin kaŝas en *morgaŭ*. ¶ Io *matin/o*, Ie *-e*, Ia *mat(ut)ino*.

El L *matutinum* s.s., subst.-igo de *matutinus* "-a", kp *Matuta* "diino de la mateno", sambaza kun *maturus* "frua" (vd. *matura*); kp ank. L *mane* "maten/o, -e".

**MATERI/O** (1; Be): A *matter*, F *matière* (kp *matériel* "-a"), G *Materie*, IPo(H) *mater/ia*, R *-ija*; L *mater/ia, -ies*.

L *materia* ank. "ligno; nutraĵo": der. de *mater* "patrino" (do orig. "patrina substanco = nutrofonto", ekz. lignotrunko kiel produktanto de ŝosoj); pri tiu, vd. sub *mamo*. Kp sekv.

**MATERIAL/O** (f', 1; Du,RE): AR(H) *materi/al*, I *-ale*, Po *-al'*, F *matériel*, G *Material*. Ps-sf *-al*.

Propr. "materiaĵo", subst.-igita adj. (L postkl. *materialis*) de L *materia* (vd. *materio*).

**MATRAC/O** (f; RE): A *mattress*, F *matelas* [matlá], G *Matratze* [-tse], I *materassa*, Po *materac*, R *matras*. G sufiĉas kiel fonto, sed la Ea ortografio estas apogata de Po (*-ac!*); rimarku ankaŭ ke la meza *e* ne troviĝas en AR kaj en F prononco. ¶ 1894 *matraz-*. ¶ Io =, Ia *matras*, Ie *-se*.

Pere de L mez. *matracium* el Ar *mat'raħ* "mato, kuseno", propr. "(io) sternita" de *t'araħa* "ĵeti".

**MATUR/A** (f; Un): A *matur/e*, I *-o*, F *mûr* (kp *maturité* "-eco"), (H *maduro*); L *maturus*. ¶ Io =, IeIa *matur*.

En L ank. "ĝustatempa" (> "akurate matura"), "frua", sambaza kun L *matutinus* "matena" (kp *mateno*).

**MAŬZOLE/O** (2; Jü): A *mausol/eum*, F *-ée* [-z-], I(H) *-eo* [I -z-], G *Mausoleum*, Po *mauzoleum*, R *mavzolej*; L *Mausoleum*. Eo *-z-* pro FIPoR kaj la ĝenerala tendenco voĉigi intervokalan s-sonon. ¶ Io =, Ie *mausol/é*, Ia *-eo*.

El Gr *Mausôleion* "tombo (propr. ejo) de Maŭzolo", der. de *Maúsôlos* "Maŭzolo", nomo de Karia reĝo (†353 a.K.), al kiu lia edzino Artemizio konstruigis en Halikarnaso luksan tombmonumenton, unu el la sep mirindaĵoj de la antikva mondo (vd. Bennemann, Miru Pensu Ridu, p. 10).

**MAZURK/O** (1; Be): AFR *mazur/ka*, I(H) *-ca*, Po *-ek*, G *Mazurka*.

Propr. "(danco) de la graflando Mazovio", der. de Po *mazur* "mazoviano". Kp semantike *polko*.

**MEBL/O** (f; Du,RE): F *meuble* [möbl], G *Möbel*, I *mobile*, Po *mebel* (kp *meblowac'* "-i"), R *mebel'* (kp *meblirovat'* "-i"), (H *mueble*). La F vorto disvastiĝis en GPoR; oni povas preni la F formon kiel fonton de la Ea, se F *eu* [ö] fariĝis Eo *e* (kiel en *kero*). Kp ankaŭ G *ö* > Eo *e* en *mevo* (vd.

tiun). Ŝajnas tamen certe, ke tie ĉi la slavaj formoj kunrolis kiel modeloj (kp Szerdahelyi 1987, 118); *-bl-* sin apogas sur F kaj la PoR verboj. ¶ Io *moblo*, Ie *moble*, Ia *mobile*.

Propr. "moveblaĵo": el L *mobilis* "movebla" (kp *aŭtomobilo*), der. de *movere* "movi" (vd. tiun).

**MEĈ/O** (f; RE): F *mèche*, I *miccia* [-ĉ-], (H *mecha* [-ĉ-]). Bazita sur F (F *è* > Eo *e* kiel en *tre*; F *ch* > Eo *ĉ*, vd. *aĉeti*: tie ĉi konfirmata de I). ¶ 1894 *mec-*. ¶ Io *mech/o*, Ie *-e*, Ia *micca*.

Latinida vorto (> A *match* "alumeto") el L vulg. **micca*, kruciĝo de L *myxa* "lampa beko por meĉo" k *muc(c)us* "nazmuko" (oni do komparis la lampbekon kun nazo); el Gr *myxa* 1) "lampbeko" 2) "nazmuko" (vd. *muko*).

**MEDAL/O** (f; RE): A *medal*, F *médaille* [-áj], G *Medaille* [-álje'], I *medaglia* [-ál'a], Po *medal*, R *medal'*, (H *medalla* [-ál'a]). Latinida [l'] redonita per Eo *l*, vd. *batalo* (rimarku tie ĉi la APo formojn). Kontrastas *medaliono*, kp tiun. (Ps-sf *-al.*) ¶ Io *medalio*, Ie *med/allie*, Ia *-alia*.

I vorto, orig. nomo de monero valoranta duonan denaron; probable el L **medalia*, neŭtra plurala formo de L postkl. *medialis* "duon(valor)a" de *medium* "duono, mezo" (vd. *meza*). Samfamilia vorto en Eo: *medaliono*.

**MEDALION/O** (f; RE): A *medall/ion*, (H *-ión* [-l'-]), F *médaillon* [-j-], G *Medaillon* [-lj-], I *medaglione* [-l'-], Po *medalion*, R *medal'on*. Latinida [l'] redonita per Eo *-li-*, vd. *bataliono*. La diferenco inter *medal-* kaj *medalion-* estas frapa; du faktoj ŝajnas rimarkindaj: (a) en ambaŭ formoj la akcento de la fontlingvoj estas konservita (kontraŭe, **medali-* donus nenaturan akcenton); (b) la Eaj formoj en ambaŭ kazoj koincidas kun Po, kiu do povas esti la senpera modelo. – Ps-sf *-on*. ¶ Io =, Ie *medal/lion*, Ia *-ion*.

Propr. "medalego", aŭgmentativo de I *medaglia* "medalo" (vd. tiun).

**MEDI/O** (3; Jü): A *medium*, (H *medio*). Kp P *meio*. Ĉar H estas ekskludita kiel fontlingvo, restas nur A kiel fonto de la Ea radiko, kvankam la A vorto nur escepte estas uzata en tiu ĉi senco (*a pure medium* 'pura medio' Webster). Efektive, F *milieu* estas pli internacia (konata kiel fremdvorto en AG) sed tre malfacile asimilebla. Ĉu eblas, ke Z utiligis la etimologian bazon de la F vorto: L *medius locus* 'meza loko', ĉerpante *medi-* rekte el L? ¶ Io =, Ie *medie* (espismoj); Ia *milieu, ambiente* (< I).

Orig. "mezo" (iu estas *meze de* certaj aĵoj = en certa *medio*), el L *medium* "mezo" (vd. *meza*). Etimologie identa estas *mediumo*.

**MEDICIN/O** (1; RE): A *medic/ine*, IR(H) *-ina*, F *médecine*, G *Medizin* [-ts-], Po *medycyna*; L *medicina*. Ps-sf *-in*.

Propr. "kuracista (arto)", der. de L *medicus* "kuracisto", samradika kun *mederi* "kuraci, prizorgi", probable de la HE radiko citita sub *mediti*. Kp sekv. k *rimedo*.

**MEDIKAMENT/O** (2; Jü): A *medicament*, I(H) *-o*, F *médicament*, G *Medikament*, Po *medykament*; L *medicamentum*. Ps-sf *-ment*.

Propr. "kuracilo", der. de L *medicare* "kuraci" de *medicus* "kuracisto" (vd. *medicino*).

**MEDIT/I** (f; RE): A *medit/ate*, G *-ieren*, I *-are*, (H *-ar*), F *méditer*, Po *medytować*; L *meditari*.

L ank. "konsideri, pripensi" (> "prizorgi", kp *medicino*), probable de HE rad. **med-* "mezuri, pripensi" (kp semantike "pensi", orig. "pesi"), ekz. en Gr *mêdea* "konsultiĝo, decido". Kp *meduzo*; vd. plue *mezuri*.

**MEDITERANE/O** (8; GD; antaŭe *Meza maro*): A *Mediterr/anean*, I *-aneo*, (H *-áneo*), F *Méditerranée*; L postkl. *Mediterraneum mare*. Ps-sf *-an*. ¶ Io =, IeIa *Mediterraneo*.

Propr. "mezlanda (maro)" (t.e. maro meze de la landoj, kp G *Mittelmeer* 'Meza maro'), el L *medius* "meza" (vd. tiun) k *terra* "lando, tero" (vd. *tero*).

**MEDIUM/O** (2; Be): AIPoR(H) *medium*, F *médium*, G *Medium*. La internacia formo konservas la L (vd. sube) *-um*; kp *forumo*. ¶ Io =, IeIa *medium*.

L vorto (moderna senco ekde la 19a jc) signifanta "(io) intera" (t.e. "[io] peranta"), neŭtra formo de *medius* "meza" (vd. tiun; kp spec. la ĝemelan *medio*).

**MEDOL/O** (4; Ve,PV): L *medulla*; F *moelle* (kp *médullaire* "-a"), I *midollo*, (H *medula*), ank. A (sc.) *medull/a* "-o", *-ary* "-a". Anatomia termino bazita sur L; sonŝanĝo *u* > *o* (laŭ modelo de I) por eviti sufikssimilan radikfinon, vd. *artikolo*. ¶ Io *medulo*, Ie *medull/e*, Ia *-a*.

De pridisputata origino; ofte (kredeble nur per popola etimologio) asociita kun L *medius* "meza".

**MEDUZ/O** (1; Jü): AI(H) *medusa* [AI -z-], F *méduse* [-z-], G *Meduse*, PoR *meduza*. Eo *-z-* do respegulas la prononcon de la plimulto de fontlingvoj. ¶ Io =, Ie *medus/e*, Ia *-a*.

Farita el L *Medusa* < Gr *Médousa* "Meduzo" (mita estaĵo kun 'hararo' el serpentoj; la tentakloj de la besto estis komparataj kun tiuj). La Gr nomo signifas "Regantino" k estas orig. ptc. prez. de *médein* "regi; (med.) prizorgi, pripensi" (kp *mediti*).

**MEĤANIK/O** (f; Du, Be; kp adj. *meĥan/a* Christaller 1923); **-K-** (8; Ve; kp adj. *mekan/a* EBV): A *mechan/ics* [-k-], Po *-ika* [-ĥ-], F *mécanique* [-k-, -ík], G *Mechanik* [-c-], I *meccanica* [-k-], R *meĥanika*, (H *mecánica* [-k-]). Eo *-ĥ-* pro (PoR kaj) origina Gr *X (kh)*, vd. *ĥaoso*. Ps-sf *-ik*. ¶ 1894 *mekanik-*.

El Gr *mêkhanikê* s.s., propr. "maŝina (arto, scienco)", adj. de *mêkhanê* "maŝino" (vd. tiun), kp la samradikan *mêkhos* "ilo, rimedo". Probable de HE rad. **magh-* "povi, kapabli", kp R *mogú* "mi povas", A *may*/G *mögen* "povi", A *might*/G *Macht* "povo, potenco". Kp sekv.

**MEĤANISM/O**, **-K-** (8; *-ĥ-* Jü, *-k-* Ve): A *mechan/ism*, Po *-izm*, F *mécanisme*, G *Mechanismus*, I *meccanismo*, R *meĥanizm*, (H *mecanismo*) [pri la prononco, kp la antaŭan]. Pri Eo *-ĥ-*, vd. *meĥanismo*. Ps-sf *-ism*.

El L postkl. *mechanisma* "aparato", paralelformaĵo al *mechanema* s.s. el Gr *mêkhánêma* "aparato, inventaĵo", subst. de *mêkhanásthai* "konstrui, inventi", der. de *mêkhanê* "maŝino, invento" (vd. la antaŭan).

**MEJL/O** (f; RE): A *mile* [majl], F *mille* [mil], G *Meile* [májle'], I *miglio* [-l'-], Po *mila*, R *milja*, (H *milla* [-l'-]). Estis necese diferencigi tiun ĉi radikon disde *mil*. Z elektis diftongon, videble laŭ G ortografio (kp *hejmo* el G *Heim*, *hejti* el G *heizen*). La alternativo estus transskribi la molan l-sonon en IR(H), sed nek **mijl-* nek **milj-* estus bone distingeblaj de *mil*; *mili-* estis bezonata por alia signifo. ¶ 1894 *meil-*. ¶ Io *mili/o*, Ie *-e*, Ia *millia*.

El L *mille (passus)* "mil dupaŝoj". Etimologie identa kun *mil*, vd. tiun.

**MEKSIK/O** (8; N-ro 77 1895; kp *Meksik/ujo* PR, *Meksik/io* LR II, *Meksik/land/o* EdE; *Meksik/o* = *Meksik/urb/o* LR II): A *Mex/ico*, F *-ique* [-ík], G *-iko*, I *Messico*, Po *Meksyk*, R *Meksika*, (H *Méjico*, [am.] *Mexico*). Vd. Albaut 1992, 20–62. ¶ Io *Mexik-ia*, Ie *Mexica*, Ia *Mexico*.

El Azteka *Mexitli*, nomo de milita dio.

**MEL/O** (f; RE): L *meles*. Zoologia termino prenita el L (samtipa kun *vulp/o* el L *vulpes*). ¶ Io *daxo* (< G *Dachs*); IeIa *taxon* (< I *tasso*, H *tejón*).

L pruntvorto, ev. identa kun *feles* "kato".

**MELANKOLI/O** (3; RE; kp *melankolik/a* N-ro 15 1888): A *melanchol/y* [-k-], Po *-ia* [-ĥ-], F *mélancolie*, G *Melancholie* [-k-], I *malinconia*, R *melanĥolija*, (H *melancolía*). Eventuala *-nĥ-* (laŭ PoR) estis, kiel ĉiam, evitata de Z. Ps-sf *-i* 1.

El Gr *melankholía*, propr. "nigra galo" (laŭ Hipokrato tia en la lieno kaŭzis melankolion): *mélas* "nigra" (kp *kalomelo*; par. al Li *mëlas* "blua"), *kholê* "galo" (vd. tiun k *ĥolero*, *kolero*).

**MELAS/O** (1; Jü): A *molasses*, F *mélasse*, G *Melasse*, IR *melassa*, Po *melasa*, (H *me-*

*laza*). Eo *s* pro fontlingva *ss*. ¶ Io =, Ie *melass/e*, Ia *-a*.

Propr. "mielecaĵo", el L *mellaceus* "mieleca" de *mel* "mielo" (vd. tiun).

**MELEAGR/O** (f; RE): L *meleagr/is -idis* (L zool. *Meleagris gallopavo*). Zoologia termino prenita el L kun apokopo de *-is* (aŭ *-id*) kiel en *lampir/o, okzal/o* (Wüster Esp. princ. 58). ¶ Io *dindo* (< F *dindon*), Ie *meleagre*, Ia *gallo de India* ('koko el Hindujo').

El Gr *meleagr/ís -ídos* "numido, L zool. *Numida meleagris*", supozeble fremdvorto kun popoletimologia asociado al la heroo *Meléagros*.

**MELIS/O** (2; Be): F *mélisse*, G *Melisse*, I *melissa*, PoR(H) *melisa*; L *melis/phyllum, -sophyllon* (L bot. *Melissa*). Eo *s* pro fontlingva (skribo *ss* kaj) prononco [s]. ¶ Io =, Ie *meliss/e*, Ia *-a*.

El L mez. *melissa*, mallongigo de la L formo citita supre, el Gr *melissóphylon* s.s., propr. "abelfolio" (ĉar la planto estas ŝatata de abeloj), kunm. de *mélissa* "abelo" (de *méli* "mielo", vd. tiun) k *phyllon* "folio" (vd. tiun).

**MELK/I** (f; RE): A *milk*, G *melken*. Kp Nd *melken*; L *mulgere*. Bazita sur G. El inter la eŭropaj vortoj por 'lakto', Z adoptis la romanan kiel substantivon (kp *lakto*), la ĝermanan (kaj slavan, vd. sube) kiel verbon (apogatan de L): 'elpremi lakton'. Vd. liston ĉe *farbo*. ¶ 1894 *trar-* (< F *traire*). ¶ Io *melkar*, Ie *melcar*, Ia *mulger*.

Der. de la subst. "lakto": A *milk*, G *Milch* (pĜ **meluk-*). Kp R *moloko* "lakto", Ir *melg* "lakto", Gr *a-mélgein* (kun prosteza *a-*) "melki", L *mulgere* "melki" (HE rad. **melg-*).

**MELODI/O** (1; N-ro 15 1888, Be): A *melod/y*, IPo *-ia*, R *-ija*, (H *-ía*), F *mélodie*, G *Melodie*. Ps-sf *-i* 1. ¶ 1882 *melod/o*.

El Gr *melô(i)día* "melodio; kantado", der. de *melô(i)dós* "kantanta" el *mélos* "(ĥor)-kanto" (orig. "sekciigita, artikigita kanto", propr. "artiko") k *ô(i)dê* "kanto" (vd. *odo*). Por la unua elemento, kp *melodramo*.

**MELODRAM/O** (1; N-ro 30 1889, Be): AR(H) *melodra/ma*, I *-mma*, Po *-mat*, F *mélodrame*, G *Melodrama*. Ps-sf *-m(at)*.

Orig. "teatraĵo kun muziko", termino farita (en F) el Gr *mélos* "melodio, kanto" k F *drame* "dramo" el Gr *dráma* s.s. (vd. *melodio* resp. *dramo*).

**MELON/O** (f; RE): AFPo *mel/on*, I *-(l)one*, (H *-ón*), G *Melone*; L *mel/o -onis*. Mallongigo de L *melopepo* "(akvo)melono" el Gr *mêlopépôn* s.s., kunm. de *mêlon* "pomo" (mediteranea vorto el nekonata fonto, kp L *malum* "pomo") k *pépôn* "matura; kukurbo" (propr. "kuirita [de la suno]", de la rad. en *péssein* "kuiri", vd. tiun). Samfamiliaj vortoj en Eo: *kamomilo, marmelado*.

**MEM** (f; Un): F *même* [mem]. Kp I *medesimo*, (H *mismo*), ank. P *mesmo*. Vorto proksimume redonanta la F prononcon. ¶ 1881 *mem.* – 1894 *ipsu* (< L *ipse*). ¶ Io *ipsa*, Ie *self* (< A *-self*), Ia *mesme, ipse*.

El L vulg. **metipsimus*, superl. de **metipse* "mem", kunm. de L montra partikulo *met* k *ipse* "mem" (ekz. *egomet ipse* "ĝuste mi, mi mem"), supozeble samradika kun *is* "tiu, li" (rad. *i-*, vd. sub *identa*).

**MEMBR/O** (f; RE) 1) anat. 2) pers.: A *member* (2), F *membre* (1,2), I *membro* (1,2), (H *miembro* 1,2, kp *desmembrar* "dismembrigi"); L *membrum* (1). ¶ IoIa = (1,2), Ie *membre* (1,2).

El HE bazo **mems-* "karno", kp Sa *mâmsám* "karno", Gr *mêrós* "femuro", Gt *mimz* "karno". Kp sekv.

**MEMBRAN/O** (f; RE): AF *membran/e*, IPoR(H) *-a*, G *Membran*; L *membrana*. Ps-sf *-an*.

Orig. "maldika haŭto", der. de *membrum* "membro" (vd. tiun).

**MEMOR/o** (f; Un): L *memoria*; A *memor/y*, I(H) *-ia*, F *mémoire*. En UV prezentita kiel verbo (kun escepto de la A formo); kp A *re/member* "-i", *memorize* "enmemorigi", F *remémorer* "rememorigi", G *memorieren* "enmemorigi", (H *rememorar* "re-i"). Kp plue la adj. A *memor/-*

*able*, I *-abile*, (H *-able*), F *mémorable* "-inda", A *memorial* "-(ig)a". Rilate la radikfinon, kp la samtipan *glor/o* (< L *gloria*). ¶ Io *memor/o* (vb *-ar*), Ie *memor/ie* (vb *-ar*), Ia *memor/ia* (vb *-ar*, ank. *recordar se* < H *recordar*, I *ricordarsi*, L *recordari*).

Der. de L *memor* "(re)memoranta", adj. (kun duobligo) de HE rad. **(s)mer-* "rememori, konsideri, pripensi", kp Sa *smárati* "rememoras", Gr *mérimna* "zorgo", *mártyr* "atestanto" (vd. *martiro*), A *mourn* "funebri".

**MENCI/o** (3; Ka): AF *men/tion*, I *-zione*, (H *-ción*); L *ment/io -ionis*. Prezentita kiel verbo = A *mention*, F *-ner*, I *menzionare*, (H *mencionar*); L *mentionem facere* ('fari mencion'). Ps-sf *-cio*. ¶ Io *mencion/o* (vb *-ar*), IeIa *mention* (vb *-ar*).

L *mentio* orig. "rememorigo, aludo (pri iu, io)", samradika kun *mens* "menso" (vd. tiun).

**MEND/I** (f; RE): F *com-, de/mander*, I *comandare*; kp P *encomendar*, ank. A *countermand* "malmendi". Unuavide la Ea radiko ŝajnas esti kreita per senprefiksigo de la F formoj (kp ekz. *kroĉi* el F *ac-, dé/crocher*); tamen la franclingva traduko en UV ("mander, commettre") indikas, ke Z deiris de la simpla F *mander* "voki, venigi". Vokalŝanĝo *a* > *e* (**mand/i* estus neoportuna pro *demand/i*), kredeble laŭ certaj nacilingvaj formoj (vd. sub *komandi* kaj *rekomendi*). ¶ 1894 *mand-*. ¶ Io *komendar*, Ie *comendar*, Ia *commandar, ordinar* ('ordoni').

Orig. "komandi, postuli (ion)", latinidaj prefikskunmetoj el L *mandare* "komisii", orig. "konfidi, transdoni (ion al iu)" (vd. *mandato*).

**MENS/O** (3; Jü; kp *mental/a* "-a" Ve; antaŭe *spirit/o*): L *mens* (gen.: *mentis*); I(H) *mente*. Kp adj. AFG(H) *ment/al*, I *-ale* "-a". La vera stemo estas *ment-* (kp la samtipajn *dent/o, gent/o*), sed tiu formo jam estis okupita de alia signifo; Z do adoptis la L nominativon (paralela kazo estas *lens/o*: *lent/o*). Pri aliaj eblaj radikkolizioj, vd. *mensogo, mentono*. ¶ Io *ment/o*, IeIa *-e*.

L *mens* "intelekto, penso, menso, spirito, intenco" estas identa kun Sa *matí-* "penso, intenco", A *mind* "menso", R *(pa)mjat'* "memoro", Li *mintis* "penso, ideo" el HE **mntis* "menso,penso", subst. de rad. **men-* "pensi, mense agitiĝi", ekz. en Sa *mányate* "pensas", *mánah* "menso, intelekto, penso, spirito"; Gr *ménos* "menso", *mnêmê* "memoro", *mnêsthai* "memori" (vd. *amnestio*), *manía* "frenezo" (vd. *manio*), *autómatos* "mem pensanta" (vd. *aŭtomato*), *Méntôr* (nomo propra, vd. *mentoro*); L *mentio* "mencio" (vd. tiun), *mentiri* "mensogi" (vd. sekv.), *comminisci* "elpensi" (vd. *komentario*), *monere* "admoni" (vd. tiun k *mono, monumento*), *monstrum* "antaŭsigno" (vd. *monstro, montri*); G *meinen* "opinii, pensi", *mahnen* "admoni"; A *mean* "intenci, voli diri".

**MENSOG/o** (f; RE): F *mensonge*, I *menzogna*. Kp F(H) *ment/ir*, I *-ire*, L *-iri* "-i", ank. A *mend/acious*, L *-ax* "-ema". La radikoj *mend-* kaj *ment-* (eble ankaŭ *mens-*) estis jam okupitaj de aliaj signifoj; Z do deiris de la FI substantivoj. La Ea formo povas esti rigardata kiel kompromisa (*-s-* laŭ F; forfalo de *n* post *o* laŭ I); la lasta trajto tamen ankaŭ povas esti klarigata kiel malsimiligo pro la antaŭa *n* (**mensong-* estus konsiderinde pli peza formo). ¶ Io *menti/ar* "-i", *-o* "-o"; IeIa *ment/ir* "-i" (Ie *-ie* "-o", Ia *-ita* "-o").

El L vulg. **mentionia*, formita el L *mentiri* "-i", orig. "elpensi (ion)", der. de *me/ns -ntis* "menso" (vd. tiun). – L *mendax* probable apartenas al alia vortfamilio.

**MENT/O** (f; RE; ank. *mint/o* Ve): L *ment(h)a*; A *mint*, F *menthe*, G *Minze* [-ts-], I(H) *menta*, Po *mieta*, R *mjata*. Formo kredeble laŭ L (botanika termino). Pri radikkolizioj kun *mens/o* kaj *menton/o*, vd. s.t.v. ¶ Io *mint/o*, Ie *-e*, Ia *mentha*.

El Gr *mínthê* s.s., de nekonata origino.

**MENTON/O** (f; RE): F *menton*, I *mento*; L *mentum*. Por unu botanika kaj unu

anatomia termino L prezentas formojn, kiuj ambaŭ donus *ment-* en Eo: *menta* (bot.), *mentum* (anat.). Z retenis tiun formon por la botanika senco, utiliganta F por la anatomia. ¶ Io =, Ie *menton*, Ia *mento*.

F el L vulg. **ment/o -onis*, der. de L *mentum* "mento", propr. "elstarajo", de HE rad. **men-* "elstari" (vd. *monto*).

**MENTOR/O** (2; Jü): AFIPoR(H) *mentor*, G *Mentor*.

El Gr *Méntôr* (nomo de la konsilanto de Telemaĥo en Odiseado de Homero), propr. "pensulo, saĝulo", identa kun Sa *mántar* "pensulo", agantnomo de HE rad. **men-* "pensi, mense agitiĝi" (vd. *menso*).

**MENU/O** (1; Ka): AFPo *menu*, G *Menü*, R *menju*, (H *menú*, *minuta*). Formo laŭ F (kp ekz. *avenu/o*, *rendevu/o*). ¶ Io =, Ie *menú*, Ia *menu*.

F gastronomia termino, orig. "detaligita (listo)" el L *minutus* "fragmentigita, eta", orig. ptc. perf. de *minuere* "malgrandigi" (vd. la etimologie identan *minuto*).

**MERIDIAN/O** (2; RE): AR *meridi/an*, I(H) *-ano*, F *méridien*, G *Meridian*. Ps-sf *-an*.

El L *meridianus (circulus)* "tagmeza (cirklo)", adj. de *meridies* (pli frue **medidies*) "tagmezo", kunm. de *medius* "meza" (vd. tiun) k *dies* "tago" (vd. *hodiaŭ*).

**MERIT/I** (f; Un): A *merit*, I *-are*, F *mériter*, (H *merecer*, kp *mérito* "-o"); L *mer/ere, -eri* (kp *meritum* "-o"). ¶ IoIeIa *meritar*, Ia ank. *merer*.

L *mer/ere, -eri* (ptc. perf.: *meritus*) "meriti; akiri, gajni; servi" estas kredeble par. al Gr *meíresthai* "ricevi kiel sian porcion" (kp *méros* "parto, porcio"). Samfamilia vorto en Eo: *emerito*.

**MERIZ/O** (f; RE): F *merise* [-íz]. Pri morfemfina *-z*, vd. Szerdahelyi 1987, 115. Escepte, L ne ludis rolon ĉe tiu ĉi botanika termino (L bot. *Prunus avium*); eble la rimanta (kaj botanike parenca!) *ĉeriz/o* < F *cerise* inspiris Z. ¶ 1894 *meris-*. ¶ Io =; (Ie *savagi cerese*), Ia *ceresia silvestre* ('sovaĝa ĉerizo').

Kruciĝo de F *amer* "amara, maldolĉa" k *cerise* "ĉerizo" (vd. tiujn). La *a-* forfalis, ĉar oni kredis ĝin parto de la difina artikolo *la*.

**MERKAT/O** (4; PV; ne ĉe Z): A *market*, F *marché*, G *Markt*, I *mercato*, (H *mercado*). Formo ŝajne kopiita laŭ I (komerca termino!); eble kontribuis ankaŭ la L originvorto (vd. sube). Influo de Ido ne estas ekskludita. Cetere, **markt-* laŭ G donus tro komplikan konsonantkombinon, kaj **market-* laŭ A estus neebla pro *mark/et/o*. Pri la semantika kampo *merkato-bazaro-foiro*, vd. Albaut, FE 247/1967, 115. ¶ Io =, Ie *mercat/e*, Ia *-o*.

El L *mercatus* "komercado, negocado" de *mercari* "komerci, negoci", der. de *merx* (gen.: *mercis*) "varo, komercaĵo", samradika kun *merc/es -edis* "pagita prezo, salajro"; plua etimologio necerta.

Samfamiliaj vortoj en Eo: *komerco*, *marĉandi*, ev. *merkredo*.

**MERKRED/O** (f; Un): F *mercredi*, I *mercoledí*, (H *miércoles*). Prenita el F kun apokopo de fina *-i* (same kiel la ceteraj nomoj de semajnaj tagoj). ¶ Io *merkurdio*, Ie *mercurdí*, Ia *mercuridi* (kp L sube).

El L *Mercurii dies* "tago de Merkuro": *Mercuri/i*, gen. de *-us*: nomo de la dio de komercado (laŭ kelkaj ligita kun *merx* "varo", vd. *merkato*; laŭ aliaj de etruska origino); *dies* "tago" (vd. *hodiaŭ*).

**MERL/O** (f; EG): (A†)F *merl/e*, I *-o*, (H *mirlo*); L *merula*. La L zoologia termino donus laŭ normala procedo **merol/o* (kp *garol/o*, *regol/o* sub *artikolo*); Z preferis la pli mallongan formon kun apogo de tri modernaj fontlingvoj. ¶ Io =, Ie *merl/e*, Ia *-a*.

Par. al G *Amsel*, A *ouzel*, *ousel* s.s., HE bazo **(a)mesl-*. – L *merula* signifis ankaŭ iun marfiŝon, kp sekv.

**MERLANG/O** (2; Jü): L zool. *Gadus merlangus*; FR *merlan*. La scienca L termino evitigas sufikssimilan radikfino *-an*. ¶ Ie =, Io *merlano*; mankas en Ia.

El F ant. *merlanc*, der. de *merle* "merlo" pere de ĝermandevena sufikso *-ing* (ank. en *haring/o*); ties fontvorto L *merula* estis nomo de fiŝo (merlango?). Kp *merlo.*

**MES/O** (f; RE): A *mass* [mäs], F *mess/e*, I *-a*, G *Messe*, Po *msza*, (H *misa*); L ekl. *missa.* Vokalismo laŭ FGI (ne por eviti kolizion kun pref. *mis-*, kiu ne ekzistis en tiu periodo). Eo *s* pro fontlingva *ss.* ¶ Io =, Ie *messe*, Ia *missa.*

El la L formulo de la pastro anoncanta la forsendon de la kateĥizatoj k la komenciĝon de la komunia soleno: *"Ite, missa est (concio)"* 'iru, (la kunveno) estas disigita (dissendita)'; oni poste ekuzis la ĉefvorton de tiu formulo pri la komunia diservo mem. L *missa* estas ptc. perf. de *mittere* "(for)sendi" (vd. *meti*).

**MESI/O** (f; RE): A *Mess/iah*, F *-ie*, G *-ias*, I *-ia*, R *-ija*, Po *Mesjasz*, (H *Mesias*); L *Messias.* Rilate la radikfinan apokopon de *-as*, kp L *Aeneas* > eo *Ene/o* Haml. ¶ 1882 *Messih/o.* ¶ Io =, Ie *Messía*, Ia *Messia.*

Pere de Gr *Messías* el Aram. *meŝiĥâ* (responda al He *maŝiaĥ*) "la Sanktoleito" (Gr traduko: *Khristós*, vd. *Kristo*).

**MESPIL/O** (2; Jü): L *mespilum*; F *nèfle*, G *Mispel*, I *nespola*, Po *niesplik*, *nieszpul'ka*, (H *nispero*). Bazita sur L (botanika termino). ¶ Io *mispelo*, Ie *méspil*, Ia *mespilo**.

El Gr *méspilon* s.s., fremdvorto de nekonata origino.

**MET/I** (f; Un): F *mettre*, I *mettere*, (H *meter*). Kp A *submit* "submeti". ¶ 1882 *mett-*. ¶ Io *pozar* (< F *poser*), Ie *metter*, *posir*, Ia *poner* (< L *ponere*), *placiar* (< F *placer*), *mitter.*

El L *mittere* (supina rad.: *miss-*) "lasi, ĵeti, sendi", postkl. "meti", kun necerta etimologio. Samfamiliaj vortoj en Eo: *meso*, *misio*; *intermiti*, *komisaro*, *komis/io*, *-iono*, *komitato*, *komizo*, *kompromiti*, *kompromiso*, *permesi*, *premiso.*

**METAFIZIK/O** (1; RE): A *meta/physics*, I *-fisica*, Po *-fizyka*, R *-fizika*, (H *-física*), F *métaphysique*, G *Metaphysik.* Ps-pf *meta-*; ĉefelemento laŭ *fiziko* (vd. tiun); ps-sf *-ik.*

Pere de L mez. *metaphysica* s.s. el Gr *metá ta physiká* "post la fiziko"; tiel nomata, ĉar la traktaĵo de Aristotelo pri metafiziko en la unuaj eldonoj estis metata post lia verko pri fiziko. Vd. ps-pf *meta-* k *fiziko.*

**METAFOR/O** (1; RE): A *meta/phor*, IPoR *-fora*; F *métaphore*, G *Metapher*, (H *metáfora*); L *metaphora.* Ps-pf *meta-.*

El Gr *metaphorá* s.s., propr. "transporto, transigo (de vorto el unu senco al alia)", subst. de *metaphérein* "transporti": *metá* "trans" (vd. la ps-pf), *phérein* "porti" (vd. sub *oferi*). Kp spec. *amforo*, *fosforo*, *semaforo.*

**METAL/O** (f', 1; RE): APo(H) *metal*, I *-lo*, F *métal*, G *Metall*, R *metall*; L *metallum.*

L *metallum* ank. "mineralo, mino", el Gr *métallon* "min(ej)o", kredeble fremdvorto, de nekonata origino. Kp sekv.

**METALURGI/O** (8; RE): A *metallurg/y*, I *-ia*, R *-ija*, F *métallurgie*, G *Metallurgie*, Po(H) *metalurgia*; L sc. *metallurgia.* Ps-sf *-i* 1.

Kreita en L sc. (18a jc) el Gr *metallourgeín* "ekspluati minon", der. de *metallourgós* "ministo" el *métallon* "minejo" (vd. *metalo*) k *érgon* "laboro, prilaborado" (vd. sub *verko*). Kp *kirurgio.*

**METAMORFOZ/O** (1; Jü): A *metamorph/osis*, F *-ose*, G *Metamorphose*, I *metamorf/osi*, PoR *-oza*, (H *-osis*). Ps-pf *meta-*, ps-sf *-z* (*-oz* ank. en *apoteoz/o*, *piroz/o* kaj sekv.).

El Gr *metamórphôsis* "transformiĝo", subst. de *metamorphoún* "transformi" el *metá* "trans" (vd. la ps-pf) k *morphê* "formo" (kun nekonata etimologio, kp sub *formo*). Samfamilia vorto en Eo: *morfino.*

**METEMPSIKOZ/O** (2; Jü): A *metempsych/osis*, F *-ose*, I *metempsic/osi*, (H *-osis*) (kiel scienca fremdvorto ank. G *Metempsychose*, Po *metempsychoza*); L postkl. *metempsychosis.* Pri Eo *-k-*, vd. *psikologio.* Ps-pf *meta-*, ps-sf *-z* (por *-oz*, vd. la an-

taŭan).

El Gr *metempsykhôsis* s.s., kunm. de *metá* "trans" (vd. la ps-pf) k subst. de *empsykoún* "vivigi" el *en* "en" (vd. tiun) k *psykhê* "vivo, animo" (vd. *psikologio*).

**METEOR/O** (2; RE): APoR *meteor*, I *-a*, (H *-o*), F *météore*, G *Meteor*. Ps-pf *meta-*, var. *met-*.

Pere de L mez. *meteora* el Gr *metéôr/os* "suprenlevita, ŝvebanta en la aero" (plur. *-a* "ĉielaj fenomenoj"), der. de *metaírein* "supren-, for/levi", kunm. de *metá* "trans" (vd. la ps-pf) k *a(e)írein* "levi" kun necerta etimologio. Kp la sekvajn.

**METEOROLOG/O** (7; antaŭe *meteorologi/ist/o*; kp *meteo/log/o* Lewin 1961,PIV, kp sekv.): PoR *meteorolog*, A *-ist*, I *-o*, (H *-ista*), F *météorologiste*, G *Meteorolog*. – Nomo de scienco: **METEOROLOGI/O** (2; Be kun preseraro, Jü; kp *meteologio* Lewin 1961 kvazaŭ el *mete/o* kaj *-logi/o*; *mete/o* kun *-logi/o* PIV): A *meteorolog/y*, IPo *-ia*, R *-ija*, (H *-ía*), F *météorologie*, G *Meteorologie*. Ps-pf kiel en *meteoro*; ps-sf *-i* 1. – La pli mallonga formo devenas de nacilingvaj mallongigoj, ekz. F *météo* "meteorologia raporto", G *Meteogramm* "desegnaĵo de veterevoluo" (Lewin l.c.); la Ea signifo de *mete/o* "enatmosfera fenomeno" estas retrograde ekstraktita el *meteologio*.

El Gr *meteôrológos* resp. *meteôrología*, propr. "kiu traktas pri (resp. pritraktado de) ĉielaj fenomenoj", el *metéôra* (plur.) "ĉielaj fenomenoj" (vd. *meteoro*) k *lógos* "parolo" (vd. *logiko*).

**METI/O** (f; EG): F *métier* [metjé], (G *Metier*), I *mestiere*. Bazita sur F kun anstataŭigo de la prononca finvokalo per Eo *-o* (radikfino *-er* neoportuna pro la sufikso, kp *planko*, *pulvo*). ¶ 1894 *mestier-*. ¶ IoIa *mestier/o*, Ie *-e*.

El L *ministerium* "ofico, servo", de *minister* "servisto" (vd. *ministro*).

**METOD/O** (1; Du, Be): A *method*, F *méthode*, G *Methode*, R *metod*, I *-o*, Po *-a*, (H *método*); L *methodus*. Ps-pf *meta-*, var. *met-*.

El Gr *méthodos* "esplorado, metodo", propr. "postsekvado, irado post (io)", kunm. de *metá* "post" (vd. la ps-pf) k *hodós* "irado; vojo", par. al R *ĥod*, Po *-chod* "irado". Samfamiliaj vortoj en Eo: *epizodo*, *periodo*, *sinodo*.

**METR/O** (f', 1,7; Be) 1) mezuro 2) lit. (PV): A *metre* (Us *meter*) (1,2), F *mètre* (1,2), G *Meter* (1), *Metrum* (2), I(H) *metro* (1,2), PoR *metr* (1) Po *metrum* (2); L *metrum* (2). La literatura senco povas esti retrograde ekstraktita el la sekva.

El Gr *métron* "mezur(il)o" (adoptita kiel unuo de longmezuro en F, 1791), ank. "metro (lit.)", par. al Sa *mâtrâ* "mezuro" k plue al L *metiri* "mezuri" (vd. tiun). Samfamiliaj vortoj en Eo: *metriko*, *metronomo*; *areo-*, *baro-*, *centi-*, *deci-*, *dia-*, *geo-*, *heksa-*, *krono-*, *mano-*, *mili-*, *termo/metro*; *geo-*, *si/-metrio*.

**METRIK/O** (2; Jü): A *metr/ics*, I *-ica*, Po *-yka*, F *métrique*, G *Metrik*, (H *métrica*). Ps-sf *-ik*.

El Gr *metrikê* s.s., propr. "metra (arto, scienco"), adj. de *métron* "metro (lit.)" (vd. *metro*).

**METRONOM/O** (2; Jü): PoR *metronom*, A *-e*, I *-o*, F *métronome*, G *Metronom*, (H *metrónomo*).

Farita (19a jc) el Gr *métron* "mezuro" (vd. *metro*) k *-nomos* "distribuanto" (vd. sub *astronomo*).

**METROPOL/O** (2; Jü): A *metropol/is*, I *-i*, Po *-ia*, R *-ija*, F *métropole*, G *Metropole*, (H *metrópoli*). Por la dua elemento *-pol*, kp Z *Konstantinopol/o* N-ro 77. ¶ Io =, IeIa *metropole*.

El Gr *mêtrópolis* "patrina urbo (de kolonio)", kunm. de *mêtêr* "patrino" (vd. sub *mamo*) k *pólis* "urbo" (vd. *polico*).

**MEV/O** (f; RE): G *Möwe*, Po *mewa*. Kp A *mew* (poezia vorto), F *mouette*; ank. Ji *meve* (Szerdahelyi 1987, 123). Verŝajne bazita sur G; por G *ö* > Eo *e*, kp plue *bleki*, *meblo*, *pekli*. Povas esti, ke en tiu ĉi okazo influis la proksimaj formoj de Po kaj Ji. – Eble Z volis pli ĝeneralan vor-

ton ol la zoologian L *Larus* (kp tamen 1894!); tiu termino aperas en PV (*lar/o = mev/o*) kaj PIV (*mev/o/j = lar/- ed/oj*). ¶ 1894 *lar-*. ¶ Io *muevo*, Ie *movette*; Ia *laro*.

Ĝerm. vorto (pĜ **maiwiz*, kp ank. Nd *meeuw*; de ĝerm. devenas F ant. *moue* (el kiu la supre citita dim.) k Li *mëvas* s.s. Probable onomatopea.

**MEZ/A** (f; Un): I *mezzo* [médzo]. Kredeble influis Gr *mésos*. Ceteraj fontlingvaj formoj similas nur vortkomence: L *medius*; A *middle, medium*, F *moyen*, G *mittler*, (H *medio*). Videble bazita sur I ortografio. Verŝajne la formo *medi-* (laŭ L) ankoraŭ ne estis rezervita por alia signifo; ĝin Z proponis en 1894. ¶ 1882 *mi/nokt/e* "meznokte" (< F *mi-*, propr. "duon-"). ¶ Io =, IeIa *medie*.

El HE **medhios* "meza", kp Sa *mádhya-*, Gt *midjis* s.s. (pĜ **midhja-*; la cititaj AG formoj devenas de ties derivaĵo), R *meĵdu* "inter"; sambaza estas la ps-pf *meta-*, kp tiun. Etimologie identaj estas *medio, mediumo*; samfamiliaj ank. *medalo, Mediteraneo, meridiano, rimedo*.

**MEZUR/I** (f; Un): A *measure*, F *mesurer* [-z-], I *misurare* [-z-]; kp G *messen*. Bazita sur F kun transpreno de intervokala [z] (Szerdahelyi 1987, 115). ¶ 1882 *mez-*. 1894 *mesur-*. ¶ Io *mezurar*, Ie *mesurar*, Ia *me(n)surar*.

El L postkl. *mensurare* s.s. de *mensura* "-o", subst. de *metiri* (sup. rad.: *mens-*) "-i" (> H *medir* s.s.), der. de subst. responda al HE **mêtis* "mezurado" (kp Sa *mâti-* "mezuro") de HE rad. **mê-* "mezuri" en Sa *(mí)mâti* "-as", Gr *métron* "-o" (vd. *metro*), Gt *mitan* "-i", G *messen* "-i", *Mass* "-o", R *merit'* "-i", Po *mierzyc'* "-i". Apofonia formo en L *modus* "-o" (vd. *modo* kun listo). La plivastigita radiko **med-* signifas "mezuri; pripensi, konsideri", kp *med/icino, -ikamento, mediti*). Kp ank. ev. *monato*.

**MI** (f; Un): Konsistas el (1) *m-*, konsonanto karakterizanta la objektformojn de la unuapersona pronomo en la fontlingvoj: A *me* [mi:] "al mi; min", F *me* "al mi; min" (kp F *moi*, akcentata formo, ankaŭ kiel subjekto), G *mir* "al mi", *mich* "min", I *mi* "al mi; min", *me* "min" (akcentata formo), Po *mie, mnie* "min", R *mne* "al mi", *menja* "min"; L *mihi, mi* "al mi", *me* "min" (kp H *me* "al mi; min", post prep.: *mî*). La sama konsonanto estas trovebla en la posesivaj pronomoj unuapersonaj: A *my* "mia", *mine* "(la) mia", F *mon* "mia", *mien* "(la) mia", G *mein*, I *mio* (fem.: *mia*), Po *mój*, R *moj*, (H *mi, mío* [fem.: *mía*]); L *meus* (fem.: *mea*); kp ank. Sk *min*; (2) *-i*, ĝeneraligita finvokalo de ĉiuj personaj pronomoj inkluzive *oni*. Pri ĝi Waringhien LV 59: "...li preferis la vokalon *-i*, eble ĉar ĝi estis pli malpeza, donas ĉe la adjektiviĝo pli mildajn sonojn (*mia, sia* ktp) kaj tiel memorigas la formojn francajn (*mien, tien, sien*) kaj italajn (*il mio, la mia*). Eble li konsideris ankaŭ, ke tri el la anglaj personpronomoj finiĝas per i-vokalo (*he, she, we*), ke en R unu finiĝas per i (*oni* = ili) kaj tri aliaj per tre proksima sono (*mï* = ni, *tï* = ci, *vï* = vi), kaj ke en H kaj I pluraj objektaj pronomoj finiĝas same (*mi, ti, ci, vi, li* = min, cin, nin, vin, ilin)." Vd. ank. Waringhien 1946, 21. Laŭ Mattos (1987, 53) la i-vokalo estis "la sola libera"; li kredas la formon *mi* tirita el la posesiva *mia*. Gregor (1982, 11) indikas LFAGRPo kiel fontojn de *mi*. – Oni povas rimarki, ke la kombino *mi* estas trovebla en la persona pronomo en GIL kaj A (prononce) plus en la posesiva pronomo de F. La elekto de *m-* estas evidenta; la subjektformoj ne prezentas unuecan deirpunkton (vd. la formojn sub *egoismo*). ¶ 1881 *mo* "mi" (*-o* subst.-finaĵo, vd. Mattos 1987, 31 s.), *ma* "mia". – 1894 *mu* "mi" (pri *-u* kiel pronoma finvokalo vd. Waringhien LV 58: li trovas ĝian fonton en LHI *tu*, F *nous, vous*, G *du, uns*, A *you*), *mue* "mia". ¶ Io *me*, kp pos. *mea*; Ie (subj.) *mi* > *yo* (< H; vd. Spiritu 85 s.), (obj.) *me*, kp pos. *mu*

> *mi*; Ia (subj.) *io* (< I), (obj.) *me*.

El HE objektformo **me*, kp ank. Sa *mâ*, Gr *(e)mé*; HE posesivoj **mos* (> Gr *emós*); **mejos* (> L; kp la ĝerm. formojn); **mojos* (> RPo). – Kp *madono*.

**MIASM/O** (1; Jü): AI(H) *miasm/a*, F *-e*, G *Miasma*, Po *miazmat*, R *miazm*; L med. *mias/ma -matis*. Ps-sf *-m(at)*.

El Gr *mías/ma -matos* "malpuraĵo", subst. de *miaínein* "malpurigi", kp *miarós* "malpura" (kun necerta etimologio).

**MIAŬ/I** (1; RE): A *miaouw, mew*, F *miauler*, G *miauen*, I *miagolare*, Po *miauczec'*, R *mjaukat'*, (H *miar, maullar*). Prezentita kiel verbo; efektive la Ea radiko egalas al la imito de la koncerna bleko (A *miaouw*, F *miaou*, G *miau*, I *miao* ktp). ¶ IoIeIa *miaular*.

Onomatopeo.

**MIEL/O** (f; RE): F(H) *miel*, I *-e*; L *mel -lis*. Kp A *mellifluous* "-flua" k.a. Diftongigita vokalo laŭ FI (vd. *hieraŭ*) por eviti homonimecon (kp *mel/o*). ¶ Io =, Ie *miel*, Ia *melle*.

Identa kun Gr *mél/i -itos*, Gt *milith* s.s.; HE praformo **melit*. Samfamilia vorto en Eo: *melaso*. – R *mëd* s.s. (Bastien) ne estas parenca.

**MIEN/O** (f; RE): A *mien* (lit.), F *mine*, G *Miene* [mí:ne'], PoR *mina*. Bazita sur G ortografio (kp *biero* < G *Bier* [bi:r]) por eviti homonimecon (kp *min/o*). ¶ Io =; Ie *mime* (kp *mimiko*); Ia *aer* ('aero', kp AF *air* "aero; mieno").

F vorto, eble de kelta origino (kp Bretona *min* "beko").

**MIGDAL/O** (f; RE): L *amygdalum*; A *almond*, F *amande*, G *Mandel*, I *mandorla*, R *mindal*, Po *migdal'*, (H *almendra*). La Po formo, kvazaŭ mallongigo de la L, verŝajne estas la bazo de la Ea radiko. Per la aferezo (oni povas interne de Eo kompari *boji* < F *aboyer*, ev. *lerta* < F *alerte*) Z eble volis proksimigi la Ean formon al pluraj el la modernaj formoj (komenca *m-* en GIPoR). ¶ Io *mandelo*, Ie *mandul*, Ia *amandola*.

El Gr *amygdalon* s.s., de nekonata origino. La modernaj formoj parte el L vulg. *amandula*, modifo de la klasika L formo.

**MIGR/I** (f; RE): L *migrare*; A *migr/ate*, I *-are*, (H *-ar*). Int. kunmetoj: L *e-, im/migrare* "el-, en/migri"; A *e-, im/- migrate*, F *é-, im/migrer*, G *e-, im/migrieren*, I *e-, im/-migrare*, Po *e-, i/migrowac'*, R *e-, im/migrirovat'*, (H *e-, in/migrar*). Supozeble Z deiris de tiuj kunmetoj, analizante ilin *el/-, en/migri*; se tiel, *migr/i* estas retrograda formaĵo. ¶ IoIeIa *migrar*.

Probable orig. "ŝanĝi lokon", de HE rad. **mei-* "ŝanĝi" en Gr *ameíbein*, L *mutare* "ŝanĝi", kp spec. L *meare* "iri, pasi, migri".

**MIKROB/O** (2; Jü): AF *micro/be*, I *-b(i)o*, (H *-bio*), G *Mikrobe*, PoR *mikrob*.

Kreita de Sédillot (en F, 1878) el G *mikrós* "malgranda" (vd. sekv.) k *bíos* "vivo" (vd. *biografo* k plue *vivi*), do signifanta "malgranda viva estaĵo". Kp spec. *amfibio*.

**MIKROFON/O** (2; Jü): AF *micro/phone*, I *-fono*, G *Mikrophon*, PoR *mikrofon*, (H *micrófono*).

Kreita (18a jc) por signifi "malgranda aparato kiu plifortigas sonon" el Gr *mikrós* "malgranda" (kredeble par. al L *mica* "grajno, iometo"; kp *mikro/bo, -metro, -skopo*) k *phônê* "sono" (vd. *fonetiko*).

**MIKROMETR/O** (2; Jü): A *micro/meter*, F *-mètre*, I *-metro*, G *Mikrometer*, PoR *mikrometr*, (H *micrómetro*).

Farita el Gr *mikrós* "malgranda" (vd. *mikrofono*) k *métron* "mezurilo" (vd. *metro*).

**MIKROSKOP/O** (2; RE): AF *microscop/-e*, I(H) *-io*, G *Mikroskop*, PoR *mikroskop*; L mod. *microscopium*. Por la dua elemento, kp sube.

Farita (17a jc) el Gr *mikrós* "malgranda" (vd. *mikrofono*) k *skopeín* "rigardi" (ank. en *horo-, kalejdo-, tele/skopo*; par. al L *spectare* "rigardi", vd. *spektaklo*), ĉar ĝi ebligas rigardi malgrandajn objektojn.

**MIKS/I** (f; Un): A *mix*, F *mêler* (kp *mixt/e* "-ita", *-ure* "-aĵo"), G *mischen*, I *mescolare* (kp *misto* "-ita"), Po *mieszac'*, R *meŝat'*, (H *mezclar*, kp *mixto* "-ita"); L *mis-*

*cere* (sup. rad.: *mixt-*). Kp G *mixen* "kunmiksi (trinkaĵon)". La A verbo koincidas kun la ĉefelemento de la L supino, tiel donante solidan bazon por internacia formo. Z aŭ transprenis la A vorton aŭ deiris de la L supino, anstataŭigante ĝian participsufikson per tiu de Eo: *mix/t/us = miks/it/a.* ¶ Io *mixar*, Ie *mixter*, Ia *miscer* (kp *mixte* "-ita").

Komuna HE vorto, supre citita en tri variantoj: latin(id)a (L *miscere* el **mic-sc-*; la latinidaj formoj el der. *misculare*), ĝermana, slava. Kp Gr *meignynai, mísgein* "-i", Sa *micrá-* "-ita", Li *miêšti* "-i" (HE rad. **mik-*).

**MIL** (f; Un): L *mille*; FI *mille*, (H *mil*). Kp A *millennium* "jarmilo". Internacia estas *milimetro* (vd. tiun) 'milono de metro'. Unusilab(igit)a kiel ĉiuj numeraloj (krom *unu*). ¶ 1881 *mil.* ¶ Io =, Ie *mill*, Ia *-e.*

Eble el HE **smi ghsli* "unu milo": la unua elemento el radiko *sem-* "unu" (vd. *simpla*), la dua komparebla al gr *khílioi* "mil" (vd *kilogramo*); kun ambaŭ kp Sa *sa-hasram* "unu milo" (HE bazo **ghesl(i)o-*). – Etimologie identa: *mejlo.* Samfamiliaj vortoj: *mili/ardo, -metro, -ono.*

**MILD/A** (2; Jü): AG *mild.* Kp NdSv *mild.* Same kiel ĉe *blinda*, la romanaj fontlingvoj ne havas unuecan ekvivalenton. ¶ Io *dolca* ('delikata'), *klementa* ('malsevera'; < F *clément*); Ie *mild* (espismo); Ia *blande* ('delikata'; < L *blandus*), *suave* ('dolĉa'; < L *suavis*), *clemente* ('malsevera').

El pĜ **meldhia-* (kp Gt *mildeis*), par. al Gr *malthakós* "mola; milda" k la aliaj vortoj citataj sub *mola.*

**MILI/O** (f; RE): L *milium*; AF *millet*, I *miglio* [-l'-], (H *mijo*). Bazita sur L (botanika termino). Eo *-li-* estas prenita rekte el L kaj ne reprezentas la romanan [l']-sonon. ¶ Io *milyeto* (kp *milio* "mejlo"), Ie *millete*, Ia *milio*.*

L *milium* (kun der. *miliaceus* "-a", kp L bot. *Panicum miliaceum*) estas par. al Gr *melínê* s.s. kun necerta etimologio.

**MILIARD/O** (1; Jü): AFR *milliard*, G *Milliard*, I *miliardo*, Po *miliard*, (H *millar de millón*). Eo *-li-* respegulas la ortografion de la fontlingvoj kaj paralelas al *miliono.* Ps-sf *-ard.*

Formita (en F, 16a jc)) el *million* "miliono" per ŝanĝo de sufikso. Vd. *mil.*

**MILIGRAM/O** (2; Be): A *milli/gram(me)*, F *-gramme*, I *-gramma*, R *-gramm*, G *Milligramm*, Po *miligram*, (H *-o*). – **MILIMETR/O** (2; Be): A *milli/metre*, F *-mètre*, I *-metro*, R *-metr*, G *Millimeter*, Po *milimetr*, (H *milímetro*).

Farita ĉe la kreado de la metra sistemo (en F, 1795) el L *mille* "mil" (vd. tiun) k Gr *grámma* resp. *métron* (vd. *gramo, metro*; kp spec. la paralelajn *centi-, deci/gramo* resp. *-metro*).

**MILIONO** (f',2,7; Un): AFR *million*, G *Million*, I *milione*, Po *milion*, (H *millón*). Eo *-li-* respegulas la ortografion de la fontlingvoj; kp *miliard/o.* Ps-sf *-on.* ¶ 1881 *milli/o.*

I vorto, propr. "milego", aŭgmentativo de *mille* "mil" (vd. tiun).

**MILIT/I** (f; Un): Laŭŝajne el L *milit/are* ("soldatservi"), *-ia* ("soldat-, milit/servado"). Tamen, ĉar *militare* ne signifas "militi" (kp ank. I *militare* "batali, soldati"), estas pli probable, ke Z prenis la radikon de la plej internacia vorto de tiu ĉi nociaro, nome A *milit/ary*, F *-aire*, G *-är*, I *-are*, Po *-ny*, (H *-ar*) "militista", kaj poste per Eaj sufiksoj kreis *milit/i, -o, -isto.* Ĉiuokaze oni devas konstati, ke la semantiko de Eo *milit-* ne tute konformas kun la responda radiko de la fontlingvoj. ¶ Io *milit/ar* "-i", *-o* "-o" (espismo); Ie *guerr/e* "-o" (< F *guerr/e*, HI *-a*), *-ar* "-i", Ia *guerr/a* "-o", *-ear* "-i".

Der. de L *mil/es -itis* "soldato" kun necerta etimologio.

**MILV/O** (2; Jü): L *milvus*; F *milan*, (H *-o*), G *Milan.* Zoologia termino prenita el L. ¶ Io *milano*, Ie *milve*; Ia *milano*.*

Nekonata etimologio. (La modernaj formoj el L vulg. **milvanus*, der. de *milvus*).

**MIMIK/O** (1; Jü): A *mimic art*, F *mim/ique*, I *-ica*, G *Mimik*, PoR *mimika*, (H *mímica*). Ps-sf *-ik*.

Propr. "mima (arto)" (kp A), el Gr *mimikós* "mim(ik)a", adj. de *mímos* "aktoro, imitisto" (> L *mimus*; ank. eo *mim/o* PV), kp *mimeísthai* "imiti" (etimologio nekonata). Samfamiliaj vortoj en Eo: *mimozo, pantomimo.*

**MIMOZ/O** (2; Jü): AFI(H) *mimosa* [AF -z-], G *Mimose*, PoR *mimoza*; L bot. *Mimosa.* Ps-sf *-oz.*

Scienca termino (L mod., Colin, 1619) der. de L *mimus* "mimo, aktoro" (ĉar unu specio de mimozo, se tuŝata, kunvolvas siajn folierojn same kiel mimo tordas siajn trajtojn). Vd. *mimiko.*

**MIN/O** (f; RE) 1) elfosejo 2) mil.: AF *mine* (1,2), G *Mine* (1,2), I *miniera* (1), *mina* (2), PoR *mina* (2), (H *mina* 1,2). ¶ Io *min-eyo* (1), *torpedo* (2), Ie *mine* (1,2), Ia *mina* (1,2).

F vorto de kelta origino (kp Ir *mein* "erco"). Semantika evoluo: "ercfosejo" > "foso en kiun oni metas eksplodmaterialon" > "eksplodkesto (mara)". Samfamilia vorto en Eo: *mineralo.*

**MINAC/I** (f; RE): A *menac/e*, F *-er*, I *minacciare*, (H *amenazar*); L *minari* (kp *min(aci)ae* "-oj"). La silabo *-ac-*, troviĝanta en AFI(L), donas oportunan diferencigon disde *min-*. Vokalo *-i-* probable laŭ L. ¶ 1894 *minaz-*. ¶ Io *minacar*, IeIa *menaciar.*

La verbo el L vulg. **minaciare* de *minaciae* "-oj", der. de *min/ax -acis* "-ema" de *minari* "-i", der. de *minae* "minacoj", orig. "murdentoj" (kiuj elstaras k tial aperas minacaj), kp *eminere* "elstari" (vd. *eminenta* k plue *monto*).

**MINARET/O** (1; Jü): AFPoR *minaret*, I(H) *-o*, G *Minarett.*

Pere de Tu *minare* el Ar *manâra* "minareto", orig. "lumturo" (de *nâr* "fajro"; la minareto estis tiel nomata pro forma simileco).

**MINERAL/O** (1; RE): AR(H) *miner/al*, I *-ale*, Po *-al'*, F *minéral*, G *Mineral.* Ps-sf *-al.*

El L mez. *minerale*, subst.-igita adj. de *minera* "erco" el F ant. *miniere* "minejo", der. de *mine* "mino" (vd. tiun). Kp sekv.

**MINERALOG/O** (7; GD; antaŭe *mineralogi/ist/o*): A *mineralog/ist*, F *-iste*, I(H) *-ista*, G *Mineraloge*, PoR *mineralog.* – Nomo de scienco: **MINERALOGI/O** (2; RE): A *mineralog/y*, IPo *-ia*, R *-ija*, (H *-ía*), F *minéralogie*, G *Mineralogie.* Ps-sf *-i* 1.

El L mod. *mineralogia*, kunm. de *minerale* (vd. *mineralo*) k la elemento *-logia*, signifanta sciencon (el Gr *lógos*, vd. ekz. *antropologio*; kp sub *logiko*). La atendita duobla *-lo-* (**mineral/o/logia*) estas eliminta per haplologio.

**MINIATUR/O** (1; Be): AF *miniat/ure*, IPo(H) *-ura*, R *-jura*, G *Miniatur.* Ps-sf *-ur.*

Itala arttermino, orig. "(malgranda) pentraĵo farita per minio (speciale por ornami komencliterojn en manuskriptoj)", der. de I *miniare* "kolorigi per minio" el L *miniare* s.s., der. de L *minium* "minio" (> eo *mini/o* Jü), vorto de ibera origino. La nunan signifon de *miniaturo* kredeble influis asociado al L *minor/ minimus* "pli (plej) malgranda" (vd. sekv.).

**MINIMUM/O** (3; Be): AFPoR *minim/um*, I *-o*, G *Minimum*, (H *mínimum*). Radikfina *-um* konservata laŭ la indiko de la fontlingvoj (vd. liston sub *forumo*); kp la analogan *maksimum/o.* ¶ IoIa *minimo*, Ie *mínimum.*

El L *minimum* "(la) plej malgranda (kvanto)", subst.-igita neŭtra formo de *minimus* "plej malgranda", superl. de adj. kies komparativo estas *minor* "pli malgranda" (pozitivo mankas); vd. plue *minus.*

**MINISTERI/O** (8; PV; ne ĉe Z; antaŭe *ministr/ej/o*): A *minist/ry*, F *-ère*, I *-ero*, PoR *-erstvo*, (H *-erio*), G *Ministerium.* Ofte la *i* de L-devena *-ium* (vd. sube) forfalas en Eo (kp spec. *mister/o*); tie ĉi ĝi estas konservita malgraŭ malforta

apogo en la fontlingvoj (se oni volis eviti sufikssimilan radikfinon *-er*, oni tamen koliziis kun ps-sf *-eri*). ¶ IoIa =, Ie *ministerie.*

El L *ministerium* "ofico, serv(ad)o, servistaro", der. de *minister* "servisto" (vd. sekv.).

**MINISTR/O** (1; Du,RE): APo *minist/er*, F *-re*, I(H) *-ro*, R *-r*. la L originvorto (vd. sube) enhavas *-e-*, kiu forfalas en la oblikvaj kazoj kaj en pluraj modernaj lingvoj (pri tiu tipo, vd. *apro*).

El L *minist/er* (gen.: *-ri*) "servisto, asistanto" (poste pri la konsilantoj de la reĝo), propr. "subulo", der. de *minus* "malpli" (vd. *minus*). – Analoga estas la antonimo *magister*, vd. *majstro*. – Kp spec. *administri, ministerio.*

**MINUS** (8; *-o* Jü): AGPoR *minus*, F *moins*, I *meno*, (H *menos*). ¶ IoIeIa *minus.*

El L *minus* "malpli", adv. responda al la adj. *minor* "pli malgranda", par. al G *minder* "malpli", Gt *mins* "malpli", R *menee* "malpli". De HE rad. **min-* "malpliigi", kp Sa *minâti* "malpliigas", Gr *minythein* "malpli/igi, -iĝi", L *minuere* "malpliigi". Samfamiliaj vortoj en Eo: *menuo, minimumo, ministro* (kun *ministerio, administri*), *minuto.*

**MINUT/O** (f; Du,RE): AF *minut/e*, I(H) *-o*, PoR *-a*, G *Minute.*

El L mez. *minuta (pars)* "malgranda (parto)" (sk. de horo), subst.-igita formo de L adj. *minutus* "malgranda", orig. "malpli(grand)igita", ptc. perf. de *minuere* "malpliigi" (vd. *minus*). Etimologie identa: *menuo.*

**MIOGAL/O** (f; RE): L zool. *Myogale moschata* ('moska'). Zoologia termino prenita el L. ¶ Io *mosko-musareno* (propr. "mosko-soriko"); (Ie *musco-ratte* 'mosko-rato'), Ia *ratto muscate* 'moska rato' laŭ A *musk-rat*, F *rat musqué*, I *topo muschiato.*

El Gr *my(o)galê* "soriko", kunm. de *mys* "muso" (vd. tiun) k *galéê* "galputoro, mustelo".

**MIOP/A** (f; RE): F *myope* [mi-], I(H) *miope*, L *myops*. Kp A *myopic* (scienca termino). ¶ Io =, Ie *miop*, Ia *myope.*

El Gr *myôps* s.s., propr. "fermanta la okulojn" (ĉar miopuloj kutimas kuntiri la okulojn por vidi pli bone), el *myein* "fermi la okulojn" (kp *mistiko*) k *ôps* "okulo" (vd. *optiko*).

**MIOZOT/O** (f; RE): L *myosot/is -idis* (var. *myosota*); F *myosotis* [mj-,-z-], I *miosotide* [-z-], (H *miosotis*). Eo *-z-* ne estas sen apogo en la prononco de la fontlingvoj sed kontraŭas al ilia ortografio. Wüster asertas (Esp. princ. 54) ke la Ea radiko baziĝas sur la varianto *myosota*, ĉar "la scienca nomo *Myosotis, -idis* rezultigus '*miozotido*'" (nekonvinke, ĉar kp *lampiro, meleagro, okzalo*). – Ankaŭ nomata *neforgesofloro* (Wü), *ne-forgesu-min* (Millidge 1924), *neforgesumino* GD, PIV, *neminforgesu* (Butler 1967) laŭ A *forget-me-not*, F *ne m'oubliez-pas*, G *Vergissmeinnicht*, H *nomeolvides*, I *nontiscordardimé.* ¶ 1894 *miosot-*. ¶ Io =, Ie *miosótis*, Ia *myosotis.*

El Gr *myosôt/ís -ídos* (var.: *myósôton*) s.s., propr. "orelo de muso" (pro la mallongaj, pintaj folioj): *myós* gen. de *mys* "muso" (vd. tiun), *ous* (gen.: *ôtós*) "orelo" (vd. s.t.v.).

**MIR/I** (f; Un): L *mirari*. Kp A *marvel*, F *s'émerveiller* (refl.), I *meravigliarsi* (refl.), ank. F *merveilleux* "-iga, -inda". Bazita ekskluzive sur L, kiu prezentas oportune mallongan radikon kun semantika rilato al la tute internacia *miraklo* (cetere la romanaj formoj estas pli malfacile asimileblaj). ¶ Io *astonesar* (< A *astonish* "mirigi"), Ie *astonar*, Ia *meraviliar.*

(La cititaj latinidaj verboj baziĝas sur L *mirabilia* "mirindaĵoj" de *mirabilis* "mirinda".) Kun L *mirari* kp *mirus* "mirinda"; orig. probable **sm-*, de HE rad. **smei-* "(mirigite) rideti", ekz. en Sa *smáyate* "ridetas; ruĝiĝas", *smayam* "miro", Gr *meidián* "rideti", A *smile* "rideti", R *smejat'sja* (refl.) "ridi". Samfamiliaj vortoj en Eo: *admiri, miraklo.*

**MIRABEL/O** (2; Jü): AF *mirabel/le*, I *-la*, PoR *-a*, G *Mirabelle*, (H *mirabel*).

Aliigo de I *mirobolano*/F *myrobolan* "speco de hinda frukto, antaŭe uzata en farmacio"el Gr *myrobálanos* s.s., kunm. de *myron* "balzamo, ungvento" (eble par. al G *Schmer* "porka graso") k *bálanos* "glano" (vd. sub *glando*).

**MIRAKL/O** (1; Be): AF *mira/cle*, I *-colo*, (H *milagro*); L *miraculum*. La radikfino *-kl* estas unu el pluraj manieroj trakti L *-cul-*, vd. sub *artikolo*. ¶ Io =, Ie *mira/cul*, Ia *-culo*.

Propr. "mirindaĵo", der. de L *mirari* "miri" (vd. tiun).

**MIRH/O** (f; RE): A *myrrh*, F *-e*, G *Myrrhe*, IPoR(H) *mirra*; L *myrrha*, *murra*. La unika kombino *-rh-* laŭ la ortografio de AFGL (*h* neprononcata) servas por diferencigi disde *mir/i*. ¶ Io *miro*, Ie *mirrha*, Ia *myrrha*.

El Gr *myrra* s.s., el semida lingvo, kp Ar *murr*, Aramea *mûrâ*, He *mor* s.s. (propr. "amara").

**MIRIAD/O** (1; RE): A *myri/ad*, F *-ade*, G *Myriade*, I *miri/ade*, PoR(H) *-ada*.

El Gr *myri/ás -ádos* "dekmilo", subst. de *my'rioi* "dekmil" (kp la modernan uzadon kiel prefikso, vd. sekv.), *myrioi* "sennombraj" (necerta etimologio).

**MIRIAMETR/O** (2; Jü): A *myria/metre*, F *-ètre*, G *Myriameter*, I *miria/metro*, PoR *-metr*, (H *miriámetro*).

Farita ĉe la kreado de la metra sistemo (en F, 1795) el Gr *myrioi* "dekmil" (vd. *miriado*) k *métron* "mezuro" (vd. *metro*).

**MIRT/O** (f; RE): A *myrt/le*, F *-e*, G *Myrte*, Po *mirt*, I(H) *-o*, R *-a*; L *myrtus*, *murtus*. ¶ Io =, Ie *mirte*, Ia *myrto*.

El Gr *myrtos* s.s., eble samradika kun *myrra* (vd. *mirho*). Kp sekv.

**MIRTEL/O** (f; RE): F *myrtille*, I *mirt/illo*, (H *-ilo*); L bot. *Vaccinium myrtillus*. Sonŝanĝo *i* > *e* en la dua silabo por eviti koincidon kun *mirt-* kaj *-il*; kp spec. *fringelo*, *makzelo*. ¶ 1894 *mirtil-*. ¶ Io = (espismo), Ie *mirtille*, Ia *myrtillo*.

Dim. de L *myrtus* "mirto" (pro simileco de fruktoj), vd. tiun.

**MISI/O** (f; RE): AF *miss/ion*, I *-ione*, R *-ija*, G *Mission*, Po *mis/ja*, (H *-ión*). Eo *-s-* pro fontlingva *ss*. Ps-sf *-cio*, var. *-(s)io*.

El L *miss/io -ionis* "sendo", subst. de *mittere* (sup. rad.: *miss-*) "sendi" (vd. *meti*). Kp spec. *komisio*.

**MISTER/O** (f; RE): A *myst/ery* [mi-], F *-ère* [mi-], G *Mysterium*, I *mist/ero*, Po *-erium*, (H *-erio*); L *mysterium*. Eo *-er/o* el L *-er/ium* probable por plifaciligi derivadon (adj. *mister/a* anst. **misteri/a*), eble ankaŭ por konservi la akcenton de la fontlingvoj (ĉiuj krom A akcentas la *e*); kontrastas *ministeri/o*. ¶ Io *misteri/o*, Ie *-e*, Ia *mysterio*.

El Gr *mystêrion* "sekreto", (plur.) "sekretaj ritoj, sekreta doktrino (nur por inicitoj)", der. de *mystês* "inicito" (vd. *mistiko*). Kp sekv.

**MISTIFIK/I** (8; RE; ank. *mistif/i* PV): A *mysti/fy* [mi-], F *-fier* [mi-], G *-fizieren*, Po *mistyfikowac'*, R *mistificirovat'*, (H *mixti-*, *misti/ficar*). Pri Eo *-if-* : *-ifik-*, vd. *edifi*. ¶ Io *mistifikar*, Ie *mistificar*, Ia *mystificar*.

Propr. "fari mistera"; farita en F (18a jc) kiel iom arbitra der. de *mystère* "mistero", vd. tiun (pri *-fier*"fari" el L *-ficare*, vd. *fari*).

**MISTIK/o** (2; Jü): A *mysticism* (kp *mystic* "-a") [mi-], F *mystique* [mistík], G *Mystik*, I *mist/ica*, Po *-yka*, R *-ika*, (H *mística*). Ps-sf *-ik*.

Subst.-igo de la responda adj. (F *mystique*, I *mistico*; L *mysticus*) el Gr *mystikós* "sekreta, mistera, nur por inicitoj" de *mystês* "inicito", propr. "kiu fermas la okulojn" (sk. antaŭ la sekretoj), agantnomo de *myein* "fermi la okulojn" (kp *miopa*), ank. "fermi (kunpremi) la lipojn" kaj tial eble par. al la vortoj cititaj sub *muta*.

**MIT/O** (1; RE): A *myth* [mith], F *-e* [mit], G *Myth/e*, *-os*, *-us*, Po *mit*, I(H) *-o*, R *mif*. ¶ Io =, Ie *mite*, Ia *mytho*.

El Gr *mythos* "fabelo, rakonto, parolo, vorto", kredeble de onomatopea origino (kp L *muttire* "murmuri", G *mucksen* "grumbli"). Kp sekv.

**MITOLOG/O** (7; antaŭe *mitologi/ist/o*): A *mytho/logist*, F *-logue*, G *Mythologe*, I *mitolog/o*, *-ista*, R *mifolog*, (H *mitólog/o*, *-ista*). – Nomo de scienco: **MITOLOGI/O** (1; Be): A *mytholog/y*, F *-ie*, G *Mythologie*, IPo *mitolog/ia*, (H *-ía*), R *mifologia*. Ps-sf *-i* 1.

El Gr *mythológos* "fabelrakontisto", kunm. de *mythos* "fabelo" k *-lógos* "parolanto" (kp *lógos* "vorto"), kun der. *mytho/logeín* "rakonti fabelojn" k *-logía* "fabelrakontado". Vd. *mito* resp. *logiko*.

**MITR/O** (1; Jü): AF *mitr/e*, IPoR(H) *-a*, G *Mitra*; L *mitra*.

El Gr *mítra* "kapbendo; zono" de necerta origino; oni komparis la Pe dinomon *Mithra*.

**MITUL/O** (2; Jü): L *mitulus*, *mytilus* (L zool. *Mytilus*); I *mitilo*. Bazita sur L (zoologia termino); la unua formo preferita por ne kolizii kun la sufikso *-il*. ¶ Io *musl/o*, Ie *-e* (< A *mussel*); Ia *musculo* (< L *musculus*).

El Gr *mytílos* s.s., der. de *mys* s.s. (propr. "muso", tiel nomita pro forma simileco; kp L *musculus* "museto; mitulo", el kiu A *mussel*, F *moule*, G *Muschel*). Vd. plue *muso*.

**MIZER/O** (f; Un): A *mis/ery* [-z-], F *-ère* [-z-], I(H) *-eria* [I -z-]; L *miseria*. Kp G *miserabel* "-a", *Misere* [-z-] "-(eg)o". Radikfino *-er* kredeble laŭ AF; kp ank. L adj. *miser* = Eo *mizer/a*. ¶ 1894 *miser-*. ¶ Io =, Ie *miser/e*, Ia *-ia*.

Der. de L *miser* "malfeliĉa, mizera", samradika kun L *maestus* "malĝoja", *maerere* "malĝoji"; etimologio nekonata.

**MOBILIZ/I** (1; Jü): A *mobil/ize*, F *-iser*, G *-isieren*, I *-izzare*, Po *-izowac'*, R *-izovat'*, (H *movilizar*). Ps-sf *-iz*.

Propr. "mov(ebl)igi (armeon)", latinida der. de L *mobilis* "movebla" de *movere* "movi" (vd. tiun; kp spec. *aŭtomobilo*).

**MOD/O** (f; N-ro 15 1888, RE) 1) vestkutimo 2) gram.: A *mood* (2) (kp, laŭ senco 1, *mod/ish* "laŭmoda", *-iste* "-istino"), F *mode* (1,2), G *Mode* (1), *Modus* (2), I(H) *moda* (1), *modo* (2), PoR *moda* (1); L *modus* (2). ¶ Io = (1,2), Ie *moda* (1), *módus* (2), Ia *moda* (1), *modo* (2).

Orig. "maniero" (senco 1 laŭ F "maniero sin vesti"; senco 2 laŭ L "maniero esprimi agon"): L *modus* "maniero; mezuro; modero" respondas al G *Mass* "mezuro, grado", de HE rad. **me(d)-* "mezuri" (vd. tiun). Samfamiliaj vortoj en Eo: *komodo*, *modelo*, *modera*, *moderna*, *modesta*, *modifi*, *moduli*.

**MODEL/O** (f; RE): APo *model*, I *-lo*, (H *-o*), F *modèle*, G *Modell*, R *model'*.

Latinida der. de L *modulus* "skalo, mezurilo", dim. de *modus* "mezuro" (vd. *modo*).

**MODER/A** (f; Un): A *moder/ate*, I *-ato*, (H *-ado*), F *modéré*, L *moderatus*. Z kredeble deiris de la cititaj formoj, kiuj donus **moderat-* en Eo; pro radikfina simileco al participa finaĵo, li ellasis la lastan silabon (eble laŭ modelo de la responda verbo: F *modérer*, G *moder/ieren*, I *-are*, kies radiko videble estas *moder-*). Kp spec. *obstin-* anst. **obstinat-*; pri aliaj apokopoj de adjektivaj sufiksoj, vd. *elektra*. ¶ 1881 *modr/a*. ¶ Io *moder-ema*, Ie *moderat*, Ia *-e*.

Ptc. perf. de L *moderari* "moderigi", propr. "doni (ĝustan) mezuron (al io)", der. de radiko paralela al L *modus* "mezuro" (vd. *modo*; kp spec. *modesta*).

**MODERN/A** (1; Be): AG *modern*, F *-e*, I(H) *-o*. Kp Po *moderniz/owac'*, R *-irovat'* "-igi".

El L postkl. *modernus* "moderna, nuntempa", orig. "ĵusa", der. de L *modo* "ĵus", propr. "apenaŭ, kun modero",abl. de L *modus* "modero, mezuro" (vd. *modo*).

**MODEST/A** (f; Un): A *modest*, F *-e*, I(H) *-o*; L *modestus*.

L *modestus* ank. "modera, sobra", propr. "(strikt)mezura", der. de radiko paralela al L *modus* "mezuro" (vd. *modera* k *modo*).

**MODIF/I** (3; Jü): A *modi/fy*, F *-fier*, G *-fizieren*, I *-ficare*, (H *-ficar*), Po *modyfikowac'*. Pri Eo *-if-* kaj *-ifik-*, vd. *edifi*.

El L *modificare* "moderigi" (> "iom ŝanĝi, modifi"), "difini laŭ mezuro" de *modus* "mezuro" (vd. *modo*) k *-ficare*, kunmeta for-

mo de *facere* "fari" (vd. tiun).

**MODUL/I** (1; Be): A *modul/ate*, F *-er*, G *-ieren*, I *-are*, Po *-owac'*, R *-irovat'*, (H *-ar*). ¶ Io *modulacar*, IeIa *modular*.

El L *modulari* "kadencigi, ritmigi", propr. "reguligi, mezuri", der. de *modulus* "mezurilo" (> eo *modul/o* [ark.] Ve), dim. de *modus* "mezuro" (vd. *modo*).

**MOK/I** (f; RE): A *mock* [mok], F *se moquer* [moké] (refl.). Kp Gr *môkásthai* "-i", *môkos* "-o". Supozeble bazita sur AF; estas neprobable ke la Gr vorto, eĉ se konata al Z, ludis rolon. ¶ Io *mokar*, Ie *mocar*, Ia *derider* (< L *deridere*).

Romana vorto (A < F; kp ank. Oc *mocar* "-i", H *mueca* "grimaco") kun nekonata etimologio; oni proponis omomatopean originon. – La simileco al la Gr vorto estas hazarda.

**MOL/A** (f; Un): L *mollis*; F *mou/ mol*, I *molle*; ank. P *mole*. Kp A *mollify* "-igi", G *mollig* "mol(eg)a", ank. H *muelle* "(agrable) mola". ¶ 1881 *moll-*. ¶ Io =, Ie *moll*, Ia *-e*.

L originformo **moldŭis*, kp Sa *mrdâ-* "tenera", G *mal(th)akós* "mola", AG *mild* "milda" (kp tiun), R *molodoj* "juna": HE bazo **meld-* "mola", kp **(s)meld-* "moliĝi, fandiĝi" (vd. *emajlo*, *malto*), lastvice identa kun rad. **mel-* "mueli" (vd. tiun). Kp ev. *mufo*. Samfamilia vorto en Eo: *molusko*.

**MOLEKUL/O** (1; Jü): A *mole/cule*, I *-cola*, Po *-kul'a*, R *-kula*, F *molécule*, G *Molekül*, (H *molécula*).

Propr. "malgranda maso", farita (en F, 17a jc) kiel dim. de L *moles* "maso, pezo; peno" (sufikso kiel en *tuberkul/o*), kredeble par. al Gr *môlos* "laborego, batalo".

**MOLUSK/O** (1; Jü; kp *mol/korp/ul/o* E-isto 4/1892): A *moll/usc*, F *-usque* [-ysk], I *-usco*, R *-jusk*, G *Molluske*, (H *molusco*): L sc. *molluscum*.

Konstruita en L mod. (*Mollusca* [plur.] Lineo, 1758) laŭ L *mollusca (nux)* "molŝela (nukso)", der. de *mollis* "mola" (vd. tiun).

**MOMENT/O** (f; RE): AFPoR *moment*, I(H) *-o*, G *Moment*; L *momentum*. Ps-sf *-ment*. ¶ 1881 *miant-* (sen etimologio en PVZ 5, 141; ĉu kombino de *mi(nut)-* kaj *(mom)ent-* kun influo de F prononco *-ment* [-mâ]?).

L *momentum* spec. "grava, decidiga tempopunkto" < "la momento, kiam la pesilo malekvilibriĝas" < "dekliniĝo (moviĝo) de la pesilo", subst. de *movere* "movi" (vd. tiun).

**MON/O** (f; Un): A *money*, I *moneta* (ank. "monero"). Kp la vorton por 'monero' en la ceteraj fontlingvoj: F *monnaie*, G *Münze*, PoR *moneta*, (H *moneda*); L *moneta*. Probable bazita ekskluzive sur A; radiko **monet-* (ĉu kun senco 'mono', ĉu 'monero') estus neoportuna pro la aspekto de diminutivo. ¶ 1881 *kun/o* (< L *pecunia*). ¶ Vp *mon* (vd. Golden en Li kaj Ni, 408), Io *pekunio*, Ie *moné*, Ia *moneta, pecunia*.

L *moneta* laŭ *Moneta* 'la admonantino', kromnomo de la diino Juno, ĉe kies templo la romiaj moneroj estis faritaj.

**MONAĤ/O** (f; RE; ank. *-k-* PV; kp *monk-* N-ro 15 1888): L *monachus*; A *monk*, F *moine* (kp *monacal* "-a"), G *Mönch*, I *monaco*, Po *mnich* [-ħ], R *monaħ*, (H *monje*). La Ea formo esence laŭ LIR; *-ħ-* laŭ PoR kaj *X* [kh] en la Gr originvorto (vd. sube kaj sub *ħaoso*; kp Szerdahelyi 1987, 114). ¶ 1894 *monak-*. ¶ Io *mon/ako*, Ie *-aco*, Ia *-acho*.

El Gr *monakhós* "monaĥo, ermito", ank. adj. "unuopa, soleca", der. de *mónos* "sola" (vd. *monotona*).

**MONARĤ/O** (f; RE)/**-RK-** (8; PV): A *mon/arch* [-k], F *-arque* [-k], I(H) *-arca* [-k-], Po *-archa* [-ħ-], R *-arħ*, G *Monarch* [-k]. Eo *-ħ-* laŭ PoR kaj *X* [kh] en la Gr originvorto (vd. sube kaj sub *ħaoso*). ¶ 1894 *monark-*. ¶ Io *mon/arko*, Ie *-arch*, Ia *-archa*. – Nomo de reĝimo kaj regno: **MONARKI/O** (8; PV)/**-RĤ-** (kromformo en 8; PV; antaŭe *monarħ/ej/o* Jü): A *mon/archy*, F *-archie*, IPo *-archia*, R *-arħija*, G *Monarchie*, (H *-arquía*) [pri la

prononco, kp la antaŭan]. Ps-sf *-i* 1.

El Gr *monarkhía* "aŭtokrateco, solreganteco", der. de *mónarkhos* "monarĥo, aŭtokrato, solreganto", kunm. de *mónos* "sola" (vd. *monotona*) k *-arkhos*, agantnomo de *árkhein* "regi" (vd. *arkaika*).

**MONAT/O** (f; Un): A *month*, G *Monat*. Kp Sv *månad* [mó:nàd], ank. Nd *maand*. Bazita sur G. Apartenas al serio de germanoriginaj tempo- kaj vetervortoj (kp *tago, jaro, somero, vintro, vetero*) kaj 'donas pli distingigan formon ol L. mensis pro *mens*' (Collinson 1959, 7). Kp sube la latinidajn formojn kaj la slavajn, fonetike tro komplikajn. ¶ 1894 *mens-*. ¶ Io = (espismo), Ie *mensu*, Ia *mense*.

Ĝerm. vorto (kp Gt *menoths*) el HE **menot* "monato" kun oblikva formo **men(e)s-*, kp Sa *mâs-*, Gr *mên*, L *mensis* (> F *mois*, H *mes*, I *mese*), Li *mënesis*, Ir *mí* s.s. Praidenta kun la HE vorto por 'luno' (kp Gr *mênê*, A *moon*, G *Mond*) k eble originanta en rad. **mê-* "mezuri" (kp tiun), ĉar 'monato' = 'tempomezuro', 'luno' = 'la ĉielkorpo laŭ kiu oni mezuras la tempon'.

**MOND/O** (f; Un): F *monde*, I *mondo*, (H *mundo*); L *mundus*. Kp A *mundane* "ĉi-monda, kosma". Romana *-o-* anst. L *-u-* same kiel en *dolĉa, kolombo, ombro, ondo, rompi*. ¶ 1894 *mund-*. ¶ Io =, Ie *mund/e*, Ia *-o*.

Eble ligita kun la homonima L *mundus* "ornamaĵoj" (kp semantike Gr *kósmos* "ordo, ornamo; kosmo"): la vorto signifas la ordigitan, organizitan mondon kontraste al *chaos* "la senforma mondo".

**MONED/O** (f; RE): L *monedula*. Zoologia termino prenita el L. Radiko mallongigita por eviti sufikssimilan finon (kp spec. *lavendo, libelo*). ¶ Io *chuvo* (< H *chova*); Ie *monedul*, Ia *-a**.

La nomo ŝajnas analoga al tiu de alia birdo, L *ficedula* "(speco de) muŝkaptulo" el *ficus* "figo" k *edere* "manĝi"; oni pensis pri **mon(et)edula* 'kiu (manĝas =) bekas monerojn'.

**MONOGRAM/O** (2; RE): APo *monogram*, F *-me*, IR *-ma*, (H *-a*), G *Monogramm*; L postkl. *monogramma*.

Orig. "mallongigo konsistanta el unu sola litero", el Gr *mónos* "sola" k *grámma* "skribaĵo" (vd. *monotona* resp. *gramo*).

**MONOLOG/O** (1; RE): AF *mono/logue* [-log], I *-logo*, PoR *-log*, G *Monolog*, (H *monólogo*).

Farita (laŭ modelo de *dialogo*) el Gr *mónos* "sola" k *lógos* "vorto, parolo" (vd. *monotona* resp. *logiko*).

**MONOMANI/O** (2; Jü): AIPo *monoman/ia*, F *-ie*, R *-ija*, (H *-ía*), G *Monomanie*; L med. *monomania*. Ps-sf *-i* 1.

Farita (en F, 19a jc) el Gr *mónos* "sola, unika" (vd. *monotona*) k *manía* "manio" (vd. tiun).

**MONOPOL/O** (1; RE): Po *monopol*, A *-y*, F *-e*, I(H) *-io*, R *-ija*, G *Monopol*; L *monopolium*. Z preferis la pli mallongan formon de FGPo; kp ekz. *participo, principo, proverbo* (kp Szerdahelyi 1987, 117). ¶ Io =, Ie *monopol*, Ia *-io*.

El Gr *mono/pôlion, -pôlía* s.s., propr. "solvendado", kunm. de *mónos* "sola" (vd. *monotona*) k subst. de *pôleín* "vendi" de HE rad **pel-* "aĉeti/vendi", kp Sa *pán'ate* "aĉetas", Li *pelnas* "profito", G *feil* "aĉetebla".

**MONOTEISM/O** (2; Jü): A *mono/theism*, F *-théisme*, I(H) *-teismo*, PoR *-teizm*, G *Monotheismus*. Ps-sf *-ism*.

Propr. "unudieco", farita el Gr *mónos* "sola, unika" k *theós* "dio" (vd. *monotona* resp. *teologo*, krome ps-sf *-ism*).

**MONOTON/A** (1; Mart, Ve; antaŭe *unu/ton/a, -form/a*): G *monoton*, A *-ous*, F *-e*, I *-o*, Po *-ny*, R *-nyj*, (H *monótono*).

El Gr *monótonos* "unu-, mono/tona", kies unua elemento estas *mónos* "sola, unika" (ank. en *monaĥo, monarĥ/o, -io, mono/gramo, -logo, -manio, -polo, -teismo*), paralela al Gr *manós* "rara" (vd. *manometro*) k par. al Sa *manâk* "malmulte" (vd. ev. ank. la vortojn sub *minimumo*); la dua estas *tónos* "tono" (vd. tiun).

**MONSTR/O** (f; RE): A *monst/er*, F *-re*,

Po *-rum*, G *Monstrum*, I *mostro*, (H *monstruo*); L *monstrum*. ¶ IoIa =, Ie *monstru*.

Orig. "(averta) signo [aperaĵo] de la dioj", el **monestrom* "admonilo, avertilo", der. de L *monere* "admoni" (vd. *monumento*). Kp spec. *montri*.

**MONT/O** (f; Un): L *mons* (gen.: *montis*); A *mount(ain)*, F *mont*, I(H) *-e*. Internacie konata per kelkaj geografiaj nomoj, ekz. F *Mont Blanc* "Monto Blanka", A *Mount Everest* "Everest-monto". – Samtipa kun *font/o*, *pont/o*. ¶ Io =, IeIa *monte*.

Propr. "elstaraĵo", subst. de la radiko en L *e/min/ere* "elstari" (vd. *eminenta*), *mentum* "mentono" (vd. tiun), *minae* "murdentoj" (vd. *minaci*). De HE rad. **men-* "elstari"; kp spec. Ir *monadh* "monto". Samfamiliaj vortoj en Eo: *munti*, *promeni*, *promontoro*, ev. *marmoto*.

**MONTR/I** (f; Un): F *montrer*, I *mostrare*, (H *mostrar*); L *monstrare*. Bazita sur F; paŭsaĵo de L ne taŭgis, ĉar *monstr-* havas alian, internacian signifon. ¶ Io *montrar*, IeIa *monstrar*.

Orig. "indiki", der. de L *monstrum* "averta signo" (vd. *monstro*). Samfamiliaj vortoj en Eo: *demonstra/cio*, *-tiva*.

**MONUMENT/O** (f; RE): AFPoR *monument*, I(H) *-o*, G *Monument*; L *monumentum*. Ps-sf *-ment*.

Propr. "admonilo", der. de L *monere* "admoni", orig. "pensigi", kaŭzativa verbo de HE rad. **men-* "pensi" (vd. *menso*). Parencaj vortoj en Eo: *admoni*, *demonstra/cio*, *-tiva*, *monstro*, *montri*.

**MOPS/O** (f; RE): G *Mops*, PoR *mops*. ¶ Io =, Ie *mops*; Ia *dogetto** ('buldogeto').

Elipso de Nd *mopshond* s.s., propr. "grimac-hundo", kp A *mop* "grimaci".

**MOR/O** (f; RE): L *mos* (gen.: *moris*); F *moeurs* "-oj". Kp AF(H) *moral*, I *-e*, G *-isch* "(bon)mora". Bazita sur la L subst. (samtipa kun *flor/o*), sed internacie konata pro la adjektivo. ¶ Io =, IeIa *more*.

L *mos* "maniero; inklino, volo; moro, kutimo, tradicio" ne havas ekzaktan ekvivalenton ekster L; eble samradika kun A *mood* "animstato", G *Mut* "kuraĝo". Kp sekv.

**MORAL/O** (1; Ald): A(H) *mor/al*, FI *-ale*, Po *-alnos'c'*, R *-al'*, G *Moral*. Ps-sf *-al*.

Subst.-igo de la responda adj. (vd. sub *moro*), do propr. "mora (scienco)" el L *moralis* "mora", der. de *mo/s -ris* "moro"; kp L plur. *mores* "moroj, moralo".

**MORBIL/O** (f; RE): L med. *morbilli* (plur.); I *morbillo*. Medicina termino prenita el L. Singularigo en Eo, apenaŭ laŭ I, pli kredeble pro logiko (unu malsano). ¶ Io =, Ie *morbill/e*, Ia *-o**.

Propr. "malsaneto" (la plur. signifas la ruĝaĵojn, kp A *measles* plur., s.s.), dim. de L *morbus* "malsano", probable par. al *mordere* "mordi" (vd. tiun).

**MORD/I** (f; Un): F *mord/re*, I *-ere*, (H *-er*); L *mordere*. Kp A *mordant* "-a" (fig.). ¶ Io *mordar*, IeIa *morder*.

Probable par. al L *morbus* "(konsumanta) malsano" (kp *morbilo*), de HE rad. **(s)mer(d)-* "konsumi, frakasi", kp Sa *márdati* "premas, disfrotas"; Gr *maraínein* "konsumi" (kp *marasmo*); L *marcere* "esti velkinta", *mortarium* "pistujo" (vd. *mortero*); A *smart*, G *schmerzen* "dolori". (Kp ank. sub *morto*.)

**MORFIN/O** (1; Be): AF *morphine*, G *Morphium*, IPo(H) *morf/ina*, R *-ij* (kp *morfinist* "-isto"). Ps-sf *-in* 2.

Farita (komence de la 19a jc) el Gr *Morpheús* "Morfeo", nomo de la dio de la sonĝoj (pro la narkotaj ecoj de la substanco), der. de *morphê* "formo, figuro" (la dio do estas nomita laŭ la ensonĝaj aperaĵoj). Vd. *metamorfozo*.

**MORGAŬ** (f; Un): G *morgen*, A *tomorrow*. Kp Nd *morgen*, Sv *i morgon*. Bazita sur G, do ĝermandevena kontraste al *hieraŭ*, *hodiaŭ*; la romanaj ekvivalentoj riskus kolizii kun *man-*. ¶ 1894 *dimanu* (< F *demain*, I *domani*). ¶ Io *morge*; IeIa *deman*.

Propr. "je (la sekvanta) mateno" (kp ank. Gt *du maúrgina* s.s.): G *Morgen*, Nd *m-*, Sv *morgon*, ank. A (lit.) *morn*, *morrow* "mateno" (ĝerm. praformoj **murganaz*, **marganaz*,

eble par. al R *mrak* "mallumo").

**MORT/o** (f; Un): L *mors* (gen: *mortis*); F *mort*, I *-e*, (H *muerte*). Kp A *mortal* "-ema", G *Mord* "-igo", R *mërtvyj* "-inta". Prezentita kiel verbo; forme la radiko tamen sendube baziĝas sur la latin(id)a subst.; al la responda verbo mankas la fina *-t*: L *mori*; F *mourir*, I *morire*, (H *morir*). ¶ 1881 *mort-*. ¶ Io = (*mortar* "-i"), IeIa *morte* (*morir* "-i").

De HE rad. **mer-* "morti" (ofte kun *t*-sufiksoj), kp Sa *mriyáte* "mortas", *mrtá-* "-inta"; Gr *á-mbrotos* "senmorta" (kp *ambrozio*); L *mortuus* "-inta"; Li *mirti* "-i"; R *(u)meret'*, Po *(u)mierac'* "-i", SK *moriti* "-igi"; Gt *maúrths* "-igo". Etimologie identa: *murdo*; samfamilia ankaŭ *amortizi*. – La radiko estas supozeble praidenta kun **mer-* "konsumi", vd. *mordi*. (La responda semida radiko similas al la HE, vd. Cherpillod 1989, 37.).

**MORTER/O** (f; EG): A *mort/ar*, F *-ier*, (H *-ero*), G *Mörtel*; L *mortarium*. Radikfino *-er* laŭ F; kredeble Z rigardis tiun sufikssimilan silabon malpli neoportuna ol *-ar*, kiu povus kaŭzi misanalizon *mort/ar-*. ¶ IoIa =, Ie *mortre*.

Propr. "pistatajo": la cititaj AFHL formoj signifas ank. "pistujo", kp ank. G *Mörser* s.s.; de HE rad. **mer-* "frakasi" (vd. *mordi*).

**MORU/O** (f; Jü): F *morue*; L zool.† *Gadus morrhua*. La F kaj la L formoj donas la saman rezulton en Eo (ĉar *rh* > *r*, vd. ekz. *kataro*, *reŭmatismo*). ¶ Io =, Ie *morúe*, (Ia nur *gado*).

F vorto, eble ia der. de Gaŭla *mor* "maro".

**MORUS/O** (f; RE): L *morus* "-arbo" (kp *morum* "-o"); F *mûre*, I(H) *mora*, Po *morwa*; ank. A *mulberry* (*berry* "bero"), G *Maulbeere* (*Beere* "bero"). La Ea radiko kopias la L arbonomon, evidente laŭ L bot. *Morus nigra*; rimarku, ke *mor-* estis okupita de alia signifo. Konservita L nominativfinajo *-us*, vd. sub *fokuso*. ¶ Io =, Ie *morbere* (*bere* "bero"), Ia *mora*.

El Gr *móron* s.s. de necerta origino; kp Armena *mor* "rubuso".

**MOSK/O** (1; Jü): A *musk*, F *musc*, G *Moschus* [-sk-], I *muschio* [-sk-], R *muskus*, Po *mech*, (H *almizcle*); L *muscus*. Eo *-o-* (laŭ G, kp ank. sube la Gr originformon) por diferencigi la radikon disde *musk-* (homonima en IPoL). ¶ Io =, IeIa *musco*.

El Gr *móskhos* s.s. el Pe *muŝk* s.s., el Sa *muŝká-* "testiko" (la substanco estas sekreciata en glando, kiu similas al skroto), propr. "museto", dim. de *mûŝ-* "muso, rato" (vd. *muso*). Samfamilia vorto en Eo: *muskato*.

**MOSKE/O** (1; Jü; kp *meskit/o* E-isto 8/1893): A *mosque* [-sk], F *mosquée* [-ské], G *Moschee* [-ské], I *moschea* [-skéa], Po *meczet*, R *meĉet'*, (H *mesquita* [-sk-]). Konservo de la vortfina *e*, akcentata en FGI; tiel estas evitita kolizio kun la radiko *mosk-*. ¶ Io =, Ie *moské*, Ia *moschea*.

El Ar *masĝid* s.s., propr. "ejo kie oni sin sternas (por adori)", el loka prefikso *ma-* k *saĝada* "sin sterni, adorkliniĝi".

**MOSKIT/O** (8; Jü): A *mosquito* [-kí-], F *moustique* [-ík], G *Moskito*, (H *mosquito* [-kí-]). ¶ Io =, Ie *mosquit/e*, Ia *-o*.

Propr. "muŝeto", dim. de H *mosca* "muŝo" (vd. tiun).

**MOST/O** (f; EG): AR *must*, F *moût*, G *Most*, I(H) *mosto*, Po *moszcz*; L *mustum*. La radikvokalo varias inter *-o-* kaj *-u-*; estas malfacile diri, kial Z preferis la unuan. ¶ Io =, Ie *most*, Ia *musto*.

Orig. "juna, freŝa (vino)", subst.-igo de la L adj. *mustus* "nova, juna", orig. probable "malseka", samradika kun L *muscus* "musko" (vd. tiun). Samfamilia vorto en Eo: *mustardo*.

**MOŜT/O** (f; Un): Po *mos'c'* [mocĉ]. Eo transprenis la Po vorton en fonetike pli simpla formo: la duobla siblosono estas reduktita ĝis unu, ĉe kio la ortografio instigis Z enmeti *ŝ*-sonon. Bianchini (79) asertas internaciecon de la vorto, kunligante ĝin kun F *Monsieur*, Nd *Meester*, L *Maiestas* ktp. ¶ 1894 *honor-*. ¶ Neniu ekzakta ekvivalento en la aliaj L.I.;

kp Io *sinioro, monsinioro*; Ie *altess/e*, Ia *-a*. Sinkopo de Po *mil'os'c'* (ekz. en *Wasza Mil'os'c'* "Via Moŝto"), propr. "amo" (poste uzata kiel honora titolo), der. (per suf. *-os'c'* "-ec") de *mil'y* "kara" (kp R *milyj* "kara, agrabla", Ĉe *mily'* "kara"), radikparenca al L *mitis* "milda".

**MOTIV/O** (1; Cart 1903, Jü): A *mot/ive*, F *-if*, I(H) *-ivo*, R *-iv*, G *Motiv*, Po *motyw*. Ps-pf *-iv*.

El L mez. *motivum*, propr. "impulso, io ekmovanta (= inspiranta al ago)", subst.-igo de L mez. *motivus* "(ek)mova", adj. de *movere* "movi" (vd. tiun; kp spec. *lokomotivo*).

**MOTOR/O** (1; Jü; *mov/il/o* E-isto 12/1894): APoR(H) *mot/or*, F *-eur*, I *-ore*, G *Motor*. Ps-sf *-or* 1.

El L *motor* "movanto" (nuna senco ekde 19a jc), agantnomo de *movere* "movi" (vd. tiun).

**MOV/I** (f; Un): A *move*, F *mouvoir*, I *muovere* (kp *movibile* "-ebla"), (H *mover*); L *movere*. Vokalo laŭ L. ¶ 1881 *mov-*. ¶ Io *movar*, Ie *mo(v)er*, Ia *mover*.

L verbo kun radikformoj *mo(v)-* (prez.) k *mot-* (sup.) k der. *mobilis* "-ebla", par. al Sa *mîvati* "ŝovas". Samfamiliaj vortoj en Eo: *aŭtomobilo, emocio, loko/mobilo, -motivo, meblo, mobilizi, motivo, motoro*.

**MOZAIK/O** (2; RE): A *mosa/ic* [-z-], F *-ïque* [mozaík], I(H) *-ico* [I -z-], G *Mosaik*, PoR *mozaika*. Eo *-z-* laŭ la prononco de la plimulto de fontlingvoj. Ps-sf *-ik*. ¶ Io =, Ie *mosaic/a*, Ia *-o*.

I arttermino el L mez. *musaicum* s.s., aliigo (per sufiksŝanĝo) de L *musivum (opus)* "mozaiko", propr. "museca [t.e. artisma, fajnarta] (laborajo)", el Gr *mouseíos* "muz(ec)a", adj. de *Moúsa* "muzo" (vd. tiun, kp spec. *muzeo*).

**MUEL/I** (f; RE): A *mill*, F *moudre*, G *mahlen*, Po *mlec'*, R *molot'*, (H *moler*); L *molere*. Kp A *mill*, F *moulin*, G *Mühle*, I *molino*, Po *mlyn*, R *mel'nica*, (H *molino*) -ejo", L postkl. *molina* "-ilo". El tiuj du vortserioj Z ekstraktis unu verban radikon, dum la apartenanta subst. estis derivata per sufikso. La konsonantismo estas preskaŭ unuanima: *m-l* (ĉiuj fontlingvoj); la vokalismo tendencas al *-o-* (LFIR, ank. H). Sed *mol-* estis jam okupita de alia signifo, kaj Z ŝanĝis al *-ue-*, kredeble laŭ G *Mühle* en alternativa ortografio (*ue* = *ü*), vd. Waringhien LV 77. (En H ekzistas formo *muela* "muelŝtono"; tamen estas neprobable, ke ĝi povis influi Z). La ŝanĝo estas unika, sed ekzistas ekzemploj de la analoga ŝanĝo *e* > *ie*, vd. *hieraŭ*. ¶ 1894 *mulin-* 'muelil-'. ¶ Io *muelar* (espismo); Ie *mol/ar*, Ia *-er*.

Komuna eŭropa vorto, de HE rad. **mel-* "mueli", kp ank. Sa *mrnâti* "frakasas, muelas"; Gr *mylê* "muelilo", *mylôn* "-ejo"; L *mola* "muelŝtono"; Gt *malan* "mueli", A *meal*/G *Mehl* "faruno"; Li *málti* "mueli". Parenca vorto en Eo: *amelo*. Kp ank. *mola*.

**MUF/O** (f; RE): A *muff*, G *Muff*, Po *muf/ka*, R *-ta*. Kp Sv *muff*. Bazita sur G(A), eble kun apogo de F *moufle* [mufl] "mufganto". ¶ Io =, Ie *muffe*; Ia *manichetto*.

Pere de F *moufle* (vd. supre) el L mez. *muffula* "peltganto", supozeble latinigo de Fk **molfell* "mola felo" (kp tiujn).

**MUĜ/I** (f; RE): F *mugir* [-ĵ-], I *muggire* [-ĝ-], (H *mugir* [-ĥ-]); L *mugire*. Eo *-ĝ-* respegulas la molan prononcon en la latinidaj fontlingvoj. ¶ Io *mujar*, Ie *muir*, Ia *mugir*.

Bazita sur onomatopea silabo *mu*, kp ank. Gr *mykásthai* "muĝi", R *mycât'* s.s. Vd. sub *muta*.

**MUK/O** (f; RE): L *mucus*; AF *muc/us*, F *-osité*, I *-o*, (H *moco*, kp *mucoso* "-eca"). La science uzata L termino disvastiĝis en AF; oni atendus **mukus/o* laŭ LAF, sed la pli mallonga formo plifaciligas pluformadon. ¶ Io =, Ie *muc*, Ia *-o*.

Samradika kun L *e/mung/ere* "purigi la nazon"; kp ank. Gr *myxa* "(naz)muko", *mykês* "fungo" (HE rad. **mek-* "mukeca, ŝlima"). Parenca vorto en Eo: *meĉo*.

**MUL/O** (f; N-ro 15 1888, UV): A *mul/e*,

F *-et* (kp *-e* "-ino"), I(H) *-o*, G *Maultier* (*Tier* "besto"), Po *mul'*, R *mul*; L *mulus*. ¶ IoIa =, Ie *mul*.

Probable identa kun Gr dial. *mykhlós* "bredazeno", Ĉe *mezek* "mulo"; eble originanta en malgrandazio, kie la bredado de muloj unue estis praktikata.

**MULT/A** (f; Un): L *multus*; I *molto*, (H *mucho*), ank. P *muito*. Kp A *multitude* "multego". La L radiko estas plurlingve konata kiel kvazaŭprefikso, ekz. A *multi/coloured* "-kolora", F *-forme* "-forma", I *-lingue* "-lingva"; kp ank. la vortojn cititajn sub *multipliki*. ¶ 1881 *madz'-* (< A *much*). ¶ Io =, Ie *mult*, Ia *-e*.

L *multus* estas samradika kun *melior* "pli bona" (sem. evoluo: "abunda" > "forta" > "taŭga, bona") k par. al Gr *mála* "tre" (HE rad. **mel-* kun nocio 'abundo'). Samfamilia vorto en Eo: *multipliki*.

**MULTIPLIK/I** (8; Jü; antaŭe *mult/obl/ig/i*): A *multi/ply*, F *-plier* (kp AF *-plication* "-o"), G *-plizieren* (kp *Multiplikation* "-o"), (H *-plicar*), I *moltiplicare*; L *multiplicare*.

Propr. "multobligi", der. de L *multi/plex* "multobla" (> AF *-ple*, H *múltiple*, I *molteplice* s.s.), kunm. de *multus* "multa" (vd. tiun) k *-plex* de *plicare* "faldi" (vd. *kompliki* k plue *plekti*).

**MUMI/O** (1; RE; kp *mum-* Be): A *mummy* [-i], F *momie*, G *Mumie*,G HI *mummia*, Po *mumia*, R *mumija*. ¶ Io =, Ie *mumi/e*, Ia *-a*.

El Ar *mûmija* s.s., der. de *mûm* "vakso" (uzita ĉe balzamado), de persa origino.

**MUNICI/O** (1; Jü): AF *muni/tion*, I *-zione*, (H *-ción*), G *Munition*, Po *amunicja*. Ps-sf *-cio*.

F militista termino, el L *munit/io -ionis* "fortikigo", subst. de *munire* "fortikigi", der. de *moenia* "urba murego", samradika kun *murus* "muro" (vd. tiun).

**MUNT/I** (4; Jü): A *mount*, F *mont/er*, G *-ieren*, I *-are*, Po *-owac'*, R *-irovat'*, (H *-ar*). La fontlingvoj indikas *mont-*, kiu formo tamen estis bezonata por alia signifo; Z ŝanĝis al *munt-*, eble inspirita de A ortografio. La sama ŝanĝo *o* > *u* ankaŭ en *frunto* (pro *fronto*!) kaj *teruro*. ¶ Io *muntar* (espismo), Ie *mont/er*, Ia *-ar*.

Identa kun F *monter* "supreniri" (sem. evoluo: > "suprenlevi" > "altigi" > "konstrui, kunmeti, munti") el L vulg. *montare* "supreniri", der. de *mo/ns -ntis* "monto" (vd. tiun, kiu do estas etimologie identa).

**MUR/O** (f; Un): F *mur*, G *Mauer*, I(H) *muro*; L *murus*. Kp A *mural* "-a". ¶ 1881 *mur/o*.

El L ant. *moerus* [mój-], samradika kun L *moenia* "urba murego" (kp *municio*) k L *meta* "(cel)fosto", probable par. al Sa *methí-* "fosto".

**MURD/I** (4; Backman 1909,PV): A *murder*, G *morden*, Po *mordowac'*. Kp Sv *mord* [mu-] "-o". La *u*-vokalo ŝajne laŭ A (ebla estas ankaŭ vokalŝanĝo *o* > *u*, kp *munti*); *mord-* havis alian signifon. La rezulta *murd-* estas sufiĉe diferencigita de *mort-*, sencparenca radiko. ¶ Io *ocidar* (< L *occidere*), IeIa *assassinar* (< F *assassiner*).

Verbo der. de la responda subst. A *murder*, G *Mord* el pĜ **murtha-* (kp ank. Gt *maúrthr* "-o"), de HE rad. **mer-* "morti" kun *t*-sufikso: vd. plue la etimologie identan *morti*.

**MURMUR/I** (f; Un): A *murmur*, F *-er*, (H *-ar*), G *murmeln*, I *mormorare*; L *murmurare*. ¶ 1906a *murm/i*. ¶ IoIeIa *murmurar*.

Der. de L *murmur* "-o", duobligita onomatopea formaĵo (analoga duobligo en *barbar/o*, *susur/i*), kp Sa *mármara-* "murmura", Gr *mormyrein* "murmureti, brueti", Li *murménti* "murmuri".

**MUS/O** (f; RE): L *mus* (gen.: *muris*); A *mouse*, G *Maus*, Po *mysz*, R *myŝ*. Kp Sv *mus*. Bazita sur L (zoologia termino) kun ĝermana kaj slava apogo; kp ank. Gr sube. La Ea formo konservas la L nominativon, tie ĉi sendube pro konsidero al alilingvaj formoj (kaj por eviti homonimecon kun *mur/o*: Wüster Esp.

princ. 59). ¶ Io =, Ia *mus*, Ie *-e*.

Komuna HE vorto kun bazo **mûs*, kp Sa *mûs-*, Gr *mys*. Parencaj vortoj en Eo: *mosko* (kun *muskato*), *muskolo*, *mustelo*, ev. *marmoto*; *miogalo*, *miozoto*.

**MUSK/O** (f; RE): L *muscus*; A *moss*, F *mousse* [mus], G *Moos*, I *muschio* [-k-], Po *mech*, R *moh*, (H *musgo*). Botanika termino prenita el L; *-u-* estas apogata de FI, *-k-* de I. ¶ Io =, Ie *mosse*, Ia *musco*.

La ĝerm. (pĜ **musa-*) kaj slavaj formoj estas par. al L (HE rad. **mu-* "malseketa", kp *mosto*).

**MUSKAT/O** (f; RE): F *muscade* (kp *muscat* "-vino"), G *Muskatnuss* (*Nuss* "nukso"), I *mosc/ata*, (H *-ada*), Po *gal'ka* ('globeto') *muszkatol'owa*, R *muskatnyj oreh* ('nukso'). Kp A *muscat wine* "-vino". Kaj *-u-* kaj *-t-* reprezentas plimulton inter la fontlingvoj. Ps-sf *-at*. ¶ Io *muskado*, Ile *(nuce de) muscate*, Ia *nuce muscate* (*nuce* "nukso").

El L mez. *muscata (nux* 'nukso') s.s., de adj. *muscatus* "moskeca" (tiel nomita pro la odoro), der. de *muscus* "mosko" (vd. tiun).

**MUSKOL/O** (f; RE): L *musculus*; AF *mus/cle*, I *-colo*, Po *-kul'*, R *-kul*, G *Muskel*, (H *músculo*). Z probable deiris de la L formo (anatomia termino), ŝanĝante *ul* al *ol* por eviti sufikssimilan radikfinon (*musk/ul/o*!) kaj preventi misanalizon (*mus/kul/o*!); pri similaj ŝanĝoj, vd. sub *artikolo*. (Evidente Z ne atentis aŭ ne timis, ke ankaŭ la adoptita radiko permesas misanalizon: *mus/kol/o*). ¶ Io *muskulo*, Ie *muscul*, Ia *-o*.

Propr. "museto" (pro la simileco de certaj muskolaj moviĝoj al la kurado de muso), dim. de L *mus* "muso" (vd. tiun). Kp sem. Gr *mys* "muso; muskolo".

**MUSLIN/O** (f; RE): AR *muslin*, F *mousseline* [muslín], G *Musselin*, I *mussolina*, Po *mus'lin*, (H *muselina*). Ea formo sen la meza vokalo laŭ APoR kaj F prononco. Ps-sf *-in* 1. ¶ Io =, Ie *musselin/e*, Ia *-a*.

Der. de I *Mussolo* "Mosulo" (Ar *Maws'il*, urbo en Mezopotamio, kie la ŝtofo estis unue fabrikata).

**MUSTARD/O** (f; RE): A *mustard*, F *moutarde* [mut-], I *mostardo*, Po *musztarda*, (H *mostaza*); ank. G dial. *Mostrich*, *Mostert*. Bazita sur A. Ps-sf *-ard*. ¶ Io =, Ie *mostarde*, Ia *mustarda*.

Propr. "(io) mosteca" (preparate, la mustardo estis miksata kun mosto), latinida der. de L *mustum* "mosto" (vd. tiun).

**MUSTEL/O** (f; RE): L *mustela*. Zoologia termino prenita el L. Pluraj fontlingvoj havas (pro hazardo) en la koncerna nomo la konsonantojn *m-t*: A *marten*, F *martre*, I *martora*, (H *marta*) [kp ank. G *Marder*]; rimarku tamen, ke kaj *mart-* kaj *mard-* estis okupitaj de aliaj signifoj. ¶ Io *martr/o*, Ie *-e*, Ia *mustela*.

Kunmetita L vorto, kies unua elemento estas *mus* "muso" (en antikvaj tempoj musteloj estis uzataj kiel muskaptantoj); la dua elemento estas obskura.

**MUŜ/O** (f; Un; kp *muĉ-* N-ro 15 1888): F *mouche* [muŝ], I(H) *mosca*, Po *mucha*, R *muha*; L *musca*. Kp ank. Li *musê*. Bazita sur F prononco (analoga estas *buŝ/o* el F *bouche*); la radikformoj *mosk-* kaj *musk-* estis rezervitaj por aliaj signifoj. ¶ 1894 *muc-*. ¶ Io *musho*, Ie *mosca*, Ia *musca*.

Komuna HE vorto, kp ank. Gr *myia* "muŝo", G *Mücke* "kulo", Latva *muŝa* "muŝo"; bazo **mu(s)-* (imito de zumado?). Samfamilia vorto en Eo: *moskito*.

**MUT/A** (f; RE): A *mute*, F *muet*, I *muto*, (H *mudo*); L *mutus*. ¶ 1882 *mo/a* (< R *molča* "silente": PIV 5, 142). ¶ Io =, Ie *mut*, Ia *-e*.

El la onomatopea radiko *mu-*, signifanta neartikulitajn k nekompreneblajn sonojn ĉe kunpremitaj lipoj (kiel en L *muttire* "murmuri"); kp spec. Sa *mûka-* "muta". Kp sub *muĝi*.

**MUZ/O** (1; RE): AF *muse* [-z], G *Muse*, I(H) *musa* [I -z-], PoR *muza*; L *Musa*. Eo *-z-* (intervokala) laŭ la prononco de la plimulto de fontlingvoj. ¶ Io =, IeIa *musa*.

El Gr *moúsa* s.s., kun pridisputata etimologio. Samfamiliaj vortoj en Eo: *mozaiko, muzeo, muziko.*

**MUZE/O** (1; Be): A *muse/um* [-z-], I(H) *-o* [I -z-], F *musée* [-z-], G *Museum*, Po *muzeum*, R *muzej*. Pri Eo *-z-*, kp *muzo*. ¶ Io =, IeIa *museo.*

Pere de L *mus(a)eum* "loko konsekrita al la muzoj: biblioteko, akademio, muzeo aŭ sim." el Gr *mouseíon* s.s., orig. subst.-igo de adj. *mouseíos* "muza", der. de *moúsa* "muzo" (vd. tiun).

**MUZEL/O** (8; PVS; ne ĉe Z; antaŭe *buŝ/eg/o, naz/eg/o*): A *muzzle* [-z-], F *museau* (kp *muselière* "-ingo") [-z-], I *muso* [-z-]. Ŝajne bazita sur la F derivstemo (kp ank. *museler* "buŝumi"); paralela estas *nivel/o* el F *niveau* (*niveler* "niveli"). Influo de Io ebla. ¶ Io =, Ie *musel*, Ia *muso.*

Der. de L vulg. *musum* de nekonata origino.

**MUZIK/O** (f'; 1; RE): A *mus/ic* [-z-], F *-ique* [-z-], I *-ica* [-z-], G *Musik*, Po *muz/yka*, R *-ika*, (H *música*); L *music/a, -e.* Pri Eo *-z-*, kp *muzo.* Ps-sf *-ik.*

El Gr *mousikê (tékhnê)* "muza (arto): muziko, spirita kulturo, poezio", subst.-igita adj. der. de *moúsa* "muzo" (vd. tiun).

ETIMOLOGIA VORTARO DE ESPERANTO
VOLUMO 3: K – M

ISBN 91 85288 21 7